

HISTORIO de ESPERANTO- MOVADO EN ALBANIO

1907-2019

Eldonis :

Kompilis: Bardhyl Adem Selimi kaj Luan Adem Jaupi

Kunredaktis: Edmond Ludwig

Grafikis:

Sponsoris:

2019

1 Enkonduko

Antaŭ du jaroj, s-ro Luan Jaupi, unu el la plej elstaraj inter niaj agantoj, insistis ke ni kompilu kune Mallongan Historion de la Esperantista Movado en Albanio.



Ion similan, fakte, faris ĉirkaŭ la jaro 2000 ankaŭ s-ro Vasil Pistoli (jam forpasinta), eksa prezidanto de Albana Esperantista Asocio. Ekde tiam la vivo de nia asocio, fondita unuafoje printempe 1991, estas pliriĉigita notinde. Tial ĝisdatigita Historio estas des pli necesa. Intertempe alvenis la vivnotoj de multaj niaj malnovaj agantoj kiel:

S-ro Shaban Hasani, nuna prezidanto de Asocio,

s-ro Gjergji Gusho, unu el plej aĝaj membroj aktuale,

s-ro Dr. Engjëll Gusho,

s-ro Janko Pali (forpasinta) tra ties filo, Petraq,

s-ro Zef Mjeda (forpasinta),

s-ro Lazër Shantoja (forpasinta),

s-ro Cuk Simoni (forpasinta),

s-ro Hamdi Sulçebe (forpasinta),

s-ro Astrit Leka, la plej aĝa membro, ankoraŭ viva, ka.

Kaj certe de la kunaŭtoroj de Historio mem.

Malgraŭ nia peto, la fratoj Peraj (Agim kaj Bahri) ne konsentis doni siajn memoraĵojn, kvankam ilia agado estis frua kaj tre grava.

La Historio, kiun ni prezentas, estas malfermita libro, kompletigenda de pli nova generacio de albanaj esperantistoj, espereble pluekzistonta kaj plivastigonta nian movadon.

2 La esperantista idealo en la mondo kaj en nia lando

Esperanto estas “genieca sintezo” de la plej bonaj elementoj, ĉerpitaj de aro de lingvoj, ellaboritaj por ebligi la komunikadon inter la popoloj kaj etnoj kaj ties diversaj kulturoj. Dank’al ĝia preciza kaj regula strukturo, Esperanto lerneblas pli facile ol la aliaj naturaj lingvoj etnaj. Alie ol ili, ĝi ebligas nin interkomuniki laŭ egalaj pozicioj inter popoloj, ĉar ĝi apartenas al neniu etno. La uzado de ĉi tiu evoluciema lingvo estas proponita en la jaro 1887 de L.L. Zamenhof kaj trovas sin utila por granda lingva komunumo en 125 landoj de la mondo.

Uzante esperanton oni ne bezonas interpretistojn, tial la sciencistoj preferus ĝin en internaciaj konferencoj, kie gravas la ideoj kaj la enhavo de prelegoj kaj ne la nivelo de lingvaj scioj, kutime de la angla, franca aŭ alia.



La kriterioj por internacia lingvo estas:

Klareco laŭ la signifo, manko de vortoj dusencaj aŭ ne precizaj.

Travidebleco laŭ la strukturo. Kvazaŭa malesto de esceptoj.

Fonetika ortografio.

Optimala lernebleco.

Esperanto evitas homonimojn, vortojn samformajn, sed diverssencajn, kaj vortojn plenumantajn diversajn gramatikajn funkciojn, ne modifante ilin (ekzemple en la angla “round” kiu povas ludi rolon de nomo, adjektivo, adverbo, prepozicio aŭ verbo).

Esperanto signas la gramatikan rolon de la vortoj.

Sekve la analizo de propozicio estas pli facila kaj la signifo pripensita estas klara. Ĉiu el la 28 literoj de la alfabeto prezentas nur unu sonon. Tio ege ŝparas tempon en la lerneja studplano, la literumado bezonas malpli da tempo, kiel kutime tio okazas ĉe la aliaj lingvoj malpli fonetikaj kiel la angla kaj la franca.

Dank’al la supraj menciitaĵoj esperanto estas lernebla kaj uzebla de plimulto de mondaj popoloj: la lingva kapablo kaj la kosto ne prezentas barojn. La sukceso en la lernado de esperanto instigas al pli pozitiva sinteno por lerni plian lingvon.

Esperanto lerneblas ege facile, ĝiaj eroj pli defiaj ne malhelpas fruan progreson en la lernado. La esploroj montras, ke ĝi estas 8-10 oble pli facile lernebla ol aliaj lingvoj.

Esperanto naskiĝis - kiel centoj da aliaj projektoj de artefaritaj lingvoj ekde la pratempo - kiel helpa rimedo por reciproka komunikado inter nacioj kaj etnoj en la tuta mondo, kiel ŝirmilo al malutila

influo por aliaj lingvoj kaj kulturoj, kiam troas la influo de la lingvoj de grandaj nacioj, sed ankaŭ kiel faciligilo por interkompreniĝo. Ĝi pludivas nun ekde 142 jaroj! Kaj daŭre ĝi enradikiĝas en la memoro kaj la monda praktiko malgraŭ grandegaj baroj je karaktero politika, ideologia, ŝtata, religia, kultura, psikologia ka, kiujn ĝi alfrontis antaŭe.

Nuntempe, kiam ekzistas superŝtato kiel Eŭropa Unio, la bezono por komuna helplingvo ene de ĝi estas sentebla. Post eliro de Britio el EU, la angla perdis sian prestiĝon ene de EU, kvankam kiel ĉiu alia lingvo de la monda kulturo, la angla plurestos potenca komunika lingvorimedo. Sed Esperanto povas akceptiĝi, ĉar ĝi plenumas kelkajn miraklajn kondiĉojn:

- Ĝi estas neŭtrala rilate al nacioj
- Ĝi estas facile lernebla
- Ĝi leksike derivita el la eŭropaj lingvoj
- Ĝi povas servi pli bone kiel helpilo por lernado fare de studentoj de la aliaj naciaj lingvoj.

La unua metodika lernolibro de Esperanto aperis la 26-an de Julio 1887. Ĝia aŭtoro estas la kuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof el Bjalistoko (aktuale Pollando) kaj la nombro de ties sekvantoj pligrandiĝis rapidpaŝe, aparte en Eŭropo.



Bjalistoko hodiaŭ

La aŭtoro, doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof, uzis la leksikon de 20 eŭropaj lingvoj kaj inventis tre precizan kaj simplan gramatikan sistemon. Pro tio Esperanto tuj akiris multajn disĉiplojn, ankaŭ en la sino de la eŭropa elito, sed aparte en la vicoj de laboristoj, ĉar por ĝin ellerni, oni bezonis almenaŭ dekoble malpli da tempo ol por la ceteraj naciaj lingvoj.

Esperanto eniris en Albanion tra ties studentoj en Vieno, Parizo, Romo, ka. La unua probable estis Lazaro Shantoja, katolika pastoro, en la jaro 1907!

Krom s-ro Shantoja ĝin parolis ankaŭ aliaj pastroj kiel Mikel Koliqi kaj ties frato Vilhelm Koliqi, poste la tradukisto Cuk Simoni, la instruisto Janko Pali, la inĝeniero Ĉefo Fico, la medicinisto Hamdi Sulçebe, ka.

Post la Dua Mondmilito la enlanda movado vigliĝis. En la 1950-aj jaroj- ĉe la Ministrejo pri Konstruado naskiĝis klubo esperantista laŭ iniciato de s-ro Fico, al kiu aliĝis prof. Vasil Pistoli, la bibliotekisto Gafur Muço, la lingvistoj Emil Lefe kaj Miço Samara, la instruistoj Astrit Leka, Zef Mjeda ka. Post 1960 ankaŭ mi, la inĝenieroj Shaban Hasani, Agim Peraj kaj Bahri Peraj, Luan Jaupi, Rita Përmeti, la instruistoj Gjergji Gusho kaj ties frato, la medicinisto Engjëll Gusho, la

instruistino Enkela Xhamaj, la biologo Saimir Beqiraj, la instruisto Nehat Sokoli, la instruistino Klea Luli. Ankaŭ multaj aliaj ĉirkaŭbrakis la internacian lingvon.

La Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun sidejo en Roterdamo (Nederlando) disponas pri Biblioteko, Muzeo, Eldonejo, Ĝenerala Direktorejo. Ĝi konsistas el plurdekaj naciaj asocioj, organizoj junularaj, edukaj, artismaj, sciencaj, komercaj, religiaj, sportaj, etnokulturaj ks.

La revuo Esperanto, ĉiumonata, organo de UEA, legiĝas en almenaŭ 120 landoj. Ĉiujare okazas en alia urbo tra la mondo Kongreso de UEA (la unua okzis en Francio, 1905, la lasta en Finnlando (2019). UEA rilatas al UNESCO pro la fakto, ke ambaŭ organizoj sekvas kongruajn celojn, interalie pri edukado. Pro tio ĉi lasta aprecis la agadon de UEA per tri sinsekvaj rezolucioj.

Ĉiujare okazas Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI kaj de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo TEJO. AIS, la Akademio Internacia de la Sciencoj rolas kiel universitatnivela organizo, konsistanta el almenaŭ 50 profesoroj el diversaj landoj. La Akademio de Esperanto zorgas pri stabiligo kaj evoluo de la Lingvo Internacia, dum la Akademio Literatura de Esperanto promocias la beletron. Ĝis somere 2019 sukcese agadis la Organizo de Sciencaj Internaciaj Esperantistaj Konferencoj OSIEK.

UEA rete publikigas ĉiujare Jarlibron, kiu estas adresaro de ties membraro, filioj kaj kunlaborantaj organizoj.

Albana Esperantista Asocio estas agnoskita kiel neregistara organizo ekde majo 1991 fare de la Ministrejo pri Kulturo, dum en 2013 ĝi estas definitive registrita ĉe la Juĝejo de Tirana (laŭ decido n° 3503 je la dato 15/02/2013).

3 La unuaj albanaj esperantistoj

Laŭ studo de prof. Vasil Pistoli konfirmita de UEA, la albana unua esperantisto estis Dom Lazër Shantoja en la jaro 2007. Lin sekvis Mark Kakariqi¹, Cuk Simoni, Vilhelm kaj Mikel Koliqi, Ĉefo Fico, Janko Pali, Hamdi Sulçebe ka.

S-ro Ĉefo Fico enalbanigis poŝlibreton “Ŝlosilon de Esperanto”, dum s-ro Cuk Simoni kompilis mem originale en Esperanto historieton de Gjergj Kastrioti- Skënderbej, Nacia Heroo de Albanio, en 15 ĉapitroj, en alloga formo, aparte por junuloj. S-ro Janko Pali tradukis en la Internacian Lingvon verkojn el la grekaj klasikuloj.

En la dokumentoj de UEA, laŭ s-ro Luan Jaupi, estas savitaj la jenaj datumoj pri ties albanaj delegitoj kaj ilia agado.:

- Jubilea Jarlibro, jaro 1937
- Lazar Shantoja, Scutari 1893

“Albana Ŝlosilo”, verkita de Ĉefo Fico en 1926,

- Jarlibro 1926

Albanio- Lazër Shantoja en Scutari 1913


- Jarlibro 1920

¹ Laŭ s-ro Zef Mjeda la unua estis mem Mark Kakariqi

- Cuk Simoni
- Jarlibro 1930
- Cuk Simoni
- Jarlibro 1931
- Janko Pali- instruisto en Qeparo (Himara), kie oni produktas olivoleon- membrokarto n° 37110
- Cuk Simoni- komercisto en Tiranë, çefurbo
- Jarlibro 1932
- Janko Pali
- Cuk Simoni- kompilis kaj eldonis la libron "Skanderbeg- Heroo de Albanujo", 144 paĝoj, 1929, Shtypshkronja Komtare, kun enkonduko de Miloš Lukaš
- Janko Pali verkis artikolon por Internacia Pedagogia Revuo 1933, "Albanujo kaj ĝia skolo"


En la libro de Th. Kilian: Verbnica a ĉitanka v BRNE 1933, oni raportas jene:

La rakonto "La sprita albana kadio" (albana popola rakonto); la reportaĵo "Albanoj en Trieste" publikigita en Heroldo de Esperanto, n° 15 1991 kaj Eta Gazeto n° 9 1991



La unua Esperanto-lernolibro en Albanio estis verkita en la jaro 1928.

Tiutempe oni nombris 6 esperantistojn, en Albanio.



Albanio en la Jarlibro 2018

- **La dokumento el la jaro 1922**

La albanaj tiutempaj registaroj subtenis esperanton. En la Centra Ŝtata Arkivo estas trovita atestaĵo pri tio. Per dokumento de la Ministrejo pri Edukado el la jaro 1922, oni raportis al Konsilio de Ministroj:

“pri konferenco okazonta en Ĝenevo, Helvetio, pri lernado de la lingvo Esperanto en la lernejoj. En tiu konferenco estis reprezentitaj 16 registaroj kaj 28 edukaj aŭtoritatoj el diversaj ŝtatoj. Partoprenis ankaŭ nia ministrejo. La konferenco decidis alvoki al ĉiuj mondaj ŝtatoj postulante ke la lernado de Esperanto estu deviga en la ŝtataj lernejoj. Per oficiala letero sendita de la Sekretariejo de la Konferenco oni petas, ke ankaŭ nia ministrejo subskribu la rezolucion de la Konferenco. Do ni petas, ke tiu afero priesploriĝu fare de nia Konsilio de Ministroj.”

Subskribis: la ministro pri edukado, Rexhep Mitrovica




Rexhep Mitrovica kaj la Ligo de Nacioj, Ĝenevo, Xhafer Ypi (ĉefministro)

Alkroĉite estas la konfirmo fare de la ĉefministro Xhafer Ypi, kiu pravigas, ke la ministro Mitrovica subskribu “la decidon je la nomo de la albana ŝtato”.

- En la jaroj 50 kaj 60 de la XX-a jarcento elstaras Astrit Leka, Vasil Pistoli, Zef Mjeda, Stathi Qehaef, kiuj starigis lernokursojn kun siaj gelernantoj. Zef Mjeda komencis traduki esperanten la “Ciklon de Bravuloj” kiel la “Klasikajn Albanajn Fabeloj-n”. Plue, li kompilis “Vortaron Albana- Itala- Esperanta” kun proksimume 30 mil vortoj. Sciigās, ke kelkaj inter niaj studentoj en la eksaj socialismaj landoj, inter ili artistoj, inĝenieroj, ankaŭ militistoj, ekzemple s-ro Adem Jaupi, patro de Luan Jaupi, el Durrēs, eklernis esperanton kaj uzis ĝin dum sia vivo kaj vojaĝoj. Same en internaciaj festivaloj aŭ kunvenoj. Tiutempe esperanton eklernis ankaŭ la aŭtoroj de ĉi tiu libro, same la aktuala prezidanto de nia Asocio, inĝ. Shaban Hasani, fratoj Gjergj kaj Engjëll Gusho, s-ro Gafur Muço, fratoj Agim kaj Bahri Peraj, ka.

En la jaro 1958 en kelkaj fakultatoj de la Universitato de Tirana kaj en la Altlernejo Agrikultura oni disdonis broŝurojn kun lecionoj de Esperanto, same la “Ŝlosilon de Esperanto” por albanoj, kompilita de inĝ. Çefo Fico. En la Ministrejo pri Konsstruado fondiĝis neoficiala Esperanto-klubo kun kolegoj de sinjoroj Fico kaj Pistoli, kiu radiigis la lingvon tra la universitataj medioj kaj eĉ pli vaste. S-ro Vasil Pistoli esperantigis libreton pri “Skënderbej- nacia heroo de albanoj”, el la originala albanlingva libro de prof. Kristo Frashëri kaj dubligis esperanten dokumentaran filmon pri la urbo-muzeo de Gjirokastër.



Profesoro Kristo Frashëri

La 3-an de aprilo 1991 subskribiĝis kunlabora interkonsento de nia asocio kaj tiu de Makedonio. La subskribintoj estis Luan Jaupi kaj Usni Zemovski.




Usni Zemoski meze, Luan Jaupi dekstre

№ Viti	Organi	Titulli	Autori
1/1984	Shkenca dhe Jeta	Gjuha Esperanto	Gj.Gusno
12/1988	Horizonti	Esperanto gjuhë ndërkombëtare	L.Jaupi
10/1988	Horizonti	Esperanto dhe Esperantizmi	M.Senara
13.03.1988	Bashkimi	Pasioni i një 90-vjeçari	V.Qeteri
21.04.1988	Adriatiku	Gjuha Esperanto	L.Jaupi
6-7/1988	Ylli	Esperanto dhe Esperantizmi	M.Senara
10/1989	Horizonti	Volspaku, Esperanto apo ndonjë gjuhë tjetër	L.Jaupi
14.06.1989	Zëri i Rinisë	Qëndrë Esperanto	L.Jaupi
16.12.1990	Adriatiku	Shpresa e Esperantos	A.Shqeri
12.05.1991	Adriatiku	Heavy Metal drejt një Esperantoje muzikore	F.Nasto
05.05.1991	Adriatiku	Esperanto në shpëtoi jetën	L.Jaupi
01.12.1991	Bashkimi Kombëtar	Esperanto, gjuhë Ndërkombëtare	S.Mirxhoni
12/1992	Adriatiku	Vepërimiti të Esperantistëve	L.Jaupi
4/1992	Adriatiku	Konsolidim i Esperantizmit në Shqipëri	L.Jaupi
7-14.03.1992	Adriatiku	Shqipëria "Internacionaliste" nuk pranon...	L.Jaupi
14.02.1992	Mësuca	Mësuca dhe Esperantist	M.Gaku
29-5.06.1993	Adriatiku	Buletin i Esperantistëve Durrsakë	Shqete e Durr
01.08.1993	Bashkimi	Gjuha Esperanto në Shqipëri	L.Jaupi
		Kuraz për njohjen e Esperantos	L.Jaupi

Artikoloj en la albana gazetaro pri esperanto

4 La unuaj eldonoj en Esperanto en Albanio

Ĝis nun sciatas, ke la unua eldono en Esperanto en Albanio estis la libro “Gjergj Kastrioti-Skanderbeg- Heroo de Albanujo”, presita en la eldonejo Gutenberg, Tirana, 1929. La libro estis verkita originale en Esperanto de s-ro Cuk Simoni per fluanta kaj riĉa lingvo kaj ĝi cirkulis tra Eŭropo kiel vera “gvidilo” pri albanoj en la medioj de esperantistoj.



La originalo en Esperanto kaj ties traduko en la albana


Dum la unua libretto en estis “La ŝlosilo de Esperanto” de s-ro Ĉefo Fico en la jaro 1928. Sendube ekzistis ankaŭ pli fruaj eldonaĵoj, eĉ manuskribitaj, sed ni ankoraŭ ne trovis ilin.

5 Niaj esperantistaj martiroj

La unua esperantisto, sed samtempe la unua martiro nia, estas Dom Lazër Shantoja. Lin mortpafis komunistoj printempe 1945, post kiam ili lin torturis ĝisoste. Kial? Eble ne pro la lingvo, sed pro ties verkaĵoj multaj, ankaŭ politikaj, kiuj ne plaĉis al la novaj regantoj. Ankaŭ pro ties religieco.



Laŭ donitaĵoj provizitaj de s-ro Luan Jaupi, eksa instruisto en Durrës, s-ro Stathi Qehaef, mortis en la politika fifama prizono de Burrel laŭ misteraj cirkonstancoj en la jaro 1972. Plej probable, lia korespondado kun esperantistoj el aliaj landoj kaŭzis suspektojn pri “spionado” ĉe iuj organoj pri ŝtata sekureco. Lin oni akuzis esti spiono de eksa Germana Demokratia Respubliko.



Maldekstre s-ro Stathi Qehaf, dekstre s-ro Luan Jaupi

Multaj albanaj esperantistoj estas spionitaj, “konsilitaj”, fare de sekurecoj pro Esperanto-agado. Ni povas mencii s-rojn Zef Mjeda, Vasil Pistoli, Shaban Hasani ka.

6 Disvastiĝo de Esperanto dum la sepdekaj kaj okdekaj jaroj.

La disiĝo de Albanio disde la “Socialisma Tendaro”, komence de la sesdekaj jaroj, malpliigis la eblecojn por kontaktoj kun fremdaj esperantistoj. Sed ĝis la fino de la sepdekaj jaroj, tamen daŭre eniris Albanion eldonaĵoj en Esperanto el Popola Ĉinio, Vjetnamio, Laoso. La revuo “El Popola Ĉinio” kaj “Vjetnamio antaŭenmarŝas” venadis regule. Radio Pekino Internacia elsendis ĉiutage novaĵprogramon ankaŭ en Esperanto. Kompreneble Esperanton en Ĉinio aŭ Vjetnamio la tieaj komunismaj reĝimoj utiligis kiel propagandilon. La kompletaj verkoj de Maŭ Ze Dong aperis ankaŭ en Esperanto, same la “Ruĝa Libro” dum la Kultura Revolucio en Ĉinio. Simile la “Taglibro en la prizono” de Ho Ĉii Min. Tiaj eldonaĵoj disdoniĝis senpage! Sendube tio tenis iel vigle la soifon al Esperanto malgraŭ la severa spionado fare de la partiaj kaj sekurecaj organoj. Kelkajn revuojn kiel MONATO kaj ESPERANTO, aperintajn en Belgio kaj Nederlando, ricevis regule ankaŭ s-ro Ĉefo Fico kaj s-ro Zef Mjeda, kiuj skribis en ili novaĵojn el Albanio. Same oni intersanĝis poŝtkartojn. Kelkiuj el ni, ekzemple s-ro Luan Jaupi, estis enskribita en la delegitaro de UEA.

S-ro Ĉefo Fico tradukis la poemon de Andon Zako (Ĉajupi) titolitan “Veploroj” kaj aliajn verkojn. Estis entreprenitaj iniciatoj fare de fremdaj esperantistoj, francaj kaj kroataj, por establi rilatojn kun landaj esperantistoj per siaj vizitoj al Albanio kiel turistoj. Tiel, laŭ rakontoj de s-ro Luan Jaupi, li

estis vizitata de sinjorino el Francio, Louise Marin kaj poste li mem sendis garantiilon al la kroatino Spomenka Štimec el Zagrebo, kvankam ĉi lasta ne sukcesis akiri la albanan vizon.


7 La neregistara esperantista Albana Esperanto- Ligo

Dum la printempo de la jaro 1991 realiĝis la unuafoja enskribiĝo de Albana Esperanto-Asocio kiel neregistara organizo fare de la Ministrejo pri Kulturo. Tion iniciis la sinjoroj Vasil Pistoli, Gafur Muço, Zef Mjeda, fratoj Peraj, fraŭlino Donika Kapollari, s-ro Janko Pali, s-ro Luan Jaupi, s-ro Bardhyl Selimi (Mezini), s-ro Shaban Hasani, s-ro Tonin Çobani ka.



La unuaj lernokursanoj de Esperanto en Durrë en la lernejo “7 Nëntori” kaj poste en la gimnazio “Gjergj Kastrioti”

Nun jen kelkaj taglibraj notoj, savitaj de s-ro Vasil Pistoli kaj faritaj dum jaroj 1991-1995 pri la agado de Albana Esperanto-Ligo



La taglibreto de prof. Vasil Pistoli

Okazintaĵoj en AEL (Albana Esperanto-Ligo) kaj AEI (Albana Esperanto-Instituto)

1991


Marto 1992 - fondiĝis AEL laŭ decido de Komitato pri Kulturo kaj Artoj, nr 3 dato 9-a de marto 1991

Fondintoj

Gafur Muço, Vasil Pistoli, Rita Përmeti, Luan Jaupi kaj Shpëtim Idrizi

Ekde la 29-a de julio ĝis la 18-a de aŭgusto 1991 Gafur Muço kaj Luan Jaupi vizitis E- Asocion de Triesto.

Julie 1991 aperis la revuo Albana Esperantisto, enkonduka numero.



De la 24a ĝis la 29-a de septembro 1991 Vasil Pistoli vizitis Bulgarion invitita de Bulgara Esperanto-Asocio

Oktobre 1991 aperis la Lernolibro pri Esperanto (Libër mësım i gjuhës Esperanto) de Vasil Pistoli, je 1000 ekzempleroj.

La 20-an de oktobro 1991 estas akceptita la Statuto de Albana Esperanto-Asocio

Decembre 1991 aperis la libreto "Asdreni- Versaĵoj" je 1000 ekzempleroj.

Decembre 1991 aperis "Albana Esperantisto" nr 1

Je 23-an de decembro 1991 fondiĝis Albana Esperanto – Instituto, kiu estis registrita ĉe la Ministrejo pri Kulturo, Junularo kaj Sportoj.

En la seminario "Ameriko- ĉu 500 jaroj da civilizacio aŭ koloniismo" (en Germanio), la 20-an de decembro 1991, partoprenis Gentian Selimi (Mezini), delegito de AEL.



Gentian Selimi (Mezini) en Germanio

La 26-an de januaro 1992, dum la kunveno de la estraro de AEL okazis ŝanĝiĝoj.

Anstataŭ s-ro Vasil Pistoli enposteniĝas Bardhyl Mezini (Selimi) kaj anstataŭ Shpëtim Idrizit enposteniĝas Engjëllushe Gjirkodhima.

Membroj de AEI estas

Vasil Pistoli - direktoro

Miço Samara - membro

Skënder Doku - membro

Janko Pali - membro

Zef Mjeda - membro

Gjergji Gusho – membro

Agim Peraj - membro

Shaban Hasani - membro

La 11-an de februara 1992, je la 16a-30, Radio Tirana elsendis pri esperanto (konversacio de radio-korespondanto kun Bardhyl Mezini kaj Miço Samara)

De la 6-a de marto ĝis la 13-a de marto 1992 vizitis Bulgarion s-roj Gafur Muço kaj Enver Rezhda. Tie ili subskribis kulturen interkonsenton.

De la 19-a de aprilo ĝis la 10-a de majo vizitis denove Bulgarion s-ro Gafur Muço.

La 5-an de majo 1992 Vasil ricevis membrokarton de UEA kun individua membrokodo vapi-z.

Julie 1992 Vasil ricevis membrokarton ankaŭ de ISK (Internaciaj Sciencaj Konferencoj) de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj). Li estis membrigita tie ekde la 7-a de aprilo 1992.

La 15-an de decembro 1992, okaze de la Zamenhof-tago, s-ro Vasil Pistoli prelegis antaŭ la profesoroj kaj studentoj de la Fakultato pri Fremdaj Lingvoj.

La 20-an de decembro 1992

Eksterordinara kunveno de AEL.

Partoprenis 20 personoj

Oni elpostenigis la AEL-estraron.

Nova estraro

Vasil Pistoli - prezidanto

Bardhyl Mezini – membro, komisiita pri internaj aferoj

Luan Jaupi – membro, komisiita pri eksteraj aferoj

Rita Përmeti - sekretario

Suela Koro - librotenisto

Lydra Hasa – komisiita pri lernokursoj kun gejunuloj

La 24-an de decembro 1992 s-ro Gafur enmanigis parton de stoko de libroj

La 5-an de februaro 1993 okazis Intervjuo en la Ŝtata Albana Televizio, je la 14-a 15, en la rubriko “Satelit Mirdita” kun s-ro Vasil Pistoli.

La 11-an de februaro 1993

Malfermiĝis “Lernokurso de Esperanto” en la Fakultato pri Fremdaj Lingvoj, kie aliĝis 78 gestudentoj en du grupoj, gviditaj de Vasil Pistoli kaj Bardhyl Mezini.

La 12-an de februaro 1993 komenciĝis lecionoj. Ĉiun lundon kaj vendredon kun Bardhyl kaj ĉiun mardon kaj ĵaŭdon kun Vasil, je la 15-a horo.

La 11-an de marto 1993 komenciĝis lernokurso en la Pedagogia Mezlernejo, en du grupoj gviditaj de Zamir Gjurgji kaj Artur Kondaj.

La 15-an de marto 1993

Komenciĝis lernokurso en la Fremdlingva Mezlernejo, en du grupoj gviditaj de Vasil kaj Bardhyl.

La 30-an de marto 1993

Vasil Pistoli finis la lernokurson, la ekzameno okazis la 22-an de aprilo 1993

La 31-an de marto 1993

Bardhyl finis la lernokurson, ekzameno okazis la 22-an de aprilo 1993.

La 14-an de aprilo 1993

Radio-Tirana en la rubriko “Demandoj-Respondoj” aranĝis intervjuon kun s-ro Vasil Pistoli kaj vicdekano de la Fakultato pri fremdaj lingvoj pri la internacia lingvo Esperanto.

La 22-an de aprilo 1993

Okazis ekzameno pri Esperanto en la Fakultato pri fremdaj lingvoj. Partoprenis 28 gestudentoj.

Atestilojn oni disdonis la 27-an de aprilo 1993

La 27-an de aprilo 1993

Oni liveris atestilojn al la partoprenintoj en la Esperanto-ekzameno, en la Fakultato pri fremdaj lingvoj.

1. Denada Harizi (el lingvistika fako)
2. Anila Muharremi (el naturaj sciencoj)
3. Ruzhdie Sala (el lingvistika fako)

4. Nikoleta Dyrmishi (el lingvistika fako)
5. Alketa Sula (el lingvistika fako)
6. Nikë Boçi (el naturaj sciencoj)
7. Servete Kuloçi (Shkencat e Natyrës)
8. Nikolla Kola (el naturaj sciencoj)
9. Sajmir Beqiraj (el naturaj sciencoj)
10. Ornela Demiri (el naturaj sciencoj)
11. Eva Puleri (el naturaj sciencoj)
12. Brunilda Ajasllari (el fremdlinga fako)
13. Maeda Ikonomi (el fremdlingva fako)
14. Migena Ikonomi (el fremdlingva fako)
15. Gentian Ymeri (el tekstila mezlernejo)
16. Artur Doçi (el gimnazio de Rrenz, Shkodër)
17. Julian Sokollari (el tekstila mezlernejo)
18. Jetmir Nikolla (el lingvistika fako)
19. Vasilika Dini (el Informadika Centro)
20. Skriton Çausllari (el historia fakultato)
21. Dritan Caka (el fremdlingva fako)
22. Drini Zollota (el lingvistika fako)
23. Kozeta Dajlani (el historia fako)
24. Alketa Lloshi (el historia fako)
25. Segjit Bodinaku (el historia fako)
26. Maria Zhuli (el fremdlingva fako)
27. Leonora Kaloçi (el medicinista fako)
28. Valbona Myrtaj (el fremdlingva fako)

La 15-an de majo 1993

Okazis ekzameno kun lernokursanoj de la Fremdlingva Mezlernejo en Tirana, el la Pedagogia Mezlernejo kaj el la urbo Durrës, entute 49 personoj. Partoprenis ankaŭ aliaj personoj krom tiuj el la ĉi menciitaj lernejoj.

1. Armand Frangu (Naturaj Sciencoj)
2. Manila Selimi (Kuracistino)
3. Ornela Doni (Fremdlingvoj)
4. Kaleme Simanaqi (Apotekistino)
5. Spartak Rogozhina (Laboristo)
6. Darwin Doksani (Senlaborulo)
7. Diana Jaupi (Senlaborulo)
8. Suela Gjepali (Lernanto)
9. Vadjola Loç (Lernanto)
10. Denis Hasa (Lernanto)
11. Majlinda Grashi (Oficistino)
12. Besnik Duro (Lernanto)

13. Adele Pleqi (Juristo)
14. Aljona Zeqiri (Fremdlingvoj)
15. Teuta Duro (Fremdlingvoj)
16. Florinda Fejza (Fremdlingvoj)
17. Alda Tola (Fremdlingvoj)
18. Flamur Duqi (Pedagogio)
19. Laureta Selmani (Fremdlingvoj)
20. Valbona Qose (Fremdlingvoj)
21. Etleva Hasimja (Naturaj Sciencoj)
22. Diana Gaçe (Pedagogio)
23. Suela Korra (Ekonomia Fakultato)
24. Engjëllushe Xhabafti (Pedagogio)
25. Manela Preçeta (Pedagogio)
26. Erjona Mëhilli (Pedagogio)
27. Lulzime Telhaj (Pedagogio)
28. Rezarta Puro (Pedagogio)
29. Behar Sallaku (Pedagogio)
30. Eliamonda Cacollari (Fremdlingvoj)
31. Etleva Muça (Fremdlingvoj)
32. Etleva Kurti (Fremdlingvoj)
33. Sonila Zeneli (Fremdlingvoj)
34. Diana Veleshnja (Fremdlingvoj)
35. Arta Alla (Lernanto)
36. Zamira Dollani (Fremdlingvoj)
37. Festjana Tartari (Fremdlingvoj)
38. Luljeta Xhoja (Fremdlingvoj)
39. Diana Tase (Ekonomia Fakultato)
40. Enkela Xhamaj (Fremdlingvoj)
41. Blerim Qose (Fremdlingvoj)
42. Arianit Bërdufi (Fremdlingvoj)
43. Dhurata Metohu (Instruistino, direktorino)
44. Iliriana Sykja (Instruistino)
45. Liliana Mema Instruistino)
46. Gazmend Leçini (Fremdlingvoj)
47. Ermira Papadhopulli (Instruistino)
48. Rozeta Koçi (Lernanto)
49. Donika Pleqi (Kuracistino)

La 21-an de majo 1993 oni liveris atestilojn.

La 15-an de junio 1993

Ekzameno kun 21 lernokursanoj de la grupo de Zamir Gjurgji ka.

1. Vjollca Islami (Kuracistino)
2. Besnik Duro (Lernanto)
3. Armand Frangu (Lernanto)
4. Sanie Tusha (Instruistino)
5. Sidrit Tusha (Lernanto)
6. Vasilika Xhaxhe (Lernanto)
7. Seit Zeqiri (Lernanto)
8. Bardhyl Dusha (Elektromekanikisto)
9. Piro Karajani (Lernanto)
10. Silvana Karajani (Lernanto)
11. Elton Kondi (Lernanto)
12. Alket Koka (Lernanto)
13. Arjan Ulqinaku (mekanikisto)
14. Ariana Lokaj (Lernanto)
15. Zamir Gjurgji (Instruisto)
16. Mario Preçeta (Lernanto)
17. Ervin Baku (Lernanto)
18. Arben Lita (Lernanto)
19. Benjamin Tërshana (Ekonomia Fakultato)
20. Nohlel Fico (Pedagogio)
21. Artor Kondaj (Lernanto)

La 10-an de oktobro 1993

Junulara kunveno en Durrës (okazis disputoj)



La 22-an de januaro 1994

Fondiĝis Studenta Esperanto Grupo en Durrës

Prezidanto: Arben Zenuni (Lagjia Popullore, Rr Rexhep Keçi p.88 Shijak)

La 25-an de januaro 1994

Laŭ la petletero sendita la 18-an de januaro 1994, (en la kunsidoj okazantaj ĉiun mardon je la 15a-30), AEL akceptiĝas kiel membro de la Forumo de la Neregistaraj Albanaj kaj Fremdaj Asocioj agantaj en Albanio (NGOS) ĉe la Sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Tirana.

Kunordiganto - Artan Spahiu

La 4-an de marto 1994

Okazis ekzamenoj por la dua nivelo de Esperanto-scio

1. Zamir Gjurgji
2. Arianit Berdufi
3. Alda Tola
4. Aljona Zeqiri
5. Gazmend Leçini
6. Sajmir Beqiraj
7. Ornela Demiri
8. Ornela Doni
9. Migena Ikonomi
10. Maeda Ikonomi
11. Blerim Qose



La progresinta lernokurso en la Fremdlingva Mezlernejo en Tirana

La 12-an de marto 1994

Okazis ekzameno kun lernantoj de la gimnazio "Sami Frashëri" en Tirana

1. Iris Petrela
2. Sonila Cara
3. Adriana Tolka
4. Johana Karapataqi
5. Majlinda Bime
6. Eugen Dautllari
7. Jonida Halili
8. Silvana Malaj
9. Pranvera Guranjaku (mësuese)
10. Ermal Myftiu
11. Julian Zonja

12. Artan Duka



Albana Bime kaj Alda Tola dum la ekzameno pri esperanto

La 24-an de marto 1994

Okazis ekzameno por la dua nivelo de Esperanto-scio:

1. Gentian Ymeri
2. Julian Sokollari
3. Sanie Tusha
4. Artur Doçi (perkoresponde)

La 30-an de aprilo 1994

Dua elsendo ĉe la Ŝtata Albana Televizio pri Esperanto en la rubriko "Satelit Mirdita" je la 13-a horo.

Oktobro 1994

Televizia elsendo pri Esperanto aranĝita de la organizaĵo de esperantistaj junuloj (Zamir Gjurgji)

La 8-an de februaro 1995

Televizia elsendo: intervjuo kun Vasil kaj Bardhyl je la 17- 17-30-a horo, pri AEL kaj la libro de Bruno Vogelmann "Nova Realismo".

La 27-an de aŭgusto 1995

Shëngjin

Nacia Kunveno okaze de finiĝo de la estrara mandato 1993-1995. Raporto pri trijara periodo.

Novaj elektoj

Agim Peraj - prezidanto

Luan Jaupi - membro

Bahri Peraj - membro


Denis Hasa - membro

Mimoza Bunjaku - membro

Alda Tola - membro

Artur Doçi- membro

Honora prezidanto - Vasil Pistoli



Intertempe s-ro Zef Mjeda kompilis Metodon de Esperanto. Ĝi estis lernolibro kun dulingva vortareto. Sekvis alia Metodo fare de s-ro Vasil Pistoli kompletigita per kvinlingva vortareto laŭ la Unua Libro de Esperanto de Zamenhof. S-ro Gafur Muço instalis en sia hejmo multobligilon, per kio li presis kelkajn tradukaĵojn el la albana al Esperanto, same modestan revuon.




Ibrahim Xhamaj, Enkela Xhamaj, Donika Kapollari, Gafur Muço kaj Bardhyl Selimi (Mezini)




Bardhyli, Enkela Xhamaj kaj Donika Kapollari

Ni eldonis libreton kun poeziaĵoj de Enkela Xhama en Esperanto, samkiel sociologian verkon de Bruno Vogelmann “La Nova Realismo”.



La revuo “Albana Esperantisto” kaj numero de “La Ponto”, aperigita de s-ro Agim Peraj



Aliaj numeroj de “Albana Esperantisto”

Aprile 1993 fondiĝis la Albana Sekcio de la Internacia Esperantista Instruista Ligo (ILEI). Ĉi lasta ebligis la venigon de tri albanaj junaj essperantistoj (Mimoza Bunjaku, Zamir Gjurgji kaj Majlinda Grashi) al Svisio (La Chaĝ-de-Fonds) por partopreni trisemajnan seminarion. Tiutempe prezidanto de ILEI estis s-ro Stefan McGill, la sekretario fraŭlino Marija Beloŝeviĉ. En Svisio pri ili zorgis s-ro Andy Kuenzli.



Stefan MacGill kaj Andreas Kuenzli

Grupo de junaj esperantistoj el Tirana kaj Durrës entreprenis ekskurson kelktagan al Vraca (Bulgario), kie ilin akceptis s-ro Lubomir Trifončovski (forpasinta).

Estis starigitaj la unuaj lernokursoj en la Ŝtata Tirana Universitato, en mezlernejoj kaj elementaj lernejoj, kiel estas menciite pli supre.

La lernokursoj stariĝis ankaŭ en Durrës, Lezhë, Pogradec kaj Kukës. Somere 1994, grupo de abiturientoj el la gimnazio “Sami Frashëri” de Tirana entreprenis unusemajnan ekskurson al Zagrebo (Kroatio), kie ilin akceptis fraŭlino Marija Beloŝeviĉ kaj la tiea albana komunumo.



Marija Beloŝeviĉ, la dua maldekstre, Zagrebo, 1996

Alia ekskurso al Kroacio okazis de grupo de gelernantoj el la Tutnacia Hotelumada kaj Turisma Mezlernejo de Tirana, somere 1996.

La jaro 1997 notis novan evoluon: la altlernejo pri Turismo kaj Internacia Kulturo (ISKT) en Bydgoszcz (Pollando) gvidata de s-ro Andrzej Grzębowski (forpasinta) akceptis 15 abiturientojn el Albanio. La altlernejo funkciadis laŭ la Bologna edukstemo 3+2. Ĝi uzis ankaŭ esperanton kiel laborlingvon preter la pola kaj aliaj internaciskale uzataj lingvoj. Lektoris profesoroj de Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) fondita en San Marino.



Bydgoszcz, Pollando, 1998

Tiam Albanio estis transformita al malfermita lando, sed ankoraŭ ne ĝuadis la liberan moviĝon tra Eŭropo de ties civitanoj. Tio plinstigis niajn studentojn studi eksterlande. La unua lernokurso ne funkciis tutnormale, ĉar la studentoj adaptiĝis malfacile al lokaj vivkondiĉoj kaj reguloj. La dua grupo de 15 personoj iris al Bydgoszcz la sekvan jaron kaj la tuto funkciis relative bone. Ĝin sekvis aliaj pli etaj grupoj ĝis la jaro 2007. Ĉirkaŭ 30 studentoj akiris bakalaŭron (Atestilon pri tri unuaj studjaroj) kaj du el ili eĉ Magistrecon. La ceteruloj forlasis la studojn, revenis patrien aŭ elmigris al aliaj okcidentaj landoj, eĉ al Aŭstralio. Tion kaŭzis ankaŭ la fakto, ke la albanaj aŭtoritatoj ĉe la Ministrejo pri Edukado ne agnoskis la diplomojn liveritajn de ISKT kaj AIS, kiel normale tio okazas en aliaj landoj, kiel en la baltaj landoj, en Hungario, Popola Ĉinio ks.

Inter niaj diplomitoj menciindas: Ereid Dhimitri, Ariel Myrazi, Dritan Xhindole, Herjon Llanaj, Saimir Begollari, Egli Brati, Fioralba Ceno, Jon Gumeni, Arta Kume, Faela Mezini, Matilda Sokoli, Elton Zaimi, ka.

Ĉi sube estas modelo de studprogramoj ĉe ISKT.

PROGRAMO POR TEMARO „ESPERANTO KAJ KULTURO”

(21 kursoj po 8 lecionoj – 45-minutaj aŭ 4 lecionoj 90-minutaj)

KURSO 1 – LA VORTKONSTRUO EN ESPERANTO KOMPARE KUN ALIAJ LINGVOJ

1. La diferencoj en gramatikaj reguloj.
2. La radikoj, sufiksoj kaj prefiksoj.
3. Kunmetitaj vortoj.
4. La vortkonstruado.

KURSO 2 – LA VIVO KAJ LA AGADO DE LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF

1. La tempo de infaneco
2. La jaroj de komenca edukado ĝis la altedukado.
3. La ideoj kaj la fako de Ludoviko
4. La agado kaj laborado de plenkreskaj jaroj ĝis la morto

KURSO 3 – IDEOJ DE INTERNACIA LINGVO – ESPERANTO

1. Interkompreniĝo inter la nacioj.
2. La laboro por monda paco.
3. Esperanto en poezio originala kaj tradukita.
4. Esperanto kiel rimedo en interhomaj rilatoj.

KURSO 4 – LA UNIVERSALAJ ESPERANTO - KONGRESOJ

1. De Boulogne sur Mer ĝis la Unua Mondmilito.
2. De la Unua Mondmilito ĝis la intermilita periodo kaj eksplodo de Dua Mondmilito.
3. La dudeka jarcento (kongresoj inter la jaroj 1945 – 1999).

4. La dudek-unua jarcento (la jaroj 2000 – 2007).

KURSO 5 – LA KONGRESO (BOULOGNE – SUR – MER)

1. La „Bulonja Deklaracio“- ĝiaj ĉefaj direktoj.

2. La „Fundamento de Esperanto“ – la verko de Ludoviko Zamenhof.

3. La Preĝo.

4. “La Espero” kun muziko de Menil – fariĝis himno de Esperanto.

KURSO 6 – LA UNIVERSALAJ KONGRESOJ EN POLLANDO 1.1912 – en Krakovo la 8-a UK de Esperanto
5.1959 - en Varsovio la 64-a UK de Esperanto 2.1927 – en Gdansko la 19-a UK de Esperanto 6.1987 - en Varsovio la 72-a UK de Esperanto 3.1931 – en Krakovo la 23-a UK de Esperanto 7. 2009 – en Bjalistoko la 94-a UK de Esperanto 4.1937 – en Varsovio la 29-a UK de Esperanto

KURSO 7 – LA ALIAJ KUNVENOJ DE ESPERANTISTOJ

1. Internaciaj kaj landaj

2. Fakaj (kunvenoj de fervojistoj, kuracistoj, turistoj, ktp.).

3. Laŭaĝaj – junularaj (TEJO), infanaj ktp.

4. Aliaj diversspecaj kunvenoj, ekzemple: de verkistoj, ĵurnalistoj, poetoj, ktp.

KURSO 8 – KIU ESTAS ESPERANTISTO

1. La subiĝo al la ideo de Esperanto.

2. La diverseco depende de la landoj kaj ŝtatoj.

3. La diverseco depende de la rasoj.

4. La diverseco depende de la religioj.

KURSO 9 – LA INTERNACIAJ ESPERANTO – LIBERTEMPOJ

1. En Pollando – Międzygórze (28 foje), Mielno, Kudowa Zdrój, Szczawnica.

2. En aliaj landoj (Gyula–Esperanto–Universitato), (Pisanica–La Esperanto–lernejo).

3. La kulturaj aranĝoj, komunaj ekskursoj al interesaj lokoj, dancvesperoj, ludoj, kantoj kaj ripozo.

4. La instruado de Esperanto dum feriadoj.

KURSO 10 – LA ESPERANTO – ORGANIZOJ

1. Bazaj kiel UEA kaj aliaj.

2. Ligitaj kun kulturo kaj scienco

3. Laŭtemaj kluboj

4. Kunvenoj por la altigado de la lingvokono

KURSO 11 – SCIENCO EN ESPERANTO – MOVADO

1. La Esperanto–lernejoj: bazaj, mezaj kaj altlernejoj.

2. Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) – San Marino

3. Somera Esperanto-Universitato en Gyula kun tri-gradaj kursoj: baza, meza kaj alta.

4. Kulturaj aranĝoj – La instruado per ludo kaj kanto.

KURSO 12 – LA INTERKOMUNIKADO PERE DE:

1. Televido 3. Gazetaro

2. Radio 4. Komputiloj – interreto (reto)

KURSO 13 – LA ESPERANTO ELDONAĴOJ

1. Jarlibro de UEA – Universala Esperanto–Asocio

2. Gazetoj kaj periodaĵoj – la plej grava “Esperanto–revuo”

3. Esperanto en gazetaro nacia kaj internacia

4. La eldonejo de gazetoj kaj libroj

KURSO 14 – ESPERANTUJO – KUTIMOJ

1. Gastamo

2. Bonvenigo de gastoj ĉe diversaj okazintaĵoj

3. Helpo en la vizitado de diversaj landoj

4. Geografiaj nomoj de diversaj lokoj

KURSO 15 – ARKITEKTURO

1. La esperantigo de la nomoj de diversaj objektoj kaj lokoj.

2. Arkitekturaj stiloj – malnovromanika, romanika, gotika, baroka, klasicisma kaj aliaj

3. La tipoj de stiloj en la arto kaj vestaro

4. La diferenco en la konstruado en Eŭropo kaj sur aliaj kontinentoj

KURSO 16 – LITERATURO

1. Originala literaturo en la lingvo Esperanto
2. Tradukoj el naciaj lingvoj al Esperanto
3. Tradukoj de Esperanto al naciaj lingvoj
4. Tradukoj: poezio, literaturo kaj gazetaro

KURSO 17 – LA DISVOLVIĜO DE ESPERANTO EN DIVERSAJ DIREKTOJ

1. En operoj kaj operetoj – tradukaĵoj kaj originalaĵoj
2. En teatraĵoj – tradukaĵoj kaj originalaĵoj
3. Kabaredoj – verkitaj originale aŭ tradukitaj
4. En filmoj en Esperanto - kun Esperanto-tradukoj

KURSO 18 – KANTOJ KAJ KANZONOJ EN ESPERANTO – KULTURO

1. La himno de esperantistoj verkita de Ludoviko Zamenhof mem sub la titolo „La Espero”
2. Kantoj kies temo tuŝas la Esperanto-movadon, ekz. “La vojo” de Ludoviko Zamenhof, „La Taĝiĝo” de Antono Grabowski ktp.
3. La ludoj kun kantoj ekzemple: „Alaŭdeto”, „Dek boteloj” ktp.
4. Verkado de oportunaj kantotekstoj por diversaj Esperanto-aranĝoj (precipe okaze de la 15-a de Decembro – naskiĝtago de Ludoviko Lazaro Zamenhof)

KURSO 19 – LA ELDONAĴOJ KIUJ INFORMAS PRI:

1. Muzeoj, ekspozicioj kaj galerioj
2. Turisme interesaj objektoj
3. La spuroj, la Esperanto-aranĝoj en diversaj turismaj lokoj
4. Placoj, stratoj, monumentoj kaj aliaj lokoj ligitaj kun Esperanto

KURSO 20 – ALIAJ ARTOJ KIUJ DISVOLVIĜAS DANK’ AL ESPERANTO

1. Interŝanĝo de la kapabloj ligitaj kun pentrado, skulptado, manverkoj kaj popolaj art-objektoj
2. Fotografiaĵoj kiel dokumentado de komunaj travivataj Esperanto-aranĝoj
3. Surbendigoj de diversaj spektakloj
4. Filmoj faritaj okaze de kunvenoj, kongresoj kaj aliaj aranĝoj

Jen la temoj de kelkaj diplomlaboraĵoj de nia studentoj:

Andi Berberi- Shqiptarët në Ballkan- Albanoj en Balkanio

Anri Subashi- Muzeologia në Shqipëri- Muzeologio en Albanio

Ariel Myrazi- Shqipëria në pikëpamje gjeografike- Albanio laŭ geografia aspekto

Arta Kume- Aspektet turistike të Kosovës- Turismecaj aspektoj de Kosovo

Dorina Sadiku- Ekskursion nëntë ditore Shqipëri- Greqi- Itali- Naŭtaga ekskurso Albanio-Grekio- Italio

Edi Ceno – Liqejt e Shqipërisë- La lagoj de Albanio

Edi Pashaj- Kështjellat e Shqipërisë- La kasteloj de Albanio

Egli Brati- Zonat e mbrojtura- La protektitaj areoj

Elton Zaimi- Shqipëria e parë përmes tre qyteteve- Albanio rigardata tra tri el ties urboj

Enis Rada- Arkeologia në Shqipëri- Arkeologio en Albanio

Envid Cara- Parqet kombëtare dhe vlerat e tyre turistike- La naciaj parkoj kaj ties turismecaj valoroj

Ereid Dhimitri- Potenciali turistik i rajonit Vlorë- Sarandë- La turisma potencialo de la regiono Vlora- Saranda

Erion Lato- Monumentet kulturore në Shqipëri- La kulturaj monumentoj en Albanio

Ervin Çanga- Besimet fetare në Shqipëri- La religiaj kredoj en Albanio

Ervis Duro- Monumentet kulturore- vlera të kulturës materiale- La kulturaj monumentoj- valoroj de la materia kulturo

Faela Mezini- Potenciali turistik i Shqipërisë së Jugut- La turisma potencialo de Suda Albanio

Fjoralba Ceno- Vlerat kulturore dhe turistike të Shqipërisë së Veriut- La kulturaj kaj turismaj valoroj de Norda Albanio

Gjergji Spaho- Shqiptarët dhe kultura e tyre midis Lindjes dhe Perëndimit- Albanoj kaj ties kulturo inter Oriento kaj Okcidento

Matilda Sokoli- Qendra pushimore në afërsi të Tiranës- Ripozejoj apud Tirana

Stela Dhami- Veshjet popullore në Shqipëri- La popolaj vestoj en Albanio

- Lernokursoj en hejmaj kondiĉoj

Tre valoraj estis ankaŭ niaj lernokursoj kun infanoj kaj lernantoj hejme. Tiel tri knabinoj el la fremdlingva mezlernejo de Tirana ariĝis en la hejmo de Rosela Spahiu kaj sekvis regulan lernokurson de Esperanto dum kelkaj semajnoj.




Rosela Spahiu, diplomita pri psikologio, rusa kaj hispana lingvoj. Dekstre Eosela, Doris Hekali, Eleda Hallvaxhiu

Samtiel du gefratoj de mia kolegino sekvis kun intereso lernokurson en sia hejmo. Ili post kelkaj jaroj aranĝis televizion elsendon por propagandi la internacian lingvon.



Interesa telefonavoko venis de prijura studento, Ili Gerdupi: “Mi aŭdis pri Esperanto kaj ties lernokursoj”- ridis li.” Ĉu eblas ankaŭ, ke mi partoprenu?”

Ili loĝis ne tre malproksime de mia hejmo, tiel mi invitis ilin al mia hejmo. Ili venis kun siaj amikinoj el la gimnazio “Sami Frashëri”, Anisa kaj Ada. Tiel komenciĝis la kurso. Post tri monatoj ĉiuj tri ekzameniĝis kaj akiris atestilon.



Ada, Anisa kaj Ili dum la kurso

Ada plustudis eksterlande, Ili kaj Anisa en Tirana. Bakalaŭriĝinte, ambaŭ akiris stipendion de universitato de Turku (Finnlando). Nun ili laboras en gravaj sektoroj en Tirana. Por mi ili estas modeloj de albanaj patriotaj junuloj kaj sociaj aktivuloj.



Ili Gerdupi kaj Anisa Gjini, 2019

- Postkiam albanoj de Albanio akiris la rajton je liberaliziĝo de vizoj tra la Ŝengen-areo (decembre 2010), la intereso de niaj studentoj pri Esperanto falis notinde. Sed ankaŭ la

lingva politiko de la registaro ne favorigis esperanton, rilate al “grandaj lingvoj” (angla, germana, franca ks). La lernejoj kaj fakultatoj eĉ ne malfermis siajn ejojn por okazigi tie lernokursojn de esperanto.

En tiaj kondiĉoj nia asocio ekuzis pli vaste la interreton por lernokursoj per ĝi. Komenciĝis ankaŭ la pli amasa tradukado el la albana moderna literaturo al Esperanto kaj inverse. Helpis notinde la iniciato de la renoma pola esperantisto s-ro Tomasz Chmielik el Świdnik, kiu estis kvazaŭ “tradukmaŝino”. S-ro Tomasz enesperantigis tra aliaj lingvoj kelkajn albanajn konatajn romanojn. Kunlabore kun li ni provlegadis ilin kaj komparis kun la originaloj en la albana.



S-ro Tomasz Chmielik renkontiĝas kun la verkistoj Fatos Kongoli kaj Luljeta Lleshanaku

La jaro 2012 notis la eldonon de la unua romano “Lëkura e Qenit” (Hunda Hauto) de Fatos Kongoli.




Intervjuo en “Esperanto France”

La prezento de la libro okazis en la Akademio de Sciencoj de Albanio, aprile 2012 kun la ĉeesto de 15 esperantistoj polaj, svedaj kaj litvaj. La eĥado en la gazetaro kaj televizio estis granda.




Dum la promociiĝo de la libro “Hunda Haŭto” en la Akademio de Sciencoj



Du eldonaĵoj de “Sloganoj el ŝtonoj: (“Parullat me gurë”) de Ylljet Alička, 2019 dhe 2013

Baldaŭ aperis aliaj libroj kiel “Sloganoj el ŝtonoj” (“Parrullat me gurë”) de Ylljet Alička, volumo kun poeziaĵoj de Luljeta Lleshanaku “Lundo en sep tagoj” (E hëna në shtatë ditë), volumo kun poeziaĵoj de Eqrem Basha “La mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj” (Bota është një pejsazh me ngjyra të shndërritshme), prezentita en Prishtina jaron poste en la Nacia Biblioteko, kun la ĉeesto de s-ro Adem Demaçi (forpasinta).



Surbaze de la esperanto-versio aperis ankaŭ la germanlingva versio de “Sloganoj” (2019), dank’al la traduko de s-ro Edmond Ludwig el Elzaso (Francio)

S-ro Adem Demaçi, aŭkultinte niajn diskutojn en Esperanto, kiel viziulo sin esprimis tre entuziasme:

“Delonge mi revadis pri tia lingvo simpla, neŭtrala, facile lernebla”



Maldrekte: s-ro Tomasz Chmielik diskutas je la ĉeesto de s-ro Demaçi, s-ino Sanie Gashi, s-ro Eqrem Basha kaj s-ro Sali Bashota

Oni tradukis ankaŭ aliajn romanojn de Fatos Kongoli (La Perdinto- I Humburi; La Kadavro- Kufoma; La Ebura Drako- Dragoi i Fildishtë); de Ylljet Aliçka (Rakontoj kun internaciuloj- Rrëfime me ndërkombëtarë); de Ismail Kadare (Palaco de la sonĝoj- Pallati i ëndërrave; Generacioj de Hankonatoj- Breznitë e Hankonatoj, ka); de Adem Demaçi (La sangovenĝaj Serpentoj- Gjarpijt e Gjakut).², Patrino Sgega kaj kvin knabinoj- Nëna Shegë dhe pesë gocat³), sed ili ne eldoniĝis siatempe pro financaj kialoj kaj malhelpaĵoj fare de agentoj pri la aŭtoraj rajtoj (temas pri Ismail Kadare).

Tre interesa estis la kunlaboro kun la libano-iraka esperantisto Hussain Al-Amily (forpasinta) loĝinta en Londono. Lia libro “La Araba Trezoro” (Thesari Arab) tradukita de mi (b.s) eldoniĝis pere de la Instituto pri la Pensado kaj Civilizo Islama en Tirana. Oni tradukis ankaŭ alian libron de li: “Prizona Taglibro”.



Foira budo, la aŭtoroj Bedri Alimehmeti kaj Sali Bashota

Dum la lastaj jaroj aperis la poeziaĵoj de Bedri Alimehmeti de “Kanzono por vi” (Kjo këngë për ju) dulingve esperante kaj albane; poeziaĵoj de Sali Bashota “La Ŝtono de la Amo” (Guri i Dashurisë); de Luan Starova “La Tempo de la Kaprinoj” (Koha e Dhive).



² Aperis julie 2019

³ Aperos baldaŭ

La verkisto kaj tradukisto el la hispana Bajram Karabolli skribis ammovelon pri rilatoj de polino al albana studento, dum la floriĝo de amikeco inter Albanio kaj ceteraj landoj de la Socialista Tendaro. Laŭ lia permeso la novelo enesperantiĝis kaj enpoliĝis kaj aperis en libro dulingva.



Bajram Karabolli kaj lia novelo


- La ĵurnaloj kaj niaj esperantaj eldonoj



Aprilo 2012

Luela Myftari

(el la ĵurnalo “Shekulli”, (La Jarcento), aprile 2012)



Intervjuo

Demando

1. Kiom da verkoj estas tradukitaj ĝis nun el la albana al Esperanto?
2. Kiom malfacilis traduki poeziojn de Ali Podrimja aŭ la romanon “Hunda Haŭto”? Kiom da tempo necesis?
3. Kio helpis vin por ties eldono?
4. Kiel la albanaj aŭtoroj tradukataj atendas la esperantan version de siaj verkoj?
5. Ĉu estas intereso pri tiaj tradukoj?

Respondo

Tomasz Chmielik

Bardhyl Selimi

1.

Ĝis nun estas tradukitaj 20 verkoj

Tri el ĉi tiuj estas tradukitaj kaj eldonitaj antaŭ la jaro 1990 (Cuk Simoni -1929, Skanderbeg-heroo de Albanio; Kristo Frasheri- Skanderbeg; Vasil Pistoli- Asdreni-Versaĵoj).

Post la jaro 1990 estas tradukitaj kaj eldonitaj: Enkela Xhamaj- Liriko; Fatos Kongoli- Hunda Haŭto; Luljeta Lleshanaku –Lundo en sep tagoj; Ylljet Aliĉka- Sloganoj el ŝtonoj; Bajram Karabolli – La polino

Aliaj verkoj tradukitaj atendas la eldonon: Fatos Kongoli- La Perdinto, Ismail Kadare- Palaco de la sonĝoj, Adem Demaçi- Sangovenĝaj serpentoj, Eqrem Basha- Poeziaĵoj; Visar Zhiti- Senfina funebra procesio; Sali Bashota- Poeziaĵoj; Mimoza Ahmeti- Poeziaĵoj, Ylljet Aliĉka- Rakontoj kun internaciuloj, Ali Podrimja- Poeziaĵoj.



2

La malfacileco en la tradukado el la albana al esperanto aŭ el ĉiu nacia lingvo al esperanto estas malpli granda ol la tradukado al la ceteraj naciaj lingvoj, eĉ pli fidela, ĝuste pro mem la naturo de esperanto, kiu estas regula lingvo kun granda fleksebleco. Tion oni konstatas aparte en la poeziaĵoj, sed ankaŭ en kelkaj verkoj kiel Sangovenĝaj Serpentoj kie la aŭtoro uzas lingvaĵon strikte regionan aŭ en la romano Senfina Funebra Procesio, kie oni uzas multajn filozofiajn esprimojn.

Antaŭ kelkaj tagoj mi babilis kun s-ino Dorota Horodyska, tradukistino de la albana literaturo al la pola. Demandite de mi, ĉu ŝi intencas traduki nian klasikulon Miloŝ Gjergj Nikolla (Migjeni), ŝi diris ke ŝi provis kelkajn fojojn sensukcese.



Tiel la traduko de la romano Hunda Haŭto bezonis kelkajn monatojn, post kiam ĝi pasis tra kelkaj manoj por provlegado, fare ĉefe de bonaj konantoj de la lingvo en aliaj landoj. Tion ni faris, por ke niaj eldonoj estu altkvalitaj ekde la komenco.



3

Aliflanke, pro relative malgranda nombro de legantoj de Esperanto kiel malplimulta lingvo, ankoraŭ malhelpas financaj malfacilaĵoj. Ĝis nun la tradukado estiĝis senpage dum la eldonado helpe de individuaj esperantistoj el la evoluintaj landoj realiĝis ŝpareme. La kvanto atingas nur kelkajn centojn da ekzempleroj. Eble pli poste, kiam la intereso de la legantoj pligrandiĝos ankaŭ pri la albana literaturo (aparte post kiam ni publikigos la verkojn de Ismail Kadare), ni povus profiti pro la librovendado, sekve ankaŭ niaj tradukoj pliiĝos.

Samtiel ni esperas, ke ekfunkcios La Balkana Projekto fare de Eŭropa Unio laŭ kiu preter la verkoj el la albana oni tradukos al Esperanto ankaŭ verkojn el la ceteraj 7 lingvoj de la Balkana Duonisulo.

Ĝis nun granda helpo en la tradukado, redaktado kaj eldonado venis de s-ro Tomasz Chmielik, universitata profesoro en Poznano kaj vicprezidanto de Akademio de Esperanto- Literaturo.

4

La albanaj verkistoj atendis tre bonkompreneme kaj interese la proponojn de nia Esperanto-asocio por traduki iliajn verkojn al Esperanto. Ili eĉ rezignis je aŭtora honorario (de Fatos Kongoli ĝis Ismail Kadare). Cetere nia asocio profitis popularecon kaj subtenon fare de niaj verkistoj por propagandi esperanton ĉe albanoj, kie ajn ili loĝas.

5

La intereso pri la verkoj de niaj aŭtoroj tradukitaj al Esperanto estis evidenta, ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en la du Amerikoj, ĝis Japanio, Aŭstralio kaj Madagaskaro, en Afriko! La legantoj el la evoluintaj landoj jam konis la tradukaĵojn de la albanaj aŭtoroj elstaraj (Ismail Kadare, Fatos Kongoli, Ylljet Aliĉka, Besnik Mustafai, Visar Zhiti) al iliaj naciaj lingvoj. Sed nur ĉi

tiujn aŭtorojn, Dank'al Esperanto ili povas ankaŭ koni aliajn albanajn aŭtorojn malpli tradukitajn en siajn naciajn lingvojn. La legantoj el la malgrandaj kaj foraj landoj nun ankaŭ povas konatiĝi kun la albana literaturo, ĉar Esperanto estas disvastigata almenaŭ en 120 landoj! Laŭ interkonsento kun la aŭtoroj, poste la albanaj tradukaĵoj povos tradukiĝi ekde Esperanto pli rapide, pli libere kaj pli fidele al aliaj lingvoj, ekzemple al la japana, ĉina, portugala, samkiel al malplimultaj lingvoj de Azio, Afriko aŭ eĉ Eŭropo.

- Informado pri Esperanto en Top Channel



(25-an de septembro 2013 kun Bardhyl Selimi)

1 Esperanto – artefarita, sed funkcia lingvo

Esperanto estas vere lingvo kreita de unu homo, s-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof en la jaro 1887, survoje al delongaj klopodoj por helpi interhoman bonkomprenemon tra la mondo. Sed spite al la fakto, ke la ceteraj projektoj disfalis (bazitaj sur matematikaj, muzikaj, trafikaj simboloj, aŭ luante el la leksiko kaj gramatiko de la ekzistantaj lingvoj, ne plu vivis. Dum Esperanto ekde tiam kreskis kaj disvastiĝis, uziĝis ĉiam pli vastskale kaj hodiaŭ ĝi ne plu estas projekto aŭ eksperimento, sed vera funkcia lingvo!

Ĝin oni parolas en la plimulto de la civilizaj centroj de la mondo, ĝi eĉ pli densas ol la UN-reto enmondo. Dum ĉi tiu tempoperiodo Esperanto konfrontiĝis al sennombraj baroj konservativaj, psikologiaj kaj aparte politikaj. Sufiĉas ke iu rememoru la Pakton de la angloparolantaj landoj en la jaro 1961, kie oni decidis en ĉiuj kampoj la enkondukon de la angla dominanta mondlingvo. Tiucele estis investitaj bilionoj da USD ne nur de angloparolantaj landoj, sed ankaŭ de aliaj grandaj landoj por disvastigi tiun lingvon, kulturon kaj civilizon ĉie ajn en la mondo.

Tio ege damaĝis kaj daŭre damaĝas la kulturojn de landoj kaj popoloj malpli grandaj.

Kial do? Ĉar ĉiu nacia lingvo, ankaŭ la albana, estas tre malfacile lernebla de homamasoj, ĉiu lingvo konsistas el leksiko kun centmiloj da vortoj kaj ankaŭ troaj gramatikaj reguloj. Sekve tiuj lingvoj estas malfacile lerneblaj.

Estas dubinde deklari, ke oni posedas perfekte alian nacian lingvon, des pli kelkajn naciajn lingvojn. La politikistoj, la sciencistoj, la aktivuloj de registaraj kaj neregistaraj organizoj partoprenantaj en internaciaj kunvenoj bone scias, kiom malfacilas interkompreniĝi kun fremdaj kolegoj, aŭskulti ties opiniojn, des pli esprimi mem siajn opiniojn en fremda lingvo. Ankaŭ la interpretoistoj similtanaj deĵorantaj ne ĉiam povas sekvi la ritmon de parolantoj por traduki ties

paroladojn aŭ deklariojn tujtuje. Tial la paroladoj venas al ĉeestantoj fragmente kaj ofte misformitaj, ĉar traduki signifas ankaŭ posedi la respektivan kulturon.

En la internaciaj kunvenoj de esperantistoj oni ne bezonas interpretistojn kaj la partprenantoj sin sentas kvazaŭ en sia lando, tutegalaj unu kun la alia.

Pro tio, ekde jarcentoj, oni faris gigantajn klopodojn por inventi pontolingvon, simplan en la lernado, neŭtralan je nacia vidpunkto por ne ĵaluzigi iun alian popolon, logikan kaj precizan por la transdonado de la beletra kaj scienca enhavo de fremdaj tekstoj.

Feliĉe tia lingvo estas jam kreita, kiel mi diris, kaj uziĝas sukcese ĉiam pli vaste en la mondo. Same en Albanio ekde 106 jaroj.

La sorto de Esperanto similas al la sorto de la tiel nomataj “arabaj ciferoj”, kiujn oni alportis en Eŭropon ekde longe, sed ili estis akceptitaj nur 500 jarojn post ties naskiĝo en Hindio. Ĉu ni povus kalkuli nuntempe sen ili? Kiel povus ekzisti matematiko sen ili? La arabaj ciferoj estis malfacile akceptitaj, ĉar ilin alportis araboj, konsideritaj malamikaj tiutempe, ĉar araboj blokis la komercajn vojojn al Oriento. Do la ĉefa kialo estis politika. Krome influis ankaŭ faktoroj konservativaj, psikologiaj ks.

Esperanto estas lingvo kun konsisto ĉefe eŭropa, pro tio ke ĝia leksiko estas ĉerpita el tri lingvaj grupoj: latina, germana kaj slava. Sed ĝi estas ĉirkaŭbrakita ankaŭ de azianoj, afrikanoj, kiuj pli facile asimilas ĝin ol la naciajn eŭropajn lingvojn. Krome japanaj sciencistoj iam decidis skribi siajn laboraĵojn ne nur en la japana, sed ankaŭ en Esperanto, ĉar tiel ili povis sin esprimi pli libere kaj pli precize.

La gramatiko de Esperanto uzas plej simplajn regulojn ekzistantajn en la naciaj lingvoj, ne nur eŭropaj, sed ankaŭ ekstereŭropaj, proksimiĝante al matematika rigoreco, ne malriĉigante aŭ malfortigante la esprimkapablon kompare al la naciaj lingvoj. Tion pruvas ankaŭ la fakto, ke al Esperanto estas jam tradukitaj precize kaj fidele la ĉefverkoj de la monda beletra literaturo, same verkoj sciencaj, religiaj, politikaj kaj filozofiaj. Ankaŭ estas verkitaj beletraĵoj, sciencaĵoj ks originalaj, kiuj poste estas tradukitaj al la naciaj lingvoj.

En Albanio, ekde la jaro 1907, oni tradukis el la albana al Esperanto kaj inverse. En la jaroj 1920-aj la reprezentanto de Albanio en la Ligo de Nacioj subtenis la proponon por enkonduko de Esperanto en la elementajn lernejojn, kiel helpa bazo por lernado de la ceteraj aliaj naciaj lingvoj. Tiutempe la reprezentanto de Francio vetois, ĉar li ankoraŭ opiniis, ke la franca daŭre servos kiel internacia lingva komunikilo. Hodiaŭ, certe ne nur li pentus, ĉar alia lingvo pretendas tiun funkcion, la angla, depende de ekonomia kaj politika ŝtata potenco. En la estonto, se ni sekvus tiun logikon, tian rolon ludus la ĉina.

Sed tio ne estus la ĝusta solvo. Ĉar tio tutegalus al la detruo de la naciaj kulturoj, kiel oni tion sentas nun ankaŭ en la potencaj landoj kiel Italio, Germanio, Francio, kie aŭdiĝas voĉoj kontraŭstarantaj la troan uzadon de la angla.

Ni revenu al la lingva bonkomprenemo ene de Eŭropa Unio. Ĉiuj 28 membroŝtatoj de EU parolas 22 diversajn lingvojn el diversaj lingvaj grupoj. Laŭ konstitucia ĉarto de EU, ĉiu lingvo ene de la Unio estas egalvalora, sed en la praktiko oni uzas la anglan kaj la francan. Ofte germanoj forlasas la kunsidojn je signo de protesto. Sed ne nur ili. Kiel oni kontentigu ĉiujn? La nacia ĵaluzo ne

permesas al ili akcepti la anglan kiel unusolan komunikan lingvon, nek iun alian nacian lingvon ene de la Unio.

Kial ni ne akceptu tutpretan neŭtralan lingvon kia estas Esperanto? Tio similus al la komuna mono eŭro, per kiu oni interŝanĝas libere varojn ie ajn en EU. La instruadon de la fremdlingvoj oni konfidu al lernejoj, individuoj. Se iu deziras studi ekzemple la finnlandan kulturon, li ellernu profunde la finnan, samkiel iam multaj sciuloj eŭropaj kaj ne eŭropaj ellernis la malnovan grekan, latinan, hebrean, sanskritan ka por malkovri la kulturajn trezorojn de l'antikveco.

Alia vojo por asimili kontentige kaj sufiĉe la ceterajn naciajn lingvojn (ni diru la italan, la francan, la hispanan, la germanan, certe ankaŭ la anglan, se ni prikonsideras Eŭropon), estus tio kion ekde jaroj UEA, la internacia esperantista asocio sideje en Nederlando, startis enkondukante esperanton en la elementajn lernejojn almenaŭ dum unu lernojaro. Aktuale en Britio oni aplikas projekton nomitan angle Language Springboard (Lingvolanĉilo), laŭ kiu la gelernantoj lernintaj antaŭe simplan lingvan strukturon kiel Esperanto rapide kaj firme asimilas alian nacian lingvon.

Eksaj studentoj miaj, lernintaj esperanton en Albanio, pli rapide asimilis aliajn naciajn lingvojn kiel la rumanan, la germanan aŭ la svedan, kiam ili iris en la respektivajn landojn por plustudi en ties universitatoj.

6. Enregistriĝo de nia esperantista asocio ĉe la Juĝejo de Tirana, februare 2013

Laŭ iniciato de s-ro Shaban Hasani kaj peto de UEA, nia asocio estis jure agnoskita ĉe la Juĝejo de Tirana laŭ decido n° 3503, dato 15/02/2013. Ĉi kaze estis kompilita kaj prezentita ankaŭ la Statuto de la Asocio.



La fondintaj membroj de la “Albana Esperanto- Asocio” estis: Shaban Hasani, Bardhyl Selimi, Ilir Pistoli, Nik Ukcama kaj Sajmir Beqiraj

STATUTI –La Statuto

I

SHOQATËS “ALBANA ESPERANTO-ASOCIO”

De la « Albana Esperanto- Asocio »

Në përputhje me Kodin Civil Shqiptar, me Ligjin nr. 8788 datë 7.05.2001 “Për Organizatat Jofitimprurëse” dhe me Ligjin nr. 8789 datë 7.05.2001 “Për Rregjistrimin e Organizatave Jofitimprurëse, themelohet shoqata jofitimprurëse

me anëtarësi "Albana Esperanto-Asocio", me kushtet që përcaktohen në statutin e saj si më poshtë:

Konforme al la Civila Kodo Albana, al leĝo nr. 8788, dato 7.05.2001 « Pri ne profitcelaj organizaĵoj » kaj leĝo nr. 8789 dato 7.05.2001 « Pri registriĝo de la neprofitcelaj organizaĵoj », estas fondita la neprofitcela organizaĵo kun membraro « Albana Esperanto-Asocio » laŭ kondiĉoj difinitaj en ties statuto kiel jene :

Neni 1

Shoqata "Albana Esperanto-asocio" është organizatë jofitimprurëse me anëtarësi.

Artikolo 1

La asocio « Albana Esperanto-Asocio » estas neprofitcela organizaĵo kun membraro.

Neni 2

Emri i saj është "Albana Esperanto-Asocio", shkurt "AEA".

Emri "Albana Esperanto-Asocio", është në gjuhën Esperanto. Në gjuhën shqipe përkthehet "Shoqata Esperantiste Shqiptare", shkurt "ShESh"

Artikolo 2

Ĝia nomo estas « Albana Esperanto-Asocio », mallonge « AEA »

La nomo « Albana Esperanto-Asocio » estas en la lingvo esperanto. En la albana ĝi tradukiĝas « Shoqata Esperantiste Shqiptare », mallonge « SHESH »

Neni 3

Shoqata "Albana Esperanto-Asocio" ka vulën dhe logon e saj me përmbajtje të njejtë me emrin.

Artikolo 3

La asocio « Albana Esperanto-Asocio » havas sian stampilon kaj logon je sama enhavo al ties nomo.

Neni 4

Shoqata "Albana Esperanto-Asocio" e ka selinë në Tiranë, me adresë: p/a Bardhyl Selimi, Rruga Fortuzi, Nd.9, Shk.1, Ap.3. 1016 Tiranë, Albania.

Selia e saj mund të ndryshojë me vendim të këshillit drejtues.

Artikolo 4

La asocio « Albana Esperanto-Asocio » havas sidejon en Tirana, adreso : p/a Bardhyl Selimi, strato Fortuzi, loĝejo 9, skalo 1 apartamento 3, 1016, Tirana.

Neni 5

Kohëzgjatja e veprimtarisë së shoqatës "Albana Esperanto-Asocio" është pa afat.

Artikolo 5

La longdaŭro de la agado de la asocio « Albana Esperanto-Asocio » estas nelimigita.

Neni 6

Shoqata "Albana Esperanto-Asocio" do të zhvillojë veprimtarinë e saj në të gjithë territorin e Republikës së Shqipërisë.

Artikolo 6

La asocio « Albana Esperanto-Asocio » agados sur la tuta teritorio de Respubliko de Albanio.

Neni 7

Shoqata "Albana Esperanto-Asocio" mund të themelojë degë të saj në qendër dhe në çdo njësi tjetër administrativo-territoriale të Shqipërisë.

Degët e shoqatës janë pjesë përbërëse e saj.

Artikolo 7

La asocio « Albana Esperanto-Asocio » povas fondi siajn filiojn en la centro kaj en çiu alia administra teritoria unuo de Albanio.

La branĉoj de la asocio estas ties konsistigaj partoj.

Neni 8

Anëtarët themelues të shoqatës "Albana Esperanto-asocio" janë:

- 1. Bardhyl Selimi*
- 2. Shaban Hasani*
- 3. Ilir Pistoli*
- 4. Nik Ukcama*
- 5. Sajmir Beqiraj*

Artikolo 8

La fondintaj membroj de la asocio "Albana Esperanto-Asocio" estas:

1. Bardhyl Selimi
2. Shaban Hasani
3. Ilir Pistoli

4. Nik Ukcama
5. Sajmir Beqiraj

Neni 9

Qëllimi dhe fusha e veprimtarisë së shoqatës "Albana Esperanto-Asocio" është:

1. Propagandimi dhe përhapja e gjuhës Esperanto në Shqipëri përmes ngritjes së kurseve, botimit të literaturës dhe materialeve të tjera në gjuhën esperanto.

2. Bashkëpunimi me shoqatat e tjera esperantiste ndërkombëtare.

3. Anëtarësimi në shoqatën ndërkombëtare të esperantos "Universala Esperanto-Asocio", me seli: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederland

Artikolo 9

La celo kaj la agadkampo de la asocio « Albana Esperanto-Asocio » estas :

- Propagandado kaj disvastigado de la lingvo esperanto en Albanio per lernokursoj, eldonaĵoj kaj diversaj lerniloj de la lingvo.
- Kunlaboro kun la aliaj fremdaj Esperanto-asocioj.
- Membriĝo al la universala Esperanto-asocio kun sidejo: Nieuwe Binnenweg 176, 3015, BJ Rotterdam, Nederland

Neni 10

Shoqata "Albana Esperanto-Asocio", e organizon veprimtarinë e saj mbi baza vullnetare dhe ndalon shpërndarjen e fitimeve që mund të krijohen gjatë veprimtarisë së saj.

Artikolo 10

La asocio « Albana Esperanto-Asocio » organizas sian agadon sur la volontula bazo kaj malpermesas disdonadon de la profitoj kiuj povus estiĝi dum sia agado.

Neni 11

Organi më i lartë drejtues i shoqatës jofitimprurëse me anëtarësi —Albana Esperanto-Asocio|| është Mbledhja e Përgjithëshme e të gjithë anëtarëve të saj.

Mbledhja e përgjithshme bëhet një herë në vit.

Mbledhja thirret nga kryetari ose nga një e treta e anëtarësisë.

Mbledhja e përgjithëshme shqyrton veprimtarinë e shoqatës për periudhën e kaluar dhe cakton objektivat për vitin në vazhdim.

Mbledhja lajmërohet një muaj më parë dhe mund të mbahet në Tiranë ose në vende të tjera.

Forumi quhet i mjaftueshëm kur numri i pjesëmarrësve është më shumë se 50 % e numërit të përgjithëshëm të anëtarëve të saj.

Mbledhjen e drejton kryetari.

Vendimet merren me shumicë të thjeshtë.

Votimi bëhet i fshehtë.

Artikolo 11

La plej alta gvidorgano de la neprofitcela asocio kun membraro « Albana Esperanto-Asocio » estas la Ĝenerala Kunveno de ĉiuj ties membroj.

La Ĝenerala Kunveno okazas unufoje jare.

La Kunveno estas anoncita de prezidanto aŭ de unu triono de membraro.

La Ĝenerala Kunveno pritraktas la agadon de la asocio dum la pasinta periodo kaj difinas la objektivajn por ka kuranta jaro.

La Kunveno estas anoncita unu monaton antaŭe kaj okazas en Tirana aŭ en la ceteraj lokoj..

La forumo konsideriĝas sufiĉa kiam la nombro de la partoprenantoj estas pli ol 50 % de la totala nombro de la membroj.

La Kunvenon estras la prezidanto.

La decidoj okazas laŭ la volo de simpla plimulto.

La voĉdonado okazas malkaŝe.

Neni 12

Organi ekzekutiv i shoqatës "Albana Esperanto-Asocio" është Këshilli Drejtues.

Këshilli drejtues përbëhet nga:

1. Kryetari

2. Sekretari

3. Financieri

Këshilli Drejtues i Shoqatës zgjidhet nga Mbledhja e Përgjithëshme një herë në tre vjet me të drejtë rizgjedhje.

Zgjedhja bëhet me votim të fshehtë nga anëtarësia pjesëmarrëse.

Ndryshimet në Këshillin Drejtues mund të bëhen vetëm nga Mbledhja e Përgjithëshme.

Artikolo 12

La plenumanta organo de la asocio « Albana Esperanto – Asocio estas la Gvidanta Konsilio.

La Gvidanta Konsilio konsistas el:

1. Prezidanto
2. Sekretario
3. Librotenanto

La Gvidanta Konsilio de la Asocio elektiĝas de la Ĝenerala Kunveno unufoje en tri jaroj je reelektebleca rajto.

La elekto okazas per malkaŝa voĉdono de la partoprenanta membraro.

La ŝanĝiĝoj en la Gvidanta Konsilio povas okazi nur dum la Ĝenerala Kunveno.

Neni 13

Detyrat dhe kompetencat e këshillit drejtues:

Këshilli drejtues

organizon të gjithë veprimtarinë e shoqatës.

Kryetari i shoqatës

- *Administron aktivitetin e përditëshëm të shoqatës, në zbatim të statutit dhe vendimeve të Këshillit Drejtues.*
- *Ai e përfaqëson shoqatën me palët e treta, në organet shtetërore dhe ligjore.*
- *Ai përgjigjet para Këshillit Drejtues dhe Mbledhjes së Përgjithëshme për veprimtarinë e tij sa herë që i kërkohet.*

Sekretari i shoqatës

- Mban rregjistrin e anëtarësisë së shoqatës, protokollin dhe dokumentet e tjera të mbledhjes së Këshillit Drejtues dhe Mbledhjes së Përgjithëshme.
- Njofton dhe organizon mbarëvajtjen e mbledhjeve të Këshillit Drejtues dhe Mbledhjes së Përgjithëshme.
- Në raste të veçanta, me autorizimin e Kryetarit zëvendëson Kryetarin e shoqatës në veprimtari të ndryshme.

Financieri i shoqatës.

- Mbledh kuotat e anëtarëve të shoqatës. Adminstron të ardhurat dhe shpenzimet që kryhen nga shoqata gjatë veprimtarisë saj.
- Harton bilancin vjetor dhe e paraqet për miratim në Këshillin Drejtues të shoqatës

Artikolo 13

La taskoj kaj la rajtoj de la Gvidanta Konsilio estas :

La Gvidanta Konsilio

- Organizas la tutan agadon de la asocio.

La prezidanto de la asocio

- Administras la ĉiutagan agadon de la asocio, konforme al la statuto kaj decidoj de la Gvidanta Konsilio.
- Ĝi reprezentas la asocion al triaj partneroj, al ŝtataj organoj, same al tiuj juraj.
- Li responsas antaŭ la Gvidanta Konsilio kaj Ĝenerala Kunveno pri ties agado kiomfoje tio estas demandite.

Sekretario de la asocio

- Tenas la registron de la membraro de la asocio, la protokolon kaj aliajn dokumentojn de la kunsidoj de la Gvidanta Konsilio kaj Ĝenerala Kunveno.
- Anoncas kaj organizas bonordiĝon de la kunsidoj de la Gvidanta Konsilio kaj Ĝenerala Kunveno.
- En apartaj kazoj, laŭ rajtigo de la Prezidanto, li anstataŭas la Prezidanton de la asocio en diversaj agadoj.

La librotenanto de la asocio.

- Kolektas la kotizojn de la membroj de la asocio. Administras la enspezojn kaj elspezojn, faritajn de asocio dum ties agado.
- Kompilas la jaran raporton kaj prezentas ĝin je aprobo antaŭ la Gvidanta Konsilio de la asocio.

Neni 14

Rregullat për pranimin dhe përjashtimin e anëtarëve:

- *Anëtar i Shoqatës "Albana Esperanto-Asocio" mund të bëhet çdo qytetar mbi moshën 18 vjeç, që pranon statutin dhe që ka njohuri elementare për gjuhën Esperanto.*
- *Pranimi dhe largimi i anëtarëve bëhet në çdo kohë me vullnet të lirë nga Këshilli Drejtues ose Mbledhja e Përgjithëshme e antarësisë.*
- *Përjashtimi i anëtarëve të shoqatës bëhet nga Mbledhja e Përgjithshme me propozim të Këshillit Drejtues.*
- *Përjashtimi bëhet në rastet kur anëtari shkel statutin e Shoqatës.*

Artikolo 14

La reguloj por la akcepto kaj ekskludo de la membroj :

- *Membro de asocio "Albana Esperanto-Asocio" povas fariĝi ĉiu civitano je aĝo pli ol 18 jara, akceptanta la statuton kaj scipovanta je elementa nivelo la lingvon Esperanto.*
- *La akcepto kaj forigo de la membroj okazas ĉiamtempe je libera volo fare de Gvidanta Konsilio aŭ Ĝenerala Kunveno de asocio.*
- *La ekskludo de la membroj fariĝas de Ĝenerala Kunveno laŭ propono de la Gvidanta Konsilio.*
- *La ekskludo okazas kiam la membro malrespektas la statuton de la asocio.*

Neni 15

Të drejtat dhe detyrat e anëtarëve:

- *Anëtarët e Shoqatës kanë të drejtë të zgjidhen dhe të zgjedhin organet drejtuese.*
- *Ata marrin pjesë lirisht në veprimtaritë e Shoqatës brenda dhe jashtë vendit. Mund të bëjnë vërejtje dhe sugjerime për përmirësimin e punës së shoqatës.*
- *Anëtarët e Shoqatës kanë detyrë të marrin pjesë rregullisht në Mbledhjen e Përgjithëshme dhe në rastet kur thirren nga Këshilli Drejtues.*
- *Të punojnë për përhapjen dhe propagandimin e gjuhës Esperanto.*
- *Të paguajnë kuotën e caktuar vjetore.*

Artikolo 15

La rajtoj kaj devoj de la membroj :

- *La membroj rajtas elektiĝi kaj elekti en la gvidantaj organoj.*

- Ili partoprenas libervole en la aktivecoj de la asocio en kaj eksterlande. Ili povas sugesti kaj rimarkigi por la plibonigo de la asocia laboro.
- La asociaj membroj devas partopreni regule en la Ĝenerala Kunveno kaj en la kazoj kiam ilin alvokas la Gvidanta Konsilio.
- Ili devas klopodi por la disvastiĝo kaj propagandado de la lingvo Esperanto.
- Ili devas pagi la difinitan jarkotizon.

Neni 16

Burimet financiare dhe rregullat lidhur me kuotizacionet:

- *Fondet bazë të shoqatës do të krijohen nga kuotizacionet e anëtarëve të saj, kontributet e donatorëve të ndryshëm, apo të ardhura të tjera që shoqata mund të sigurojë nga burime të tjera të ligjëshme, fonde që do të përdoren në funksion të përmbushjes së qëllimit të saj.*
- *Kuota vjetore e anëtarëve të Shoqatës është 500 Lek dhe paguhet brenda muajit janar të vitit në vazhdim.*
- *Kuotat administrohen nga financieri.*

Artikolo 16

La financaj fontoj rilatas al la kotizoj:

- La bazaj fontoj de la asocio estiĝos danke al la kotizoj de ties membroj, kontribuaĵoj de diversaj donacioj, aŭ aliaj enspezoj kiujn la asocio povas havigi al si de aliaj laŭlegaj fontoj, kiuj uziĝos al la funkcio de plenumado de ties celoj.
- La jarkotizo de ĝiaj membroj estas 500 Lekoj kaj oni pagas ĝin ene de la monato januaro de la kuranta jaro.
- La kotizoj administriĝas de la librotenanto.

Neni 17

Kriteret e administrimit të pasurisë:

- *Për administrimin e pasurisë së Shoqatës ngarkohet financieri.*
- *Financieri është i detyruar të mbajë regjistrin përkatës për të ardhurat dhe shpenzimet që kryhen gjatë zhvillimit të veprimtarive të Shoqatës.*
- *Ai harton bilancin vjetor dhe ja paraqet atë për miratim Mbledhjes së Përgjithëshme.*

Artikolo 17

La kriterioj de administrado de la riĉaĵoj:

- Pri administrado de la riĉaĵoj de la asocio prizorgas la librotenanto.

- La librotenanto estas obligata teni la respektivan registron pri la enspezoj kaj elspezoj faritaj dum la agado de la asocio.
- Li kompilas la jaran raporton kaj prezentas ĝin je aprobo al la Ĝenerala Kunveno.

Neni 18

Mënyra e miratimit dhe e ndryshimit të statutit, të programit dhe të rregullave të brendëshme:

- *Statuti dhe programi i shoqatës miratohen nga anëtarët themelues.*
- *Ndryshime mund të bëhen nga Mbledhja e Përgjithëshme me kërkesën e më shumë se gjysmës së anëtarëve.*
- *Këshilli Drejtues harton një Rregullore të Brendëshme të cilen ja paraqet për miratim Mbledhjes së Përgjithëshme.*

Artikolo 18

La aproba kaj ŝanĝmaniero de la statuto, de programo kaj de la internaj reguloj :

- La statuto kaj la programo de la asocio aprobiĝas de la fondintaj membroj.
- La ŝanĝiĝoj povas okazi de la Ĝenerala Kunveno laŭ demando de pli ol duono de ties membroj.
- La Gvidanta Konsilio kompilas Internan Regularon kion ĝi prezentas je aprobo al la Ĝenerala Kunveno.

Neni 19

Rregullat për bashkimin dhe ndarjen e organizatës:

- Shoqata nuk mund të bashkohet me një shoqatë tjetër, as të ndahet.

Artikolo 19

La reguloj pri unuiĝo kaj disiĝo de la organizaĵo :

- La asocio ne povas aliĝi al alia asocio, nek malaliĝi.

Neni 20

Mënyra e përfaqësimit ligjor:

- *Përfaqësimi ligjor i Shoqatës bëhet nga Kryetari i saj.*
- *Përfaqësimi në bankë bëhet nga Kryetari dhe financieri.*

Artikolo 20

La maniero de jura reprezentigo :

- La jura reprezentigo de la asocio realiĝas de ties prezidanto.
- La reprezentigo ĉe la banko realiĝas de prezidanto kaj librotenanto.

Neni 21

Shpërndarja e shoqatës:

- *Shoqata shpërndahet në rast se merret vendim nga Mbledhja e Përgjithëshme për shpërndarjen e saj.*
- *Nëqoftëse numri i anëtarëve të saj bie në më pak se 5 veta.*
- *Për arësye të tjera ligjore*
 - a- Sipas vendimit të Mbledhjes së Përgjithshme të thirrur posaçërisht.*
 - b- Me vendim të gjykatës.*

Artikolo 21

La malfariĝo de la asocio :

- La asocio malfariĝas enkaze de decido fare de Ĝenerala Kunveno pri tio.
- Se ties nombro falas malpli 5
- Pro aliaj juraj kaŭzoj
 - a- Laŭ decido de la Ĝenerala Kunveno alvokita aparte.*
 - b- Laĝ decido de la juĝejo.*

Neni 22

Likujdimi i shoqatës:

- *Kur vendoset shpërndarja e shoqatës ajo ĉrregjistrohet, pushon veprimtarinë e saj dhe vihet në likujdim nga komisioni i likujdimit, i cili formohet dhe vepron sipas rregullave ligjore në fuqi.*

Artikolo 22

La likvido de la asocio :

- Kiam la asocio malfariĝas ĝi malregistriĝas, ĉesigas sian agadon kaj subiĝas al proceduroj de likvideco fare de respektiva komisiono, kiu formiĝas kaj agadas laŭ juraj validaj reguloj.

Neni 23

Rregullat për likujdimin dhe destinimin e pasurisë pas mbarimit të shoqatës:

- *Në rast të shpërndarjes ose të mbylljes së veprimtarisë së shoqatës pasuria e saj, pas likujdimit të kreditorëve, detyrimeve ligjore dhe*

procedurave të tjera, i kalon një shoqate tjetër simotër brenda ose jashtë vendit me vendim të Mbledhjes së Përgjithëshme.

Artikolo 23

La reguloj pri likvido kaj aliĝo de la riĉajo post la finiĝo de la asocio:

- Enkaze de malfariĝo aŭ fermo de la agado de la asocio, ĝia riĉajo, post kvitiĝo kun la kreditantoj, juraj obligajoj kaj aliaj proceduroj, transpasas al alia kvazaŭ fratina asocio ene aŭ eksterlande laŭ decido de Ĝenerala Kunveno.

Neni 24

Zgjidhja e mosmarrëveshjeve:

- *Mosmarrëveshjet që mund të lindin ndërmjet anëtarëve të shoqatës dhe organeve të saj, ndërmjet shoqatës dhe personave të tretë do të zgjidhen me mirëkuptim.*
- *Kur kjo nuk arrihet të zgjidhet me mirëkuptim, kompetente për zgjidhjen e tyre do të jetë Gjykata e Shkallës Parë, Tiranë.*

Artikolo 24

La solvo de la malkonsentoj :

- La malkonsentoj kiuj povus naskiĝi inter la membroj de la asocio kaj ties organoj, inter la asocio kaj triaj partneroj solviĝos laŭkonsente.
- Kiam tio ne realiĝos laŭkonsente, taŭga organo por la solviĝo estas la Juĝejo de Unua Grado, Tirana.

Anëtarët themelues të shoqatës "Albana Esperanto Asocio" :

La fondintaj membroj de la asocio « Albana Esperanto-Asocio » :

1. Bardhyl Selimi
2. Shaban Hasani
3. Ilir Pistoli
4. Nik Ukcama
5. Sajmir Beqiraj

Notere- Notario

Mirka Papa

7 Kelkaj niaj elstaraj esperantistoj

7.1 Vasil Pistoli



Unu esperantisto en la mondo de scioj

(Intervjuo en la tagĵurnalo “Metropol” 20/06/2009)

- Sinjoro Vasil, vi pasigis l’infanaĝon kaj junaĝon inter du amoj: la violono kaj inĝenierado. Kiel okazis, ke vi definitive vin dediĉis al la dua?

- Mi eklernis ludi per violono en Shkodër ĉe la muzikista asocio “Rozafat”. Ekde tiam la muziko fariĝis necesa bezonaĵo por travivi tiujn spiritajn internajn sentojn, kiuj povus eksplikiĝi nur per la muziko. (por mi, nur la klasika instrumenta muziko).

Mi aĉetis multajn klasikajn muzikaĵojn, inter ili dek volumojn de “Biblioteca d’oro”, kiuj konatigis min kun ĉi tiu vivo ne anstataŭigebla.

Kiu ne konas ĉi muzikon, eble ne povas kompreni ties forton, tiun duan vivon travivatan de homo. Miaj amikoj, kiuj ne sciis, ke mi okupiĝis pri muziko, ekvidis min unuafoje en la asocio “Rozafat” dum koncerto gvidita de nia komponisto Prenk Jakova. Pli poste mi min dediĉis al inĝenierado, ĉar ĝi kaj matematiko estis miaj pasioj kaj talentoj, neeksplikeblaj ankaŭ. En la mezlernejo, en la gimanzio de Shkodër, mi fariĝis kvazaŭ asistanto de la profesoro de matematiko, kiam oni solvis ekzercojn sur la nigra tabulo. Mi neniam ekzameniĝis skribe en la klasĉambro. La profesoro diris al mi: Vi, Vasil, iru hejmen. Eble li pensis ke mi donus kopion al iu samklasano. Mi uzadis la logaritman kalkulilon, kion kutime uzis la inĝenieroj en siaj projektoj, tiam la sola uzata kalkulilo (kiel hodiaŭ la komputilo).

- Kiel akompanis vin la violono dum la vivo?

- Ĉiam, ĉiutage. Kiam mi restis sola, se mi ne havis alian laboron, mi lernis parkere iun muzikparton, kio ne nur plezurigis min, sed ankaŭ igis mian tempon pasi nesentite. Tio pludaŭras eĉ nun. Kiam la homo ne estas malsana kaj solas, li ne povas ĝui plenan

malstreĉiĝon, se li ne okupiĝas per io. Tio estas por mi la muziko.

- Kiam vi decidis definitive pri la estonta profesio via?

- Mi memoras ke tuj post la liberigo el la nazia koncentrejo de Prishtina (Kosovo), post la fino de la Dua Monda Milito, en Tirana oni aranĝis tiel nomatan "someran lernokurson" por tiuj kiuj malĉeestis en la lernejo dum la milito. Tiutempe mi devintus esti abituriento. Post kiam oni akceptis min en la kurso, min kaj aliajn akirintajn bonegajn rezultojn, oni proponis daŭrigi la studojn en Sovetunio. Mi respondis "Jes, plezure" kaj poste demandis pri la fako. Ili diris al mi: "por iĝi aviadilisto". Sed al mi ne plaĉis la armeo, nek la milito kaj mi respondis "Ne, mi ne volas fariĝi aviadilisto". Reveninte en Shkodër, oni dungis min provizore en la prefektejo de Shkodër. La prefekto, kiu respektis min, demandis: Ĉu vi deziras plustudi en la universitato? Kian fakon vi ŝatas? Mi respondis "Inĝenierado". Nu, konsentite, pretigu vin, ĉar vi veturos kun kelkaj kamaradoj tra Durrës al Bulgario per la rumana ŝipo "Transilvania". Mi ege ĝojis kaj ekiris al Durrës por aliĝi al la ceteraj kamaradoj. Estis decembro 1945 kiam ni ekveturis per ŝipo. Post unu semajno ni atingis Kostoncon, en Rumanio. Ekde tie, per trajno, ni pluveturis al Sofio, Bulgario, je la sojlo de la Nova Jaro.

La kondiĉoj por ni estis kompreneble malfacilaj, ĉar ni ne scipovis la lokan lingvon kaj la lernojaro estis komencinta jam kelkajn monatojn antaŭe. Entute, ni estis 6 albanaj studentoj.

Komence ni ekloĝis en luita privata domo kaj multe pli malfrue en studenta domo, kun la bulgaraj studentoj. Bonŝance, la ĉambro, kie mi dormis, havis pianon. La dommastroj, gemaljunuloj pensiiĝintaj, diris al mi: Ĉu malhelpas vin la piano? Mi respondis tutplezure: Ne, ĝi ne malhelpas min, vi povas lasi ĝin ĉi tie. Tiel mi komencis lerni iom pri la pianludo. La muziko iras al ties pasiiĝinto. Por pliprofundigi miajn sciojn pri muziko, mi enregistriĝis ĉe la Akademio pri Muziko en Sofio. Pli ĝuste, en la praktika kurso pri violono, gvidata de profesorino Nedjalka Dimeonova, tre fama internacia violonistino. Ŝi testis min dum ludo de malpeza koncerto per la violono sole. Vi havas bonan fingron, diris ŝi.

Tiutempe, najbare al mi, loĝis du bulgaraj studentoj. Ili protestis ĉiam, kiam mi trejnis min per la violono. Lasu la violonon, ĉar ni studas. Tio ege ĉagrenis min. Sed ili pravis. Mi ne havis alian liberan lokon por trejni min per la violono dum ankaŭ la lecionoj pri inĝenierado postulis sian tempon.

La okupo per muziko malhelpis la studadon pri inĝenierado por kio oni donis al mi stipendion. La samtempa sekvo de ambaŭ fakultatoj rezultigis neebbla. Tiel mi rezignis je la Akademio pri Muziko, iom antaŭ ol finiĝis la unua lerneja jaro. Mi foriris iel "ŝtele", ne anoncante tion al la profesorino. En la jaro 1950 la profesorino vizitis Albanion okaze de koncerto kaj renkontiĝis hazarde kun du personoj min konintaj. Ŝi demandis ilin; Kie troviĝas Vasil? Li estis mia studento en la kurso pri violono. Sed li malaperis post la unua jaro, ne renkontinte min. Ili respondis: Li estas ankoraŭ en Bulgario, daŭrigas la studojn pri inĝenierado.

- Ĉu vi elektus tutsame, se ni irus malantaŭen en la tempo? Ĉu vi fariĝus inĝeniero denove?

- Nepre. Mi klopodus fariĝi inĝeniero, je ajna kondiĉo.

- Ĉu estis tre malfacile por intelektulo vivi kaj labori en reĝimo diktatoreca? Ĉu vi sentis vin malfeliĉa pro tio?

- Certe. Estis tre malfacile, ĉar oni devis seniĝi je multaj liberecoj. Ĝis la abiturienteco mi loĝis kaj studis en Shkodër, tiam la lando estis ne diktatoreca. Kompreneble la totalisma reĝimo estis

vera malfeliĉo kaj Albanio travivis ĉirkaŭ 46 jarojn tian reĝimon. Nia lando povintus ĝui reĝimon similan al tiu de Grekio, sed ne. Sub la influo de Jugoslavio kaj Sovetunio, ties slavokomunismo, Albanio restis en la duonparto ne demokratieca de Eŭropo. Krome albanoj vivis en pluraj ŝtatoj, ĉar la grandaj potencoj disdonis ties teritoriojn al niaj najbaroj ekde la jaro 1878.

- *Ĉu vi iam intencis forlasi Albanion?*

- Ne, pro miaj vastaj familiaj rilatoj.

- *Kiuj pleje influis vian vivon?*

- Miaj gepatroj sendis min en la ŝtatan elementan lernejon ĉe “Dugajt e Reja: (Nova Bazaro) dum la unua jaro. Poste mi sekvis duan jaron en privata serbokroata lernejo. La trian jaron en jezuita lernejo, dum la kvaran jaron en franciskana lernejo. La kvinan jaron ili sendis min denove en la ŝtatan lernejon “28-a de Novembro” (Jaro de sendependiĝo de Albanio). La mezlernejajn studojn mi sekvis en la ŝtata gimnazio “28 Nentori”.


Sed mi povas diri, ke plej multe influis min mia edzino kaj miaj filoj. Mi klopodis krei por ili plej bonajn vivkondiĉojn. Miaj filoj nomiĝas Ardian kaj Ilir. Pli malaĝa Ardian (kun kiu mi loĝas en Novjorko ekde la morto de mia edzino) studis pri inĝnierado laŭ sia deziro kaj mia, dum Ilir laboras en la Instituto Hidrometereologia en Tirana. Tie li estas komputilprogramisto. Li pasiigintis pri komputiloj kaj specialistiĝis plurfoje eskterlande. Hodiaŭ li laboras en privata entrepreno pri komercado de diversaj varoj. Ambaŭ filoj estas edziĝintaj kaj havas infanojn.

- *Ĉu vi povus rakonti ion pri via akcepto kiel membro de la Internacia Akademio de Sciencoj?*

- Tio okazis post mia pensiigo, kiam mi deĵoris parttempe ĉe Seismologia Centro de nia Akademio de Sciencoj. Iutage tien venis profesoro, seismologo en Japanio, kiu okupiĝis pri tertremoj. Koincidis, ke li estis ankaŭ esperantisto. Li proponis al mi verki artikolon pri seismologio en Albanio. Li sugestis, ke mi traduku ĝin ankaŭ al Esperanto kaj sendu ĝin al li. Poste lia asistanto sin okupis pri tio kaj ĉion pretigis por la revuo “Scienca Revuo”, kiu aperis en Svisio en la lingvo Esperanto. La artikolo de sep paĝoj estis publikigita en tiu revuo. Tio estis unu el la kondiĉoj por akceptiĝi ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj AIS, kiu agnoskas ankaŭ esperanton kiel laborlingvon. Tiu akademio estis jure agnoskita ĉe la registaro de la ŝtato San Marino ekde la jaro 1983. La 21-an de junio 1992 mi ricevis leteron de AIS kie, interalie, oni skribis: Kunlabore kun la jam elektita prezidanto de ISK kaj vicprezidanto prof. Pennacchietti, ni konfirmas, ke vi estas membro de la Scienca Kolegio (ISK). Via distinga signo estas 1691 SK 073. Laŭ via deziro, vi povas resti longtempe libera membro de ISK. Do, la Akademio, vidinte mian artikolon en “Scienca Revuo” sendis al mi tiun leteron, ĉar ĝi bezonis havi membron ankaŭ el Albanio. Mi estis sendinta ankaŭ la titolojn de miaj eldonaĵoj kiel tiujn de la lernolibroj por studentoj pri Inĝenierado, artikolon en la Bulteno de Teknikaj Sciencoj de la Universitato kaj aliajn studaĵojn. Tia estas mia historio, ne kiel membro de la Akademio sed kiel membro de ties Scienca Konsilio.

- *Ĉu tio igis la aferojn pli facilaj por vi?*

- Tio pli konigis min ĉe la aliaj homoj, ĉio iĝis pli surpriza ol pli facila, ĉar tio okazis tre malfrue (1992). La Akademio de Sciencoj de Albanio, aranĝis solenaĵon okaze de mia 80-jariĝo kun la ĉeesto de du inter ties membroj, informitaj de eksa dekanato de la Fakultato pri Inĝenierado, prof. Kiĉo Negovani,



La tagon de mia 80-jariĝo

Tiun tempon mi konsideriĝis nur universitata profesoro. La aliaj ne konis mian agadon kiel inĝeniero aŭ diverskampe, ekz. en la eldonado, tradukado kaj partoprenado en la internaciaj konferencoj de UNESCO pri la studado de tertremoj okazintaj en Albanio.

La konferencoj okazis en Bulgario kaj Makedonio en ties seismologiaj institutoj, aparte en Skopje, kie en la jaro 1963 la tertremo detruis la urbon notinde. La ekipaĵoj estis alvenintaj el Usono, same la laborantoj specialiĝintaj en Usono.

- *Kiel vi dividas la tempon dediĉitan al laboro, familio kaj amuziĝo?*

- La labora reĝimo por mi estis strikta. Mi ĉiam troviĝis en la oficejo. Iutage la dekanano bezonis eksperton por realigi urĝan projekton por nova domo de la Ekonomia Fakultato. Ĉar neniu membro de nia katedro ĉeestis tiuomomente, mi entreprenis tion, kvankam mi ne responsis pri tia projekto, sed pri la metalaj konstruktadoj. En la dekanejo atendis stare arkitekto, kiu estis desegninta la arkitektan parton de la domo. Mi eliris. Pli poste mi vokis la arkitekton kaj petis lin: Donu al mi la arkitektan projekton, ĉar mi faros la konstruprojekton kaj respektivajn enkalkulaĵojn.

Tiel ni faris. Mi laboris tutan nokton kaj liveris la projekton sekvatage. La vicdekanano surprizige diris al mi: Vi estas aginta ne konvene, pro tio ni decidis antaŭaverti vin per noto en via biografio! Mi diris: Jen la projekto kaj forviŝu la noton pri mi.

Fakte tia noto neniam estis forviŝita de la ĉefo, sed ankaŭ la aliaj en la katedro ne estis punitaj. Okazis ankaŭ similaj malagrabloj. Sed la divido inter laboro, familio kaj amuziĝo estis ĉiam enorde. Kiam mia edzino malsaniĝis, plejparton de mia tempo mi dediĉis al ŝi, ĉar mi estis jam pensiiginta.

- *Ĉu vi opinias ke Albanio jam antaŭenmarŝis? Kion vi postulus de la nova generacio?*


- Fakte nian landon pluregadis la personoj fidelaj al komunismo ankaŭ post la falo de la totalisma reĝimo en 1991. Mi komparu Albanion kun Bulgario, ekzemple. Post la falo de la totalisma reĝimo en Bulgario, tie ekregis antikomunistoj, kiel la doktoro pri filozofio s-ro Ĵelju Ĵelev. Li verkis kelkajn librojn. Plej konata el ili estas la monografio "La Faŝismo". Li skribas pri faŝismo, subkomprenante la faŝistan (komunistan) reĝimon en sia lando, Bulgario (1967). Kiam li sendis artikolon al la revuo de la Marksima Instituto en Sofio, tio ege plaĉis al ties ĉefredaktoro

kiu telefonis al Ĵelev: Tre bona artikolo, kamarado Ĵelev, sed kial vi ne subskribis ĝin?! Ĵelev respondis ke la artikolo estas verkita fakte de Jozef Goebbels, fifama nazisto, ĉefo pri la propagando de la nazia reĝimo!...

Post la falo de komunismo (1989) en Bulgario, Ĵelev estis elektita la unua plurisma prezidento.

Ĉi tiun libron, la bulgaraj esperantistoj sendis al mi, tradukitan al Esperanto kaj mi transdonis ĝin al nia sekretario (sinjoro Bardhyl Selimi Mezini). Poste Bardhyl enalbanigis ĝin kaj ĝin eldonis en la jaro 2001.

Hodiaŭ Bulgario estas membro de EU, dum Albanio atendas tre longe.



La esperanta eldono kaj la albana eldono de “La Faŝismo”. Dekstre s-ro Ĵeliu Ĵelev

Permesu al mi pluparoli pri mi mem. Diplomiĝinte pri konstrua inĝenierado, la fakultato tenis nur min por plustudi unu jaron en la postuniversitata kurso pri problemoj de projektado, ĉe la Instituto de Projektado en Sofio. Tiel okazis. Mi eklaboris tie por projekti industriajn domon. Mi utiligis libron en la rusa lingvo entenantan numerajn tabulojn pretajn por enkalkulado de konstruelementoj, kiun aliaj projektistoj en la Instituto ankoraŭ ne konis. Post kiam mi finis la staĝon, mi revenis al Albanio. Tuj mi kompilis du grafikojn por pretpretaj kaj rapidaj enkalkulaĵoj de la konstruaj elementoj de la armita betono. Tiujn grafikojn mi ne eldonis, sed uzadis mem. Kopion mi enmanigis al mia asistanto (hodiaŭ profesoro en la Fakultato pri Konstru-inĝenierado).

-*Via filo estas same inĝeniero. Ĉu vi estas kontenta pro tio?*

- Tio estis ja mia deziro kaj mi faris ĉiun klopodon por ke li fariĝu konstru-inĝeniero. Li estis sukcesa ankaŭ ĉi tie en Novjorko. Eĉ la nepo plustudas pri inĝenierado.



Vasil Pistoli dum ekzameno pri Esperanto en la Instituto por Blindaj Studentoj, Tirana

- *Kiel vi sentiĝas hodiaŭ 85-jariĝa en fremda lando?*

- Familia kuniĝo kun la familio de mia filo (Ardian) kreis por mi multajn facilecojn por pasigi la

aĝulecon post la forpaso de mia edzino. Ĉi tie mi havas mian propran komputilon konektitan al interreto. Ĝi malfermis al mi senfinajn fenestrojn al la enciklopediaj scioj. En la “Libera Wikipedio” estas publikigitaj 12 milionoj da artikoloj (2.7 milionoj en la angla, 350 mil en la itala, 40 mil en la albana ks) de elstaraj ekspertoj el la tuta mondo. Tie aperas ankaŭ la Historio de Albanio, verkita de la Akademio de Sciencoj de Albanio. Tiel mi povas pasigi la tempon tre agrable.

- *Vi estas konata kiel elstara esperantisto. Kian valoron havas Esperanto?*

- Mi eklernis esperanton hazarde. Kiam mi deĵoris en la Ministrejo pri Konstruado en Tirana, mia kolego pli maljuna, s-ro Ĉefo Fico, estis esperantisto. Mi eksciis tion, kiam lin renkontis japana ambasadoro, same esperantisto. Mi aŭkultis ilin interbabilante en flua Esperanto, ne komprenante ion.



Vasil Pistoli en sia apartamento en Tirana

Interalie la japano demandis Fico-n, ĉu estis intereso pri Esperanto en Albanio. Fico montris min. La japano ricevis mian adreson kaj publikigis ĝin en la ĉina revuo “El Popola Ĉinio” en la rubriko “Korespondi deziras”. Poste mi petis inĝ. Fico-n rakonti ion pri Esperanto kaj kiel mi povus ellerni ĝin. Li enmanigis al mi broŝureton 12 x 8 cm-a kun proksimume 15 paĝoj kun la titolo “La Ŝlosilo de Esperanto”. Ĝi estis kompilita de li mem multajn jaroj antaŭe. En la broŝuro estis la tuta gramatiko kaj eta vortaro dulingva. Kun kurtaj ekzemploj.



Vasil kun fremdaj esperantistoj en Tirana

Dank'al simila broŝuro por rusoj la fama verkisto Lev Tolstoj sukcesis, ene de du horoj, ekkompreni tekstojn en Esperanto..Tio eblas ĉar Esperanto disponas pri 16 ĉefaj reguloj gramatikaj simplaj, ekz. “ĉiu nomo finiĝas per o”, “ĉiu adjektivo finiĝas per a” kaj tiel plu. Mi vizitis nian Nacian Bibliotekon en Tirana kaj traserĉis tie pri Esperanto. Rezulte mi trovis itallingvan libron por lernado de Esperanto. Per kajero kaj skribilo mi eknotis multon el ĝi. La

libro entenis ĉirkaŭ 300 paĝojn. Fakte en la libro ne estis pli ol 16 reguloj, kiujn enhavis la broŝuro de Fico, la cetero estis diversaj legaĵoj.

Post kelkaj tagoj alvenadis je mia adreso multaj leteroj de esperantistoj el diversaj landoj, eĉ esperantistoj indiĝenaj en Ameriko (Poka Hontas).

Baldaŭ mi finposedis la simplajn regulojn de Esperanto. Iutage la pordisto de nia ministrejo anoncis al mi, ke estas iu fremdulo (germano) kiu deziris renkontiĝi kun mi, Ni renkontiĝis. Estis la unua fremda esperantisto kun kiu mi ekbabilis en Esperanto. Li nomiĝis Erald Wald. Mi avertis lin, ke mi estas komencanto, sed li konfirmis ke tio ne gravas, li fakte bone komprenis min..Ni daŭrigis la konversacion ankaŭ post la laboro.

Pli malfrue mi sukcesis verki propran lernolibron por albanoj, kiun ni disdonis en kelkaj urboj de la lando. Ekzempleron de la libro mi sendis ankaŭ al la UEA-librovendejo, kiu mendis pliajn 10 ekzemplerojn por kiuj ili donis al mi honorarion kaj abonis min al la revuo “Esperanto”, organo de UEA, por kelkaj jaroj. Okaze de mia 50-jariĝo la revuo publikigis plenan paĝon kun la titolo: Unu el la patroj de Esperanto en Albanio. Mi estis prezidanto de Albana Esperanto-Ligo kaj prezidanto de Albana Esperanto-Instituto.

Foririnte el Albanio al Usono, oni igis min Honora Prezidanto de la Ligo dum la Instituton pluestris la eksa sekretario, s-ro Bardhyl Selimi. Li salutparolis ankaŭ en la solenaĵo okaze de mia 80-jariĝo.



En la jaro 1946, la kroata esperantisto Ivo Lapema, elstara aktivisto de nia Movado, estis komisiita kiel advokato de Albanio ĉe la Haga Juĝejo pro la tiel nomata “Incidentto en la Kanalo de Korfu”. (Temis pri eksplodo de marminoj kontraŭ militistaj ŝipoj britaj, kaŭzinta al britoj notindan damaĝon je vivo kaj materialoj. La minoj estis instalitaj de Albanio kunlabore kun Jugoslavio, malrespekte al la internaciaj traktatoj). La decido de la Haga Juĝejo kulpigis Albanion pro la incidento. La Brita Registaro postulis kiel rekompenco la blokon de la oro trovita en Germanio postmilite, forrabita el Albanio. S-ro Ivo Lapema alvenis en Albanion kaj renkontiĝis kun Enver Hoĝa, nia diktatoro, por ekcii pli detale pri la afero. Enver Hoĝa obstine diris al li nur ke “nia afero estas justa”. Kion faru la advokato ĉikaze? Nenion! Albanio perdis sian oron. Mi legis pri tio, multajn jarojn pli poste, reveninte patrion el Bulgario, en la ĵurnaloj esperantistaj, kie skribis ankaŭ s-ro Lapema. Sen Esperanto mi ne povus scii, kio ja okazis en la Kanalo de Korfu.

Alia kazo por kiu helpis min Esperanto estis la eldono de la verko de la pola aŭtoro Sienkiewicz “Quo vadis” (Kien vi iras), temanta pri la epoko de Nerono kaj por kiu la aŭtoro akiris Nobel-premion pri beletro en la jaro 1905 (tradukita ankaŭ al Esperanto). Dank’al tiu traduko mi povis konatiĝi kun ĝi.



Tra Esperanto mi povis ankaŭ konatiĝi kun la kulturo de popoloj, pri kiu skribis al mi fremdaj esperantistoj, aparte pri Okcidento el kiu estis tre malfacile ĉerpi literaturon en nia lando komunista.

-*Vi dediĉis sufiĉe da tempo al tradukoj?*

- Mi tradukis el la albana al Esperanto kaj inverse. Albana historiisto estis verkinta libron kun la titolo “Gjergj Kastrioti- Skënderbej”. La libro eble estis tradukita ankaŭ en aliajn lingvojn, por ke la fremduloj konatiĝu kun nia nacia heroo. Mi esperantigis ĝin. Kelkajn ekzemplerojn mi sendis eksterlanden (Italio, Francio ka). La fremdaj esperantistoj fotokopiis ĝin kaj multobligis por disdoni al la aliaj esperantistoj. Unu ekzempleron ili sendis ankaŭ al mi.



Dume la ĉina revuo “El Popola Ĉinio” publikigis plenpaĝe recenzon pri la libro kaj sendis al mi la revuon. Kopio de ĉi tiu libro troviĝas ankaŭ en la muzeo pri Skanderbeg en la urbo Kruja, El Esperanto mi enalbanigis verkon de la germana sociologo Bruno Vogelmann “La Nova Realismo”.



La versioj en la albana kaj Esperanto de la libro de Vogelmann

- *Ĉu vi estis iel persekutita pro Esperanto dum la komunisma reĝimo?*

- Tiam en Albanio la homoj ne komprenis, kion signifas la vorto “esperantisto”. Tiel niaj esperantistoj vivis silente, sub-ombre, ekz. la inĝeniero Ĉefo Fico, Spiro Rusha, eksa sekretario de la ĉefministrejo, doktoro Hamdi Sulçebe, kiu ĉiusemajne parolis en radiorubriko pri sanaj konsiloj, Janko Pali el Himara, kiu havis hejme riĉan bibliotekon kun Esperanto-eldonaĵoj ka. La Instituto pri Esperanto kaj nia Ligo fondiĝis post la falo de komunismo. Komprenoble niaj korespondoj en Esperanto altiris la atenton de la sekreta polico, La sekvo estis la fakto, ke oni ne permesis al mi veturi eksterlanden por partopreni internaciajn konferencojn..

- *Kiel vi karakterizus vin per malmultaj vortoj?*

- Mi estas pasiiganta pri ĉio nova en la scienco ĝenerale, pri enciklopedio, malfermanta novajn horizontojn kaj sendube pri la profesio de inĝenierado kaj muziko, ĝis atingo de la sciolimo, kiam la homo “scias, ke li scias nenion”. (Sokrato)

-*Kiel vi resumus vian vivon ĝisnunan?*

- Mi estas jam kontenta pro tio atingita de mi ĝis nun.

- *Kiel vi pasigas la tagon? Ĉu estas io pri kio vi aktuale okupiĝas aparte?*

- Alveninte al Novjorko mi trovis eksterordinarajn kondiĉojn por estingi mian scivolemon. Ŝajnas al mi samkiel en la libro “Liza en la mirlando” verkita de Luis Karol, aŭ en la fantasta libro de Voltero “Mikromegas”.

Intervjuis: Blerina Goce

7.2 Ĉefo Rauf Fico

Dr. Ing. Ĉefo Fico naskiĝis en la urbo Gjirokaŝtër, la 9-an de oktobro 1907. Tie li sekvis la elementan lernejon, dum la mezlernejajn studojn li sekvis en Italio. Same tie li studis en la Fakultato pri Inĝenierado de Torino. Dum la universitataj studoj, Fico konatiĝis kun la lingvo esperanto, skribis por la ĵurnalo “Studenti Shqiptar” (La albana studento) en ties numeroj 2 kaj 3 pri “la problemo de la internacia lingvo kaj Esperanto” kaj kompilis “La ŝlosilon de esperanto por albanoj”. (Ĝenevo, 1928, 5000 ekzempleroj)



En la patrio inĝ. Fico klopodis disvastigis la internacian lingvon kiel “lingvon de paco kaj bonkomprenemo inter la diversaj popoloj de la mondo”. Li abonis kelkajn esperantistajn revuojn, kiujn li post tralego disdonis al siaj kursanoj.

S-ro Ĉefo havis korespondadon kun esperantistaj amikoj el Francio, Anglio, Italio, Bulgario, Sovetunio, Popola Ĉinio, Norda Vjetnamio, Aŭstrio, Germanio ka. Sed kvankam li estis invitita en kelkaj internaciaj kongresoj, Fico ne sukcesis partopreni pro la politika reĝimo komunista en Albanio.

Fico kompilis lernobroŝuron pri Esperanto, uzebla de siaj kursanoj ĉe la kulturdomo “Ali Kelmendi” en Tirana, en la ministrejo, kie li mem deĵoris, en la Fakultato pri Historio kaj Filologio.

Inĝ. Fico tradukis en esperanton la poemon “Veploroj” de la albana aŭtoro Andon Zako Ĉajupi ka. Li mortis en Tirana post longedaŭra malsano la 20-an de aprilo 1971.

Fico revadis, ke Esperanto fariĝu dua lingvo instruata en niaj lernejoj. Tiun ideon li prezentis al la Centra Komitato de la Albana Kompartio, esperante ke Albanio iĝu la unua lando enmonde estiganta tion. Sed sensukcese.

Narina Ĉefo Fico

7.3 Dom Lazër Shantoja



(1891-1945)

Dom Lazër Shantoja estas tre interesa figuro de granda ekleziulo, publicisto, poeto, lingvisto kaj socia aktivisto, kies vivo finiĝis tragike.

Por ni, esperantistoj, li estis la unua albano alportinta la internacian lingvon en nian landon.

Jam antaŭ longe mi aŭdis la jenan anekdoton pri li:

Lazër estis invitita al internacia kunveno en Svedio. Atinginte Stokholmon relative malfrue vespere, neniuj plu atendis lin. Tiam Lazër iris al la plej proksima policejo por peti helpon. En la policejo oni ofertis ĉambron, kiu servis kiel antaŭprizono, ĝi estis libera. Komence li hezitis, surprizite kaj timema, sed poste li konstatis, ke la dormejo estis sufiĉe komforta. Tie estis lito kun kovriloj, necesejo, ŝranko kun kelkaj libroj kaj revuoj, tablo kaj seĝoj. Tranoktinte la gasto dankis al la policistoj dirante ŝerce: “se ankaŭ en mia lando la antaŭprizonaj ĉeloj estus kiel ĉi tiu, mi plezure tranoktadus tie longtempe!”

Trafoliumante mian arĥivon, mi trovis kelkajn notojn pri s-ro Shantoja.

Li estis partopreninta la entombigon de Avni Rustemi (politikulo albana tiutempe) en la urbo Vlora. En la ĵurnalo “Ora e maleve” (La horo de la montoj) li priskribis la grandan amason de homoj alvenintaj en Vlora ĉikaze, longan vicon de aŭtoj de la funebra procesio por la prezidanto de la organizaĵo “Bashkimi” (La kuniĝo), simbolo de la albana junularo. (Junie 1924, post la entombigo, eksplodis granda ribelo, kiu faligis la leĝan registaron de Ahmet Zog).

En la jaro 1902 oni nomumis lin direktoro de la publika itala lernejo (malfermita en Shkodër en 1861), kie tuje la albana lingvo ekuzatis kiel lernolingvo. Prave tiu ago estas konsiderita malfacila por la tempo (La otomana imperio ne permesis la albanan lingvon en la lernejoj kaj administracio).

Mem Shantoja skribis en 1940:

La lernejo por pastroj? Uh, kian malbonan impreson havis tiu franciskana lernejo, lernejo por malriĉaj montaranoj kaj infanoj. Lernejaĉo, tiu de Gjuhadol (kvartalo de Shkodër). Tute ne aristokrateca. Nu, kion do?! Lernejo, kie oni lernis albanlingve. Ĉu vi aŭdas?! Kian bezonon havas la infanoj lerni albanlingve? Ili parolas albane la tutan tagon hejme kun la gepatroj. Kien ili iros per tio?! Tiu lingvo apenaŭ kondukus vin trans Shën Gjijn (loko apud la urbo), kara. Ni bezonas la fremdlingvojn. Tiel oni rezonadis tiutempe en nia Shkodër. Kaj jen...En tiu lernejo tiel malplaĉa eĥadis unu nomo. Granda nomo, plenigonta, dominonta, plialtigonta kaj surtronigonta la albanan lernejon kaj la albanan lingvon en Albanio: ĝi estis la nomo de la paroĥisto de Gomsiqe (vilaĝo apud Shkodër), Patro Gjergj Fishta”⁴

- “Alia politika grupo, formiĝinta pli malfrue en elmigrantejo, estis tiu de Zara (Kroatio) (aŭ Sendependa Grupo), reprezentita de Mustafa Kruja, Hasan Prishtina, Dom Lazër Shantoja ka. La grupanoj subtenis la amikecon kun Italio kaj kontraŭstaris la komunismon. Ili opiniis naive, pragmatisme, ke la albana nacia afero solviĝus helpe de Italio”⁵
- “La unua viktimo de komunismo en la nova reĝimo (inter la katolikaj pastroj) estis Dom Lazër Shantoja, arestita fine de 1944, aktiva en la politika vivo albana, kiu dum mallonga tempoperiodo subtenis la faŝismon. Kiam lia patrino vizitis la filon en la prizono, ŝi petegis la gardiston mortigi sian filon pro kompato. Tiel grave li estis masakrita, ke li rampis per la genuoj kaj la kubutoj, ĉar li ne plu povis stari surpiede. En 1945, transformita en vivan kadavron, oni pafmortigis lin surkole”.⁶
- “Kaj Lazër Shantoja, Aleksandër Sirdani, Bernardin Palaj estis pafmortigitaj, sed la kugloj certe falus hajle ankaŭ sur la kupolojn de la universitatoj en Okcidento kie ili studadis, sur la bibliotekoj tra Eŭropo kie troviĝas iliaj verkoj”.⁷
- “Tamen, ekde la jaroj 1930, li (la poeto Mjeda) konatiĝis kiel granda majstro interalie ankaŭ de la iluminista poeto Lazër Shantoja.”⁸
- Dum longa tempo la katolikaj ekleziuloj sin sentis ekskluditaj, kaj ili pri tio pravis. 500 jarojn ili estis persekutitaj, por ke ili ŝanĝu sian kredon, sed ili akceptis ĉion, krom tio kaj la afero ne ŝanĝiĝis ankaŭ post kiam la Otomanoj foriris. Unu el plej grandaj malamikoj de la kredo al Dio estis la komunismo kaj ĝi neniam ĉesigis sian batalon ĝisfine, sed ankaŭ la Diaj servuloj ne haltis. La persekutado de la kristanaj ekleziuloj estis terura, tiel ankaŭ la krimoj kontraŭ ilin. Konica.al⁹ raportos unu teruran kazon, tiun de plej honorinda homo, Dom Lazër Shantoja.

Lazër Shantoja naskiĝis en Shkodër le 2-an de septembro 1892, de patro Mikel kaj patrino Luĉie Shantoja, devenantaj de Vjerdha e Vjetër (vilaĝo) apud Rragam, vilaĝo apud Shkodër.

La elementan edukiĝon li ricevis en la Saveria Kolegio kaj en la Papa Seminario en Shkodër, kun profesoroj Ndre Mjeda kaj aliaj jezuitaj pastroj.

Ĉirkaŭ la jaroj 1909-1910 li sin distingis en la lernado de la latina, malnovgreka kaj la itala. Li estis la unua albano, kiu posedis flue esperanton.

⁴ Ĉerpita el la libro de Gjovalin Gjoka pri la aktoro Pjetër Gjoka.

⁵ Astrit Jegeni, monografio pri Zef Mala

⁶ Luan Doda “Regado sen konkero”

⁷ Visar Zhiti “La vojoj al Infero”

⁸ El artikolo en la revuo “Fryma” (La animo)

⁹ Interreta forumo albanlingva

En la jaro 1914 Lazër vizitis Vienon unuafoje. La superajn teologiajn studojn li daŭrigis en la universitato de Innsbruck, kie Lazër ellernis la germanan. La 29-an de majo 1915 li fariĝis paroĥisto kaj servis en Pulaj, Beltojë, Velipojë, Rrjoll, Sheldi¹⁰ de 1917 ĝis 1922.

Lazër komencis tradukojn kaj la unuaj publikaĵoj aperis en “Lajmtari I zemrës s’Jezu Krishtit” (La heroldo de la koro de Jezu Kristo), en “Kalendari I veprës pijore” (La kalendaro de la religia verkado) ka. Li eldonis “Për natë kazanash” (amuziĝoj, kolekto de ludoj, enigmoj, proverboj).

Junie 1919 italaj militistoj enprizonigis lin en Beltojë. De 1922-1924 li estis sekretario de la episkopo de Shkodër, lia moŝto Lazër Mjeda. La 17-an de aprilo 1923 Shantoja renkontis en Vieno la aŭstran kancelieron, Dr. Joseph Seipel.

Li kunlaboris kun Anton Harapi¹¹ en la revuo “Ora e Maleve” kie Shantoja elmontris sian talenton kiel arda verkisto kaj satira poeto. Dom Lazër estis lia unua kunlaboranto preter Luigj Gurakuqi¹².

Pro politikaj ŝanĝoj en la patrio post 1924 Shantoja translokiĝis al Svisio, kie li deĵoris kiel paroĥestro en la germanparolanta Bienne kaj pli poste en La Motte, en la kantono Vaud dum longaj 15 jaroj, perfektigante sian francan lingvon. Kun li loĝis la patrino, Cija. En svisa vilaĝo Shantoja li ektradukis “Wilhelm Tell” kaj Faust”. Intertempe liaj artikoloj publikiĝis en la albanaj revuoj “Kumbona e Diellës”, “Cirka”, “Illyria” ka.

En la jaro 1936 la ĉiusemajna revuo “Leka” publikigis “Hermann kaj Dorotea” de Goethe, tradukitan de Dom Lazër.

La nova politika stato en Albanio post la faŝista okupacio (7-an de aprilo 1939) venigis Shantoja kun multaj aliaj politikaj elmigrintoj patrien. Oni atendis lin varme. Shantoja mesis en la katedralo kaj ofertis miraklan omelion por la ĉeestantoj.

Septembre 1939 li ekloĝis en Tirana kun la patrino. Li ege esperis je nova epoko por sia lando. En 1941 kun Ernest Koliqi, Mustafa Kruja, Zef Valentini, Karl Gurakuqi, Xhevat Korça¹³ ka li kunfondis la Instituton pri Albanaj Studoj.

Post la kapitulacio de la Faŝista Italio, septembe 1943, Shantoja rezignis je politika agado, dum li observis ĉagrene la fratmortigan intermiliton enlande.

Jarfine 1944, post kiam la komunistoj forkaptis la ŝtatpotencon, Shantoja fuĝis al la montoj Sheldija, kie li gastis en la paroĥejo de Dom Nikollë Gazulli¹⁴. Poste li gastis en Dedaj 22 tagojn ĉe Mark Tom Prela kaj ĉe Kolë Nuri Sheldija pliajn 26 tagojn. La komunistoj poste mortkondamnis ambaŭ gastigantojn.

Januare 1945 Shantoja estis arestita kaj torturita. Dom Lazër deklaris al ili:

“Ekde longe mi jam sciis, ke la komunistoj estas patriaj perfiduloj”.

Mem Enver Hoxha¹⁵ signis la decidon pri pafmortigo de Dom Shantoja.

“La decido estis plenumita en Tirana, la 5-an de marto 1945”- raportis Mehmet Shehu¹⁶.

¹⁰ Vilaĝoj apud Shkodër

¹¹ Albana eminentulo, katolika pastro, pafmortigita de komunistoj

¹² Alia albana eminentulo

¹³ Albanaj eminentuloj

¹⁴ Katolika pastro, pafmortigita de komunistoj

¹⁵ Komunista diktatoro

¹⁶ Komunista generalo, poste ĉefministro

La malamo de la komunista reĝimo por tiu intelektulo tradukinta Goethe kaj Schiller kaj publicinta en plej konataj albanaj revuoj kaj ĵurnaloj de la tiama epoko estis tiel granda, ke la torturintoj amputis el la korpo de Shantoja kvar kruojn!

La sorto de tiu pastro estis enradikiĝinta en la kontraŭokcidenta kaj kontraŭkristana sinteno de la komunistoj kaj en la porokcidenta sinteno de Shantoja, en ties kredo je la renaskiĝo de la aŭtoktona kristana kredo ĉe albanoj post kvin jarcentoj da otomana jugo.

7.4 Mikel Koliqi



(septembro 29, 1902 – Januaro 28, 1997)

Katolika pastro, muzikisto, la unua albana kardinalo.

Lia moŝto Mikel Koliqi apartenas al la unua generacio de la albanaj esperantistoj, kune kun sia frato Wilhem Koliqi. Antaŭ multaj jaroj mi bonŝancis vidi ĉe mia amiko dekojn da poŝtkartoj, kiujn la fratoj Koliqi estis interŝanĝintaj en Esperanto kun fremdaj amikoj el la diversaj landoj de la mondo.

Mikel Koliqi naskiĝis la 29-an de septembro 1902 de la patro Shan Koliqi kaj la patrino Age. Lia frato estis la konata albana verkisto kaj politikisto Ernest Koliqi.

La elementan lernejon Mikel sekvis en la Ksaveria Kolegio gvidata de jezuitaj pastroj. Ĉi lastaj sendis lin poste al Italio por studi en la kolegio “Cesare Arici” en Breŝia. Pli poste Mikel enregistriĝis en la Kolegio Villorez en Monza en 1919, en 1924 en la teknika lernejo en Bari kaj en la Politeknikumo de Milano. Ĝuste tie li sentis sin dediĉita al religio. Pro tio Koliqi forlasis la politeknikumon. En la jaro 1931 li finstudis pri teologio kaj filozofio en la Episkopa Seminario en Milano. La 30-an de majo samjare li estis nomumita paroĥisto en la Jezuita Preĝejo de Shkodër de episkopo Lazër Mjeda kaj sendita kiel paroĥisto en la diocezon de Shkodër.

Plejprobable en Italio, Mikel Koliqi konatiĝis kun esperanto kaj uzis ĝin dum la kontaktoj kun aliaj samideanoj, rekte aŭ perkoresponde.

En la jaro 1932, Koliqi fondis la ĥoron de la katedralo, nomata “Scuola Cantorum”. Tiucele, li komponis kaj surscenigis tri melodramojn de Dom Ndre Mjeda¹⁷. Mikel komponis ankaŭ 40 diversajn ĥorajn kantojn.

¹⁷ Albana ekleziulo kaj verkisto

De 1938 ĝis 1944 li redaktis la periodaĵon “La Katolika Albana Agado” kaj estis direktoro de “Kumona e së diellës” (La Dimanĉa kampanilo).

La 3-an de februaro 1945 la komunistaj aŭtoritatoj arestis Mikel Koliqi kaj kondamnis lin al du jaroj da enprizonigo pro la fakto ke “li aŭskultis fremdajn radiojn”. La vera kialo, plejprobable, estis la politika agado antaŭ 1945 de lia frato Ernest Koliqi. Du aliajn pastrojn kunarestitajn, oni pafmortigis.

Post la elprizonigo antaŭtempa Mikel denove estis arestita (1946) kaj kondamnita je 5 jaroj da enprizonigo. Sekvis alia elprizonigo kaj tria aresto en 1951, ĉi foje oni sendis lin en la lagrojn de Gradishta, Kuç, Gjază, Beden, Orman, Savër, Ballsh kaj Zejmen. (vera kalvario). Entute li pasigis 21 jarojn en la prizono kaj 21 jarojn en la lagroj. En la jaro 1986 oni liberigis lin pro maljunecaj kialoj.

Post 1990 Papo Johano Paŭlo la Dua akceptis lin en la Kolegio de Kardinaloj (novembre 1994) skribante ke “Mikel estas brava parohisto” kaj “heroeca pastro elteninta la komunisman teroron”.

Antaŭe, en 1993, la Papo estis renkontinta Koliqi en Albanio, okaze de sia vizito unua tie.



“Enprizonigita kaj ekskludita dum longaj jaroj de ekzercado de pastreca misio” skribis la Papo post la morto de la albana kardinalo. “Li estis potenca abio neniam timigita, brila ekzemplo de la Eterna Viziulo, samtiel de la kontinua fideleco al la Diina Kredo”

Kiam Mikel Koliqi estis invitita al la Kolegio de Kardinaloj, la novaĵagentejo de Vatikano anoncis ke “tio estis simboleca gesto pro la eklezia dankemo por iu, kiu neniam rezignis je la kredo, sed daŭrigis kaŝe sian agadon dum la severa diktatoreca reĝimo”.

La kardinalo Koliqi surmetis la ruĝan ĉapelon tre malfrue en sia vivo. Li estis unu el 30 novaj kardinaloj elektitaj tiujare, kiel parto de klopodoj por daŭrigi la tradicion de la plivastiĝo ne nur per personoj de itala deveno.

Kiam Koliqi studis inĝenieradon en la Universitato de Milano, unu samklasano estis ankaŭ la estonta Papo Johano XXIII.

La lastajn jarojn de sia vivo li pasigis kun sia nepino kaj ties familio en eta apartamento apud la katedralo de Shkodër. Li estis ĉiam gastigema malgraŭ sia malbona sanstato. Al gastoj Koliqi rakontis kun bedaŭro pri la prizonaj tempoj.



Foto de la familio Koliqi antaŭmilita

Forpasinte la 28-an de januaro 1997 oni entombigis Koliqi en la tombejo de la katedralo de Shkodër.

Bibliografio

1. Camaj M., *Fjala qet fjalën - Në rasën e gjashtëdhjetvjetorit të lindjes së Ernest Koliqit*, "Shêjzat",
2. [^] [Bushati H.](#), "Shkodra dhe motet: (traditë, ngjarje, njerëz...)", Shkodër: Idromeno, 1999.
3. [^] [Demo E.](#), *Viktor Koliqi i fshehti dhe i ndjeshmi vëlla shkrimtar: "Hylli i Dritës" rizbulon pas gjysmë shekulli vëllain shkrimtar të Ernest Koliqit*, Tiranë: [Shekulli](#). - Nr. 2529, 22 janar, 2009, f. 20 - 21.
4. [^] ^a ^b ^c [Elsie, Robert](#) (2013). "*A Biographical Dictionary of Albanian History*". I.B. Tauris. f. 247. [9781780764313](#). Marrë më 2 mars 2018.
5. [^] ["Kërkim "Mikel Koliqi" në catholic-hierarchy.org"](#).
6. [^] ["Historiku i Katedrales së Shkodrës"](#).

7.5 Cuk Simoni



Historio de Cuk Simonit en neniesa popola lingvo

(artikolo en la gazetaro)




De Elsa Demo

Cuk Simoni eldonis en la jaro 1929 historion de Gjergj Kastrioti- Skënderbej, originale en Esperanto. Kvankam la libro ne pretendas estis scienca esploraĵo, ĝiaj valoroj estas grandaj. Post la jaro 2000 la verko de Simoni estis tradukita kaj eldonita en la albanan lingvon. La tradukinto, Bardhyl Selimi, ne preterpasas tiun raran kazon de libro verkita unue en Esperanto kaj poste tradukita en la albanan. Li aldonas ke “Cuk Simoni estis tre kapabla verkisto. Uzinte malmultajn fontojn tiutempajn li sukcesis prezenti al la esperantistoj tre interesan, fidelan kaj lingve bonkvalitan bildon de nia nacia heroo”.

La libro estas skribita en ĝenro inter historio kaj reverkado, preskaŭ beletreca.


La teksto en la albana estas ilustrita kaj adaptita al la hodiaŭa standardo de la albana kaj disponeblas aktuale en interreto.



La eldonoj de 1929 (origine en Esperanto) kaj de 2011 (eldonita de SHBLSHR)

La nomo de la intelektulo el Shkodër fariĝis konata post la traduko el la itala de “Aventuroj de Pinokio, historio de ligna pupo” de Carlo Collodi.

“Pinokio” estis reeldonita adaptite al la standardo de la albana de filo de Cuk, Zef Simoni.



Post 1945 Cuk Simoni estis konata de la aŭtoritatoj de la kulturaj aferoj kiel “iu Cuk Simoni”. Sed li estis lernanto de Dom Lazër Shantoja, esperantisto ekde 1907. S-ro Selimi ne kaŝas la fakton ke pri Cuk Simoni li disponas tre malmulte da donitaĵoj. Ankaŭ la gefiloj de Cuk Simoni povus kontribui pli multe.

Ambaŭ eldonoj de “Skanderbeg- Heroo de Albanujo” havas enkondukon de ĉeĥoslovaka profesoro esperantista Miloŝ Lukaŝ (oktobro 1928), kie interalie oni legas:

“Ni esperu ke la majesta ideo de Zamenhof trovu en Albanio baldaŭ, multajn fidelajn disĉiplojn, dank’al la fervora propagandeca laboro de nia kara amiko, s-ro Cuk Simoni”

La tradukinto Selimi preferas reveni al sia temo pri Esperanto ĝenerale kaj konkludas, ke gravas ke “Cuk Simoni donacis al ni originalan verkon skribitan rekte en Esperanto pri Skanderbeg. Ekde la jaro 1929 restis malmulte da ekzempleroj de la verko de Simoni. Sur tiuj mi jam baziĝis por traduki albanlingven, ne sur la manuskriptoj”.

En la jaro 1967 estis klopodoj por traduki alian verkon pri Skanderbeg el la albana al esperanto, sed bedaŭrinde la tiutempaj aŭtoritatoj komunistaj ordonis, ke la tuta eldonkvanto iru al la fabriko por enkartoniĝo, ĉar ili havis suspektojn pro la lingvo ne konata de ili...

Jen fragmento el la libro de Cuk Simoni:

"La diligenta samideano S-ro Cuk Simoni prenis sur sin la taskon konigi al la tutmonda esperantistaro la historion pri la glora heroo de sia nacio. La laboro meritas simpatian akcepton ne nur pro la enhavo, kiu prezentos utilan materialon precipe al la historiistoj, sed samtempe pro la cirkonstanco, ke ĝi estas la unua esperantlingva libro aperanta en Albanujo"

"Al tiu ĉi lando kaj al ĝia nacio oni ĝis nun ne dediĉis ekster ties limoj sufiĉan atenton; prave plendis pri tio publike jam antaŭ dek kvar jaroj la unua albana esperantisto Don Lazar Shantoja (vidu la gazeton "Esperanto" el la jaro 1914-a, paĝo 22-23), iama instruisto de s-ro Cuk Simoni. Kaj tamen Albanujo estas unu el la plej interesaj ŝtatoj en Eŭropo".

7.6 D-ro Hamdi Sulçebe



(Artikolo por la revuo “Dielli Demokristian” (Demokristana suno) de la albanaj studentoj en Aŭstrio)

D-ro Hamdi Sulçebe naskiĝis en Elbasan en 1907. Li studis en mezlernejo en Graz (Aŭstrio) kaj en Vieno li sekvis la Fakultaton pri Medicino en 1933.

Dum longaj jaroj Sulçebe instruis en la Medicinista Mezlernejo en Tirana kaj poste en la Fakultato pri Medicino. Li verkis la unuan lernolibron pri pediatrio kaj esploris “La Rakiton en la distrikto de Tirana”. La medicinista scienca gazetaro akceptis multajn artikolojn kaj studaĵojn de d-ro Hamdi.

En la jaro 1939 la Doktoro fondis la unuan Konsultejon por “Patrino kaj Infano” en Tirana kaj samjare li komencis paroli regule en la radiorubriko “Medicinistaj Konsiloj” ĝis la jaro 1992, do 50 jarojn! (raraja eĉ en la mondo). Li forpasis la 7-an de februaro 1993.

Sed d-ro Hamdi Sulçebe estis ankaŭ esperantisto! Laŭ liaj memoraĵoj, dum la tempo de studoj en la gimnazio en Graz, en la domon, kie li enloĝiĝis, venadis sinjoro, amiko de la dommastro. Ĉi tiu parolis al la junulo - plena je revoj kaj scivolemo - pri Esperanto, lingvo aperinta en la jaro 1887. Ekde tiam la estonta kuracisto aliĝis al tiu limigita cirklo de adorantoj kaj praktikantoj de Esperanto en la Reĝa Albanio kaj pli poste. Intertempe Esperanto estis enirinta en Shkodër ekde la naskiĝjaro de Sulçebe kun Dom Lazër Shantoja kaj pli poste kun la fratoj Wilhelm kaj Mikel Koliqi, same kun Cuk Simoni ka. Samaĝaj kiel Sulçebe estis ankaŭ la inĝeniero Ĉefo Fico kaj la instruisto Janko Pali

Kiam fondiĝis la Albana Esperanto-Ligo en 1991, d-ro Sulçebe ankoraŭ vivis, sed bedaŭrinde mi vizitis ties hejmon post lia forpaso kaj renkontis nur ties filon kaj ties familion.

Kaj jen kion skribis mem d-ro Hamdi en siaj memoraĵoj (eltiraĵo ĉerpita el “Albana Esperantisto”, decembro 1991).

“Esperanto estas mia nostalgio. Dum la fruĵunecaj jaroj, pli ol duonjarcenton antaŭe, mi loĝis en Vieno kaj studis en gimnazio. Mi memoras, ke aĝulo vizitadis la dommastron kaj li babilis ankaŭ kun mi, konsilante al mi studi esperanton. Li substrekis la fakton, ke, ĉefe la malgrandaj popoloj bezonas facilan internacian lingvon.

“La kreinto de Esperanto”, diris li, “estas la pola okulisto Lazaro Zamenhof, naskiĝinta en Bialistoko, kies loĝantaro konsistis el diversaj naciecoj: poloj, rusoj, germanoj kaj hebreoj. Kvankam ili kunloĝis en la sama urbo, iliaj interrilatoj estis tre malbonaj. Ĝuste tiu cirkonstanco instigis Zamenhofon inventi esperanton kiel internacian lingvon. Tiel li kontribuis al la kunfratiĝo de diversaj naciuloj. La ideo mem naskiĝis, kiam Zamenhof studis en la gimnazio!” Ankaŭ mi, en la jaro 1926, estis gimnaziano! Kial mi ne lernu esperanton? La vortaro de Esperanto kaŭzis al mi nenian malfacilaĵon, ĉar mi havis scion pri la latina kaj la angla.

Min ege impresis la maniero de la formiĝo de la vortoj per sufiksoj kaj prefiksoj. Mi tuj komencis legi variajn librojn en Esperanto. Mi partoprenis en la kunvenoj de la loka esperantista klubo kaj de esperantista asocio.

Bedaŭrinde, enirinte en la universitaton, mi devis rezigni pri Esperanto. La longaj studoj en la universitato, poste venis la doktoriĝa periodo kaj profesia kuracista laboro, aldonu ankaŭ mian nesufiĉan volon, ĉio tio kaŭzis tiun interrompon de mia agado por Esperanto.

Tre malfrue mi konatiĝis kun inĝ. Ĉefo Fico, unu el pioniroj de Esperanto en Albanio. Sed niaj renkontiĝoj estis raraj.

Antaŭ iom da tempo frapis ĉe mia pordo du ĝentilaj homoj, s-roj Gafur Muço kaj Enver Bezhda, kiuj sciigis min pri la fondiĝo de la Albana Esperanto-Ligo, kio estis mia plej granda malnova deziro. Tuj post ilia foriro ekokupis min vera nostalgio pri Esperanto. Mi traserĉis en miaj libroj kaj fine trovis verajn trezorojn: la unua estis la verko de Seppik “La tuta Esperanto”. Kredu min, post duonjarcento mi legis kaj relegis grandsopire la vorton “samideano”. Kvankam nun mi estas 84-jara, mi deziras pluokupiĝi pri Esperanto. Kiel mi agus alie, post kiam mi relegis la unuan poemon de Zamenhof en Esperanto:

Malamikeco de la nacioj

Falu, falu, jam tempo estas!

La tuta homaro en familion

Unuiĝi sin devas.

Prof. Dr. Hamdi Sulçebe Tiranë”

7.8 Zef Luigj Mjeda



En Vikipedio oni skribas:

Zef Luigj MJEDA (naskiĝis en la jaro 1921 kaj forpasis la 5-an de oktobro 2000) estis albana esperantisto kaj Honora Membro de UEA ekde la jaro 1996.

En la jaro 1958 li renkontis la vjetnaman ambasadoron Nguen Van Kinh, en Tirana, kiu entuziasmigis lin per Esperanto. Ekde tiam Zef dediĉis sin plene al ĉi tiu lingvo laŭ eblecoj en la tiama komunisma Albanio.

En la jaro 1967 la sekreta polico arestis lin pro absurdaj kialoj kaj oni maldungis lin kiel instruiston, dum naŭ jaroj, ĝis kiam li pensiĝis. Intertempe Zef najlis lignajn kestojn en la cigareda fabriko.

Tamen Zef neniam ĉesigis sian agadon por Esperanto: li instruis ĝin malkaŝe, tradukis poeziaĵojn kaj fabelojn albanajn, kompiladis grandan vortaron.

Post la jaro 1990, finfine Zef povis libere agadi en la sino de intelektuloj kaj religiuloj.

Baldaŭ li aperigis dulingvan vortareton (esperanto-albana) en 1993) kaj lernolibron de Esperanto (1994).



Du eldonoj de la lernolibro de Zef Mjeda

Pro esperantista agado kaj aliaj kontribuadoj, la albana prezidento honoris lin per la titolo “Instruisto de la Popolo” en la jaro 1994.

Mjeda estis delegito de UEA kaj estro de la albana filio de Internacia Katolika Esperantista Unuiĝo (IKUE)

Bedaŭrinde multaj tradukaĵoj liaj restis ankoraŭ ne eldonitaj, interalie la tuta ciklo pri bravuloj (granda albana eposo), multaj popolaj fabeloj kaj granda vortaro albana- itala- esperanta.

Jen kelkaj fragmentoj el la Ciklo pri Bravuloj:

Bajloz reprezentis danĝeran malamikon, kiun alfrontis kaj neniiĝis la bravulo Gjergj.

Gjergj Elez Alia havis naŭ vundojn sur sia korpo, kaŭzitaĵoj de malamikoj venintaj el la maro kaj suferis dum naŭ jaroj surlite en sia hejmo. Ĉiuj amikoj estis jam forgesintaj lin. Nur la fratino flegis lin tagnocte dum naŭ jaroj. Tio ege ĉargrenis Gjergji-on, ĉar la fratino estis enfermita en la nobelturo pro li, dum la amikinoj de la fratino estis jam edzinigitaj kaj ĝuadis la vivon.

Iutage, la heroldo sciigis pri la alveno de alia malamiko, Nigra Bajlozo, el la maro, kiu mortigis homojn kaj detruis vilaĝojn ĉiutage. Neniam antaŭe la homoj estis vidintaj tian monstron, kiu demandis de ĉiu domo frostitan virŝafon, belan junulinon kaj aliajn tributojn.

La fratino de Gjergj aldiris sian fraton ke Bajloz elvokis lin al duelo. Tiam Gjergj petis la fratinton pretigi la ĉevalon kaj la armilojn, ĉar li alfrontos la teruran Bajlozon.

La fratino plorkantis:

*- Frato mia, kial la morto nin jam forgesis
Dum la gepatroj niaj sub la tilio jam putriĝis
Kaj via koro viva same en la hejmo putriĝos
Dum mia korpo en la manojn de la nigra Bajlozo enfalos..*

*Kial ne detruigis ĉi tiu nobelturo kaj premu nin sub ĝi mortajn?
Kial do ne ruinigis nia domo?
Ĉar la morto estus pli dolĉa, mia povra patrino, ol la vivo sen honoro.*

Gjergji, aŭskultinte ĉi tiujn vortojn. tuj forgesis pri siaj korpaj vundoj kaj subite ekstaris surpiede, kvazaŭ neniam li suferis surlite: maldika, altstatura, tiel kiel li estis. la plej bona bravulo.

- Fratino mia, prenu la militĉevalon mian, sendu ĝin al la hufferisto por ke li pretigu la ĉevalon por la milito.

La morgaŭon Gjergji luktis kontraŭ Bajlozon kaj venkis lin. Reveninte hejmen li ĉirkaŭbrakis la fratinton kaj mortis kune kun ŝi.

Oni entombigis ilin kune kaj, ekde tiam, la loko ilia restis neforgesebla.

Nun ankaŭ la edzino de Zef ne plu vivas sed estas la filinoj kaj nepinoj, same esperantistoj.



Zef kun sia familio dum la vizito de la nederlanda esperantisto Jacques Tuinder (jam forpasinta)

En la Julia numero de Albana Esperantisto (1993) aperis jena tradukaĵo de Mjeda.

Miaj vojaĝoj

(Poezio de Xhevair Spahiu)

Mi ascendos la nebulon,

Por ke sur miajn montojn mi iru

Se ili pluvon volas,

mi larmgutojn verŝos.

Mi ascendos la ĉevalon,

Por senti la guston de l' vento

Kiam atendos min amo.

Mi ascendos la riveron

Por ke ĝi alportu min al maro,

Por ke mi mem la ŝipojn portu.

Mi ascendos la arbon,

Por ke ĝi enigu pli profunden tere la radikojn.

Mi ascendos la revon,

Sur sproniloj de birdo,

Mi konduku ĝin ĉe la morgaŭo.

Mi ascendas la kanton,

Ĝia mastro, ĝia sklavo por ke mi kantu,

Al movo, ankaŭ al punkto morta.

Dum en la decembra numero 1993 ĉi tiu historieto de Esperanto en Shkodër.

Shkodra- la lulilo de la albana kulturo kaj de esperantista Movado en Norda Albanio

“La Eŭropa Renesanco efikis pozitive al la unuaj verkistoj en la albana lingvo, ĉiuj pastroj kaj prelatoj: Buzuku – Missa (1555); Budi- ritual romanum in epiroticam lingvam (1621); Bardhi- Dictionarium latino-epirotica (1635); Bogdani- Cuneus prophetarum- italic et EpiroticeConlexta (1685).

Norde de Albanio, centre en Shkodër, disvolviĝis religia kristana kulturo je profundaj patriotismaj radikoj.

Krom la nomoj supre menciitaj, en la XVIIIa ĝis XIXa jarcentoj elmontriĝis eksterordinara kulturo danke al pastroj Gjon Kazazi, Pjetër Zarishi, Ejll Radoja, Ndue Bytyçi kaj laikuloj Pashko Vasa, Zef Jubani kc. Tiu viveca agado daŭris ankaŭ per tre talentaj nomoj: Shtjefën Gjeçovi, Bernardin Palaj, Donat Kurti, Gjon Shllaku kc. Ilia fama revuo “Hylli i dritës” (La Stelo de la Lumo) fariĝis lanterno de la kulturo. Mi mem estis granda ties disĉiplo.

Ne mirinde ke en tia urbo kun vasta kulturo disvolviĝis unuafoje en nia lando ankaŭ la esperantista agado. Kronologie, la unua esperantisto en la urbo de Shkodër (subkompreneble ankaŭ en Albanio) estis Mark Kakariqi, ellerninta esperanton en Parizo en 1907. Pri donitaĵoj pruvantaj tiun daton por kelkiu alia esperantisto mi ne disponas.

Laŭ aliaj personoj esperanton ellernis Dom Lazër Shantoja en 1912. En la jaro 1929 Cuk Simoni eldonis esperantlingve la libron “Skënderbeu- nacia hero de Albanio”. En la enkonduko de tiu libro, Cuk Simoni diras ke Dom Lazër Shantoja instruis esperanton al Cuk Simoni kaj korespondis vaste kun fremduloj, aparte kun la redaktoro de la latva revuo, sinjoro Robs Lunz.

En la urbo de Shkodër, samkiel en la ceteraj urboj de nia lando, ni starigos lernokursojn por tiu ĉi mirakla lingvo, lingvo de paco kaj amikeco, je grandaj valoroj propedeŭtikaj por ellerni aliajn fremdlingvojn.

Mi mem jam tradukis en esperanton 7000 versojn el la rapsodioj de Ciklo pri Bravuloj “Mujo kaj Halil”, 50 naciajn kaj popolajn fabelojn. Dum dudek jaroj mi kompiladis vortaron esperanta-albana kun pli ol 40 mil vortoj kaj vortaron albana-esperanta kun 30 mil vortoj, ankaŭ lernolibron kun 12 lecionoj por lerni esperanton.”

*Ni ne volas ke dank' al
Antikvaj putraĵoj kiuj demandas "sanktecon",
Ree mergiĝi en la fosaĵo de mizereco.
Por ree verkadi kantojn de malĝojego
La unutonan kanton, senaniman de sklaveco,
Esti najleto enpuŝita en cerbojn de homaro.*

*Ni filoj de la nova jarcento,
Penas nin impeto kaj ardo,
En novajn batalojn ni luktos
Kaj por la venko ni falos.*

7.2 Çefo Rauf Fico

Dr. Ing. Çefo Fico naskiĝis en la urbo Gjirokaŝtër, la 9-an de oktobro 1907. Tie li sekvis la elementan lernejon, dum la mezlernejajn studojn li sekvis en Italio. Same tie li studis en la Fakultato pri Inĝenierado de Torino. Dum la universitataj studoj, Fico konatiĝis kun la lingvo esperanto, skribis por la ĵurnalo “Studenti Shqiptar” (La albana studento) en ties numeroj 2 kaj 3 pri “la problemo de la internacia lingvo kaj Esperanto” kaj kompilis “La ŝlosilon de esperanto por albanoj”. (Ĝenevo, 1928, 5000 ekzempleroj)



En la patrio inĝ. Fico klopodis disvastigi la internacian lingvon kiel “lingvon de paco kaj bonkomprenemo inter la diversaj popoloj de la mondo”. Li abonis kelkajn esperantistajn revuojn, kiujn li post tralego disdonis al siaj kursanoj.

S-ro Çefo havis korespondadon kun esperantistaj amikoj el Francio, Anglio, Italio, Bulgario, Sovetunio, Popola Ĉinio, Norda Vjetnamio, Aŭstrio, Germanio ka. Sed kvankam li estis invitita en kelkaj internaciaj kongresoj, Fico ne sukcesis partopreni pro la politika reĝimo komunista en Albanio.

Fico kompilis lernobroŝuron pri Esperanto, uzebla de siaj kursanoj ĉe la kulturdomo “Ali Kelmendi” en Tirana, en la ministrejo, kie li mem deĵoris, en la Fakultato pri Historio kaj Filologio.

Inĝ. Fico tradukis en esperanton la poemon “Veploroj” de la albana aŭtoro Andon Zako Çajupi ka. Li mortis en Tirana post longedaŭra malsano la 20-an de aprilo 1971.

Fico revadis, ke Esperanto fariĝu dua lingvo instruata en niaj lernejoj. Tiun ideon li prezentis al la Centra Komitato de la Albana Kompartio, esperante ke Albanio iĝu la unua lando enmonde estiganta tion. Sed sensukcese.

Narina Çefo Fico

7.3 Dom Lazër Shantoja



(1891-1945)

Dom Lazër Shantoja estas tre interesa figuro de granda ekleziulo, publicisto, poeto, lingvisto kaj socia aktivisto, kies vivo finiĝis tragike.

Por ni, esperantistoj, li estis la unua albano alportinta la internacian lingvon en nian landon.

Jam antaŭ longe mi aŭdis la jenan anekdoton pri li:

Lazër estis invitita al internacia kunveno en Svedio. Atinginte Stokholmon relative malfrue vespere, neniu plu atendis lin. Tiam Lazër iris al la plej proksima policejo por peti helpon. En la policejo oni ofertis ĉambbron, kiu servis kiel antaŭprizono, ĝi estis libera. Komence li hezitis, surprizite kaj timema, sed poste li konstatis, ke la dormejo estis sufiĉe komforta. Tie estis lito kun kovriloj, necesejo, ŝranko kun kelkaj libroj kaj revuoj, tablo kaj seĝoj. Tranoktinte la gasto dankis al la policistoj dirante ŝerce: “se ankaŭ en mia lando la antaŭprizonaj ĉeloj estus kiel ĉi tiu, mi plezure tranoktadus tie longtempe!”

Trafoliumante mian arĥivon, mi trovis kelkajn notojn pri s-ro Shantoja.

Li estis partopreninta la entombigon de Avni Rustemi (politikulo albana tiutempe) en la urbo Vlora. En la ĵurnalo “Ora e maleve” (La horo de la montoj) li priskribis la grandan amason de homoj alvenintaj en Vlora ĉikaze, longan vicon de aŭtoj de la funebra procesio por la prezidanto de la

organizaĵo “Bashkimi” (La kuniĝo), simbolo de la albana junularo. (Junie 1924, post la entombigo, eksplodis granda ribelo, kiu faligis la leĝan registaron de Ahmet Zog).

En la jaro 1902 oni nomumis lin direktoro de la publika itala lernejo (malfermita en Shkodër en 1861), kie tuje la albana lingvo ekuzatis kiel lernolingvo. Prave tiu ago estas konsiderita malfacila por la tempo (La otomana imperio ne permesis la albanan lingvon en la lernejoj kaj administracio).

Mem Shantoja skribis en 1940:

La lernejo por pastroj? Uh, kian malbonan impreson havis tiu franciskana lernejo, lernejo por malriĉaj montaranoj kaj infanoj. Lernejaĉo, tiu de Gjuhadol (kvartalo de Shkodër). Tute ne aristokrateca. Nu, kion do?! Lernejo, kie oni lernis albanlingve. Ĉu vi aŭdas?! Kian bezonon havas la infanoj lerni albanlingve? Ili parolas albane la tutan tagon hejme kun la gepatroj. Kien ili iros per tio?! Tiu lingvo apenaŭ kondukus vin trans Shën Gjini (loko apud la urbo), kara. Ni bezonas la fremdlingvojn. Tiel oni rezonadis tiutempe en nia Shkodër. Kaj jen...En tiu lernejo tiel malplaĉa eĥadis unu nomo. Granda nomo, plenigonta, dominonta, plialtigonta kaj surtronigonta la albanan lernejon kaj la albanan lingvon en Albanio: ĝi estis la nomo de la parohisto de Gomsiqe (vilaĝo apud Shkodër), Patro Gjergj Fishta”¹⁸

- “Alia politika grupo, formiĝinta pli malfrue en elmigrantejo, estis tiu de Zara (Kroatio) (aŭ Sendependa Grupo), reprezentita de Mustafa Kruja, Hasan Prishtina, Dom Lazër Shantoja ka. La grupanoj subtenis la amikecon kun Italio kaj kontraŭstaris la komunismon. Ili opiniis naive, pragmatisme, ke la albana nacia afero solviĝus helpe de Italio”¹⁹
- “La unua viktimo de komunismo en la nova reĝimo (inter la katolikaj pastroj) estis Dom Lazër Shantoja, arestita fine de 1944, aktiva en la politika vivo albana, kiu dum mallonga tempoperiodo subtenis la faŝismon. Kiam lia patrino vizitis la filon en la prizono, ŝi petegis la gardiston mortigi sian filon pro komparto. Tiel grave li estis masakrita, ke li rampis per la genuoj kaj la kubutoj, ĉar li ne plu povis stari surpiede. En 1945, transformita en vivan kadavron, oni pafmortigis lin surkole”.²⁰
- “Kaj Lazër Shantoja, Aleksandër Sirdani, Bernardin Palaj estis pafmortigitaj, sed la kugloj certe falus hajle ankaŭ sur la kupolojn de la universitatoj en Okcidento kie ili studadis, sur la bibliotekoj tra Eŭropo kie troviĝas iliaj verkoj”.²¹
- “Tamen, ekde la jaroj 1930, li (la poeto Mjeda) konatiĝis kiel granda majstro interalie ankaŭ de la iluminista poeto Lazër Shantoja.”²²
- Dum longa tempo la katolikaj ekleziuloj sin sentis ekskluditaj, kaj ili pri tio pravis. 500 jarojn ili estis persekutitaj, por ke ili ŝanĝu sian kredon, sed ili akceptis ĉion, krom tio kaj la afero ne ŝanĝiĝis ankaŭ post kiam la Otomanoj foriris. Unu el plej grandaj malamikoj de la kredo al Dio estis la komunismo kaj ĝi neniam ĉesigis sian batalon ĝisfine, sed ankaŭ la Diaj servuloj ne haltis. La persekutado de la kristanaj ekleziuloj estis terura, tiel ankaŭ la krimoj

¹⁸ Ĉerpita el la libro de Gjovalin Gjoka pri la aktoro Pjetër Gjoka.

¹⁹ Astrit Jegeni, monografio pri Zef Mala

²⁰ Luan Doda “Regado sen konkero”

²¹ Visar Zhiti “La vojoj al Infero”

²² El artikolo en la revuo “Fryma” (La animo)

kontraŭ ilin. Konica.al²³ raportos unu teruran kazon, tiun de plej honorinda homo, Dom Lazër Shantoja.

Lazër Shantoja naskiĝis en Shkodër le 2-an de septembro 1892, de patro Mikel kaj patrino Luĉie Shantoja, devenantaj de Vjerdha e Vjetër (vilaĝo) apud Rragam, vilaĝo apud Shkodër.

La elementan edukiĝon li ricevis en la Saveria Kolegio kaj en la Papa Seminario en Shkodër, kun profesoroj Ndre Mjeda kaj aliaj jezuitaj pastroj.

Ĉirkaŭ la jaroj 1909-1910 li sin distingis en la lernado de la latina, malnovgreka kaj la itala. Li estis la unua albano, kiu posedis flue esperanton.

En la jaro 1914 Lazër vizitis Vienon unuafoje. La superajn teologiajn studojn li daŭrigis en la universitato de Innsbruck, kie Lazër ellernis la germanan. La 29-an de majo 1915 li fariĝis paroĥisto kaj servis en Pulaj, Beltojë, Velipojë, Rrjoll, Sheldi²⁴ de 1917 ĝis 1922.

Lazër komencis tradukojn kaj la unuaj publikaĵoj aperis en “Lajmtari I zembrës s’Jezu Krishtit” (La heroldo de la koro de Jezu Kristo), en “Kalendari I veprës pijore” (La kalendaro de la religia verkado) ka. Li eldonis “Për natë kazanash” (amuziĝoj, kolekto de ludoj, enigmoj, proverboj).

Junie 1919 italaj militistoj enprizonigis lin en Beltojë. De 1922-1924 li estis sekretario de la episkopo de Shkodër, lia moŝto Lazër Mjeda. La 17-an de aprilo 1923 Shantoja renkontis en Vieno la aŭstran kancelieron, Dr. Joseph Seipel.

Li kunlaboris kun Anton Harapi²⁵ en la revuo “Ora e Maleve” kie Shantoja elmontris sian talenton kiel arda verkisto kaj satira poeto. Dom Lazër estis lia unua kunlaboranto preter Luigj Gurakuqi²⁶.

Pro politikaj ŝanĝoj en la patrio post 1924 Shantoja translokiĝis al Svisio, kie li deĵoris kiel paroĥestro en la germanparolanta Bienne kaj pli poste en La Motte, en la kantono Vaud dum longaj 15 jaroj, perfektigante sian francan lingvon. Kun li loĝis la patrino, Cija. En svisa vilaĝo Shantoja li ektradukis “Wilhelm Tell” kaj Faust”. Intertempe liaj artikoloj publikiĝis en la albanaj revuoj “Kumbona e Diellës”, “Cirka”, “Illyria” ka.

En la jaro 1936 la ĉiusemajna revuo “Leka” publikigis “Hermann kaj Dorotea” de Goethe, tradukitan de Dom Lazër.

La nova politika stato en Albanio post la faŝista okupacio (7-an de aprilo 1939) venigis Shantoja kun multaj aliaj politikaj elmigrintoj patrien. Oni atendis lin varme. Shantoja mesis en la katedralo kaj ofertis miraklan omelion por la ĉeestantoj.

Septembre 1939 li ekloĝis en Tirana kun la patrino. Li ege esperis je nova epoko por sia lando. En 1941 kun Ernest Koliqi, Mustafa Kruja, Zef Valentini, Karl Gurakuqi, Xhevat Korça²⁷ ka li kunfondis la Instituton pri Albanaj Studoj.

Post la kapitulacio de la Faŝista Italio, septembe 1943, Shantoja rezignis je politika agado, dum li observis ĉagrene la fratmortigan intermiliton enlande.

Jarfine 1944, post kiam la komunistoj forkaptis la ŝtatpotencon, Shantoja fuĝis al la montoj Sheldija, kie li gastis en la paroĥejo de Dom Nikollë Gazulli²⁸. Poste li gastis en Dedaj 22 tagojn ĉe

²³ Interreta forumo albanlingva

²⁴ Vilaĝoj apud Shkodër

²⁵ Albana eminentulo, katolika pastor, pafmortigita de komunistoj

²⁶ Alia albana eminentulo

²⁷ Albanaj eminentuloj

²⁸ Katolika pastro, pafmortigita de komunistoj

Mark Tom Prela kaj ĉe Kolë Nuri Sheldija pliajn 26 tagojn. La komunistoj poste mortkondamnis ambaŭ gastigantojn.

Januare 1945 Shantoja estis arestita kaj torturita. Dom Lazër deklaris al ili:

“Ekde longe mi jam sciis, ke la komunistoj estas patriaj perfiduloj”.

Mem Enver Hoxha²⁹ signis la decidon pri pafmortigo de Dom Shantoja.

“La decido estis plenumita en Tirana, la 5-an de marto 1945”- raportis Mehmet Shehu³⁰.

La malamo de la komunista reĝimo por tiu intelektulo tradukinta Goethe kaj Schiller kaj publicinta en plej konataj albanaj revuoj kaj ĵurnaloj de la tiama epoko estis tiel granda, ke la torturintoj amputis el la korpo de Shantoja kvar kruojn!

La sorto de tiu pastro estis enradikiĝinta en la kontraŭokcidenta kaj kontraŭkristana sinteno de la komunistoj kaj en la porokcidenta sinteno de Shantoja, en ties kredo je la renaskiĝo de la aŭtoktona kristana kredo ĉe albanoj post kvin jarcentoj da otomana jugo.

7.4 Mikel Koliqi



(septembro 29, 1902 – Januaro 28, 1997)

Katolika pastro, muzikisto, la unua albana kardinalo.

Lia moŝto Mikel Koliqi apartenas al la unua generacio de la albanaj esperantistoj, kune kun sia frato Wilhem Koliqi. Antaŭ multaj jaroj mi bonŝancis vidi ĉe mia amiko dekojn da poŝtkartoj, kiujn la fratoj Koliqi estis interŝanĝintaj en Esperanto kun fremdaj amikoj el la diversaj landoj de la mondo.

Mikel Koliqi naskiĝis la 29-an de septembro 1902 de la patro Shan Koliqi kaj la patrino Age. Lia frato estis la konata albana verkisto kaj politikisto Ernest Koliqi.

La elementan lernejon Mikel sekvis en la Ksaveria Kolegio gvidata de jezuitaj pastroj. Ĉi lastaj sendis lin poste al Italio por studi en la kolegio “Cesare Arici” en Breŝia. Pli poste Mikel enregistriĝis en la Kolegio Vilorez en Monza en 1919, en 1924 en la teknika lernejo en Bari kaj en

²⁹ Komunista diktatoro

³⁰ Komunista generalo, poste ĉefministro

la Politeknikumo de Milano. Ĝuste tie li sentis sin dediĉita al religio. Pro tio Koliqi forlasis la politeknikumon. En la jaro 1931 li finstudis pri teologio kaj filozofio en la Episkopa Seminario en Milano. La 30-an de majo samjare li estis nomumita paroĥisto en la Jezuita Preĝejo de Shkodër de episkopo Lazër Mjeda kaj sendita kiel paroĥisto en la diocezon de Shkodër.

Plejprobable en Italio, Mikel Koliqi konatiĝis kun esperanto kaj uzis ĝin dum la kontaktoj kun aliaj samideanoj, rekte aŭ perkoresponde.

En la jaro 1932, Koliqi fondis la ĥoron de la katedralo, nomata “Scuola Cantorum”. Tiucele, li komponis kaj surscenigis tri melodramojn de Dom Ndre Mjeda³¹. Mikel komponis ankaŭ 40 diversajn ĥorajn kantojn.

De 1938 ĝis 1944 li redaktis la periodaĵon “La Katolika Albana Agado” kaj estis direktoro de “Kumona e së diellës” (La Dimanĉa kampanilo).

La 3-an de februaro 1945 la komunistaj aŭtoritatoj arestis Mikel Koliqi kaj kondamnis lin al du jaroj da enprizonigo pro la fakto ke “li aŭskultis fremdajn radiojn”. La vera kialo, plejprobable, estis la politika agado antaŭ 1945 de lia frato Ernest Koliqi. Du aliajn pastrojn kunarestitajn, oni pafmortigis.

Post la elprizonigo antaŭtempa Mikel denove estis arestita (1946) kaj kondamnita je 5 jaroj da enprizonigo. Sekvis alia elprizonigo kaj tria aresto en 1951, ĉi foje oni sendis lin en la lagrojn de Gradishta, Kuç, Gjazë, Beden, Orman, Savër, Ballsh kaj Zejmen. (vera kalvario). Entute li pasigis 21 jarojn en la prizono kaj 21 jarojn en la lagroj. En la jaro 1986 oni liberigis lin pro maljunecaj kialoj.

Post 1990 Papo Johano Paŭlo la Dua akceptis lin en la Kolegio de Kardinaloj (novembre 1994) skribante ke “Mikel estas brava paroĥisto” kaj “heroeca pastro elteninta la komunisman teroron”.

Antaŭe, en 1993, la Papo estis renkontinta Koliqi en Albanio, okaze de sia vizito unua tie.



“Enprizonigita kaj ekskludita dum longaj jaroj de ekzercado de pastreca misio” skribis la Papo post la morto de la albana kardinalo. “Li estis potenca abio neniam timigita, brila ekzemplo de la Eterna Viziulo, samtiel de la kontinua fideleco al la Diina Kredo”

Kiam Mikel Koliqi estis invitita al la Kolegio de Kardinaloj, la novaĵagentejo de Vatikano anoncis ke “tio estis simboleca gesto pro la eklezia dankemo por iu, kiu neniam rezignis je la kredo, sed daŭrigis kaŝe sian agadon dum la severa diktatoreca reĝimo”.

La kardinalo Koliqi surmetis la ruĝan ĉapelon tre malfrue en sia vivo. Li estis unu el 30 novaj kardinaloj elektitaj tiujare, kiel parto de klopodoj por daŭrigi la tradicion de la plivastiĝo ne nur per personoj de itala deveno.

³¹ Albana ekleziulo kaj verkisto

Kiam Koliqi studis inĝenieradon en la Universitato de Milano, unu samklasano estis ankaŭ la estonta Papo Johano XXIII.

La lastajn jarojn de sia vivo li pasigis kun sia nepino kaj ties familio en eta apartamento apud la katedralo de Shkodër. Li estis ĉiam gastigema malgraŭ sia malbona sanstato. Al gastoj Koliqi rakontis kun bedaŭro pri la prizonaj tempoj.



Foto de la familio Koliqi antaŭmilita

Forpasinte la 28-an de januaro 1997 oni entombigis Koliqi en la tombejo de la katedralo de Shkodër.

Bibliografio

7. Camaj M., *Fjala qet fjalën - Në rasën e gjashtëdhjetorit të lindjes së Ernest Koliqit*, "Shêjzat",
8. [^] [Bushati H.](#), "Shkodra dhe motet: (traditë, ngjarje, njerëz...)", Shkodër: Idromeno, 1999.
9. [^] [Demo E.](#), *Viktor Koliqi i fshehti dhe i ndjeshmi vëlla shkrimtar: "Hylli i Dritës" rizbulon pas gjysmë shekulli vëllain shkrimtar të Ernest Koliqit*, Tiranë: [Shekulli](#). - Nr. 2529, 22 janar, 2009, f. 20 - 21.
10. [^] ^a ^b ^c [Elsie, Robert](#) (2013). "*A Biographical Dictionary of Albanian History*". I.B. Tauris. f. 247. [9781780764313](#). Marrë më 2 mars 2018.
11. [^] ["Kërkim "Mikel Koliqi" në catholic-hierarchy.org"](#).
12. [^] ["Historiku i Katedrales së Shkodrës"](#).



7.5 Cuk Simoni

Historio de Cuk Simonit en neniesa popola lingvo

(artikolo en la gazetaro)




De Elsa Demo

Cuk Simoni eldonis en la jaro 1929 historion de Gjergj Kastrioti- Skënderbej, originale en Esperanto. Kvankam la libro ne pretendas estis scienca esploraĵo, ĝiaj valoroj estas grandaj. Post la jaro 2000 la verko de Simoni estis tradukita kaj eldonita en la albanan lingvon. La tradukinto, Bardhyl Selimi, ne preterpasas tiun raran kazon de libro verkita unue en Esperanto kaj poste tradukita en la albanan. Li aldonas ke “Cuk Simoni estis tre kapabla verkisto. Uzinte malmultajn fontojn tiutempajn li sukcesis prezenti al la esperantistoj tre interesan, fidelan kaj lingve bonkvalitan bildon de nia nacia heroo”.

La libro estas skribita en ĝenro inter historio kaj reverkado, preskaŭ beletreca.


La teksto en la albana estas ilustrita kaj adaptita al la hodiaŭa standardo de la albana kaj disponeblas aktuale en interreto.



La eldonoj de 1929 (originale en Esperanto) kaj de 2011 (eldonita de SHBLSHR)

La nomo de la intelektulo el Shkodër fariĝis konata post la traduko el la itala de “Aventuroj de Pinokio, historio de ligna pupo” de Carlo Collodi.

“Pinokio” estis reeldonita adaptite al la standardo de la albana de filo de Cuk, Zef Simoni.



Post 1945 Cuk Simoni estis konata de la aŭtoritatoj de la kulturaj aferoj kiel “iu Cuk Simoni”. Sed li estis lernanto de Dom Lazër Shantoja, esperantisto ekde 1907. S-ro Selimi ne kaŝas la fakton ke pri Cuk Simoni li disponas tre malmulte da donitaĵoj. Ankaŭ la gefiloj de Cuk Simoni povus kontribui pli multe.

Ambaŭ eldonoj de “Skanderbeg- Heroo de Albanujo” havas enkondukon de ĉeĥoslovaka profesoro esperantista Miloŝ Lukaŝ (oktobro 1928), kie interalie oni legas:

“Ni esperu ke la majesta ideo de Zamenhof trovu en Albanio baldaŭ, multajn fidelajn disĉiplojn, dank’al la fervora propagandeca laboro de nia kara amiko, s-ro Cuk Simoni”

La tradukinto Selimi preferas reveni al sia temo pri Esperanto ĝenerale kaj konkludas, ke gravas ke “Cuk Simoni donacis al ni originalan verkon skribitan rekte en Esperanto pri Skanderbeg. Ekde la jaro 1929 restis malmulte da ekzempleroj de la verko de Simoni. Sur tiuj mi jam baziĝis por traduki albanlingven, ne sur la manuskriptoj”.

En la jaro 1967 estis klopodoj por traduki alian verkon pri Skanderbeg el la albana al esperanto, sed bedaŭrinde la tiutempaj aŭtoritatoj komunistaj ordonis, ke la tuta eldonkvanto iru al la fabribo por enkartoniĝo, ĉar ili havis suspektojn pro la lingvo ne konata de ili...

Jen fragmento el la libro de Cuk Simoni:

"La diligenta samideano S-ro Cuk Simoni prenis sur sin la taskon konigi al la tutmonda esperantistaro la historion pri la glora heroo de sia nacio. La laboro meritas simpatian akcepton ne nur pro la enhavo, kiu prezentos utilan materialon precipe al la historiistoj, sed samtempe pro la cirkonstanco, ke ĝi estas la unua esperantlingva libro aperanta en Albanujo"

"Al tiu ĉi lando kaj al ĝia nacio oni ĝis nun ne dediĉis ekster ties limoj sufiĉan atenton; prave plendis pri tio publike jam antaŭ dek kvar jaroj la unua albana esperantisto Don Lazar Shantoja (vidu la gazeton "Esperanto" el la jaro 1914-a, paĝo 22-23), iama instruisto de s-ro Cuk Simoni. Kaj tamen Albanujo estas unu el la plej interesaj ŝtatoj en Eŭropo".

7.6 D-ro Hamdi Sulçebe



(Artikolo por la revuo “Dielli Demokristian” (Demokristana suno) de la albanaj studentoj en Aŭstrio)

D-ro Hamdi Sulçebe naskiĝis en Elbasan en 1907. Li studis en mezlernejo en Graz (Aŭstrio) kaj en Vieno li sekvis la Fakultaton pri Medicino en 1933.

Dum longaj jaroj Sulçebe instruis en la Medicinista Mezlernejo en Tirana kaj poste en la Fakultato pri Medicino. Li verkis la unuan lernolibron pri pediatrio kaj esploris “La Rakiton en la distrikto de Tirana”. La medicinista scienca gazetaro akceptis multajn artikolojn kaj studaĵojn de d-ro Hamdi.

En la jaro 1939 la Doktoro fondis la unuan Konsultejon por “Patrino kaj Infano” en Tirana kaj samjare li komencis paroli regule en la radiorubriko “Medicinistaj Konsiloj” ĝis la jaro 1992, do 50 jarojn! (raraĵo eĉ en la mondo). Li forpasis la 7-an de februaro 1993.

Sed d-ro Hamdi Sulçebe estis ankaŭ esperantisto! Laŭ liaj memoraĵoj, dum la tempo de studoj en la gimnazio en Graz, en la domon, kie li enloĝiĝis, venadis sinjoro, amiko de la dommastro. Ĉi tiu parolis al la junulo - plena je revoj kaj scivolemo - pri Esperanto, lingvo aperinta en la jaro 1887. Ekde tiam la estonta kuracisto aliĝis al tiu limigita cirklo de adorantoj kaj praktikantoj de Esperanto en la Reĝa Albanio kaj pli poste. Intertempe Esperanto estis enirinta en Shkodër ekde la naskiĝjaro de Sulçebe kun Dom Lazër Shantoja kaj pli poste kun la fratoj Wilhelm kaj Mikel Koliqi, same kun Cuk Simoni ka. Samaĝaj kiel Sulçebe estis ankaŭ la inĝeniero Çefo Fico kaj la instruisto Janko Pali

Kiam fondiĝis la Albana Esperanto-Ligo en 1991, d-ro Sulçebe ankoraŭ vivis, sed bedaŭrinde mi vizitis ties hejmon post lia forpaso kaj renkontis nur ties filon kaj ties familion.

Kaj jen kion skribis mem d-ro Hamdi en siaj memoraĵoj (eltiraĵo ĉerpita el “Albana Esperantisto”, decembro 1991).

“Esperanto estas mia nostalgio. Dum la frujunecaj jaroj, pli ol duonjarcenton antaŭe, mi loĝis en Vieno kaj studis en gimnazio. Mi memoras, ke aĝulo vizitadis la dommastron kaj li babilis ankaŭ kun mi, konsilante al mi studi esperanton. Li substrekis la fakton, ke, ĉefe la malgrandaj popoloj bezonas facilan internacian lingvon.

“La kreinto de Esperanto”, diris li, “estas la pola okulisto Lazaro Zamenhof, naskiĝinta en Bialistoko, kies loĝantaro konsistis el diversaj naciecoj: poloj, rusoj, germanoj kaj hebreoj. Kvankam ili kunloĝis en la sama urbo, iliaj interrilatoj estis tre malbonaj. Ĝuste tiu cirkonstanco instigis Zamenhofon inventi esperanton kiel internacian lingvon. Tiel li kontribuis al la kunfratiĝo de diversaj naciuloj. La ideo mem naskiĝis, kiam Zamenhof studis en la gimnazio!” Ankaŭ mi, en la jaro 1926, estis gimnaziano! Kial mi ne lernu esperanton? La vortaro de Esperanto kaŭzis al mi nenian malfacilaĵon, ĉar mi havis scion pri la latina kaj la angla.

Min ege impresis la maniero de la formiĝo de la vortoj per sufiksoj kaj prefiksoj. Mi tuj komencis legi variajn librojn en Esperanto. Mi partoprenis en la kunvenoj de la loka esperantista klubo kaj de esperantista asocio.

Bedaŭrinde, enirinte en la universitaton, mi devis rezigni pri Esperanto. La longaj studoj en la universitato, poste venis la doktoriĝa periodo kaj profesia kuracista laboro, aldonu ankaŭ mian nesufiĉan volon, ĉio tio kaŭzis tiun interrompon de mia agado por Esperanto.

Tre malfrue mi konatiĝis kun inĝ. Ĉefo Fico, unu el pioniroj de Esperanto en Albanio. Sed niaj renkontiĝoj estis raraj.

Antaŭ iom da tempo frapis ĉe mia pordo du ĝentilaj homoj, s-roj Gafur Muço kaj Enver Bezhda, kiuj sciigis min pri la fondiĝo de la Albana Esperanto-Ligo, kio estis mia plej granda malnova deziro. Tuj post ilia foriro ekokupis min vera nostalgio pri Esperanto. Mi traserĉis en miaj libroj kaj fine trovis verajn trezorojn: la unua estis la verko de Seppik “La tuta Esperanto”. Kredu min, post duonjarcento mi legis kaj relegis grandsopire la vorton “samideano”. Kvankam nun mi estas 84-jara, mi deziras pluokupiĝi pri Esperanto. Kiel mi agus alie, post kiam mi relegis la unuan poemon de Zamenhof en Esperanto:

Malamikeco de la nacioj

Falu, falu, jam tempo estas!

La tuta homaro en familion

Unuiĝi sin devas.

Prof. Dr. Hamdi Sulçebe Tiranë”

7.7 Janko Pali



Artikolo de Beqir Sina



Janko Ll. Pali estis kaj restas erudiciulo je naciaj dimensioj en la areo de Bregdet³² de Albanio, perlo de nia lando.

Lia vivo estis malfacila dum ĉiuj periodoj, kiujn nia popolo jam pasigis. Janko naskiĝis elmigrinto, kreskis orfo kaj mortis elmigrinto.

Janko Pali sin distingis je ne elĉerpebla deziro por scioj. Li posedis la anglan, la francan, esperanton, la italan, la hispanan, la grekan, la rusan kaj iomete la germanan.

Naskiĝis li la 20-an de julio 1898 en la vilaĝo Çoban Ishah de Izmir (Anatolio) kaj mortis la 12-an de septembro 1994 en Korfu.

La gepatroj forpasis, kiam Janko estis etulo. En la jaro 1900 li revenis Albanion kun sia patrino dum la lando ankoraŭ suferis sub la otomana jugo. La elementa lernejo estis greklingva, sed Janko studis diligente. Tamen en 1912 la ekonomiaj kondiĉoj ne ebligis al li daŭrigi la mezlernejajn studojn, ankaŭ Balkanio tiutempe estis en la milito. Tial li servis kiel asistanto en iu vendejo. Post du jaroj li elmigris al Ateno, kie li faris diversajn laborojn.

Malsaniĝinte en 1915 Janko revenis hejmen kaj resaniĝinte iris denove al Grekio, en Pireo, kiel teknika lernanto en la Trajnoriparejo de la linio Pireo- Lariso- Kufi. Ĉi-okaze li sekvis la vesperan profesian lernejon.

Kelke da tempo Janko laboris en Lavrio kiel forĝisto en la Asocio de la Grekaj Minejoj. Li klopodis por elmigri al Francio en 1917, kie, en Marsejlo, li laboris kiel mekanikisto en la konata entrepreno "A. Gramon", en Pont de Cheruy, apud Liono, kaj poste en Parizo kaj Bulonjo kaj San Etieno. En la uzinoj "Leflev".

Definitive Janko instaliĝis ĉe la uzino "Salmson" ĝis la tago de la reveno patrion en 1928, kie li ekdeĵoris kiel instruisto. La nova profesio ege plaĉis al li kaj kontentigis lin. Lia gvidmaksimo estis "La edukisto edukas sin mem".

Sekvis unujara militista trejnado en Tirana pri komunikilaj aferoj, en radiotelegrafio.

³² Marborda regiono de Vlora ĝis Saranda

En la jaro 1935 Janko ekzameniĝis en la Pedagogia Lernejo de Elbasan por perfektigi siajn instruistajn kapablecojn. Daŭre li studis kaj kopiis diversajn lernolibrojn en eksterlandaj tekstoj. Janko Pali kontraŭstaris la religiajn servojn en la greka lingvo uzita en la preĝejoj albanaj, pro kio la altrangaj ekleziuloj malamamis lin.

Tio eble kaŭzis ankaŭ lian enprizonigon dum la greka okupacio de la regiono en 1940-1941. Kiam la faŝista Italio atakis nian landon, la 7-an de aprilo 1939, Janko Pali kun dekoj da liaj kamaradoj pretis militi kiel volontulo.

Maje 1939 li ĉeestis la solenaĵojn aranĝitajn en Tirana okaze de alportiĝo de la ostoj de la nacia albana poeto Naim Frashëri el Turkio. Oni komisiis lin salutparoli kaj Janko faris tion bonege.

Somere 1940 Janko estris la tendaron starigitan ĉe la marbordo de Himara kun la infanoj de la regiono. Poste li partoprenis en tendaro en Durrës kun 700 instruistoj el la tuta lando.

Aŭtune 1940 Janko Pali estis enpostenigita ĉefinstruisto de la Bregdet-a regiono. Kiam komenciĝis la itala-greka milito, grekoj arestis lin kiel “danĝeran albanon”.

La okupantoj kondukis Jankon al Delvinë, poste al Janina kaj Ateno en koncentrejon. Tio daŭris ekde januaro 1941 ĝis aprilofino 1941.

Propraokule Janko Pali vidis kiel estis torturitaj en la lagroj de Kocinaja kaj Pireo miloj da Ĉamoj³³. Post la germana atako kontraŭ Jugoslavio kaj Grekio, aparte kiam estis bombardita la Pirea haveno, la 6-an de aprilo 1941, naskiĝis la espero je liberiĝo ĉe la militkaptitoj albanaj kaj ceteraj.

Liberigite Janko veturis al Patra, poste al Krioner de Mesolongio kaj fine al Agrinjo.

Vloran li atingis majofine 1941. Kun granda sopiro li retrovis patrimon sian kaj familion, kiu pro la milito pasigis la vintron en la kavoj kaj for de siaj loĝejoj detruitaj pro la bombardoj.

La unuan de decembro 1941 Janko fariĝis patro de filo, Petraq. Denove li ekdeĵoris kiel instruisto en Himara ĝis aprilo 1943, kiam italoj arestas lin kun kelkaj aliaj viroj.

La fino de la milito trovis ankaŭ Albanion en malbona ekonomia kaj socia stato. Pro granda bezono je instruistoj la nova registaro organizis kongreson de instruistoj en Korça, kie partoprenis ankaŭ Janko. Oni dungis lin en Vlora, poste en Malakastra kaj fine en Piqeras, ne fore de lia naskiĝloko Qeparo.

La morto de la patrino estis granda vundo por li, ĉar la patro estis lasinta Jankon delonge.

Dum 1946 li enoficiĝis en la Urbodomo de Vlora por edukadaj aferoj.

De 1950-1956 Janko instruis en Qeparo.



Janko Pali post 1990 kun la albanaj esperantistoj Luan Jaupi kaj Gafur Muço kaj la franca esperantisto/esploristo Marcel Cortiade.

En 1964 Janko Pali pensiĝis je la aĝo de 67 jaroj.

Kelkaj opinioj esprimitaj pri Janko Pali

".....Janko estis la instruisto de multaj generacioj samkiel elstara esperantisto" (Vasil Qesari)



Petraĝ Janko Pali, la filo, loĝanta en Usono

Dr, Jorgo Dhrami

“En la trezorujo de Janko Pali troviĝas 80 000 versoj, poeziaĵoj, lirikaĵoj, elegioj, historiaĵoj kc. Li kompilis dulingvan albanan-francan vortaron kun 45 000 vortoj”

Janko verkis lernolibron “Kiel ni lernu esperanton?” kaj starigis lernokurson. Li verkis same Historion de Qeparo (lia naskiĝvilaĝo), Historion de ties lernejo, rakontojn. Plue li faris milojn da tradukaĵoj. Janko tradukis Historion de Francio, Historion de Napoleono, Ezopon, La Providencon.



La nepino de Janko Pali, s-ino Jolanda dum vizito al Tirana aŭguste 2019

La filo Petraĝ estas klopodanta diskonigi la verkon de sia patro

En nia revueto Albana Esperantisto estas publikigita ĉi tiu tradukaĵo el la poemoj de la albana klasikulo Milosh Gjergj Nikolla (Migjeni) je titolo "Ni, la filoj de nova jarcento".

Albane

Migjeni - Të Birtë E Shekullit Të Ri

Na të birtë e shekullit të ri,
që plakun e lamë në "shejtnin" e tij
e çuem grushtin për me luftue
ndër lufta të reja
dhe me fitue...

Na të birtë e shekullit të ri,
filizat e një toke së rimun me lot,
ku djersë e ballit u dikonte kot -
se dheu ynë qe kafshatë e huej
dhe në marrzi duhej shum shtRejtë t'u paguhej.

Na të birtë e shekullit të ri,
vllazën të lindun e të rritun në zi,
kur tinglloi çast' i ynë i mbramë
edhe fatlumë
ditëm me thanë :

S'duem me humbë
në lojë të përgjaktë të historis njerzore,
jo! jo! s'i duem humbjet prore -
duem ngadhnim!

ngadhnim, ndërgjegje dhe mendimi të lirë!
S'duem, për hir
të kalbsinave të vjetra, që kërkojnë "shejtnim",
të zhytemi prap në pellgun e mjerimit
që të vajtojmë prap kangën e trishtimit,
kangën monotone, pa shpirt, të sklavnis -
të jem' një thumb i ngulun ndër trutë e njerzis.
Na të birtë e shekullit të ri,
me hovin ton e të ndezun peshë,
ndër lufta të reja kemi m'u ndeshë
dhe për fitore kem' me ra fli.

Esperante

Filoj de nova jarcento

Ni filoj de la nova jarcento

Kiuj "maljunulon forlasis" en sian "sanktecon",

Pugnon levis por batali

En novajn batalojn

Kaj venki.

Ni filoj de la nova jarcento,

Idoj de iu utero per larmoj akvigita,

Kie ŝvito el frunto vane elfluis,

Ĉar nia tero estis fremda buŝ-pleno,

Kaj freneze devis tre kare al ili pagi,

Ni filoj de la nova jarcento,

Fratoj naskiĝintaj kaj kreskintaj en funebro

Kiam sonis nia lasta moment'

Kaj feliĉaj,

Sciis diri.

Ne volas sin perdi,


En sangaj ludoj de la homara historio.

Ne! Ne! Neniel ni volas perdon.

Ni volas venkon.

Venkon de konscienco kaj pensado libera!

7.8 Zef Luigj Mjeda



En Vikipedio oni skribas:

Zef Luigj MJEDA (naskiĝis en la jaro 1921 kaj forpasis la 5-an de oktobro 2000) estis albana esperantisto kaj Honora Membro de UEA ekde la jaro 1996.


En la jaro 1958 li renkontis la vjetnaman ambasadoron Nguen Van Kinh, en Tirana, kiu entuziasmigis lin por Esperanto. Ekde tiam Zef dediĉis sin plene al ĉi tiu lingvo laŭ eblecoj en la tiam komunisma Albanio.

En la jaro 1967 la sekreta polico arestis lin pro absurdaj kialoj kaj oni maldungis lin kiel instruiston, dum naŭ jaroj, ĝis li pensiĝis. Intertempe Zef najlis lignajn kestojn en cigareda fabriko.

Tamen Zef neniam ĉesigis sian agadon por Esperanto: li instruis ĝin kaŝe, tradukis poeziaĵojn kaj fabelojn albanajn, kompiladis grandan vortaron.

Post la jaro 1990 Zef povis finfine libere agadi en la sino de intelektuloj kaj religiuloj.

Baldaŭ li aperigis dulingvan vortareton (esperanto-albana en 1993) kaj lernolibron de Esperanto (1994).



Du eldonoj de la lernolibro de Zef Mjeda

Pro esperantista agado kaj aliaj kontribuaĵoj la albana prezidento honorigis lin per la titolo “Instruisto de la Popolo” en la jaro 1994.

Mjeda estis delegito de UEA kaj estro de la albana filio de Internacia Katolika Esperantista Unuiĝo (IKUE)

Bedaŭrinsde multaj tradukaĵoj liaj restas ankoraŭ ne eldonitaj, interalie la tuta ciklo pri bravuloj (granda albana eposo), multaj popolaj fabeloj kaj granda vortaro albana- itala- esperanta.

Jen kelkaj fragmentoj el la Ciklo pri Bravuloj:

Bajloz reprezentis danĝeran malamikon, kiun alfrontis kaj neniigis la bravulo Gjergj.

Gjergj Elez Alia havis naŭ vundojn sur sia korpo, kaŭzitaĵn de malamikoj venintaj el la maro kaj li suferis dum naŭ jaroj surlite en sia hejmo. Ĉiuj amikoj estis jam forgesintaj lin. Nur la fratino flegis lin tagnocte dum naŭ jaroj. Tio ege ĉargrenis Gjergji-n, ĉar la fratino estis enfermita en la nobelturo pro li, dum la amikinoj de la fratino estis jam edzinigitaj kaj ĝuadis la vivon.

Iutage la heroldo sciigis pri la alveno de alia malamiko, Nigra Bajlozo, el la maro. Tiu mortigis homojn kaj detruis vilaĝojn ĉiutage. Neniam antaŭe la homoj estis vidintaj tian monstron, kiu postulis de ĉiu domo frostitan virŝafon, belan junulinon kaj aliajn tributojn.

La fratino de Gjergj diris al sia frato, ke Bajloz elvokis lin al duelo. Tiam Gjergj petis la fratinton pretigi la ĉevalon kaj la armilojn, ĉar li alfrontos la teruran Bajlozon.

La fratino plorkantis:

*- Frato mia, kial la morto nin jam forgesis
Dum la gepatroj niaj sub la tilio jam putriĝis
Kaj via koro viva same en la hejmo putriĝos
Dum mia korpo en la manojn de la nigra Bajlozo enfalos..*

*Kial ne detruigis ĉi tiu nobelturo kaj premu nin sub ĝi mortajn?
Kial do ne ruiniĝas nia domo?
Ĉar la morto estus pli dolĉa, mia povra patrino, ol la vivo sen honoro.*

Gjergji, aŭskultinte ĉi tiujn vortojn tuj forgesis pri siaj korpaj vundoj kaj subite ekstaris surpiede, kvazaŭ neniam li suferintus surlite: maldika, altstatura, tiel kiel li estis. la plej bona bravulo.

- Fratino mia, prenu la militĉevalon mian, sendu ĝin al la hufferisto, por ke li pretigu la ĉevalon por la milito.

La morgaŭon, Gjergji luktis kontraŭ Bajlozo kaj venkis lin. Reveninte hejme li ĉirkaŭbrakis la fratinton kaj mortis kune kun ŝi.

Oni entombigis ilin kune kaj, ekde tiam la loko ilia restis neforgesebla.

Nun ankaŭ la edzino de Zef ne plu vivas, sed estas la filinoj kaj nepinoj, same esperantistoj.



Zef kun sia familio dum la vizito de la nederlanda esperantisto Jacques Tuinder (jam forpasinta)

En la julia numero de Albana Esperantisto (1993) aperis la jena tradukaĵo de Mjeda.

Miaj vojaĝoj

(Poezio de Xhevair Spahiu)

*Mi ascendos la nebulon,
Por ke sur miajn montojn mi iru
Se ili pluvon volas,
mi larmgutojn verŝos.*

*Mi ascendos la ĉevalon,
Por senti la guston de l' vento
Kiam atendos min amo.*

*Mi ascendos la riveron
Por ke ĝi alportu min al maro,
Por ke mi mem la ŝipojn portu.*

*Mi ascendos la arbon,
Por ke ĝi enigu pli profunden tere la radikojn.*

*Mi ascendos la revon,
Sur sproniloj de birdo,
Mi konduku ĝin ĉe la morgaŭo.*

*Mi ascendos la kanton,
Ĝia mastro, ĝia sklavo por ke mi kantu,*

Al movo, ankaŭ al punkto morta.

Dum en la decembra numero 1993 aperis la jena historieto de Esperanto en Shkodër:

Shkodra- la lulilo de la albana kulturo kaj de la esperantista Movado en Norda Albanio

“La Eŭropa Renesanco efikis positive al la unuaj verkistoj en la albana lingvo, ĉiuj pastroj kaj prelatoj: Buzuku – Missa (1555); Budi- ritual romanum in epiroticam lingvam (1621); Bardhi- Dictionarium latino-epirotica (1635); Bogdani- Cuneus prophetarum- italic et EpiroticeConlexta (1685).

Norde de Albanio, centre en Shkodër, disvolviĝis religia kristana kulturo je profundaj patriotismaj radikoj.

Krom la nomoj supre menciitaj, en la XVIII-a ĝis XIX-a jarcentoj elmontriĝis eksterordinara kulturo dank’ al la pastroj Gjon Kazazi, Pjetër Zarishi, Ejll Radoja, Ndue Bytyçi kaj laikuloj Pashko Vasa, Zef Jubani kc. Tiu viveca agado daŭris ankaŭ per tre talentecaj nomoj: Shtjefën Gjeçovi, Bernardin Palaj, Donat Kurti, Gjon Shllaku kc. Ilia fama revuo “Hylli i dritës” (La Stelo de la Lumo) fariĝis lanterno de la kulturo. Mi mem estis tirs granda disĉiplo.

Ne mirinde, ke en tia urbo kun vasta kulturo disvolviĝis unuafoje en nia lando ankaŭ la esperantista agado. Kronologie la unua esperantisto en la urbo de Shkodër (subkompreneble ankaŭ en Albanio) estis Mark Kakariqi, ellerninta esperanton en Parizo en 1907. Donitaĵoj pruvantaj tiun daton por kelkiu alia esperantisto mi ne disponas.

Laŭ aliaj personoj esperanton ellernis Dom Lazër Shantoja en 1912. En la jaro 1929 Cuk Simoni eldonis esperantlingve la libron “Skënderbeu- nacia hero de Albanio”. En la enkonduko de tiu libro Cuk Simoni diras, ke Dom Lazër Shantoja instruis esperanton al Cuk Simoni kaj korespondis vaste kun fremduloj, aparte kun la redaktoro de la latva revuo, sinjoro Robs Lunz.

En la urbo de Shkodër, samkiel en la ceteraj urboj de nia lando, ni starigis lernokursojn por tiu ĉi mirakla lingvo, lingvo de paco kaj amikeco, je grandaj valoroj propedeŭtikaj por ellerni aliajn fremdlingvojn.

Mi mem jam tradukis en esperanton 7000 versojn el la rapsodioj de Ciklo pri Bravuloj “Mujo kaj Halil”, 50 naciajn kaj popolajn fabelojn. Dum dudek jaroj, mi kompiladis vortaron (esperanta-albana) kun pli ol 40 mil vortoj kaj vortaron (albana-esperanta) kun 30 mil vortoj, ankaŭ lernolibron kun 12 lecionoj por lerni esperanton.”

7.9 JACQUES TUINDER

(9 januaro 1933 – 18 junio 2011)



Ĉi tiu sinjoro ege helpis Albanion kaj nian esperantistan movadon dum 15 jaroj! Li mem sin sentis membro de nia Asocio, tial ni konsideris lin nia, vere.

Jacobus Antonius Tuinder naskiĝis en Hago (Nederlando). Diplomiĝis pri la “sociaj aferoj”, praktikis la akompanon de la homoj marĝenizitaj (en prizono, poste en psikiatrio). Li konatiĝis kun sia edzino dum la UK - Varsovio 1959, havas tri filojn, Flip, Jef kaj Bart. La lasta ne plu vivas, kio ege ĉagrenis la gepatrojn. Unu el la nepoj portas ties nomon, Bart.

En la esperanto-movado Jacques estas konata ĉefe tra la kristanoj kaj por sia laboro helpe al homoj je vida malkapablo. Ekzemple, li helpis la blindulinon Nora Reinders-Bartels, kiu, perdinte sian solan filon, restis nemotivita. Kun Paul van den Berg, prezidanto tiama de Nosobe, li instigis ŝin ellerni esperanton.

S-ron Tuinder oni ofte trovis pakante brajlan paperon, sindediĉe, same kaŝitajn donacaĵojn, eĉ aparaturajn por la malriĉaj homoj, inter alie, ankaŭ en Albanio, Rumanio, eksa Sovetunio. Neniam li fermis la pardonon al la gastoj. Lia varma voĉo invitis ilin, malgraŭ longdaŭra laciga laboro-Bonvolu!

Preskaŭ 45 jarojn, ekde novembro 1956, Jacques Tuinder klopodadis mildigi la sorton de la homoj je vida malkapablo, kiuj vivis en mizeraj kondiĉoj. Komence lin alarmigis la sciigo ke milionoj da afrikanoj ne necese suferas, inter alie, pro la “rivera malsano” kaŭzita de la muŝo Ce-Ce.

Ĉar Zamenhof (la inventinto de Esperanto) servis unu tagon semajne senpage al la malriĉaj homoj, Jacques alvokis siajn diligentajn kolegojn: Esperantistoj, esperigu tiujn esperantajn! Krom 29 unuaj kunlaborantoj komence, li kunlaboris ankaŭ kun aliaj instancoj, kun la fondaĵo de profesoro Weve-f kaj poste Memiso, “Sovaĝaj anasoj”, la vendejoj de la reciklitaj varoj de Heemskerk (kie li mem volontulis), kun la komunumo Ijmond.

Aperis du vojaĝantaj klinikoj okulistaj (Zamenhof kaj Esperanto) en Kenio kaj Malavio, plus hospitalo por okulmalsanoj en Kamerunio. Aldoniĝis kampanjoj en Azio: la projekto de vitamino A por infanoj vjetnamaj, la blindulejo en Sri Lanka; mem Jacques vojaĝis al Duŝanbe, ĉefurbo de Taĝikio, kie blinda sinjorino kontaktis lin ĉe la Instituto por tre malriĉaj blinduloj.

Ĝenerale Jacques estis invitata de la instancoj tra lokaj esperantistoj, ofte de mem la blinduloj. Tion li substrekis en siaj raportoj al la sponsoroj kaj al loka gazetaro. Li skribis ankaŭ artikolojn en la esperantistaj revuoj. Tiutempe Jacques estris IKUE, La Ligon de Esperantistaj Kristanoj (1966-1971). Sed la ekleziaj instancoj ne toleris ties ekumenismon kaj maldekstrismon. Poste, li estris KELI (asocion kristanan protestantan de 2000-2004). Lin oni agnoskis nur pli malfrue. Li fariĝis Honora Membro de LIBE (Asocio de blinduloj), dank’al sponsorizado de kongresanoj; Esperanto-Nederland premiis per Verloren-van- Themaat, en 2007 kaj la reĝino honoris lin per la titolo “Kavaliro de la “Ordeno de Oranje Nassau”.

En Eŭropo estis multaj blinduloj en Albanio, Moldavio, Ukrainio kaj Rusio. Por ne konkurenci la lokajn optikistojn, li sin okupis ekskluzive pri malriĉaj blinduloj, interalie en la prizonoj (Rusio, Albanio), en Rumanio kun romoj loĝintaj ĉe la montoj de rubaĵoj, traserĉante aĵojn ankoraŭ utilajn. Sed li provizis ankaŭ la dormejojn de la blindulejoj per la necesaj materialoj (brajla presejo, brajla papero, brajlaj presiloj, ka)

Pensiĝinte, Jacques daŭrigis servadon en la Monaĥejo de Bergen (N-H), kie antaŭe li helpis al rifuĝintoj por produkti kandelojn. Poste li trovis tempon ankaŭ por korespondo en Brajlo. Dum la semajnfinoj de Nosobe, la partoprenintoj en la meditadoj matenaj ĉiudimanĉe ricevis plenajn

tekstojn skribitajn en Brajlo por legi laŭvice mozaikece. Li helpis tie, samkiel en la hejmo ankaŭ lia edzino. Kvankam li mem pagis ĉiujn elspezojn, li komencis la vojaĝojn tra Afriko. Jacques adoptis blindajn infanojn: 11 en Kongolando, po du en Maroko kaj Rumanio, 3 en Maŭritanio kaj multaj aliaj, li diris, atendas. Bedaŭrinde tio estis ekster liaj ebloj.

Jacques Tuinder ege amis Albanion. Komence li konatiĝis kun esperantisto el Shkodër, Zef Mjeda. Alveninte Albanion, li provizis per ekipaĵoj kaj aranĝis vizitojn de la malriĉaj blinduloj en la klinikoj de Shkodër, Durrës, Gramsh kaj Tirana.

En Tirana li kunlaboris kun la Instituto de Blindaj Lernantoj, kie la fondaĵo Evidente investis kelkcentmilojn da eŭroj por la hejtado, dormejoj, akvoprovizado, lernoĉambroj, komputiloj, brajla presejo, trejnado de instruistoj, Brajla papero kaj multo alia necesa.



S-ro. Jacques salutparolas tagon de ricevo de ordeno fare de la prezidento de Albanio

La prezidento de Albanio dekoris lin en 2006 per la Medalo de Dankemo, kio ege feliĉigis Tuinder.



La medalo de la prezidento. Dekstre Jacques kun sia kolego blinda antaŭ la domo de Osman Kazazi

Jen kion rakontas s-ro Jacques Tuinder:

Kiel mi kontaktiĝis kun Albanio?

La 18-an de decembro 1990, s-ro Zef Mjeda, loĝanta en Shkoder, skribis leteron al s-ino Mila van der Horst-Kolinska, deĵorantino en la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando. Li skribis:

Estimata Sinjorino Mila,

Tre honte mi skribas al Vi, sed ne trovante alternativon mi ĝenas vin! Mi ĝenis unufoje s-ron Rašić pri mia malsano. Mia edzino Anjeze (sesdek ses jarojn aĝa, patrino de du filinoj, ĝis nun tre sana),

estas atakita abrupte de 'katarakto' je sia maldektra okulo. Ni konsultis okulkuraciston. Li eksplikis, ke operacio estas farebla, sed malfacila. Mi petas vin, se tio estas ebla, informiĝi ĉe okulkuracisto kaj sciigi min, ĉu troviĝas aliaj formoj por elimini la katarakton, t.e. sen operacio? Se tio ekzistas, ĉu estas eble trovi medikamentojn, por elimini la katarakton?

S-ino Mila kontaktis Jacques Tuinder, prezidanton de Agado E3, kun la peto respondi ĉi tiun leteron. Li tion faris kaj reskribis la 22-an de februaro 1991, ke kun granda danko li ricevis koncernan leteron.

Kara amiko,

Sekve de via peto mi konsultis nederlandan okuliston, kiu diris ke katarakta operacio en nia lando estas simpla kaj unufoja. Oni eĉ ne bezonas eniri hospitalon, ĉar eblas poliklinika helpo. Por povi pli bone konsideri vian problemon, via okulisto sendu detalan informaron en E-o aŭ unu el la t.n. modernaj lingvoj. Se via edzino estos helpobla, mi invitos vin veni al Nederlando kaj Agado E3 pagos la kostojn. Al vi ambaŭ mi deziras ĉion bonan, esperante baldaŭ aŭdi de vi. Kore salutas Jacques Tuinder.



Jacques Tuinder post la vizito al Zef Mjeda en Shkodër

Sekvis longa korespondado, kiu rezultigis en tio, ke - danke ankaŭ al la interveno de la nederlanda ambasadoro en Beogrado! - finfine ges-roj Mjeda ricevis ĉiujn dokumentojn por povi vojaĝi Nederlandon. Zef telegramis la 30-an de januaro 1993:

"La unuan de februaro je la deksesa kaj dek minutoj mi kaj Anjeze forflugos de Tirana al Zurich, je la deknaŭa kaj dudek kvin minutoj ni forflugos al Amsterdam Zef".

Tri semajnojn de februaro ili gastis ĉe familio Tuinder en Heemskerk dum kiu restado okazis sukcesa okulooperacio en Heerlen. Jaron poste Vera kaj Jacques Tuinder faris kune kun grupo viziton al Albanio, kie okazis agrabla renkontiĝo kun Anjeze kaj Zef Mjeda. Restis amika kontakto kaj sekvis pluraj vizitoj.

Zef tre ŝatus vidi en sia urbo realiĝon de Optika Centro, sed ĉiuj niaj klopodoj kaj forto- streĉoj kondukis finfine al nenio. Agado E3 - poste Fondaĵo Evidente - instalas tiajn centrojn en Durres, Gramsh kaj Barbullush, sed bedaŭrinde neniu el ili pro diversaj kaŭzoj restis.

Kune kun profesoro pri oftalmologio mi faris rondvojaĝon por konatiĝi kun ĉiuj okulistoj en Albanio, sed pro la terura ĉiuloka korupcio estis ege malfacile pripensi realismajn planojn por la estonteco.

Plurfoje mi aranĝis misiojn kun optikistoj al diversaj lokoj de la lando. Al multaj malriĉaj homoj ni servis per laŭreceptaj okulvitroj.

Nia helpo al la Instituto por Vidhandikapitaj Infanoj komenciĝis en 1994 kaj daŭras ĝis hodiaŭ. Nia espero estas granda, ke jam baldaŭ la lernejo povos fari komencon per enkonduko de postelementa instruado. Nia afabla kaj sindediĉa kontaktpersono Bardhyl Selimi dum serio da jaroj sukcese instruis Esperanton sub la tegmento de la lernejo.

Estis por miaj helpantoj kaj ni granda honoro ekkoni, ami kaj estimegi s-ron Osman Kazazi, kiu estis kvazaŭ la "Albana Mandela". Ni gastis en lia domo, kie li kunloĝis kun siaj fratinoj. Kaj ĉiam li akompanis nin dum niaj tiamaj laboroj en Tirano kaj ankaŭ ekster la ĉefurbo. Dufoje li vizitis nian landon, ankaŭ por submetiĝi al sukcesa katarakt-operacio. Kiam ni ekaŭdis pri lia forpaso mi tuj kun kunestranaro flugis al Albanio, sed ne plu povis ĉeesti la imponan enterigan ceremonion.



Osman Kazazi estas honorita de urbodomo de Tirana per la titolo "Honora Civitano". Li pasigis en la politika prizono 33 jarojn



OSMAN KAZAZI



Sinjoro Paul Leuf, amiko de Kazazi, elspezis 30 000 guldenojn por starigi la buston de Kazazi ĉe la bulvardo Zog la Unua en Tirana

Mi tre ĝojas, ke en Albanio mi trovis tiom da bonaj geamikoj. Konklude: ke la ekonomie malforta lando kaj multsuferinta popolo baldaŭ ekvidu 'printempon' en ĉiuj sencoj!

7.10 Miço Samara


Profesoro Miço Samara, elstara albana lingvisto, kunaŭtoro de la “Vortaro de la Nuntempa Albana Lingvo” (1980) kaj aŭtoro de la “Vortaro de Sinonimoj de la albana”: estis samtempe simpatianto kaj konanto de esperanto. Laŭ la peto de s-ro Vasil Pistoli, li kompilis prelegon pri la similaĵoj inter la albana kaj esperanto. Ĉi sube stas la plena teksto.

La Albana kaj Esperanto

Tiel kiel ankaŭ en aliaj lingvoj, la leksiko de la albana lingvo, krom la signifoj ligitaj je socia kaj mondkoncepta realeco de la albanoj, posedas ankaŭ fonetikajn kaj morfologiajn elementojn specifajn, kies studado donis al la albanologoj materialon por difini ĝian originon kaj tipologion kiel lingvon analizan-sintezan kaj inter la plej malnovaj en la hindeŭropa familio. Apogante sin precipe sur sia studado de la leksiko kaj la etimologio, profesoro **Eqrem Çabej**, aprobas tezon pri la albana lingvo kiel **ido de Ilira lingvo** (E.Çabej, Lingvaj Studadoj, II jaro, 1976, pag'o 30), dum **F.Bopp**, ek de 1854, "malkovris karakteron de la albana lingvo kiel hindeŭropa lingvo" (E.Çabej, en suprenomita verko, paĝo 12).

En ĉi tiu skribaĵo ni klopodos doni nur kelkajn ĝeneralajn konsiderojn pri la leksiko de la albana lingvo komparata kun tiu de Esperanto en **aspekto vortfarada kaj semantika**, en kiu oni rimarkas ne nur kontrastajn sed ankaŭ komunajn trajtojn.

1. La plimulto de la vortoj en la albana lingvo estas derivitaj aŭ komponitaj; tial ili estas motivitaj ankaŭ flanke de semantiko. Kvankam la kvanto de la radikvortoj ne estas granda, en la albana lingvo kiel en Esperanto, ĉiu radikvorto povas servi kiel semantemo, aligante al si afiksojn por formi amason da novaj vortoj kaj da variaj signifoj, kiuj tamen havas komunan elementon.



Ekzemple, de la radiko **punë "labor"** formiĝis kaj estas nun uzitaj ĉirkaŭ **40** derivitaj aŭ kunmetitaj vortoj:

punëdashës	-laborema
punëdhënës	-labordonanto
punësim	-enlaborigo
punëtor-e(adj)	-laborema

punëtor-i	-laboristo
punëtor-ja	-laboristino
punëtori-a	-laboristaro
punim	-laboraĵo
punishte	-laborejo
punoj	-labori
punoĥet	-oni laboras
punoĥjës	-laborulo
punuar (i , e)	-laborata
punuëshëm (i)	-laborebla
papunë (i)	-senlabora
papunësi	-senlaboreco
papunušëm (i)	-nelaborebla
përpunoj	-prilabori
përpunim	-prilaboraĵo
mbipunë	-pluslaboro
bashkëpunoj	-kunlabori
bashkëpunim	-kunlaborado
bashkëpunëtor-I	-kunlaboranto
bashkëpunëtore	-kunlaborantino
ditëpunë	-labortago
hekurpunues	-ferlaboristo
etj	-ktp

Ilia vortfarada analizo en komparo kun ĝia ekvivalento en Esperanto povas ilustrigi per alia strukturekzemplo:

papranušëm (i)	neakceptebla
(alb.)	(E-o)

Pa	-nea prefikso	ne	-nea prefikso
pranue-vortradiko		akcept-	-vortradiko
pranoj -"akcepti"		akcepti	
shëm	-sufikso signifanta	ig	-efika sufikso
	ke io povas esti farata	ebl	-sufikso signifanta, ke io povas esti farata
i	-antau'a vortero de	a	-finaĵo de la adjektivo
papranueshmëri			nekakceptebleco

Kiel en Esperanto, tiel en la albana lingvo, por kunmeto aŭ kunigo de prepozicio kun leksemo (vortelemanto), oni akiras novan vorton, kiu el sintaksa vidpunkto estas cirkonstanca komplemento, kiel ekz. estas formita la vorto **përtokë "surtere"** (en la frazo **ai ra përtokë**, "li falis surteren") el per "sur" + **tokë**, "tero", (t. e. "sur la teron") au' kiel ekz. estas formita la vorto **afërmendsh,(sendube)**, (el **afër**, "apud" + **mendje**, "penso" en ablativo). Per kunmeto, kiel ankaŭ en Esperanto, estas formitaj en la albana lingvo la vortoj **i(e) paraluftës**, "antaŭmilita" (el **para**, "antau" + **luftë**, "milito"), aŭ **i (e) pasluftës**, "postmilita" (el **pas**, "post" + **luftë**, "milito") ktp.

Tamen ekzistas vortkunmetaĵoj en kiuj la unua elemento estas determinanta :

pikësynim	-celadpunkto
rrugëdalje	-elirvojo
ditëpune	-labortago

Tiu tipo kutime aperas per leksigo de sintagmo, el kiu la dua elemento estas nedifinita : **pikë +synim** "punkto +celado", **rrugë + dalje**, "vojo + eliro", **ditë + punë**, "Tago + laboro", dum la unua tipo respondas al vera vortfarado kun difinita determinato : **mishngrënës** "karnomang'a" ktp.

Ekzistas kazoj de duopa formo :

mirëdashës -dashamirës "bonvola" kun eta semantika diferenco. Notu ke tiaj duopaj ekzemploj ankaŭ en parolata Esperanto : centjaro ,jarcento.

Kelkaj el la vortfaradaj morfemoj en la albana lingvo havas apartajn funkciojn, kiuj kongruas kun funkcioj de iliaj ekvivalentoj en Esperanto. Ekzemple:

- la sufikso **-z** esprimas la diminutivecon, kiel **-et** en Esperanto kiu modifas signifon de la vortradiko, sed ne ŝanĝas ĝian fundamentan signifon (vidu **shtëpizë** "dometo", el **shtëpi** "domo" + **z** "et" (En la albana lingvo ne estas sufikso esprimanta aŭgmentativecon, kiel estas **-eg** en Esperanto).

- la sufikso **-eshë** aŭ **-e** havas leksiko-gramatikan inigan funkcion (vidu **bareshë** "pas'tistino" el **bari** "pŝ'tisto" + **eshë** "in"; **punëtore** "laboristino", el **punëtor** "laboristo" + **e** "in").

Por komponi albanajn vortojn, ekzistas kelkaj komponaj tipoj, sed plej produktemaj estas la determinaj komponoj, kiel en Esperanto, precipe la tipo kiam determinanta estas la unua elemento, ekzemple: **kryeqytet** "c'efurbo" (el **krye**, "c'ef" + **qytet** "urbo"), **kryeministër** "c'efministro", **kryeartikull**, "c'efartikolo", **kryeredaktor** "c'efredaktoro", **bashkëpunoj** "kunlabori" (el **bashkë** "kun" + **punoj** "labori"), **bashkëekzistoj** "kunekzisti" k.a.

2. Historio-geografiaj cirkonstancoj kaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj interrilatoj de la albana popolo kun aliaj najbaraj popoloj de Balkanio kaj Eŭropo, influis al penetrado kaj uzado de **fremdaj vortoj** kaj internaciaj terminoj en la albana lingvo, precipe en politika-socia, scienca kaj teknika kampoj. Sed, alimaniere ol okazis en kelkaj aliaj lingvoj de la hindeŭropa familio, en la albana lingvo, tiel same kiel en Esperanto, la fremda vorto aŭ termino asimiliĝas fonetike -gramatike sin adaptigante al la albana nature, al ortografiaj reguloj kaj al ĝia fleksio. La plimulto de ili derivas el la **latino** (precipe de la vulgara latino), sed estas ankaŭ tiaj el la **greka, slava, turka kaj franca**.

Kompare kun la leksiko de Esperanto, la prunteprenataj vortoj en la nuna albana lingvo, povas esti klasifikataj en du grupoj:

a) Fremdaj vortoj havantaj saman fonton kaj konservantaj saman fonetikan komplekson; ili estas precipe internaciaj terminoj, ekzemple **atom** "atomo", **auto** "aŭto", **autor** "aŭtoro", **grip** "gripo", **ekonomi** "ekonomio", **ideal** "idealo", **konferencë** "konferenco", **lokomotivë** "Lokomotivo", **radio** "radio", **poezi** "poezio", **pallto** "palto", **vagon** "vagono", ktp.

Ĝenerale ĉi tiuj vortoj havas albane tiun saman signifon kiel en Esperanto. La fonetika kaj semantika kongruo (kiel en la albana lingvo, tiel ankaŭ en Esperanto), faras ilin tre facile alproprigeblaj fare de albanparolanto. Tiaj estas ankaŭ kelkaj fremdaj afiksoj havantaj samajn fontojn kaj funkcion:

-la prefikso **ri** "re" (ĉe verboj de tipo **rishikoj** "revidi", kiu montras ripeton);

-la sufikso **ist** "ist", esprimanta personon kiu profesie sin okupas pri la afero difinita de la radiko aŭ adepton de iu teorio, doktrino ktp. (ekzemple **telegrafist** "telegrafisto", **socialist** "socialisto").

b) Kelkaj fremdaj vortoj havas en la albana lingvo saman fonton, sed kongruas parte de fonetika flanko; en tia okazo la fonetika ligilo inter albana kaj Esperanto klarigas serĉante en komuna etimologio; ekzemple la vorto **kalë** (alb.) kaj ĉevalo (E-o) mi opinias, ke kunligiĝas kun la latino **caballus**, kie latina **c** iĝis albana **k**. El analizo de vortkomparo de ĉi tiu grupo eliĝas ke en albana lingvo estas pli malfacila ol en la unua grupo. Malesto de fonetika travidebleco en la vortoj de ĉi tiu grupo, kelkfoje estas akompanita je semantikaj signifaj ŝanĝoj kiujn alportis la fremda vorto al la albana lingvo, en komparo kun tiu vorto en Esperanto. Ekzemple: la vorto **labori** en Esperanto povas esti komparata kun la albana vorto **lëvroj** (ankaŭ en latino "laborare") sed en la albana lingvo ĉi tiun vorton oni uzas precipe je signifo **lëvroj** tokën "prilabori kampon" dum por la aliaj signifoj de la vorto "labori", oni uzas la vorton **punoj**.

3. Ĝenerale, la albana leksiko kontrastas kun la leksiko de esperanto, precipe el semantika flanko pro ĝia sufiĉe larĝa kaj riĉa semantika strukturo de la plej uzataj vortoj. Tiel surbaze de "vortaro de nuntempa albana lingvo" (1980) kun ĉirkaŭ 43000 vortoj, la vorto dal "eliri" havas 35 signifojn, dum la vorto bëj "Fari" havas 39 signifojn. La larĝigo de polisemio (multsignifeco) estas unu el la vojoj por pliriĉigi la albanan lingvon je novaj leksiko-semantikaj unuoj. Tio ne kongruas kun la vojoj de pliriĉigo de la leksiko en Esperanto, kiu riĉiĝas precipe aligante al vortradiko afiksojn. Pere de larĝigo de polisemio (multsignifeco), surbaziĝante sur ĉentipo de la derivigo, la albana vorto bosht "akso" post la unua signifo "akso de maŝino", riĉiĝis je multnombraj novaj metaforaj signifoj:

-en geografio: boshti i Tokës "la akso de la Tero"

-en literaturo: boshti ideor "la ideologia akso" ktp.

La semantika derivado, surbaze de nomaj kaj verbaj monemoj (elementoj), fariĝis tre produktema kaj aktiva en la nuntempa albana lingvo. Tial, okazas ofte ke al unu albana vorto, laŭ ĝia signifo, respondas du aŭ pli multaj sinonimoj en Esperanto. Tion oni rimarkas dum la tradukoj de la albana en Esperanton aŭ de Esperanto en la albanan. Konsultiĝo kun vortaro dum tradukado de unu lingvo en alian, helpas por malkovri ne nur leksikosemantikajn specifikecojn, de ĉiu el ili, sed ankaŭ bezonojn kiujn povas havi la lingvoj. Mem L. Zamenhov kuraĝigis ĉi tiun kontraŭstarigon. (Vidi P. Janton, "L'esperanto 1973 paĝo 93).

Tial ni opinias, ke la esperantistoj devas plimultigi tradukojn, inkludante ankaŭ tradukojn de la albana en Esperanton. Ĉi tiuj tradukoj kreas pli grandajn eblecojn por proksimigi aŭ konverĝigi naciajn lingvojn al Esperanto en leksika kampo. Sekve la leksiko de Esperanto povus pliriĉiĝi je novaj vortoj el leksiko de naciaj lingvoj, tiam kiam ĉe ĝi forestas preciza sinonima ekvivalento. Tiukaze mi sugestus ke la leksiko de Esperanto povu pliriĉiĝi ankaŭ je kelka albana vorto; ekzemple: besa "beso" (je signifo de "devigo, donita parolo"), ktp.

4. Konklude, oni povas diri, ke studado de leksiko de nacia lingvo, tiel kiel studado de fonetika kaj gramatika flanko, en komparo kun Esperanto, havas teorion kaj praktikan gravecon. Tia kompara studado profundigas reciproke konon de leksika strukturo en ĉi tiuj lingvoj, malkovras pli bone ĝiajn valorojn, disvolviĝon kaj inklinojn de plua disvolviĝo. Ĝi helpas por perfektigi, trovi kaj serĉi pli konvenajn metodojn por alproprigi naciajn lingvojn kaj Esperanton kiel helpan internacian lingvon, kiu ĝeneraligis kaj povas ĝeneraligi plue plej bonajn leksikajn valorojn de la naciaj lingvoj.

Verkado de dulingvaj vortaroj Esperanto-Albana kaj Albana-Esperanto, de malgranda aŭ meza tipo, restas tasko de Albana Esperanto-Instituto. Pere de tiuj, albanaj esperantistoj helpus por pli larĝa disvastigo de Esperanto inter la albanparolantojn, de la diversaj landaj vortaroj de la mondo.

Verkita de prof.dr.Miço Samara


membro de la Albana Esperanto-Instituto

7.11 Stathi Qehaef

Pri tiu ĉi sinjoro mi aŭdis tre malfrue, dank'al s-ro Luan Jaupi. Lia tragika sorto estas simila al tiu de la unua albana esperantisto, Dom Lazër Shantoja. Sed, bedaŭrinde, ni disponas pri malmulte da donitaĵoj liaj surkampe de Esperanto.




Tre saĝa kaj lerta homo, Stathi Qehaef, krom multaj fremdlingvoj, posedis perfekte ankaŭ esperanton, kiun li eklernis ekde sia frua junaĝo. En la urbo Durrës li fariĝis diligenta propagandisto de tiu helplingvo. Stathi korespondis kun multaj esperantistoj el la diversaj landoj de la mondo. Li ricevadis revuojn kaj librojn de la esperantaj centroj kaj eldonejoj.



Kiam li instruis al siaj gelernantoj diversajn muzikilojn, (violonon, mandolinon, gitaron ka), li komencis instrui ankaŭ esperanton al multaj junuloj de sia urbo. Krome li rekomendis al ili korespondi kun eksterlandanoj en esperanto kaj provizis ilin per esperantaĵoj.

\



Stathi Qehaef kaj Luan Jaupi, ties lernanto

La agado de Stathi rigardatis malbone de la registaro kaj ties sekretaj organoj, ĝis kiam, novembre 1971, oni arestis lin pro akuzo pri “spionado”. Tiam finiĝis ankaŭ la agado de unu el la plej elstaraj esperantistoj albanaj. La reĝimo komunista kondamnis lin. La akuzo estis: “agento”. Sed jam post unu jaro en la terura prizono de Burrel, li mortis.

Aldonaĵo

El la juĝprocesa raporto

“La filo de Kostandin kaj Andronina, naskita en 1926, en Kallamata de Grekio (Peloponezo), loĝanto en Durrës, estas je socia deveno metiisto. Lia patro estis fotografisto. Stathi estis tiutempe varbita de la angla sekreta servo, kiu, siaflanke, transdonis lin al la usona sekreta servo. Tiutempe Stathi estis ankoraŭ tre saĝa junulo, kio pruvigas kiam, arestite, ili eksciis, ke li posedis 26 lingvojn! En la jaro 1949, dum la grekaj provokadoj³⁴, Stathi alvenis Albanion, kie la aŭtoritatoj sendis lin en la distrikton de Lushnja. Poste oni sendis lin al Durrës, kie li ekinstruis muzikon en la lernejo “Mujo Ulqinaku” ĝis la momento de la aresto. Tiam Stathi ŝajne laboris por la albana sekreta servo, sed fakte li plurestis agento de la fremdaj servoj. Kun greka ŝtataneco, nun sen ŝtataneco, kun altaranga klereco, ne edzigita, ne punita, arestita la 5-an de novembro 1971 kaj kondamnita la 17an de Julio 1972 de la juĝejo de la distrikto Durrës, estas deklarita kulpa:

- Pro krimo de spionado favore al la sekretaj servoj de Orienta Demokrata Respubliko (DDR) kaj, surbaze de artikolo 65 de la Punkodo, kondamnita je 25 jaroj da enprizonigo kaj konfisko de lia riĉaĵo.
 - Estas kulpa pro krimo de agitado kaj propagandado kontraŭ la popola ŝtatpotenco, surbaze de la artikolo 73/1 kaj artikolo 12 de la Punkodo kondamnitas je ok jaroj da enprizonigo.

³⁴ De 1944-1949 en Grekio okazis civila milito. Albanio kaj Jugoslavio subtenis grekajn komunistojn, kiuj ofte eniris en la albanan teritorion dum la milittagoj. Ilin postsekvis la reĝa naciista greka armeo subtenata de Britio. En 1949 tia situacio akriĝis kaj la albana armeo kunfrontiĝis al reĝa greka armeo ĉe la landlimo sudoriente de Albanio.

- Deklariĝas kulpa pro krimo de malrespektado de la reguloj pri komerco, surbaze de la artikolo 96 de la Punkodo je unu jaro da enprizonigo kaj je 1000 lekoj da monpuno.
- Deklariĝas kulpa pro krimo de pornografio kaj surbaze de la artikolo 288 de la Punkodo kondamnita je du jaroj da enprizonigo kaj konfisko de la pornografiaj materialoj.
- Definitive, kunigante ĉiujn kondamnojn, surbaze de la artikolo 41 de la Punkodo, la suspektito estas kondamnita je 25 jaroj da enprizonigo, konfisko de riĉaĵo kaj 1000 lekoj da monpuno”

7.16 Luan Adem Jaupi



Sendube forta kolono de la Esperanto-movado en Albanio, aparte post 1990, estas s-ro Luan Adem Jaupi el la urbo Durrës. Esperanto eniris lian familion komence tra lia patro Adem, eksa kapitano de la Komerca Ŝiparo de Albanio, lerninta la IL-on en la eksa Sovetio, kie li studis. Tiun lingvon Adem uzadis dum siaj vojaĝoj eksterlanden per la komercaj ŝipoj.

Sed la regulajn lecionojn Luan ricevis de sia instruisto pri gitaro, s-ro Stathi Qehaef, same disciplo de la IL.


Antaŭ la jaro 1990 Luan korespondis kun fremdaj esperantistoj, eĉ unu el ili alvenis en Durrës, malgraŭ grandaj striktaj reguloj de la komunisma reĝimo.



S-ino Louis Marin, francino, en la familio de Luan

Alia esperantistino, s-ino Spomenka Ŝtimec el Zagrebo, kvankam ŝi akiris invitleteron de Luan, ne sukcesis viziti nian landon. Jen kiel rakontas Spomenka mem pri la odiseado por akirado de la albana vizo tiutempe en sia libro “Geografio de miaj memoroj”, oka ĉapitro.

Spomenka Ŝtimec



Sinjorino Spomenka Ŝtimec kaj ŝia libro

La ĉapitro “Ne realigita vojaĝo al Albanio”

“Spomenka Ŝtimec

Geografio de miaj memoroj

Vieno 1992

La neokazinta vojaĝo al Albanio

En januaro 1991, en la telefonaŭskultilo en mia oficejo, eksonis la voĉo de mia konato Usni el Makedonio.

- Mi havas invitilon al Albanio por pritrakti esperantajn aferojn. Ĉu vi ŝatus akompani min?

La invitilo evidente estis iom speciala.

Usni estas oficisto en Ohrid, antikva urbo ĉe la plej malnova lago en Eŭropo. La albana estas unu el liaj gepatraj lingvoj, sed li ne emis konsideri sin albano, sed egipto. Li entreprenis komplikan procedon por akiri rajton por kelkcent de siaj samnacioj por povi sin deklari egiptoj. Li fosis en arkivoj kaj serĉadis dokumentojn por prui sian tezon pri la egipta deveno. Gazetoj donis al li certan atenton. Sed esploroj pri la historio de la egipta gento estis nur unu el liaj ŝatokupoj. Ankaŭ al Esperanto li dediĉis grandan energion. Li estis la aŭtoro de la gramatiko "Albana ŝlosilo"-elementa lernilo por albanoj, kiun li eldonis en 1980 kaj kiu enhavas etan Esperanto-albanan vortaron.



Usni Zemowski centre kaŭranta

Ĉar mi en la periodo 1989-1992, ĉe Universala Esperanto-Asocio, gvidis la kulturan fakon, Usni invitis min por levi siajn kontaktojn en Albanio al pli oficiala nivelo.

Ŝajnis ke Usni povas pli facile akiri sian enirvizon por Albanio ol mi: Li ja loĝas en ĉelima regiono, la albana estas lia gepatra lingvo. Mi ne estas albano loĝanta en Jugoslavio. Necesis trarampi komplikan burokratan mekanismon. Sed mi kuraĝis eniri ĝin!

La unua ŝtupo estis la policejo en Zagrebo, kie mi komencis esplori pri la necesaj dokumentoj.

La unua oficistino en la ĉambro 2 ne aspektis amike, sed tuj ekuzis la karesvorton "suneto" por alparoli min. Ĉu por mildigi la cirkonstancojn?

- Ĉu privata vojaĝo?

- Ĉu ofica? Vi, ĉiukaze, bezonas invitleteron el Albanio, surbaze de kiu vi ricevos elirvizon el Jugoslavio. La invitletero devas esti akompanata de nacilingva traduko. Kiam ni donos al vi

elirvizon, la Albana Ambassadejo en Beogrado donos al vi enir-vizon. Unue, vi devas alporti garantileteron el Albanio, ĉio estas tre rapide preta, suneto.

Al Usni mi telefone eksplikis, ke "oni" postulas garantileteron el Albanio por mi... kaj kelkajn semajnojn poste Usni sendis ĝin al mi. Ĝi estis en la albana lingvo, subskribita de Luan Jaupi, en la stilo socirealista. Ĝi estis konfirmita de la Oficejo de notario en la urbo Durrës:

"Lundon, la 4-an de marto mian oficejon de notario Elda Mihal Puli, en la distrikto Durrës, eniris Luan Jaupi, filo de Adem, naskita la 23-an de julio 1954, loĝanto en la strato A. Goga...Lian identecon mi konstatis per identigila numero....konfirmita de la Civila Buroo de la urbo Durrës. En la atesto de miaj okuloj la koncernulo subskribis la aldonitan garantileteron."

Mi estis danka al la nekonata Luan, kiu, lundon, eniris notariejon kaj ateste de la oficistaj okuloj subskribis invitleteron je mia nomo.

Dank' al ĝi mia pasporto baldaŭ ekhavis la necesan elirvizon. Mi enpakis mian pasporton kaj iom heziteme adredis ĝin kun la ricevitaĵaj formularoj al la Ambassadejo de Albanio en Beogrado.

Kelkajn tagojn poste mi eksciis, ke mia pasporto bone alvenis, sed la albana oficisto ne estis kontenta pri la formularoj, per kiuj mi petis la vizon. Laŭ la makedona akcento, per kiu li parolis kun mi, eblis kompreni, ke la formularoj ne plu validas. Li precizigis: ili estas tro mallongaj, do, eksaj.

- Sed kial la polico distribuas ilin? - kuraĝis mi demandi- Kiel aspektas la novaj formularoj? Kio estas la nomo de la formularo?

- Ili devas esti grandaj.

Je mia insisto eblis kompreni nur, ke la formularoj dividiĝas je grandaj kaj malgrandaj kaj la diferenco estas "ke la grandan vi devas plenigadi la tutan tagon".

Estis iom da kompatato en la voĉo de la oficisto. Mi kontraŭvole ekridis, komprenante la situacion. La divido de la formularoj al "grandaj" kaj "malgrandaj" anoncis al mi tiun landon, kie la tempo fluas per alia rapido. Tie verŝajne ankoraŭ funkcias mezurunuo "duontaga marŝado", "tuttaga veturo for de la ĉefurbo", kaj ankaŭ "tuttaga plenigado de la formularo".

La Zagreba polico, kiu en la lastaj tri jaroj pritraktis nur tri privatajn vizitojn al Albanio, ne posedis aliajn formularojn.

Mi petis amikon el Beogrado viziti la ambassadejon kaj mem sendi al mi la grandajn formularojn. Li, eksambasadoro laŭ profesio, mem scivole eniris la internon de la ambassadejo por peti formularojn.

La granda formularo scivolis pri miaj antaŭaj nomoj kaj miaj parencoj en Albanio kaj aparte demandis pri la grado de parenceco kun la persono, kiu sendis la invitleteron. Kiel klarigi, ke temas pri neniun grado de parenceco: la persono, kiu sen hezitoj sendis al mi garantileteron, parolas la Internacian Lingvon kiel mi. Ĉu tiu grado de parenceco laŭ la lingvo elektita sufiĉas por la vizo? Ĉu mi ne embarasas la samlingvan Luan? Ne nur unu fojon Esperanto skribis ĉapitrojn pri "La danĝera

lingvo". Ĉu ne tro frue ni kontaktas? Ĉu mi atendu, ke Albanio havu pli da internaciaj rilatoj kaj pliperfektigu en la transnaciaj interŝanĝoj kaj nur tiam aperu la esperantistoj?

Aŭ ĉu mi devas estis la pioniro?

Intertempe, el la arkivoj de la Roterdama Centra Oficejo atingis min listo kun deko da samideanoj, kiuj en Albanio rilatas al Esperanto. Ĉiujn mi informis, ke mi planas viziton al Albanio, se mi ricevos enirvizon.

Kelkaj respondis. Ĉiuj respondoj venis per rekomenditaj leteroj. Ĉu pro bezono konservi konfirmilon aŭ espero, ke tiel ĝi sekure venos.

La unua letero venis el la urbo Shkodër, de sinjoro Zef Mjeda. Pli ol sesdekjara, lia larĝa manskribo informis pri liaj tradukoj el la albana poezio al Esperanto. Ĉu li estas tiu silenta instruisto, kiu dum jaroj per pinta krajono en kajerojn notis Albanan-Esperantan vortaron de 30000 vortoj? Ĉu li, en silento de sia hejmo, instruis Esperanton al ĉiuj siaj familianoj kaj la novaj bofilinoj, kiuj aledziĝis, eksekvis familian kurson?

Kun intereso mi eklegis la poemon "Gjergj Elez Alia" tradukitan de li.

"Inter agloj la aglo, Gjergj Elez Alia,

De naŭ jaroj, naŭ vundojn li havas.

Tagnokte, ĉe lia kapo flegas la fratino,

Liajn vundojn per fontakvo ŝi lavas".

Arkaika sonis la lingvo.

Mi sendis donace kelkajn librojn en Esperanto. Liaj respondoj baldaŭ montris, kiom profunde li trastudis ĉiun paĝon.

Alia letero venis de Klara, juna instruistino de la angla, edzino de Gëzim kaj patrino de la kvarjara Elvin.

Mi lernis la nomojn. Albanio, malantaŭ la nebulo, konsistis el panjoj kaj filoj, avoj kaj bofratinoj. Arben, Asllan, Bahri Perraj. El iliaj kovertoj elfaladis bildkartoj pri Albanio: fresko kun Sankta Teodoro el Berat kaj la domo en Korçë, kie kamarado Enver Hoĝa vivis kaj laboris. Longe mi rigardis la teksitajn kurtenojn, varmkolorajn tapiŝojn, kamenon kun grandaj lignopecoj. Latuna kruĉo ĉe la kameno. Ĉu foto de lia patrino sur la muro?

Intertempe, dum mi atendis, ke Tirana konfirmu miajn formularojn kaj permesu al mi enirvizon, sangaj eventoj portis la nomon de Albanio sur la titolpaĝojn de la mondaj ĵurnaloj. Elŝiriĝadis la lando el la fera ĉirkaŭbrako de la tordita komunismo, al kiu ĝi dum jardekoj apartenis kaj kiu donis al ĝi tiun pezan kromnomon de "lasta bastiono de komunismo en Eŭropo".

Dudeko da miloj da albanoj, sur malstabile troŝarĝitaj ŝipoj, direktiĝis al Italio, al la Okcidento. Okazis la unuaj plurpartiaj elektoj, post kiuj Ramiz Alia restis prezidento.

Pafoj kaj esperoj.

La ĵurnaloj en mia lando ne lasis min sen korŝiraj rakontoj pri la fuĝo tra la "Damnita Montaro". Dum la unuaj tri monatoj en 1991, fuĝis sur la teritorion de Jugoslavio 900 personoj.

"Oni ekiras en la montaron je la tria matene, kiam la dormo konkeras la albanajn limgardistojn. Mi vidis mian bofraton iri alidirekten, por serĉi la vojon en la montaro. Li ne plu revenis. La fratino frostiĝis antaŭ miaj okuloj. Kiam mi trovis paŝtistan kabanon por peti panon kaj varmon, jam neniam savo eblis."

Komisiono pri fuĝintoj de la Unuiĝintaj Nacioj pagadis la restadon de la fuĝintoj dum ilia halto en Jugoslavio. La pli granda parto de ili celis al Usono. Labori. Perlabori. Sendi la monon hejmen. Ne reveni. Tiel resumiĝas la deziroj".

La agado de la esperantista grupo de Durrës post 1991, estrata de Luan, estis tre vigla kaj varia. En ĝi eniris multaj junuloj el Durrës mem kaj el Shijak. Unu kafejo en la plaĝo portis la nomon "Esperanto".

Sed pli bone ni donu la memoraĵojn de Luan mem:

"Mi naskiĝis en Durrës, la 23-an de aŭgusto 1954. Tie mi finstudis en elementa lernejo (okjara). Poste mi dungigis en Uzino de Radio-Televidiloj, pro tio la mezlernejon mi sekvis en la fako de Radio-TV.

Mia patro Adem, finstudinta en la eksa Azerbajĝano (Sovetunio) pri mara navigacio, tutan tempon pasigis sur la komercaj grandaj ŝipoj albanaj. Dum la jaroj 1960 li konatiĝis kun Esperanto, kiun li praktikis dum la renkontiĝoj kun fremdaj esperantistoj en la marhavenoj de la Popola Ĉinio., Pollando, Germanio, Italio ka.

Poste la internacian lingvon ankaŭ mi lernis dum la kursoj de gitaro sub la gvido de nia instruisto poliglota, s-ro Stathi Qehaef. Ankaŭ mia frato, Fatmir, lernis esperanton. La ĉefa lernolibro estis "Paŝoj al plena posedo"

Dum longaj jaroj mi korespondis kun esperantistoj el la diversaj landoj de la mondo, same kun la Centra Oficejo de UEA en Nederlando. Tio estis malfacila kaj danĝera afero dum komunismo, ĉar la sekreta polico suspektis ĉiun, kiu korespondis kun fremduloj aŭ lernis fremdlingvojn ne devigaj en la lernejoj ŝtataj. Mi memoras pri kelkaj elstaraj figuroj esperantistaj tiutempaj el la mondo kiel Bruno Vogelmann, Mario Dazzini. Elda Doerfler, Aldo Viotto, Sera Fenovenese, Don Dulio Manjani, Marjoie Boulton, Louise Marin, Stojan Kocevski, Husni Zemoski, Spomenka Ŝtimec ka. Same kun landaj esperantistoj kiel Janko Pali, Zef Mjeda, Vasil Pistoli, Bardhyl Selimi (Mezini), Gafur Muço, Marcel Cortiade, Shaban Hasani, Tonin Ĉovabi, Gjergji Gusho, Agim Peraj kaj Bahri Peraj ka.,


Post la jaro 1990, nia enlanda Movado revigliĝis ankaŭ en la distrikto de Durrës. Mi fondis la lokan societeton kaj komencis gvidi lernokursojn. Inter miaj kunlaborantoj estis s-ino Dhurata Sesesri (Jaupi), Karita Hyka (Agasi) ka, kiuj partoprenis ankaŭ en la internaciaj renkontiĝoj. Mi estis tiutempe ĉefdelegito de UEA por Albanio kaj mia nomo estis notita en la Jarlibro de UEA. Kiam

fondiĝis la Albana Esperanto-Ligo (1991), mi partoprenis internacian renkontiĝon en Ohrid (Makedonio) kaj poste en Romo, kadre de Radikala Partio Internacia (Esperanto-sekcio) en Italio, Bulgario kaj kiel reprezentanto de Postkomunisma Albanio.



Luan kaj Bardhyl kun hungara kaj litova esperantistoj

Mi aktivis en la gazetaro per artikoloj ĉefe pri Esperanto kaj per diversaj fotoj. Nuntempe mi ankoraŭ deĵoras ĉe la arkivejo de la domkulturo “Aleksander Xhuvani” en Durrës.



Luan kun Janko Pali en la vilaĝo Qeparo

Oni aprecis min per apartaj meritoj:

- per la urbodoma “Dankemo” de Durrës
- Per tria premio pro la foto “La libelo sur la pinarbo” en Moskvo
- Per la unua premio en la ekspozicio de figura arto de Eŭropa Akademio pri Artoj
- Per Diplomo por la unua premio pro artismaj fotoj de Eŭroart
- Per la titolo “Porpaca ambasadoro”
- Per Dankemo de QFK- Durrës”

Alia grava aspekto de la agado de Luan estas muzeologio. Li fondis kaj plivastigis dum jaroj sian privatan muzeon en la hejmo. Pri tio skribis detale loka gazeto:

La Muzeo de la kolektisto Luan Jaupi, laboratorio por historiistoj, lingvistoj kaj arkeologoj
Verkis Xhevahir Gradica

“Durrës estas antikva urbo preskaŭ tri-mil-jara. Ĝi allogis imperiestrojn, armeojn, arkeologojn, historiistojn, kronikistojn, etnografojn, lingvistojn, komercistojn kaj turistojn.

Dum la romia erao Durrës estis tre grava marhaveno en la Adriatika maro kaj pli vaste.

En la urbo troviĝas la arkeologia muzeo, la etnografia muzeo, la historia muzeo kaj tiel plu. Sed krom la ŝtataj muzeoj ekzistas ankaŭ privataj muzeoj.



La arkeologia muzeo de Durrës

Unu el ili, centre de la urbo, troviĝas en la hejmo de Luan Jaupi!

La fotilo de marko “Fed-1”, sovetia produkto, donacita al Luan de lia patro estis mirakla rimedo por fiksi milojn da fotoj ĉie en la urbo kaj por pasiigi pri la fotografia arto. Danke al la fotografio Luan fariĝis konata kaj tre petata en koncertoj, festivaloj, ludoj.

La lernejoj invitis lin dum siaj aktivecoj, promenadoj, ekskursoj. Same la entreprenoj. Luan traveturis la tutan Albanion fotografante.

Tio daŭrigis bonan tradicion de la urbo mem en la fotoarta praktiko ekde la XIX-a jarcento.

Post la jaro 1990 la urbo fariĝis pilgrimejo por turistoj el la tuta mondo. Tie oni aranĝas ankaŭ internaciajn konferencojn pri arkeologio, literaturo, junulinaj konkursoj ktp. Luan ĉeestis tiujn eventojn.

Ankaŭ la urba teatro kaj distraj spektakloj invitis Luan fiksi iliajn aktivecojn.

Kaj ĉion Luan faris volontule!

Post la unua fotilo sekvis aliaj 43 fotiloj (Pentagon, Pentaks, Praktika, Kodak, Nikon, Agfa, Canon ka). Krom la fotilo ankaŭ la biciklo estis nedisigeblaj akompanantoj de Luan.

Estas tre interesaj ankaŭ kunfotaĵoj de Luan kun elstaraj personecoj eksterlandaj deĵorantaj en Albanio kiel ambasadoroj de Usono kaj Italio (Mariza Lino kaj Paolo Foresti), kun la albanaj eminentaj aktoroj Lazër Filipi kaj Kadri Roshi, kun angla humoristo aktoro Pitkin, la itala aktorino Kardinale kaj turka plej konata aktorino.

Luan estas la fondinto de la ĵurnalo “Durrës- Bizneso” kaj kunlaboranto de “Teuta Televizio”.

Li kondukis la aktivecojn de la Asocio “Durrës”, de la ĵurnalo “Bulevard” aŭ televizio “Adriatik” kaj “Real” fiksante ĉion per sia fotilo.

La domkulturo “Aleksander Moisiu” konservas la fotoarkivon pretigitan de Luan.

Grava kontribuado estas la kolekto de fruaj fotoj de la urbo dum la lastaj du jarcentoj.

Kolekto

Vasta spaco de sia hejmo je dimensioj 10 x 4 m estas dediĉita al objektoj de granda kolekto de diversspecaj relikvoj staplitaj en pluraj ŝrankoj. Luan respektas apartan modelon de arkivado, dank'al kio li povas trovi kaj elmontri ĉion kio interesus la historiistojn, lingvistojn, arkeologojn, filatelistojn.

En la kolekto troviĝas ĉiu poŝtmarko de la albana ŝtato. En ĝi estas ankaŭ poŝtmarkoj el diversaj landoj ĉerpitaj ankaŭ el la leteroj senditaj de sia patro, kapitano pri navigacio el diversaj landoj de la mondo.

Aparta angulo en la librosektoro estas dediĉita al Esperanto, same variaj albumoj. La unua aboco de la albana verkita de Kostandin Kristoforidhi en 1872 (vera raraĵo enlande) en Konstandinopolo estas ankaŭ tie.

Same troviĝas tie aliaj raraj libroj, vortaroj, almanakoj, katalogoj.

Ĉe la rando de la muzeo estas kestoj kun metalaj moneroj albanaj kaj fremdaj (markoj, dolaroj, pesetoj, dinaroj, rubloj, ŝilingoj, sterlinoj, frankoj, moneroj el la tuta mondo.

Durrës estas konata kiel la unua centro de produktado de moneroj dum la VII-ĝis-VI-a jarcentoj antaŭ Kristo. En la muzeo troviĝas ankaŭ moneroj el tiu tempo!

La horloĝoj de diversaj specoj, grandaj, malgrandaj, tablaj, muraj, manaj kaj poŝaj, kun aŭ sen baterio de la lastaj du jarcentoj troviĝas tie.

La maro, sendube, okupas apartan lokon en la muzeo. Okulfrapas la objektoj donacitaj de lia patro Adem, kiujn Luan konservas kun eksterordinara fanatikeco. (savigiloj, ankroj, ĝirokompassoj, lanternoj, radioj, lampoj, kandeloj, mapoj kaj multaj ceteraj maraj materialoj). Tre malnova ankro kun kvar hokoj eble de la velŝipoj de la XVIII-a kaj XIX-a jarcento same troviĝas tie.

Ankaŭ fusiloj de diversaj specoj kaj modeloj, uzitaj dum la Unua kaj Dua Mondmilitoj. Pluraj glavoj kaj sabroj, tranĉiloj, sagoj, arkoj, armiloj eksteruzaj. Plie raraj koraloj, valoraj ŝtonoj, konkoj ĉerpitaj ĉe la marbordo de Madagaskaro, Suda Ĉinio ĝis Kubo.

Radioriceviloj “Sonnenberg”, “Fanola” ĝis lastaj albanaj (antaŭ la 1990-a jaro) “Iliria: kaj “Fatosi”, gramafonoj kaj diskoj.

La kupraĵoj estas multvariaj, landaj kaj eksterlandaj, produktitaj de metiistoj konataj. Inter ili estas kruĉoj, teo-boligiloj, pelvetoj, bakiloj, kaldronoj, kaseroloj, ks. Ĉiuj donacoj de diversaj autoktonaj familioj de la urbo.

La naciaj kostumoj okupas sian lokon. Vestoj ekde la kapo ĝis la mokasenoj estas bele kaj akurate disponigitaj en la pavilono pri kulturo kaj etnografio.

Blazonoj kaj flagoj de diversaj ŝtatoj same troviĝas en la muzeo de Luan.

La arkeologiaj objektoj ne povis manki. Ilin Luan kolektis tra la urbo, post kiam oni konstruis novajn domojn.

Malgraŭ la fakto ke ĉio en la muzeo estas valorega kaj Luan povus elspezi sufiĉe da mono pro eventuala vendo, li neniam intencis tion.

Esperanto

Luan Jaupi estas elstara esperantisto kaj disvastiganto de IL en sia distrikto. Li estas sociestro en sia urbo, delegito de UEA kaj aktiva aganto ĉe la Albana Esperanto Asocio.

Por Jaupi Esperanto estas la lingvo unuiganta popolojn sub la alvoko: Unu Tero, unu Lingvo, unu Dio!



La lernokurso en la gimnazio “Skënderbeu” Durrës kaj la unuaj esperantistoj de la urbo

Hodiaŭ en lia muzeo estas sufiĉe granda kvanto da libroj kaj revuoj en la lingvo Esperanto. Interalie libroj pri Historio, Metodo kaj Legaĵoj.

Centoj la leteroj el lia korespondo kun esperantistoj de Italio, Aŭstrio, Hispanio, Svisio, Ĉeĥio aperas sur liaj ŝrankoj”.

7-12 Astrit Rakip Leka



Sendube Astrit Rakip Leka estas la plej aĝula esperantisto ankoraŭ viva en Albanio.



Jaro 2018, Astrit kaj alia veterano, Mujo Sokoli (nun forpasinta)

Je la fino de la 1950-aj jaroj Astrit instruis latinajn kaj slavajn lingvojn al siaj lernantoj, inkluzive de Esperanto. Ankaŭ la filino, Brikena, eklernis la IL-on. La baza instruilaro estis la eldonajoj rusaj kaj “La ŝlosilo de Esperanto” de Ĉefo Fico.

S-ro Kopi Kyçyku verkis biografian libron pri “la titano” Leka kiel li sin esprimas.

Ekde junaĝo Astrit aliĝis al la Naciliberiga antifaŝista milito. Li elstaris kiel brava gerilano. Astrit devenas de patriota klera familio kun fruaj tradicioj el la suda ĉemara belega vilaĝo Borsh.

Estante kolegiانو en Perugia (Italio) en la jaro 1939, tagon de sendependeco de Albanio (28-an de novembro) li kontraŭstariĝis fizike al faŝista studento kiu ŝiris la albanan standardon originantan ekde la XV-a jarcento, al kiu la faŝistoj estis aligintaj du hakilojn, simbolo de faŝismo. Sed nur dank’al la interveno de la tiam alban ministro pri edukado, konata lingvisto, Ernest Koliqi, oni ne ekskludis lin el la lernejo.

La 28-an de oktobro 1941, kiel tio estas dokumentita en la ŝtata arkivo, Astrit aperis en la granda manifestacio kontraŭ faŝistoj en Tirana.

Kiel brava gerilano li helpis notinde en la provizado de partizanaj taĉmentoj per faruno kaj aliaj bezonaĵoj, ĉerpitaj en kondiĉoj de granda risko. Post la finiĝo de la tiuj faroj li signis “Alarik”, nomo de konata mongolo, kio ege alarmigis germanojn.

Kvankam Astrit Leka militis ankaŭ armile enkadre de la Unua Partizana Brigado ĝis la liberiĝo de Albanio, oni kelkfoje provis persekuti lin, eĉ mortigi lin, pro lia sinteno antidiktatoreca prookcidentema.

Li estis bonega studemulo, kio pruviĝas per la fakto, ke li akiris tri universitatajn diplomojn dum la jaroj 1948-1956. Tamen la ŝtataj instancoj ĉiam dungis kaj maldungis lin, ne kontentaj pro lia spirito ne koruptema de ŝtatpotenco. La kulmino atingiĝis en la jaro 1967 kiam, instruante la francan en la gimnazio “Partizani” en Tirana, enkadre de tiel nomata kultura revolucio (laŭdita de Popola Ĉinio) oni ekskludis lin de la eduka sistemo kaj devigis lin labori permane en agrokulturo. Lian edzinon, Emine, kiu estis profesoro en la Agrokultura Universitato, oni sendis priservi porkejon en la periferio de Tirana, ĉar ŝi rifuzis divorciĝi de “popola malamiko”...

La jaro 1990 trovis Astrit senlabora, kvankam li kaŝe daŭre instruis fremdlingvojn al studentoj hejme. Akirinte pasporton, dank’al la ŝanĝiĝoj en la leĝaro komunisma, Astrit kun la familio migris al Usono kaj poste definitive al Svisio, kie li loĝas ankoraŭ nun.

La urbo internacia de Ĝenevo ebligis al li elvolvi plene sian talenton, kvankam tiam 65 jara. Tiel Astrit kunfondis la Asocion SOLIDEST helpe al landoj de Orienta Europo kaj verkis plurajn artikolojn pri la historio de albanoj. Li ege kontribuis dum la milito en Kosovo (1998-1999) klarigante al NATO kaj Okcidentaj Potencoj, ke la naciliberiga armeo de Kosovo ne estis terorisma, sed granda faktoro defende de alban popolo tiel subpremita de la eksa reĝa kaj komunisma Jugoslavio. En Tirana Astrit kunfondis la Asocion de Demokrataj Veteranoj de Milito, antipodo de la malnova Asocio de Enverista (Stalinisma) Asocio de Veteranoj.



En la kunvenoj de Militaj Veteranoj enmonde



Ĉikaze li sukcesis agnoskigi tiun Asocion, poste ankaŭ similajn asociojn en Kosovo kaj Okcidenta Makedonio al la Eŭropa Federacio de Militaj Veteranoj kaj Tutmonda Milita Veterana Asocio. En la unua federacio li portas la postenojn de vicprezidanto kaj en la dua tiun de ĝenerala konsilisto.



Astrit Leka kun la Kosova laŭreato de la porpacca premio Saĥarov Adem Demaçi en Ĝenevo kaj kun elstara albana pentristo Sali Shijaku en Tirana

Albanoj estos ĉiam dankemaj al Astrit pro liaj klopodoj diskonigi en la mondo la figuron de ilia nacia hero- Gjergj Kastrioti Skanderbeg. En la jaro 1997 li sukcesis starigi per siaj elspezoj la buston de la heroo, tuj apud la domoj de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo kaj negocis tiucele en 54 landoj de la mondo (Eŭropo, Ameriko, Azio, Australio).



Emine kaj Astrit Leka dum junaĝo



Ĉe la busto de Skanderbeg en Ĝenevo

La kontribuo de la fonduso SILIDEST, longjare estrata de Astrit, tuŝis ankaŭ la aferon de neniigo de antipersonaj minoj, la mildigon de interrilatoj en Palestino, ka.

La Konfederacio de Svisio ege aprecis la agadon de siaj civitanoj Emine kaj Astrit Leka.

La albana ŝtato, Akademio de Sciencoj kaj aliaj instancoj en Albanio kaj Kosovo aljuĝis al Astrit pli ol 11 medalojn kaj titolojn de braveco kaj dankemo.

7.13 Adem Jaupi, la kapitano kiu timigis la timon



Estas ja koincido, ke ankaŭ la patro de nia samideano, s-ro Luan Japupi, Adem Jaupi, estis esperantisto. Dum liaj studoj en la eksa Sovetio kaj poste li konatiĝis kun Esperanto kaj uzadis ĝin por komunikado kun la fremduloj.

Adem naskiĝis la 22-an de marto 1929 en la urbo Korça en klera kaj patriota familio. Ekde infaneco li estis tre scivolema kaj brava. Lia patro, Emin, partoprenis la liberigan militon de Vlora (1920) post kiam la itala armeo forlasis Albanion. Dum la dua monda milito ankaŭ Adem aliĝis al la naciliberiga armeo kun siaj fratoj kaj kuzoj.

En la jaro 1947 la ŝtato sendis lin por studi en la eksa Jugoslavio, en la Marlernejo, sed unu jaron poste la interrilatoj inter ambaŭ landoj rompiĝis, tiel Adem revenis patruon. En la jaro 1952 la ŝtato sendis lin plustudi en Sovetio ĉe la Militista Akademio pri Navigacio en Baku (Azerbajĝano).

Dum 1958-1961 li estis dungita ĉe la Albania Defendministerio (ĉe marafera direktorio).

Samtempe, scipovante la rusan, Adem instruis al fakuloj de maristaro kaj tenis korespondon kun la kolegoj eksterlande. Post la rompiĝo de interrilatoj de Albanio kun Sovetunio (1961), Adem komencis deĵori en la komerca ŝtata ŝiparo ĝis pensiigo. Menciindas la tiutempaj konataj ŝipoj transoceanaj kiel Vlora, Arberia, Vampo, Shkodra, Durresi, Tirana, Mati, Skenderbeu, Teuta, Liria, kiuj trapasis marliniojn al Eŭropo, Azio kaj Afriko. Pro liaj sindediĉo kaj oferdonoj oni nomis lin "Mara junulo". Plue oni karakterizis lin "La kapitano, kiu subigis la timon".

Jen kion rememoras mem la filo de Adem, Luan Jaupi:

En la jaro 1976 la albana ŝipo Mati dronis en la akvoj apud Konstanca (Rumanio) malgraŭ eksterordinaraj klopodoj de la maristaro kaj Adem mem, kiu forlasis la ŝipon la lasta. Neniu maristo estis damaĝita.

Adem posedis kelkajn fremdlingvojn kiel la serbokroatan, rusan, italan, anglan kaj esperanton, kiuj ege helpis lin en sia profesio. En la hejmo estas riĉa biblioteko, kun marista literaturo, beletraĵoj landaj kaj eksterlandaj de aŭtoroj konataj kiel Fishta, Mjeda, Kadare, Agolli (albanaj), Tolstoj, Dostojevski, Remarque, Dumas, Drajer (fremdaj), same multaj vortaroj.

Li pasiigis pri muziko, el kiu "La Valso de Danubo" ege impresis lin, same la albanaj karakterizaj kanzonoj de Korça kaj Shkodra.


Inter lia amikoj estis veraj intelektuloj, diversaj fakuloj, ordinaraj honestaj homoj.

La edzino devenis de fama sportista familio Duma, kun kiu li havis kvar gefilojn (Julieta, Fatmir, Arjan kaj Luan). Luan, krom esperantisto elstara, estas arkivisto kaj fotografisto ĉe la urbodomo de Durrës.

La 13-an de junio 2005 Adem forpasis. Krom la loka radio kaj gazetaro la mortoononcon publikigis ankaŭ la revuo "Esperanto" nr 11, 2005.

Pro apartaj meritoj Adem Jaupi estas dekorita per ordenoj kaj diversaj medaloj de la Popola Kunveno (Parlamento).

Li aktiviĝis en la organizaĵo de la Veteranoj de Naciliberiga Milito, same en la Asocio de Maristoj "Adrion".



Revuo Esperanto anoncas pri la morto de Adem Jaupi

-
-
-
-
-
-
-

7.13 Gafur Muço



Gafur, la dua dekstre, Rita Përmeti centre

Gafur estas unu el la fondintoj de la Albana Esperanto-Ligo. Li estis samtempe la unua prezidanto de la Albana Esperanto-Ligo. Gafur deĵoris longjare ĉe la Ministrejo de Konstruado en Tirana, kiel bibliotekisto. Tie li kunlaboris, surkampe de Esperanto, kun ing. Ĉefo Fico kaj Ing. Vasil Pistoli. Frujare 1991 li turnis sian hejmon en la strato "Thanas Ziko" en Tirana en la sidejon de nia Ligo. Tie li instalas eĉ multobligilon por presi diversajn niajn esperantaĵojn. Lin ege helpis tuttempe la fraŭlino Rita Përmeti. (vidu sur la supra foto)

Jen lia intervjuo publikigita en nia revuo, decembre 1991:

Demando: Kiam kaj kiel vi ekopupiĝis per Esperanto?

Gafur: Tio okazis dum jaroj 1960. Tiam mi laboris kun la sinjoroj Ĉefo Fico kaj Vasil Pistoli, kiuj varbis min al Esperanto. Sinjoro Vasil eĉ havigis min lernolibron kaj aliajn esperantaĵojn kiuj estis malfacile troveblaj.

Demando: Ĉu la libroj mankis pro ekonomiaj kialoj?

Gafur: Ĝis la jaro 1956 estis danĝere sin okupi per Esperanto. Ĉar tio bezonis korespondon kun fremdaj esperantistoj, interŝanĝon de opinioj kaj literaturaĵoj, renkontiĝojn. Sed tio ne plaĉis al tiutempaj aŭtoritatoj, kiuj konsideris la interrilatojn kun fremdlandoj danĝeraj por la lando, ĉar laŭ ili, tiel povus penetri nian landon la biurĝa vivmaniero. Ĉi tie ekzistis cenzuro! La leĝo estis severa. Dum postaj kvar jaroj, danke al la insistado de s-ro Ĉefo Fico kaj s-ro Vasil Pistoli, ni, esperantistoj, ekĝuis pli da eblecoj agi. Tiam malfermiĝis du lernokursoj (1958 kaj 1960). Oni povus sin aboni al la revuo "Nuntempa Bulgario" kaj poste al "El Popola Ĉinio". (tiam la ŝtataj rilatoj kun Ĉinio estis bonaj). Sed bedaŭrinde tiu ora tempo finiĝis baldaŭ.

Demando: Vi, kune ku s-ro Pistoli en la jaro 1967 tradukis en esperanton la libreton pri Gjergj Kastrioti- Skënderbeu, de Kristo Frashëri. Kiel ebligis tio?

Gafur: Tio estis neebla se ne subtenus nin unu el la ŝtataj kaj partiaj altranguloj, s-ro Fadil Paçrami (poste enprizonigota). Ni profitokazis de solenaĵoj okaze de 500-jariĝo de la morto de nia nacia hero. Tiutempe Vasil Pistoli tradukis kaj eldonis en esperanton ankaŭ filmeton pri la historia urbo de Gjirokaŝtër, naskiĝurbo de komunista diktatoro Enver Hoxha kaj de mondfama albana verkisto Ismail Kadare. Denove estis la subteno de Fadil Paçrami, kiu gvidis kulturajn aferoj en la ĉefurbo.

Oni denove malpermesis la korespondon kun eksterlando kiel ia "danĝera agado". Ĉiu fremdulo laŭ la Sekreta Sekureservo konsideriĝis spiono, kiu volis renversi la ŝtatpotencon kaj la popolan reĝimon. Ĉie estis cenzuro. Tiel mi limigis min per malmultaj leteroj kaj profunde enpeniĝis kiam mi skribis leterojn.

Demando: Ĉu estas malfacile por la esperantista ligo agadi en la kondiĉoj de ekonomia, financa kaj social krizo?

Gafur: Certe jes, eĉ tre malfacile estas. Sed danke al nia pasio kaj persistado, aparte de sinjoroj V. Pistoli, Z. Mjeda, B. Mezini, A. Peraj, Sh. Hasani kaj al la morala kaj materiala helpo de fremdaj esperantistoj kiuj sendis nin diversajn eldonaĵojn, tiaj malfacilaĵoj reduktiĝas.

Ege helpis nin ankaŭ UEA, la asocioj de Trieste kaj Bulgario. Ni estas tre dankemaj al ili!

Demando: Kian ampleksecon havas via asocio?

Gafur: Hodiaŭ funkcias la asocietoj en Tirana, Durrës, Lezhë, Kukës, Shkodër; ankaŭ la grupo de la junaj esperantistoj. Baldaŭ stariĝos filioj ankaŭ en la ceteraj urboj.

Demando: Kion vi aldirus al la albanaj esperantistoj?

Gafur: Mi dankas ilin por ilia fido al mi elektante min Prezidanto de la Ligo, kio obligas min per granda respondeco.

7.14. Gjergji Tasi Gusho



Sinjoro Gjergji estas aktuale la plej aĝa esperantisto loĝanta en Pogradec, Albanio.

La lingvon internacian li ellernis memstare dum la jaroj 1960-aj. Jen kion li rakontas pri tio:

“Eble estis la jaro 1957, kiam mi ekaŭdis unuafoje pri Esperanto. Tiam mi estis studento en la Fakultato pri Filologio, pri la rusa lingvo. Iutage nia profesoro anoncis viziton de persono kun tre interesa temo: la internacia helplingvo Esperanto. En la aŭditorio ĉeestis studentoj de la rusa kaj albana fakoj. La preleganto estis inĝ. Ĉefo Fico. Ni konatiĝis, dank’al li pri la

historio de la lingvo kaj ties kreinto, la polo L.L. Zamenhof, pri la apero de la unua libro julie 1887 kaj tuja disvastiĝado de Esperanto tra la mondo.

Interalie li diris, ke mem la ideo de IL naskiĝis en la dua parto de XIX-a jarcento, kiam asocio de lingvistoj, prikonsiderante la malfacilaĵojn de la interkomunikado de la homoj de diversaj naciecoj kaj la evoluon de la industrio, ekonomio, komerco kaj internaciaj rilatoj, proponis ke oni inventu internacian komuniklingvon por plifaciligi la interkomunikadon de homoj de diversaj naciecoj. Tiutempe oni bezonis posedi kelkajn fremdlingvojn por interkomuniki kun homoj el diversaj landoj, kio estis vere malfacila afero.



Gjergji Gusho kaj lia edzino Zhaneta

La inventota lingvo devus esti klara en prononcado, simpla laŭ gramatika vidpunkto, facile lernebla, racia kaj riĉa je leksiko. Multaj lingvistoj entreprenis tian laboron, sed sensukcese. La praktiko pruvis, ke ilia laboro ne estis taŭga.

Nur la doktoro okulisto el Bialostoko, en Pollando (tiam sub la Rusia Imperio), L.L.Zamenhof, kreis lingvon taŭgan por la ĉi-supre menciitaj kvalitoj. Tiun lingvon li nomis Esperanto. Poste s-ro Fico parolis pri la simpleco de la gramatiko de IL. Ĉiuj ni restis ravitaj.

La studentoj de la rusa lingvo kiel mi, bone sciis kiom malfacile estas ekposedi fremdan lingvon kiuj havas multajn regulojn kaj esceptojn. La prelego ege kontentigis nin kaj multaj deziresprimis eklerni tiun miraklan lingvon, sed tiutempe la sola lingvo lernenda estis la rusa.

Tamen en la jaro 1959 mia pli aĝa frato revenis el Bulgario, kie li finstudis en la universitato. Interalie li alportis ankaŭ lernolibron de Esperanto por bulgaroj, kiun li donacis al mi. Ties aŭtoroj estis Ivan Sarafov kaj Simeon Hesapĉie, la eldono okazis en 1957. La libro enhavis 25 lecionojn kaj aldonajon kun legaĵoj kaj fine vortareton (bulgara-esperanta kaj esperanta-bulgara) kun la leksiko uzata en la lernolibro.

Mi trafolumis la libron kaj komprenis, ke mi povus uzi ĝin por lerni esperanton. La bulgara similas al la rusa, tiel mi ne havis malfacilaĵojn por posedi la vortaron de Esperanto tra la

bulgara. Mi komencis lerni. Krom la lecionoj mi uzis apartajn kajerojn kaj du vortarojn (albana-esperanto kaj esperanto-albana). Tiel mi metis miajn bazojn en la lernadon de tiu lingvo.

Iufoje, post kelkaj jaroj, kiam mi deĵoris en Tirana, mi vizitis la Nacian Bibliotekon kaj interesiĝis, ĉu ekzistis tie libroj en Esperanto. Traserĉante la fremdan literaturon mi trovis multajn eldonaĵojn en Esperanto. Mi notis la adresojn de la libroj, same kiel la titolon, la aŭtoron kaj la lokon de la libro en la biblioteko. Poste tiujn librojn mi pruntis tra la urba biblioteko de Pogradec, laŭ demando farita de nia loka biblioteko al la nacia biblioteko en Tirana. La libroj alvenis per la poŝtoservo. Interalie mi ricevis ankaŭ lernolibron de Esperanto por rusoj, same kelkajn legaĵojn en Esperanto.

Surbaze de ĉi tiuj libroj mi pliriĉigis ankaŭ miajn personajn vortarojn (esperanto-albana kaj albana – Esperanto).

Post la jaro 1991, kiam nia lando demokratiigis kaj post kiam fondiĝis la Albana Esperanto-Ligo, mi havis eblecojn komuniki kun fremdaj esperantistoj. Unu el ili estis ruso loĝanta en Pjetrozavodsko, alia en Italio, tria en Svedio kaj kvara en Francio, kiuj sendis ankaŭ librojn en tiu ĉi lingvo.

En mia lando mi korespondis kun la forpasinta sinjoro esperantisto Zef Mjeda, sed iom pli kun s-ro Bardhyl Selimi (Mezini). Post 1991, kiam mi ankoraŭ instruis en la mezlernejo de la urbo, mi parolis al miaj gestudentoj kaj al miaj amikoj pri la lingvo Esperanto, pri ĝia celo, aŭtoro, tempo de kreiĝo, same pri kelkaj gramatikaj apartecoj. Ili aŭskultis min interesplene kaj multaj deziresprimis eklerni IL.

Mi malfermis senpagan lernokurson en la jaro 1992. Por kontentigi ilian deziron, mi pensis verki mem lernolibron kun taŭgaj lecionoj por helpi al lernado. La tekstojn mi ĉerpis el la disponeblaj libroj adaptante tiujn, kiuj aspektis pli raciaj. La aŭtoroj el kiuj mi ĉerpis materialojn estas: A. Tellini (Corso di lingua internazionale Esperanto 1921), Vasil Pistoli (Lernolibro de Esperanto, Tirana, 1991, Ivan Sarafof (Kurso por esperanto, Sofio, 1957), A. T. Koroleviĉ, Kniga ob Esperanto, Kiev, 1989) kaj aliajn.

Tiucele helpis min ankaŭ mia sperto kiel instruisto de fremda lingvo en la lernejo. La materialojn mi tajpis per skribmaŝino, je malnova modelo, kiu havis eĉ la apartajn literojn de Esperanto kiel ĉ, ĝ, ŭ, ŝ, ĵ, ĥ. La librofoliojn mi multobligis kaj disdonis al la lernantoj. Tiel aperis resumo el 25 lecionoj kaj kelkaj legaĵoj, kiuj konsistigas la bazon de la lernolibro. La laboraĵo estis en formo de broŝuro.”

La sinjoro Gjergji Gusho estas delegito de UEA, tutmonda esperantista organizaĵo, membro de la Albana Esperanto-Asocio kaj de la Albana Sekcio de ILEI.

7.15 Dr. Engjëll Tasi Gusho



La delegito de UEA por la urbo Korça (Albanio) estas s-ro Engjëll Tasi Gusho. Jen kion skribas pri li loka ĵurnalo.

Engjëll Gusho, la kuracisto de Korça, civitano kaj esperantisto.

“Engjëll Gusho estas unu el plej maljunaj kuracistoj en Korçë, ankoraŭ aktiva, kvankam 75-jara! Li naskiĝis la sepan de oktobro 1944.

S-ro Gaço Kane en sia libro pri ‘Korça medicino’ mencias ankaŭ Gusho-n. Kun gepatroj intelektuloj, honorindaj instruistoj kaj parenkaro je patriotaj tradicioj, Engjëll edukiĝis sufiĉe bone. En la jaro 1967 li finstudis en la Fakultato pri Medicino de la Tirana Universitato. Li eklaboris en Maliq, en la vilaĝo Sheqeras kaj laboris poste kelkajn jarojn en la hospitalo de Maliq kiel ties direktoro.

Dum 1973-1975 Engjëll specialiĝis pri endokrinologio en Tirana. Reveninte al Korçë li malfermis la endokrinologian servon en la distrikto de Korça. Ĝis pensiĝo (2007) li deĵoris kiel endokrinologo ĉe la hospitalo-polikliniko de Korça. Engjëll kondukas tre ĝentile kun siaj pacientoj kaj estas tre kapabla kuracisto.

Sed Engjëll estas pasiiĝinta ankaŭ por beletro kaj fremdlingvoj. Li posedas la francan kaj la rusan, same la internacian lingvon Esperanto. Li estas membro de la Albana Esperanto Asocio.

La scienca verkado de Engjëll Gusho estas vasta kaj konata. Pro tio la Nacia Parlamento honoris lin per la Medalo “Bona servado al la popolo”. Kaj en la jaro 1989 per la ordeno “Je bona servado al la popolo”. Kvankam pensiĝinto, doktoro Gusho daŭre deĵoras ĉe du privataj klinikoj en Korça. La kunlaboro de tiu sindediĉa kaj kapabla kuracisto kun siaj kolegoj notinde plibonigis la endokrinologian servon en la hospitalo de Korça.

La lingvon Esperanto Engjëll komencis lerni, instigite de pli aĝa frato, Gjergji, kiu deĵoris kiel instruisto en Pogradec, kiel instruisto de la rusa en la gimnazio. Tial li uzis la lernolibron de Gjergji kaj daŭre uzadas esperanton en sia internacia korespondado, inkluzive kadre de la tutmonda medicinista asocio.”

La posedo de du fremdaj lingvoj (franca kaj rusa) certe helpis al Engjëll ankaŭ por posedi esperanton. Granda helpo estis la libro de Andrez Childs-Mee “Esperanto aŭtodidakte” kaj “La tuta Esperanto” de Henrik Seppik.



S-ro. Engjëll (meze) en la Akademio de Sciencoj de Albanio, 2012

Kiel rakontas Engjëll mem, lin plezurigis la Esperanto-versio de la libro “Skanderbeg” de Kristo Frashëri tra la traduko de Vasil Pistoli kaj Gafur Muço. Poste ankaŭ la lernolibro “Ĉu vi parolas esperanton?” de Bardhyl Selimi. Li scivoleme sekvas la radioelsendojn en Esperanto kaj tralegas sciencajn artikolojn pri medicino.

7.17 Shaban Ali Hasani



Estis decembro 1961. Shaban sekvis siajn studojn en la eksa Teknikumo pri Konstruado en Tirana. Li devenis el la vilaĝo Petkaj de la regiono de Malziu (Kukës) kaj revis fariĝi konstruisto. En la kulturdomo “Ali Kelmendi” en Tirana li legis anoncon, laŭ kio tie estis malfermita lernokurso pri Esperanto. En la mezlernejo li studis fremdlingvon, samkiel ĉie en la lando, la rusan. Li sin demandis: kio estas Esperanto? La saman scivolemon havis ankaŭ

mi, kiam mi estis gimanziano en la lernejo “10 Korriku”. Ni estis amikoj, tiel ni enskribiĝis en la lernokurso, kiun gvidis aĝulo moviĝanta per bastono. Li estis la inĝeniero Ĉefo Fico.



Shaban (dekstre} en sia vilaĝo Petkaj

Alia pasio de Shaban tiutempe estis la beletro. Li ĵus estis finverkinta amnoveleton. Tion ni proponis por provlegi al la renoma verkisto (Dhimitër Shuteriqi) tra ties filino, Mira, same gimnaziano en mia lernejo “10 Korriku”. Kaj la verkisto respondis post iom da tempo tre afable, tre detale, konsilante la junan verkiston Shaban per kuraĝigaj vortoj.



Shaban dum soldatservo kaj decembre 1961 en la urbo de Shkodër je mia akompano (tiam mi estis en militista mezlernejo “Skanderbeg”).

Esperanto daŭre restis la pasio de Shaban, ankaŭ dum la soldatservo kaj la universitataj studoj. Lia korespondo estis tre vasta kun la eksterlandaj esperantistoj, kio atentigis ankaŭ la sekretajn servojn en la urbo de Kukës. Pro tio Shaban ĉesigis la korespondadon. Sed li daŭrigis tion post la jaro 1990.



Shaban kaj lia edzino, Gjyle, (jam forpasinta) gatis kaj prizorgis dum jardekoj en sia hejmo multajn fremdajn esperantistojn, ekde Francio ĝis Litvujo, ĉar Shaban enskribiĝis en la Pasporta Servo.



Kun francaj kaj germanaj esperantistoj

Ekde pluraj jaroj Shaban gvidas la Albanan Esperanto-Asocion kaj estas delegito de UEA.

Jen kion skribas li pri si mem:

“Mi naskiĝis la 23-an de Julio 1945 en la vilaĝo Petkaj, regiono Malzi, distrikto Kukës. La sepjaran lernejon mi sekvis la en naskiĝloko, Shëmri. Dum 1960-1964 mi studis en la Teknikumo pri Konstruado “8 Nentori”, Tirana, post kiam mi akiris la titolon “Mezgrada Teknikisto de Konstruado” en la fako “Domkonstruaĵoj”. Ekde la 15-a de Julio 1964 ĝis la 13-a de majo 1965 mi estis enpostenigita respondeculo por la sektoro de investaĵoj en la Industria Entreprenejo “Sharra” (Segejo) en Shëmri.



Kukës 1986 kaj Tiranë 2012 (apude la litva esperantistino Mara Timermare)

Poste, ĝis la 30-a de aŭgusto 1979, mi deĵoris kiel konstrua teknikisto en la Ŝtata Konstrua Entrepreno en Kukës, (same dum la dujara soldatservadode 1966 ĝis 1968, kiam mi gvidis diversajn armeajn konstrulaborojn).

De 1970 ĝis 1975 mi sekvis la universitatajn studojn en la Fakultato pri Konstruĝinĝierado en la fako: civilaj konstruaĵoj, Industriaj, vojoj-montoj)



Jaro 2019, Tiranë



Krujë, 2012 kun fremdaj esperantistoj

De 1983 ĝis 1988 oni enpostenigis min ĉefinĝiniero ĉe la Konstrua Entrepreno- Kukës kaj poste ĝis 1991, ĉe la Entrepreno de Komunumaj Servoj de la urbo.

Unu jaron mi estis direktoro en la Urbodomo de Kukës kaj du pliajn jarojn direktoro de Entrepreno pri Irigaciado.

En 1994 mi fondis mian privatan entreprenon “Simon shpk”, kiun mi gvidis ĝis 2008. Poste mi deĵoris kiel teknika gvidanto en aliaj privataj konstruaj entreprenoj en Tirana.

La Nacia Parlamento, en la jaro 1986 honoris min per “Ordeno de Laboro Tria Klaso” Kiam oni konstruis, ekde la komenco, la novan urbon de Kukës (tiam la granda elektra energia centralo de Fierza sur la rivero Drin postulis akvobasenon, kiu kovris la malnovan urbon), mi okupiĝis pri la starigo de multaj objektoj sociekonomiaj kaj kulturaj, konstruataj en ĝi.”

S-ro Shaban estas verkinta interesan monografion pri la regiono de Malzi, pritraktantan diversajn aspektojn historiajn, etnografiajn, ekonomiajn, ks.

7.18 Zamir Gjurgji



Kun Zamir mi estas ekkonatiĝinta dum la lernokurso de esperanto en la firmao “Karajani”, en la jaroj 1990. Li posedis kelkajn fremdlingvojn (italan, francan, ka), sed estis scivolema pri novaĵoj. Por perlabori, dum longa tempo, Zamir vendis surstrate etajn varojn. Li loĝis kun la patrino en apartamento en la loĝbloko “Nova Tirana”.

Zamir akceptis nian proponon por ĉeesti trisemajnan seminarion en La Chaĝ de Fonds, (Svisio), kun du aliaj junulinoj (Majlinda Grashi kaj Mimoza Bunjaku) somere 1993. Li revenis entuziasmigita pro esperanto. Kelkfoje Zamir akompanis fremdajn esperantistojn vizitantajn Tirana-n. Ankaŭ li ege helpis nian asocion per komputila ellaborado de nia Bulteno siatempe, kiam li deĵoris en iu ĵurnalo. Zamir estas edziĝinta kaj havas infanon.

La vivaj malfacilaĵoj, senlaboreco, forigis lin disde nia enlanda movado, kiu sendube postulas volontulecon. Sed tamen li restas diligenta esperantisto ekde la jaro 1991.

En la julia numero de nia tiama papera revueto “Albana Esperantisto” (1993) Zamir priskribas kiel li konatiĝis kun Esperanto:

“Ĉe ĉiu homo ekzistas neeltenebla deziro por malkovri nekonatan, neviditan. Ankaŭ “la lingvo” estas elemento survoje de malkovro de la mondo.

Dum la unuaj paŝoj al nova lingvo, ĉe kiu ajn malfermiĝas fenestro tra kiu oni vidas la realon, per propraj okuloj, antaŭe tute ne konatan kaj ne perceptitan realon. Sur ĉi tiu vojo malfacila la pasio de la unuaj momentoj turniĝas al kutimo, de kiu oni neniel disiĝas la tutan vivon.

Ĉiu lingvo havas siajn fizionomion kaj originalajn esprimkapablecojn.

La homo surpriziĝas kaj poste raviĝas, kiam li distingas la emociajn kolorojn, eĉ de unu sola esprimaĵo kaj aparte kiam tio venas de granda plumo kaj tio instigas lin por ekkoni pli profunde la lingvon, kvankam tia vojo, pro lingvokonoj, havas siajn malfacilaĵojn.

Komence, ŝajnas ke vi trapasas de bulevardo al ĉefa strato kaj plue en duarangajn stratjon, kiuj fariĝas ĉiam pli malvastaj kaj kelkfoje ne traireblaj pro la lingvaj baroj.

Ĉu veras la aperanta penso ĉi supre? Sufiĉas ja diri, ke por ekĝui la plezuron, kiun donas la plumo de granda verkisto, unue ni devas koni eĉ la nuancojn plej detalajn kaj plej belajn de la vortotrezoro.

Tio estas akiraĵo iom ĝenerala, sed tie ekzistas reale ankaŭ esceptoj.


Mi komencis esperanton tute hazarde kaj motivigite de ideo por okupiĝi per io nova kaj konvinkite ke la fruktojn de tiu afero mi ne rikoltus tuje, sed tute surprizite pro mia konfrontiĝo kun Esperanto, mi rimarkis ke mi povis kompreni tute libermaniere ĝin pli bone kaj pli rapide ol la aliajn lingvojn.

Pristudinte poiome, al mi okulfrapis la alta grado de racieco de la lingvo envorte. Ĉiu naskiĝinta demando pri tio havas do sian respektivan respondon. Dum en aliaj lingvoj oni ne povas serĉi la kialon, ĉar la respondo estus tia, ĉar tiel jam diris iam la anglo, la germano, la ruso ks.

La facileco de la esprimado, rompanta la lingvajn barojn de striktaj reguloj pri la ordo de la vortoj en la propozicio, kiuj ne ekzistas en la ceteraj lingvoj, sen kiu apenaŭ io vere funkcius, same atentigis min.

Tipa estas nur la germana lingvo, kie oni devas atendi ĝis la fino de la frazo por uzi la verbon kaj akiri la sencon de ĝi.

Ne nur la simpleco de esperanto rimarkita de Tolstoj, sed ankaŭ ĝiaj gramatikaj elementoj, servas kiel katalizilo de la homa fantazio. Ekzemple la prefikso -mal ne nur simpligas preskaŭ la duonon de la vortaro, sed ankaŭ instigas fantazion por serĉadi ĉiam, deirante de la antonimo. Ekzemple, se en la teksto ni havas la vortoesprimon "regulo", pere de la vorteto "mal", indikanta la kontraŭon de la vorto regulo, ni devas turni nin al nia fantazio por trovi la vorton -ĥaoso-. Samtempe evidentiĝas ne nur la kapablo por absorbi ene de ĝi ĉiujn atingiĝojn de la aliaj lingvoj, sed ankaŭ ĝian junecan karakteron. Ekzemple: ĝi ne traktas, postkiam jam venis ŝtonigita -ant- luprenita el la neolatinaj lingvoj (en la franca- ant- en la itala-ante) kaj memsufiĉiĝante per la formado de la aktiva participo, sed daŭras pluen ankaŭ per tiu ĉi sufikso, formas ankaŭ respektivajn verbonomojn. Ekzemple ne nur- skribanta- kiel aktiva participo, sed ankaŭ- skribanto- kiel respektiva verbonomo.



Tiuj ĉi estas kelkaj inter ties ecoj el mia vidpunkto, kiuj - konfrontigante ilin al la ecoj de la ceteraj lingvoj -, laŭ kio mi scias - ebligas min doni tian interpretaĵon.

Aliflanke mi rigardas esperanton kiel lingvon, ebligantan la mensan kaj spiritan kuniĝon de la homoj. Ĉar mem figureca esprimaĵo, uzata ofte kiam mi intencas fari ion, akiri interkonsenton aŭ trovi komunan lingvon, povas ricevi tre bone realan koloron, ĉar jam ekzistas komuna lingvo.

Se Esperanto inspiras kuniĝon, tio klariĝas ankaŭ en ties simbolo -e- latine flanke de e-slava kiel nekontestebla indikilo de la kuniĝo de la ŝtatoj de Oriento kaj Okcidento.

Se ni rigardas ĝin el alia vidpunkto, en ĉi tiu glora tempo kun plene da demokratiaj ŝanĝiĝoj en la tuta mondo, ambaŭ e-oj, starante brakenbrake, povas interpretiĝi jene:

La unua e kiel ekuo, monunuoj anticipanta al la plena ekonomia unuiĝo de la kontinento, kio eĉ ne kontraŭstaris al la ceteraj monunuoj kiel dolaro, marko, liro, franko, rublo ka, sed ĝi okupis sian lokon.


Kaj la dua e, Esperanto: tio fariĝos baldaŭ la dua ĉenero de la ĉeno, plenumanta la pensan unuiĝon kaj kreas tiun nedisigeblan ĉenon de ekonomia kaj spirita unuiĝo, ne kontraŭstarante al la ceteraj lingvoj kiel la angla, la franca, la itala, la rusa ka, okupante sian lokon.

Ni esperu ke la futuro ne restu porĉiame futuro por Esperanto, sed ŝanĝiĝu al prezenco.

7.19 Mimoza Bunjaku



Mimoza naskiĝis en Kukës, kie ŝi finstudis en la urba gimnazio. Dum la universitataj studoj ŝi pasigis en Tirana ekzamenon en la fako geografio. Post 1991 Mimoza enskribiĝis en la lernokurso de Esperanto de s-ro Nehat Sokoli en Kukës.




Kukës

En la jaro 1993 la albana Sekcio de ILEI ebligis al ŝi, interkonsente kun la ILEI-estraro, partopreni trisemajnan seminarion en La Chağ de Fonds (Svisio). Post la seminario ŝi akiris diplomon. Tio ege kuraĝigis Mimoza-n por starigi mem lernokurson en la gimnazio, kie ŝi instruis.

Unu jaron poste alvenis invitletero el la Karlskoga universitato (Svedio), kie s-ro Lars Forsman³⁵ gvidis internacian kvarmonatan lernokurson pri esperanto. Mimoza akceptis la invitilon kaj vojaĝis al Svedio, kovrante mem la elspezojn.



Karlskoga, Svedio



Lars Forsman

Je la fino de la kurso ŝi konatiĝis kun sia estonta edzo el la urbo Orebro kaj fondis familion. Ili havas unu filon, jam studento en la universitato kaj Mimoza siaflanke laboras en Orebro.

³⁵**Lars Forsman** (naskiĝis en la jaro 1938), sveda pedagogo, instruisto de fremdlingvoj kaj rektoro de la Sveda Instituto de Esperanto. Li finstudis pri la germana kaj angla en la universitatoj de Uppsala kaj Lund, same pri pedagogio, fonetiko kaj lingvistiko.

7.20 Nehat Sokoli



Nehat estas instruisto pri biologio kaj ĥemio en la distrikto de Kukës. Dum longaj jaroj li deĵoris en Kruma, en Kukës, en Bardhoc, kaj laste en Topojan. Kelkajn jarojn li laboris en la entrepreno pri medicinaj herboj kaj en la konstruado de la aŭtoŝoseo konektanta Albanion kun Kosovo kaj en ties daŭrigo en Kosovo.



Nehat en Kukës vintre kaj kun sia familio

S-ro Nehat estas edziĝinta kaj havas du gefilojn, kiuj studas medicinon. Li eklernis esperanton post la jaro 1990, kvankam antaŭe ankaŭ li ricevadis esperantaĵojn senditajn el Popola Ĉinio.

Nehat gvidis lernokursojn en la lernejoj, kie li deĵoris.

7.21 Martha Heide Otto



Speciala membro de Albana Esperanto-Asocio estis dum longaj jaroj ankaŭ s-ino Martha Heide Otto, je germana nacieco kaj usona ŝtataneco.



Martha Heide Otto vivis kaj laboris multajn jarojn en la urbo Vlora

Ŝi alvenis en Albanion komence de 1990 kiel Baha'i-anino kaj volontulis ĉefe en la urbo Vlora, kie ŝi eĉ aĉetis apartamenton.



S-ino Martha en Vlora, en Tirana kaj en Lisbono dum tiea UK

Preter Baha'i-anino Martha estas ankaŭ esperantistino. Tio ligis ŝin kun ni.



Dum la kongreso de Internacia Radikala Partio en Tirana

Post kelkaj jaroj Martha translokiĝis al la Monda Baha'i-centro en Haifa, Israelo, ĉiam serve al sia religia pasio, kie ŝi instruis al pilgrimintoj vizitintaj la centron. Poste ŝi revenis Albanion.



Martha kun albanaj esperantistoj

En la urbo Vlora Martha gvidis lernokursojn pri la angla, la germana, same pri Esperanto!

Ŝi reprezentis nian Asocion en kelkaj UK.

Pro apartaj meritoj sociaj en Vlora Martha estas honorita per Dankema Letero kaj aliaj aprecaĵoj.

Jen kion skribas ŝi mem:

“Mi nomiĝas Martha Otto, mi estas mondcivitanino, sed ankaŭ ‘vloranino’. Kial do? Mi alvenis Albanion unuafoje por partopreni Balkanan Konferencon organizitan de la Nacia Asembleo de Baha’i-anoj, en Tirana, en la jaro 1995. Vojaĝinte tra la tuta lando kaj

*renkontiĝinte kun multaj afablaj albanoj, mi revenis ĉi tien du fojojn per mia eta aŭto plenplena de libroj, ludiloj, medikamentoj. En la jaro 1996 mi findecidis translokiĝi de Germanio al Albanio, kie mi restadis du jarojn. Antaŭe mi pasigis longajn jarojn en Suda Azio. La kor-elektita urbo mia estis Vlora
Tre frue mi trovis tie amikojn, ĝentilajn najbarojn pretajn helpi min kaj studentoj por la lernokursoj de la angla, germana kaj franca lingvoj.*



1997

La civila milito enlande en 1997³⁶ interrompis mian agadon kaj poste, en 1998, mi komencis gvidi la edukprogramojn kun infanoj kaj junuloj, same la kuraĝigan trejnadon por virinoj kaj instruistoj. Ekde 1995 mi konatiĝis kun s-ro Zef Mjeda en Shkodër, Agim Peraj en Lezhë kaj Gafur Muço en Tiranë. Sed mia plej bona amiko esperantisto estis Bardhyl Selimi. Ĉiam kiam mi vizitis Tirana-n ni renkontiĝis kaj babilis plezure. Krome Bardhyl invitis min al sia lernejo kaj al aliaj lokoj.

Dum la jaroj 2004-2013 oni invitis min deĵori ĉe la Monda Centro de Baha'i en Haifa, Israelo, por gvidi pilgrimintojn el la tuta mondo. Ekde la komenco mi kontaktiĝis kun la lokaj kaj regionaj esperantistoj, kiuj venadis regule al mia loĝejo, ĉiun monaton. Krome mi partoprenis multajn naciajn kunvenojn israelajn kaj ekskursojn al la famaj lokoj kiel Norda Galileo, la Morta Maro aŭ Jeruzalemo.

Dum mia deĵorado en la Mondra Centro mi ofertis lernokursojn pri esperanto por la interesitoj inter 600 volontuloj tie kaj organizis regule ankaŭ komunajn tagmanĝojn. Inter la pilmigrintoj estis ankaŭ esperantistoj el la diversaj landoj de la mondo.

Pasintjare, okaze de la Internacia Junulara Kongreso en Israelo, same la Azia Kongreso, mi bonŝancis gvidi du grupojn alvenintajn por viziti la terasojn kaj ĝardenojn de la Baha'i-centro sur la Monto Karmelo.

Post 9 jaroj da deĵorado en Haifa mi revenis al Vlora, rekonstruis mian loĝejon kaj restarigis kontaktojn kun la najbaroj.

Mi fondis junulan grupon por estigi moralan edukiĝon kaj ĉeestis en la regulaj kunvenoj kun patrinoj kaj amikinoj, kun kiuj ni babilis pri interesaj temoj ekzemple kuraĝigo, spirita trankvilo, konsiloj de Patrino Tereza, Senco de la Vivo, kiel reagi al kalumnioj, konfliktoj ka. Kvankam estas malfacile interesi junulojn pri la internacia lingvo, ĉar iliaj gepatroj preferas aliajn naciajn fremdlingvojn « utilajn », mi havas nun unu kursanon pri Esperanto, kiu eklernis ĝin per la metodo « lernu.net ».

³⁶ Okazis fakte kolapso de la ŝtato pro la perdo de mono de plimulto de la albanoj ĉe la fifamaj Ponzaj Piramidoj

Nun mi vivas en Leipzig, Germanio, pli proksime al miaj gefiloj. Unu el ili, la plej juna, estas medicinisto en tiu urbo. Mi renkontis ĉi tie s-ron Erich- Dieter Krause, aŭtoro de granda vortaro esperanto-germana. Post kiam mi estos aranĝinta mian loĝejon, mi intencas kontakti la lokan esperantistan grupon.

Pro mia multflankaj travivaĵoj en Albanio, tiu ĉi lando plurestos en mia koro kaj mi nepre revizitos ĝin.

Mi esperas, ke ni renkontiĝos baldaŭ dum la aktivecoj de la albana esperantistoj. Mia adreso jenas:

Heide Martha Otto, Leipzig, Julio 2019”

Kiam ni petis s-inon Martha ‘kiel ŝi konatiĝis kun esperanto’ ŝi eksplikis tion per letero:

“Ekde mia junaĝo mi ŝatis la lingvojn, kolektis poŝtmarkojn, korespondis kun amikoj el la tuta mondo en la germana, angla kaj franca, vivis kaj studis en Anglio kaj Francio kaj fine, fariĝis interpretistino, tradukistino kaj instruistino de fremdlingvoj. Mi ellernis ankaŭ la hispanan kaj italan kaj multe vojaĝis.

En la jaro 1975 mi aliĝis al la Baha’i-kredo, kie por ni, ampleksiĝas ĉiuj religioj kaj tio estis io noveca por nia epoko. La fondinto, Bahau’u’llah, baziĝas sur la spiritaj veraĵoj jam konataj de ĉiuj religioj kaj aldonas novajn sociajn leĝojn por nia epoko, ekzemple:

Unueco de la homaro, forigo de antaŭjuĝoj, egalrajto inter viroj kaj virinoj, ĝenerala edukiĝo, harmonio inter la scienco kaj religio, elekto de komuna komuniklingvo ka. Mi aŭdis iam pri tio, sed mi pensis ke mi mem ne bezonas “artefaritan lingvon”.

Tamen, en la jaro 1989, mi aŭdis radioelsendon pri Lazaro Zamenhof, pri lia donaco por la mondo, la “komuna lingvo” kaj pri la terura sorto de lia familio, kiu pereis en la koncentrejoj naziaj. Tiu donitaĵo kortremigis min, mi aĉetis lernolibron, ekzerciĝis kaj partoprenis UK-on en Brajtono (Anglio). Tiutempe mi studis tie, ekde la 14-jariĝo, kun kelkaj amikoj, baha’i-anoj germanaj, kiuj parolis flue esperanton. Estis vere nekredbla sperto kun granda influo al mi, ĉar tiel mi ne nur kunparolis kun la orienteŭropanoj, sed ankaŭ kun la homoj el la tuta mondo.

Oni invitis min partopreni en la internacia ĥoruso kaj tiel mi enamiĝis al esperanto.

Rememorante ke Baha’u’llah, antaŭ cent jaroj, rekomendis al la mondaj registaroj, ke ili elektu komunan lingvon por antaŭenigi la unuecon de la homaro, mi profundiĝis en la studadon de ĉi tiu temo kaj legis, ke la filo, Abdul-Baha, dum siaj vojaĝoj tra Eŭropo kaj Nordameriko, vizitadis ankaŭ la asociojn kaj klubojn esperantistajn, petante samtempe, ke la Baha’i-anoj eklernu la internacian lingvon.

Tiel agis multaj disĉiploj de Baha’u’llah, ekzemple Martha Root, usonanino kiu dediĉis tutan sian vivon al la disvastiĝo de la instruoj de Baha’i. Dum UK en Ĝenevo, ŝi konatiĝis kun Lidia Zamenhof kaj amikiĝis kun ŝi. Poste Lidia estis invitita viziti la Mondan Centron de Baha’i en Haifa, Izraelo, kie en la Sanktulejo de Bab, ŝi forte spirite travivis la etoson kaj komencis kredi al Dio, fariĝante baha’u’llah-anino. Ŝi komprenis ke la noblaj ideoj de ŝia patro Lazaro, esprimitaj en la verko “Homaranismo”, enhavas similajn veraĵojn samkiel en la mesaĝo de Baha’u’llah al la mondo. Tamen, estante dieca profeto, Li, Bahai’u’llah, eldiras tre profundajn veraĵojn kaj pli ĝustajn ol tiuj en la homa filozofio.

Dum miaj vojaĝoj tra Ameriko, Aŭstralio kaj Azio mi ĉiam uzis ambaŭ krurojn miajn: Bahai kaj esperanto. Ekzemple, en Samarkando en 1992 (antaŭ la epoko de la porteblaj telefonoj) mi serĉis kaj trovis Baha’i-centron. Bedaŭrinde tiutage ĝi estis fermita!

Mi telefonis al esperantista amiko, kun kiu ni renkontiĝis en la bazaro kaj li sciigis min pri la loko, kie loĝis baha'ullanoj. Li plue diris, ke la lernokursoj pri Esperanto okazis en la Baha'icentro.

Kelkajn jarojn pli poste, en Pnom Penh (Kamboĝio), mi rimarkis, dum mia biciklado, verdan muron kie oni estis skribinta per grandaj literoj E-S-P-E-R-A-N-T-O.

Tie mi konatiĝis kun instruisto de Esperanto kaj helpis lin dum liaj kursoj.

Ĉie kien mi vojaĝas, mi renkontas homojn kun la sama vizio.

La Tero estas nur unu lando kaj ĉiuj homoj estas ties civitanoj!

Mi estas certa, ke post kiam ni liberiĝos de antaŭjuĝoj kaj establos egalrajtecon inter ĉiuj homoj, finfine ni realigos la unuecon de la homaro, helpe de la komuna lingvo.

En la jaro 1996 mi translokiĝis al Albanio- sed tio estas alia historio..

Heide Martha Otto, julio 2019

Aldonaĵo

Raporto pri la 102-a kongreso de Esperanto en Seulo (22-29an de Julio 2017).

“En Hanoi mi renkontiĝis kun esperantistoj partoprenintaj la UK-on en Seulo. La UK en Seulo okazis en la universitato pri lingvistikaj studoj Hankuk, en bela domo, tre pura, en la sudkorea ĉefurbo.

En la kongreso ĉeestis 1200 homoj el 61 landoj. Tie oni atestis denove, ke Esperanto estas lingvo de amikeco.

Inter la aktivecoj estis ankaŭ tiu kun la temo “La Turismo kaj vojoj de la firma evoluo”. La librofoiro, La Tago de la Lernado, la Esperantologia Konferenco, variaj prelegoj, teatraĵoj kaj kanzonoj, naciaj vesperoj kaj artismaj internaciaj renkontiĝoj, la balo, la Kongresa Universitato, diversaj konkursoj kaj ekzamensesioj, samkiel la fama aŭkcio pri la diversaj objektoj esperantistaj ka.

Ĉi-jare mi estis la sola esperantisto el Albanio, salutparolanta la kongresanojn.

Plaĉis al mi la Korea Kultura Ĉambro, informanta pri la historio, kulturo, muziko, kostumoj, dancoj, produktado de ventumiloj, same pri la skribmaniero korea, genieca Hangulo, kreita dum la XV-a jarcento de la reĝo geniulo Sexhong.

Surprizis min la partopreno en la kurso pri Tekjonin, tradicia korea memdefenda arto, gvidata de bulgarino, kiun delonge mi ne estis renkontinta.

La plej grava evento estis la Ponto-Kunveno pri la Korea unuiĝo. Invitis min dr. So Gilsu, kiu lastjare vizitis Albanion kaj estis akompanita de nia samideano Bardhyl. La diskutgvidantoj kaj entute 16 fakuloj kaj 100 interesitoj, sekvis la diskutojn. Sekvantan tagon ni ĉiuj iris al la parlamenta aŭlo, kie nin akceptis oficiale ties gvidantoj. Salutparolis altrangulaj funkciuloj, kun kiuj ni pridiskutis la ĉefajn punktojn de la enketilo pretigita de Dr. So Gilsu.

Antaŭ tio mi intervjuis kelkajn koreojn pri tiu tikla temo. Ĝenerale la maljuna generacio interesiĝas pri la unuiĝo, dum la junuloj ne, ĉar ili bone scias ke “ili devas pagi por tiu celo”. Ni ĉiuj atendas kiel evoluos tia afero kaj kiam unuiĝos la jam disigita lando.

Kelkaj kongresanoj el Ĉinio kaj Japanio demandis min pri Albanio. Ili miris ke, antaŭ 30 jaroj, Ĉinio kaj Albanio havis similajn eduksistemojn kaj registarojn kaj estis ambaŭ evoluantaj landoj. Sed nun “Kial Albanio ne antaŭeniris samkiel Ĉinio?”

Lastajn kvar tagojn post la solena fermo de la Kongreso, mi vizitis muzeojn, pasigis la tempon kun amikoj el la Baha'i-centro, kie oni organizis ankaŭ la 19-an Festo-Tagon. Je mia miro, ili pretigis tre bongustajn ĉinajn manĝaĵojn, ĉar tiuj koreaj ne taŭgas pro mia eŭpepsio, - ili estas tre akraj kaj spicaj kaj kun multe da viando!

Kiam esperantistoj kunlaboras, la lingvo fariĝas vere internacia kaj unuigas la homojn el ĉiuj landoj- ĝis kiam estiĝos la celo de nia kara Dr. Zamenhof "ĝis kiam la bela sonĝo de la homaro por la eterna bono, realiĝos". Heide Martha Otto, aŭgusto 2017."

7.22 Tonin Ĉobani

Sinjoro Tonin longe instruis en la urbo Lezha, kie li konatiĝis kun la pentro-instruisto Agim Peraj. Plej probable Tonin eklernis esperanton dank'al Agim. Li estas ankaŭ delegito de UEA.



Tonin naskiĝis la 5-an de novembro 1947 en la urbo Shkodra. Ekde longe li doktoriĝis pri beletra kritiko kaj mem verkas ankaŭ. S-ro Ĉobani prelegis en la Universitato de Shkodër, same en privataj universitatoj. Ekde 1998 li vivas kaj laboras en Tiranë kiel ĵurnalisto kaj dungito ĉe AMA (Nacia Konsilio pri Radio kaj Televido). Li estas beletra kaj arta kritikisto kaj historio-beletra esploristo. Tonin okupiĝis interalie pri la renoma poeto albana Gjergj Fishta, historiaj figuroj kiel Lekë Dukagjini, Frang Bardhi kaj Patrino Tereza.

Alia pasio de Tonin estas la muziko (li ludas per muzikiloj) kaj la muzik-komponado. La Nacia Parlamento honoris lin en la jaro 1979 per la medalo "Naim Frashëri". Li akiris beletrajn premiojn ĉe la gazeto "Drita" kaj revuo "Nëntori" en 1976 kaj 1978 respektive, same la premion "Velia" en 1999. Tonin publikigis kelkajn studaĵojn kiel "Kërkime letrare" (Beletraj esploraĵoj) en 1988, "Miti dhe antimiti fishtian" (La mito kaj kontraŭmito fiŝtjana), "Dhjetë esse për Fishtën" (Dek eseoj pri Fishta) en 1999, "Paralele kulturore të një qyteti" (Kulturaj paraleloj de iu urbo), "Artikuj dhe studime të ndryshëm" (artikoloj kaj diversaj studaĵoj) en 2001, "Fishtologji, studime" (Fiŝtologio, studaĵoj) en 2006, "Gjergj Fishta, fillimet letrare" (Gjegj Fishta, beletraj komencoj) en 2017, "Princi i përfolur Lekë Dukagjini" (La pruparolaĉita princo Lekë Dukagjini) en 2013, "Frang Bardhi dhe relacionet e tij" (Frang

Bardhi kaj ties raportoj) en 2006, “Pjetër Zarishi dhe Krijimi i Rrozullimit” (Pjetër Zarishi kaj La Kreo de la Universo) en 2007, “Figurat mitologjike në Lahutën e Malcisë” (La mitologiaj figuroj en la Lahura e Malcis) kaj “Fjalori i Mitologjisë: (La vortaro de Mitologio) en 2012, “Eseistika” (Eseistiko) en 2013, “Gjergj Fishta dhe Kanuni i Lekë Dukagjinit” (Gjergj Fishta kaj La Buša Leğaro) en 2014, “Mitologji shqiptare” (Albana mitologio) en 2017 kaj kelkajn beletraĵojn: “Puthje pa puthje” (Interkisado sen kisoj) en 1996, “Një grua përballë vetvetes” (Virino fronte de si mem” en 1997, “Etikë në prozë, gjashtë triptrikë” (Etiko en prozo, ses triptikoj) en 2002, “Variacione me fjalën komb” (Variaĵoj kun la vorto nacio) en 2004, “Lekë Dukagjini, kështjella e ligjeve” (Lekë Dukagjini, la kastelo de la leĝoj) en 2015, “Legjenda dhe vende shqiptare” (Legendoj kaj albanaj lokoj), kunaŭtoro, en 2015 .

7.23 Bardhyl Adem Selimi



Memoraĵoj de Bardhyl

Bardhyl Selimi

Esperanto en mia vivo

(Memoraĵoj)

Sendube, Esperanto estis unu el miaj plej grandaj pasioj. Estante gimnaziano, mi aŭdis pri ĝi kaj sekvis lernokurson, kiu okazis ĉiun dimanĉon en la kulturdomo "Ali Kelmendi" en Tirana.

Estis decembro 1961. Gvidis la kurson inĝeniero Çefo (Ĉefo) Fico, el Gjirokastër³⁷. Li estis viro prudenta, gaja, senlaca. Kvankam li suferis pro reŭmatismo ĉe gamboj - pro tio li uzis

³⁷ Urbo sude de la lando

bastonon - nenian dimanĉon li mankis. Kun li venis ties pli juna kolego, inĝeniero Vasil Pistoli³⁸



Dum ekskurso al pratempa kastelo de la urbo Shkodër, nordokcidente de la lando kun fremdaj esperantistoj, somere 2001.

Mia samkursano estis s-ro Shaban Hasani³⁹, samaĝulo, tiam lernanto ĉe mezlernejo pri konstruado. Cetere tien venis multaj aliaj civitanoj, inter kiuj ankaŭ s-ro Dilaver, instruisto pri matematiko, blindulo, kondukata ĉiam de kuzo.

³⁸ Poste prezidanto de la Albana Esperanto Asocio

³⁹ Aktuala prezidanto de AEA



Mi kaj Shaban, lastjare

La kurso daŭris tri monatojn. Ni uzis poŝlibreton nomatan "Ŝlosilo de Esperanto". Verŝajne tiaj libretoj estis eldonitaj en multaj mondaj lingvoj kaj helpis notinde por lerni Esperanton, ankaŭ dum vojaĝoj. "Ŝlosilo" por albanoj estis pretiginta mem s-ro Fico. Dum la 1920 - jaroj li studis en Italio, kie li ankaŭ ellernis Esperanton.



Dum lernokurso kun blindaj kaj duonblindaj lernantoj en Tirana, jaro 2003

Esperanto ege altiris min, ĉar ĝi estis konstruita laŭ fiksjaj reguloj, simile al matematiko, sen esceptoj.

Ekzemple, la nomoj finiĝas per "o", krom en akuzativo per "n", kiel en la albana.

"Urbo" - "urbon"; "Mano- manon" ka.

La adjektivoj finiĝas per "a": urba- libera- forta" ka.

La derivitaj adverboj finiĝis per "e", "bone- rapide- escelente", ka.

Se ni aldonas ĉe vortoradiko "et" ni reduktas la dimensiojn: "urbeto- libreto-knabeto" ka. Kontraŭe, per "eg" ni pligrandigas dimensiojn: "urbego- bruego- pordego" ka.

La sufikso "ar" formas tuton de elementoj dum la sufikso "er" montras elementon: "arbaro- kamparo, soldataro" kaj "sablero-pluvero-programero" ka.

Per "an" ni montras partoprenanton de tuto: "urbano- partiano", ka; per "estr" oni notas ĉefon: "urbestro- partiestro" ktp.

La nomoj ne posedas sekson, krom se temas pri animaloj (homoj kaj animaloj). Tial "ŝranko, tablo, ĉielo, tero " ne havas sekson kiel en iuj naciaj lingvoj, inkluzive la albanan.

Sed "patro- patrino", "knabo-knabino", ĉevalo- ĉevelino" montras viran kaj inan sekson, respektive. Tion certigas la sufikso "in".



Mi kun du junaj esperantistoj el Hungario kaj Litovio, jaro 1991

Do, ne necesas parkerigi inajn nomojn. Simile okazas kun antonimoj, kiuj formiĝas per la prefikso "mal": "bona- malbona, bela- malbela, alta- malalta"ka.

Se ni uzas sufikson "id" ni obtenas "bebon". Tiel "ĉevalido- hundido- homido", kio ankaŭ en la albana postulas apartajn vortojn por parkerigi..

La sufikso "ist" montras profesion: "muzikisto- sportisto- instruisto- ŝuisto" ka.



Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto

Tuto lernata de ni ŝajnis vera miraklo. Ĉar en la lernejo ni studis paralele almenaŭ du fremdajn naciajn lingvojn, la anglan kaj la rusan kaj bone sciis, kiom malfacilaj ili ja estis. Ĉar ĉiuj naciaj lingvoj, kvankam ili havas siajn internajn leĝojn, ĝenerale entenas multajn malregulaĵojn, havas multajn idiomojn, milojn da prefiksoj, sufiksoj, finaĵoj lernendaj parkere kaj prave aplikendaj, por ke ni povu asimili ilin iel. Tial estas ja raraj la personoj, kiuj parolas flue la lernitajn fremdajn lingvojn.

Esperanto estis proponita kiel internacia helplingvo, ĉar ĝi estis neŭtrala, proprajo de neniu specifa popolo kaj simpla, natura, ĉar ĉiujn siajn radikojn ĝi ricevis el la ekzistantaj lingvoj (ĉefe eŭropaj, plie latinaj) kaj fonetika. Tial ĝi supervivis (ekde ties kreiĝo en la jaro 1887 fare de s-ro Ludoviko Zamenhof).

Ĝus fininte la kurson, ni ekkorespondis kaj legis revuojn alvenintajn tiutempe el Ĉinio, Vjetnamio, Laoso, sed ankaŭ el Eŭropo. Certe, nia vortorezervo komence estis malriĉa, tial la enhavo de niaj leteroj estis nek longaj, nek profundsencaj, kun gramatikaj eraroj, sed ne pli multe ol kiam ni korespondis ruslingve kaj anglalingve.

La revuoj "El Popola Ĉinio", "Vjetnamio antaŭenmarŝas", diversaj broŝuroj kaj verkoj de Maŭ Ze Dong, Ho Ŝi Minh, same la revuo "Esperanto" de la Tutmonda Universala Esperanto-Asocio (UEA), centre en Roterdamo (Nederlando), la "Jarlibro" de tiu asocio, kie aperis ankaŭ mia nomo, tenadis min ligita kaj en kontakto kun la mondo de la esperantistoj.

Tiun pasion mi daŭrigis ankaŭ en la universitato varbante ankaŭ miajn kolegojn- studentojn. Sed pli poste, kiam la klasbatalo akriĝis ene de lando kaj kontaktoj kun fremduloj vidiĝis suspekteme, mi ĉesigis korespondadon, por rekomenci ĝin post la jaro 1990.

Mi memoras, ke tiutempe, antaŭ 1990, mi kunlaboris multe kun s-ro Gafur Muĉo, esperantisto, kiu daŭre korespondis kun samideanoj el diversaj landoj de la mondo. Mi vizitis lin hejme kaj legis leterojn alvenintajn al li, same mi travidis diversajn poŝtkartojn kaj librojn liajn. Gafur deĵoris ĉe biblioteko de la Ministrejo pri Konstruado. Jarojn poste oni maldungis lin, probable ankaŭ pro liaj rilatoj al eksterlandaj esperantistoj, ĉar similajn ĝenojn havis ankaŭ s-ro Vasil Pistoli, al kiu oni neniam permesis vojaĝi esksterlanden por sia laboro.



Sur la foto: Ibrahim Xhamaj, Enkela,(ties filino), Rita Përmeti, Gafur Muĉo kaj mi, antaŭ pli ol 25 jaroj.

S-ro Ĉefo Fico estis tro maljuna, sed li havis amikecon kun politburoisto Spiro Koleka, same esperantisto. Ĉe inĝenieron Ĉefo, kiu loĝis en la "strato de Durrës", ne fore de mia hejmo, mi iris ofte por vizito, li donacis al mi diversajn revuojn kaj babilis kun mi elkore.

En la jaro 1967, inĝ. Vasil Pistoli tradukis en esperanton koncizan biografion de Gjergj Kastrioti- Skënderbej⁴⁰, kompilitan de Kristo Frashëri. Gafur eldonis ĝin. Sed baldaŭ, laŭ ordono de kompartia aŭtoritatulo, oni devis forsendi la libron por kartoniĝo, kvazaŭ ĝi estus "malpermesita libro". Verŝajne oni estis leginta pri tio okazinta en eksa Sovetunio aŭ Nazisma Germanio al esperantistoj, kie pluraj estis persekutitaj kiel "spionoj" de Okcidento. Ulrich Lins estas verkinta interesan monografion kun la titolo "La danĝera lingvo", ĝuste pri tiu temo.

⁴⁰ Albana nacia heroo



Oni produktis ankaŭ turisman dokumentaran filmon pri la muzea urbo de Gjirokaŝtër kun esperantista ĉiĉeronado, kiun mi jam spektis en nia ŝtata filmejo en Tirana.

Gafur, printempe 1991, renkontis min kaj sciigis, ke li jam fondis "Albanan Esperantistan Ligon" AEL. Antaŭe, li partoprenis en la grupo, kiu fondis Respublikecan Partion, tial mi vidis lin televizie dum renkontiĝoj kun la tiama komunista prezidento Ramiz Alia, sed baldaŭ oni estis ekskludinta lin disde tiu partio.

La novaĵo pri Albana Esperantista Ligo ekĝojigis kaj aktivigis min tuj. Mi malfermis lernokurson kun kolegoj kaj lernantoj en la elementa lernejo de Mushqeta⁴¹, kie mi instruis matematikon kaj entreprenis la ligan taskon de korespondado kun eksterlando. Tiutempe oni

⁴¹ Loĝloko je 22 km sude de Tirana



sendis al ni senpage multajn revuojn kaj librojn. Estis bone por ni, ke Albanio enlistiĝis en la Tutmonda Esperantista Movado, eĉ pro la fakto ke Albanio komenciĝas per A, inter la unuaj.

Alvenis tre interesa libro kun filozofia enhavo, verkita de la germano Bruno Vogelmann, kun la titolo "La Nova Realismo". Mi tralegis ĝin kaj proponis al la aŭtoro, ke ni enalbanigu ĝin. La aŭtoro konsentis kaj s-ro Vasil eklaboris. Post unu jaro la libro eldoniĝis.



Mi kun profesoro Vasil Pistoli kaj s-ro Shaban Hasani

Pli poste mi daŭrigis la korespondadon kun tiu ĉi viro, serioza, studema, klera, kun tre interesa pasinto, eksa politika prizonulo en naziaj koncentrejoj, kiu eĉ 93-jara karakteriziĝis je klara pensado.



Ing. Vasil Pistolo kompilis ankaŭ tre bonan lernolibron pri esperanto por albanoj akompanatan de kvinlingva vortaro, laŭ la modelo de la unua libro pri esperanto de Zamenhof. La libro rapide vendiĝis.

Reveninte por instrui en Tirana, en profesia mezlernejo de periferia suburbo, mi malfermis ankaŭ tie lernokurson. La gelernantoj fondis junulan societeton, kiun ili eĉ baptis per tre simpatia nomo "Junesp" kaj ili interrilatis kun similaj organizaĵoj eksterlande.



Dum ekskurso kun lernantoj al urbo Durrës


Somere, en 1992, 18 el ili kaj junuloj el Durrës, kie aktivis s-ro Luan Jaupi, entreprenis vojaĝon al Bulgario, al Vraca, kie ilin atendis s-ro Ljubomir Trifonĉovski (jam forpasinta).



Dum iujunulara kunveno en Durrës, 1993

Gafur estis en kontakto kun bulgaraj esperantistoj, li interŝanĝis vizitojn kun ili. Ankaŭ mi renkontiĝis kun ties prezidanto, en Tirana, s-ro Petar Todorov, mi eĉ gastigis lin por tagmanĝo en mia hejmo. Alvenis esperantistoj ankaŭ el aliaj landoj. Mi memoras pri norvego, kiu estis helpinta sian amikon funkciigi, ankaŭ en Albanio, rapidan marŝiparon "La Vikinga". Li proponis al ni organizi en Tirana internaciajn kunvenojn.

En la jaro 1993, s-ro Zef Mjeda, instruisto, esperantisto el la urbo Shkodër, samaĝulo de Vasil Pistoli, eldonis alian lernolibron pri esperanto-instruado, kompletigitan per bonega vortaro albana-esperanta kaj esperanta-albana. Zef estis plenuminta kolosan laboron por esperanto. Tiel li estas kompilinto de granda vortaro albana- esperanta- itala. Li tradukis en esperanton tutan ciklon pri bravuloj kaj ankaŭ popolajn albanajn fabelojn. Tiutempe li verkis regule por internaciaj revuoj.



La nederlanda esperantisto Jacques Tuinder dum vizito al Zef Mjeda, tiam grave malsana

Mi bedaŭris, ke en la jaro 1995, Zef publikigis en la ĵurnalo "Rilindja Demokratike" fiartikolon pri mi kaj Vasil, nomante nin "komunistaj esperantistoj". Kial li faris tion? Laŭ mia opinio, pro ia envieco, kiu kaptas foje eĉ elstarajn homojn, pensantajn ke oni estas preterlasanta ilin aŭ subestimanta ilin. Pli poste li pentis serioze pro tiu senmorala ago, nebazita.

Zef estas mortinta antaŭ multaj jaroj, mi ĉeestis lian entombigon kaj vizitis liajn kunfamilianojn kelkfoje. Bedaŭrinde lia verkaro ankoraŭ ne estas publikigita, ĉar la edzino Anjeze, jam forpasinta, hezitis senbaze kaj poste komisiis tiun taskon al persono ne rilatanta al esperanto, David Luka, kvankam universitata profesoro.

En la jaro 1993 Gafur troigis per siaj nekorektaj kondutoj (li misuzis nian asocion pro personaj materiaj profitoj). Tiam nia anaro kunvenis en Lezhë, urbo apud Shkodër kaj elektis novan prezidanton, s-ron Vasil Pistoli (estraranoj: Agim Peraj-instruisto, Luan Jaupi - teknikisto, Gjergji Gusho- instruisto, Rita Përmeti- ekonomikisto kaj mi- instruisto). Ekde tiam, plivigliĝis la agado de nia asocio.

Nian laboron ni bazigis sur du kampojn: lernokursoj kaj propagando per amaskomunikiloj kaj elektronika medio. Tiel ni starigis kursojn en universitato, en tutlanda fremdlingva mezlernejo "Asim Vokshi", en la pedagogia mezlernejo kaj, kompreneble, ankaŭ en la lernejoj, kie ni mem instruis (Tiranë, Lezhë, Durrës, Kukës, Pogradec).



Lernokurso en la tutlanda teknologia kaj turisma mezlernejo . Grupo de unua lernokurso en Durrës

Pli poste ni starigis lernokursojn ankaŭ en la elementaj lernejoj.

Mi memoras niajn universitatajn studentojn ĉe la Filologia kaj Historia Fakultatoj. Estis dum la komenco de la jaro 1993 kaj albanoj ankoraŭ soifis je vojaĝoj eksterlanden. Tiel esperanto estis por ili ankaŭ ia rimedo por ĝui tion. Ni dividis ilin en du grupojn kaj eksinstruis Vasil kaj mi. Fine restis 22 studentoj, kiuj akiris atestilon pri la unua nivelo.

En la gimnazio "Sami Frashëri", apud la urbocentro, tiun posttagmezon la aŭlo plenŝtopiĝis de studentoj. Sed, kiel tio okazas ofte, fine akiris la atestilon nur 15 studentoj. Unu el ili, atestanto de Jehovo, rifuzis ricevi atestilon, ĉar tio, laŭ li, kontraŭstaris lian kredon!?

Somere 1995, 12 el tiuj studentoj ekskursis al Zagrebo (Kroatio), invititaj de tieaj junaj esperantistoj, gviditaj de fraŭlino Marija Beloŝeviĉ. Tie ili reekzameniĝis akirante plian atestilon.

Jaron poste, mi mem akompanis grupeton de miaj studentinoj dum ekskurso al Zagrebo, kie ni pasigis agrablan semajnon.



Sur la vojiro Durrës- Ancona- Split kaj revene. En la gimnazio "Gjergj Kastrioti- Skënderbej" Durrës

Ĉi-okaze ni konatiĝis ankaŭ kun albana komunumo loĝanta kaj laboranta en Zagrebo. Fraŭlino Marija vizitis Albanion en la ŝtorma politika printempo 1997 kaj aranĝis ekspozicion en Tirana.

Simpatia kurso estis malfermita ĉe privata firmao, "Karajani", kie mi deĵoris kiel tradukisto dum posttagmezoj. Partoprenintoj estis civitanoj de diversaj aĝoj kaj profesioj. Kelkaj el ili fariĝis veraj esperantistoj (Zamir Gjurgji, Saimir Beqiraj ka).




Zamir Gjurgji

Dum lecionhoro pri esperanto en Durrës

Kun miaj studentoj en la profesia mezlernejo, je la periferio de la ĉefurbo, ni aranĝis ankaŭ kunvenojn komunajn kun la junaj esperantistoj de la urbo Durrës. En unu el ĉi tiuj kunvenoj partoprenis ankaŭ elstara svisa esperantisto, s-ro Andy Kuenzli kaj bulgara esperantistino.

Nia asocio kreis instruistan fakon, kiu membriĝis ĉe ILEI. Tri inter niaj junaj esperantistoj (Mimoza Bunjaku, Majlinda Grashi kaj Zamir Gjurgji) partoprenis trisemajnan seminarion en Svisio, sponsoritan de ILEI. Majlinda estis tre aktiva en Durrës, sed edziniĝinte, ŝi ĉesigis la rilatojn kun nia movado.

Mi kaj Vasil intervjuiĝis dum tridek minutoj ĉe la ŝtata televido (1996), kie ni prezentis argumentojn favore kaj kontraŭ esperanto. Intervjuo organiziĝis ankaŭ ĉe albana nacia radio. Same oni publikigis artikolojn por landaj ĵurnaloj. En la sindikata semajna ĵurnalo "Pasqyra", dum 13 numeroj, ni konatiĝis la legantojn kun elementa kurso de esperanto.



Dum intervjuado en ŝtata televido, 1996. Propaganda aktiveco en Durrës, 1994

Post kelkaj jaroj s-ro Vasil petis rezignon de sia posteno pro translokiĝo al Usono ĉe sia filo. Nova prezidanto elektiĝis, s-ro Agim Peraj, instruisto pri pentroarto, delonga aktivisto kune kun sia frato Bahri Peraj.



Bahri Peraj, Agim Peraj kaj Luan Jaupi (1991) (1992)

Kafejo "Esperanto" sur plaĝo de Durrës

Bedaŭrinde la agado de la asocio ekstagnis, krom tiu de la instruista fako, kiu eldonis regulan bultenon, komence surpapera, poste elektronika. En la jaro 2013 (februare) nia asocio registriĝis ĉe Tirana juĝejo kaj aliĝis oficiale al UEA. Nova prezidanto elektiĝis, s-ro Shaban Hasani, inĝeniero pri konstruado.

Aldone al malmultaj membro-kotizoj, notindan helpon donis al nia asocio fremdaj amikoj esperantistaj.



Mi kaj Luan Jaupi en 2018

Menciindas la membriĝo de germandevena esperantistino, s-ino Martha Heide Otto⁴².



Mi kun Martha kaj s-ro Astrit Leka., 94-jara, esperantisto el 50-aj jaroj, (2018)

Dum tiuj ĉi jaroj ni instigis junulojn partopreni en la internaciaj renkontiĝoj en Eŭropo, en konferencoj kaj kongresoj de UEA, TEJO, ILEI, eĉ en la religiemaj fakaj societoj esperantistaj. Grandan helpon donis al ni nederlanda esperantisto, s-ro Jacques Tuinder, fondinta bonfaran organizaĵon EVIDENTE, precipe por blinduloj ĉie en la mondo.



"Evidente" kontribuis notinde ankaŭ en Albanio, almenaŭ ekde jaro 1997. Ĝi provizis la porblindulan Instituton en Tiranë per literaturo en Brajlo, per skribmaŝinoj, komputiloj, same por rekonstruiĝo de internulejo, klasĉambroj ks, investinte ĉirkaŭ 500 mil eŭrojn!

⁴² Martha aktiviĝas ankaŭ en Baha'i-asocio



Kun s-ro Jacques Tuinder en la franciskana preĝejo en Shkodër dum la jaroj 2000. Gafur Muço, Janko Pali, Marcel Cortriade kaj Luan Jaupi en Tirana (1991)

Post la jaro 1999 mi kompilis lernolibreton pri esperanto (la kvina laŭvice en Albanio, post Vasil, Zef, Gjergji kaj Agim), ĉar la unuaj metodoj elĉerpiĝis. Mi dissendis lernolibretojn ankaŭ al Kosovo, tuj post ties liberiĝo, somere 2000. Por eldono helpis italaj esperantistoj (persone s-ro Renato Corsetti). Novembre 2004 aperis regula lernolibro mia, kun la titolo "Ĉu vi parolas esperanton?".



Lernolibro. Luan Jaupi en la vilaĝo Qeparo kun nia elstara malnova esperantisto Janko Pali (1992)

Tre utila agado nia estis la kunlaboro kun la turisma organizaĵo "Monda Turismo", en Bydgoszcz (Pollando) kaj AIS. S-ro Andrzej Grzebowski ofertis al ni akcepti studentojn el Albanio por "Altlernejo pri Turismo kaj Internacia Kulturo" starigita de li tie, ekde la jaro 1991.



S-ro. Grzebowski mortis rn 2014 dum UK en Buenos Ajres. Jen en Bydgoszcz.

Tio realiĝis dum la somero 1997, tuj post la tragikaj okazintaĵoj en Albanio pro la tiel nomataj financaj fibankoj "Ponzi". Multaj junuloj, abiturientoj, esprimis sian deziron aliĝi. La unua grupo de 15 personoj komencis studojn en Bydgoszcz, sed bedaŭrinde plimulto el ili forlasis la lernejon, pro seniluziiĝo. Ilia celo estis elmigri okcidenten. La duan grupon el 15 studentoj akompanis mi mem, septembre 1998 kaj mi restis kun ĝi unu semajnon.



Foto farita en la aeroporto de Tirana, antaŭ ekflugo

Same, post unu jaro, iris al Pollando la tria kaj kvara grupoj kun malpli da studentoj. Entute bakalaŭriĝis 25 studentoj, el kiuj du magistriĝis.



Mi kun grupo de polaj kaj albanaj gestudentoj en Bydgoszcz

Por iliaj diplomoj la studentoj elektis temaron el Albanio: kulturo, arkeologio, turismo, historio. Tiel, tra esperanto, Internacia Akademio de Sciencoj AIS, kiu liveras diplomojn, diskonigis Albanion en la mondo, laŭ aspektoj kulturaj- turismaj.



Kun skota esperantisto s-ro David Kelso en la kastelo de Kruja, 2004

Sugestite de la nederlanda esperantisto s-ro Jacques Tuinder, mi instruis IL kelkajn longajn jarojn en la Instituto por Blindaj Gelernantoj en Tirana, ĉar tiu lingvo estas pli facile lernebla de ili.



Unu el lernantinoj nun deĵoras en la urbodomo de Tirana. Gelernantoj sekvis ankaŭ radioelsendojn de Pekino en Esperanto!




Blindaj kaj duonblindaj gelernantoj



Jacques Tuinder honirita per Medalo de Dankemo de nia prezidento Alfred Moisiu

Por mi estis tre alloga la agado de OSIEK (Organizaĵo de Sciencaj Internaciaj Konferencoj). Tie oni povas prelegi en esperanto pri diversaj sciencaj temoj. Komence mi estis invitita en OSIEK- konferenco en Rafina- Grekio en la jaro 1997. Sed mi ne sukcesis akiri vizon. Somere 1998 la konferenco okazis en Trieste (Italio). Mi partoprenis ĝin. Mi vojaĝis kun mia edzino per pramsĝipo ĝis Ancona kaj poste trajne al Perugia, kie studis miaj filoj.



En Trieste kun la franca esperantisto Eric Laubacher

Mia temo estis "Iliroj⁴³ en la Romia Imperio". Mi parolis pri kontribuo de iliroj kaj ilia vivo en la romia imperio. Komprenoble mi tuŝis ankaŭ problemon de albanoj ekster Albanio kaj la rajton de albanoj de Kosovo por sendependeco.



Mi kaj mia edzino Vjollca dum marvojaĝo kaj en Perugia, Umbria, Italio

Tri jarojn poste mi partoprenis denove konferencon de OSIEK en Trieste, akompanate de mia koleginino de beletro, s-ino Xhuma Ĉupa, kiu prelegis pri "Ciklo de Bravuloj ĉe albanoj, slavoj kaj grekoj". Mi prelegis pri historio de albanoj.




En esperantista klubo en Trieste. Dekstre s-ino Xhuma Ĉupa.

En la jaro 2005 la kuranta konferenco de OSIEK okazis en Rafina denove, sed la grekaj kolegoj rifuzis akcepti min. Edukitaj, ekde infanaĝo, per ŝovinismaj ideoj ili ne povis aŭdi pri albanoj kiel egalrajtaj dum historia evoluo, aŭtoktonaj en siaj teroj, ne malpli antikvaj ol la grekoj mem...

Mi atendis la someron 2006 por partopreni sekvan konferencon en Timiŝoara, Rumanio. Dum halto en la stacidomo de Belgrado mi renkontis du serbajn renomajn esperantistojn, Tereza Kapista-n kaj Dimitron. Mi prelegis en Timiŝoara pri "Albanoj inter Okcidento kaj Oriento".

⁴³ Antaŭintoj de albanoj




En Timișoara



En la stacidomo de Belgrado kun serbaj samideanoj kaj en Timișoara kun italaj kaj francaj profesoroj

Samjare, juliofine, mi partoprenis la UK-on en Florenco. Estis eksterordinara sperto. Mi akompanis du blindulinojn, sponsorizitajn de la fonduso EVIDENTE, estrata de s-ro Tuinder. Mia pli aĝa filo venis al Florenco por renkonti min.




En Florenco kun mia filo kaj du albanaj esperantistinoj

Septembre 2007, mi akompanis denove grupon de studentoj al Bydgoszcz, Pollando.



En Bydgoszcz kun niaj studentoj kaj en la centro de Varsovio

Pro mia kunlaboro kaj helpo per prelegoj kaj artikoloj pri la albana kulturo kaj turismo, la altlernejo de Bydgoszcz liveris al mi du diplomojn.



Miaj diplomo kaj Dankletero

Somere 2008 mi partoprenis en la UK en Roterdamo (Nederlando) kun mia edzino. Denove sponsoris nian vojaĝon s-ro Tuinder.



En Roterdamo, parolante pri sendependeco de Kosovo kaj en la granda salono de la Kongresejo

Somere 2010 mi partoprenis konferencon en Karlovo, ĉerande de la montoj Balkan, Bulgario, organizitan de s-ro Boĵidar Ivanov. Mi ekkonis Boĵidar-on en Bydgoszcz, kie li prelegis ankaŭ por nia studentoj. Li estis prudenta, klera, modesta viro. Tre dediĉita al esperanto. Mi memoras ke, iutage, Boĵidar prelegis pri la alfabeto de la bulgara lingvo. Kiam li menciis la literon "ë" li diris ke "probable ni bulgaroj luprenis ĝin de albanoj".



En Bydgoŝcz

Kelkfoje Boĵidar petis, ke mi vizitu lin en Karlovo, kie li estis stariginta privatan universitaton en vilao bela kun granda korto kaj dormejoj. Mi revizitis lin en 2011 kaj estis ravita de pitoreska urbo kun orienta arkitekturo, kun pavimitaj stratoj, kun restoracioj en la kortoj de privataj domoj, plenaj je verdeco. Boĵidar organizis tie sesiojn de AIS, kie partoprenis profesoroj esperantistaj el diversaj landoj. Ankaŭ mi prelegis du fojojn, pri "Interrilato Matematiko- Filozofio" kaj "Amuza momento en la lecionhoro de matematiko".



Maldekstre, Boĵidar Ivanov. Dum vizito al Karlovo


Oktobrofine 2010 oni invitis min al Sarajevo (Bosnio) okaze de internacia konferenco pri la defioj de eŭropa integriĝo, organizita de tieaj esperantistoj, kie mi prelegis pri la temo " Kion povus kontribui albanoj al Eŭropa Unio".

Aprile 2011 mi estis invitita de esperantista asocio de la regiono Elzaso-Loreno, Francio, por prelegi pri "Turismaj Aspektoj de Albanio". Mia gastiganto, s-ro Edmond Ludwig, akompanis min dum vojaĝoj tra Elzaso-Loreno, inkluzive de Strasburgo, kie mi same prelegis por klubanoj kaj studentinoj studintaj pri Albanio.



En Elzaso- Loreno, prelegante pri Albanio

La revuo MONATO, kies korespondanto mi estas ekde la jaro 1991, motivigis min konatiĝi kun araba esperantisto aĝula, kies vivhistorio estis tre interesa. Estinte juna, en 1967, Husaain Al-Amily ege aktivis en la esperantista movado, li ankaŭ kunlaboris kun la londona Esperanto-Klubo.



S-ro Hussain Al - Amily kaj lia libro en la albana

Lia patro estis libanano kaj la patrino irakanino. Mem Hussain laboris multajn jarojn en Irako dum la periodo de la regado de Sadam Husejn. Tie li manaĝis propran komercan entreprenon en malfacilaj kondiĉoj. Oni enprizonigis lin dum du monatoj. Ĝuste tiun vivoparton li rakontis en la libreto "Prizona taglibro" kiu ilustris la veran etoson de la reĝimo. Sed min pli allogis alia, pli volumeca libro lia, "TREZORO". Temis pri proverboj kaj saĝaj anekdotoj arabaj. Mi proponis al li, ke la libron mi enalbanigu. Hussain konsentis, li eĉ pagis la koston por 500 unuaj ekzempleroj, eldonitaj de 'Univers', de la Albana Instituto pri Pensado kaj Civilizo Islama. Nia korespondo daŭris ĝis lia forpaso.



Familiaj fotoj de Hussain Al-Amily

Mia laboro pri tradukado

Tradukoj el la albana al esperanto kaj inverse estis multaj post la jaro 2000. Popoloj parolantaj "grandajn lingvojn" (angle, hispane, ruse, france, germane ka) kaj loĝantaj en ŝtatoj ekonomie kaj politike fortaj, ne sentas multe bezonon por tradukaĵoj el alilandaj literaturoj. Ili facile povas trovi necesajn teknikajn informojn aŭ alispecajn librojn en sia lingvo.

Ni, albanoj, kvankam ni iam, laŭdire, estis granda popolo. ege bezonas tradukaĵojn el aliaj "grandaj" kaj "negrandaj" lingvoj, ĉar la kultura riĉaĵo de la homaro estas multvaria. Miloj da novaj librotitoloj, prezentitaj en niaj librofoiroj, estas plejmulte tradukaĵoj el fremda literaturo.


Ĉu facilas traduki? Certe ne! Posedi kvalite fremdlingvon postulas milojn da studhoroj, same babilan praktikadon en lando, kie oni parolas ĝin. Tial la bonaj tradukoj estas malmultaj, precipe tiuj de beletro.

Dum miaj universitataj studoj estis necese traduki diversajn lernotekstojn pri matematiko kaj fiziko el la rusa kaj la angla, lingvoj kiujn ni komencis lerni ekde kiam ni estis dekdu-jaraj.

Sed ankaŭ pli poste, kiam mi eklaboris, mi daŭrigis traduki filozofiajn, sciencajn artikolojn, mallongajn rakontojn, certe uzante vortaron. Pli malfacile estas traduki el la albana al aliaj lingvoj.

Konatiĝinte kun la helplingvo esperanto, kiel 16-jarulo, mi havis plian oran eblecon por tradukoj el tiu lingvo, kiu, pro ties strukturo, estas almenaŭ dekfoje pli facila ol la gepatraj lingvoj. Tial mi sukcesis enalbanigi kelkajn librojn ekde esperanto.



Mi komencis kun la libro "La Faŝismo" de s-ro Zhelju Zhelev, eksa unua demokrata prezidento de Bulgario (1992-1997). La libro eldoniĝis laŭ permeso de la aŭtoro. (jam forpasinta).



Mi daŭrigis kun alia libro pri "Balkana Kuirejo" verkita de mia bulgara amiko kaj kolego Petko Arnaudov, (same jam forpasinta). La libro havis tri sinsekvajn eldonojn.

Poste mi eldonis la libron "Anekdotoj kun elstaraj homoj" surbaze de libro de la pola amiko, Andreo Pettyn.


Kun granda plezuro mi enalbanigis el esperanto-versio, biografian libron pri Gjergj Kastrioti-Skënderbej⁴⁴, verkitan kaj eldonitan de albana esperantisto Cuk Simoni en la jaro 1929. La libro estis tiam dissendita tra la tuta esperantista mondo.



La libro de Cuk Simoni kaj la poeziaĵo de Eqrem Basha



Helpe de pola esperantisto, s-ro Tomasz Chmielik, (je amika moknomo "Tradukmaŝino"), mi ektradukis romanojn de la moderna albana beletro. Tomasz estis enesperantiginta el aliaj eŭropaj lingvoj kelkajn romanojn de Ismail Kadare, Fatos Kongoli, Ylljet Aliĉka kaj poeziojn de diversaj albanaj aŭtoroj (Ali Podrimja, Luljeta Lleshanaku, Eqrem Basha). Mi helpis per komparo kun la albana originalo kaj diversaj notoj.

⁴⁴ Albana nacia heroo, 1403-1468)




La libro "Hunda Haŭto" de Fatos Kongoli kaj poezioj de Luljeta Lleshanaku

Mi tradukis la novelon "La Polino" de Bajram Karabolli kaj romanojn de Fatos Kongoli: "La Kadavro", "Ebura Drako", poeziojn de Sali Bashota "La ŝtono de la amo". "La Polino" kaj "La Ŝtono de la amo" estas eldonitaj jam.



Anekdotoj kaj Ŝtono de Amo

Lastatempe eldoniĝis la romano de Luan Starova "La Tempo de Kaprinoj"



Estas tutpreta por eldono la romano "La Perdinto" de Fatos Kongoli, same poeziaĵoj de Ali Podrimja.

La postuloj por bonkvalita traduko instigis nin peti helpon de provlegantoj inter renomaj esperantistoj. Tial atendas eldonon romanoj de Adem Demaçi "Sangovenĝaj serpentoj" kaj "Patrino Shega kaj kvin knabinoj", poeziaĵoj de Mimoza Ahmeti, Flora Brovina, rakontoj de Adil Olluri.

Dum kelkaj aliaj romanoj de Ismail Kadare (Palaco de Songoj, Generacioj de Hankonatoj, Posteulo, Generalo de mortinta armeo ka) ankoraŭ ne aperis pro problemoj de aŭtora rajto. Administras du fremdaj kompanioj, kiuj prizorgas la eldonojn fremdlingvajn de la verkaro de Ismail.

Kiel vidite, esperanto estas absorbinta de mi konsiderindan parton de energio kaj tempo. Mi eĉ povas diri, ke ĝi estis kialo de multaj "kvereloj" kun mia edzino, kiu opiniis mian okupiĝon per esperanto senprofita. Ankaŭ mia patro, jam forpasinta, ne konante la veran valoron de IL, dubis pri mia agado.




Mi kun fremdaj esperantistoj en la Bazaro de Kruja, somere 2001

Tamen mi estas konvinkita je la utileco de IL, same kiel miloj da aliaj antaŭ mi ĝis hodiaŭ, konsiderante esperanton tre racia, praktika kaj utila por la solvo de komunikaj problemoj intertnaj en Eŭropo kaj en la mondo.

Bardhyl Selimi, oktobro 2018

7.25 Artur Doçi



Arturi majtas

Kiam mi instruis en la mezlernejo pri konfekciaĵoj kaj teksaĵoj en la suburbo de “Kombinat” en Tirana (nun

administra subunuo n° 6 de Tirana) dum 1991-1993, unu el miaj esperanto-kursanoj sciigis min pri Artur, sia kuzo, lerninta la internacian lingvon en sia vilaĝo Rrenz en la distrikto de Dibra, nordoriente de Albanio. Ĉiun tagon, la juna paŝtisto Artur lernis dek novajn vortojn. Poste Artur alvenis mem kaj renkontis min kelkfoje, aparte kiam li enskribiĝis kiel studento ĉe la Fakultato pri Informadiko. Baldaŭ Artur fariĝis unu el la plej bonaj inter niaj junaj kaj kvalitaj subtenantoj en la klopodoj por disvastigi esperanton en Albanio. En la jaroj 2000 li mem pretigis eĉ diĝitan lernokurson pri esperanto de 20 lecionoj kun teksto voĉlegata sur KD.

Nia asocio sendis lin al la junulara esperantista konferenco en Germanio. Finstudinte en Tirana, Artur trovis eblecon, helpe de germana esperantisto, por labori en Germanio kaj poste en Aŭstrio, kie li fondis ankaŭ sian familion kun albana junulino. Li havas filon.

Jen kion li skribas en la revueto “Albana Esperantisto” (1993):

“ Jen mi skribas en esperanto. La izoliĝo de Albanio estis granda obstaklo por disvastigi esperanton en nia lando, ĉar la korespondado kun la fremduloj, inkluzive de esperantistoj, renkontiĝo kun ili, partopreno en la internaciaj aktivecoj, estis malebla.

Dum la 60-aj jaroj oni faris kelkajn paŝojn al la instruado de esperanto. En la lernokursoj partoprenis ankaŭ mia patro, tiam studento. Li alportis al mi ekzempleron de la Ŝlosilo de Esperanto, vekante en mi ties junulan revon, ne realigita, sed tre bela.

Pli poste mi bonŝancis, ekhavi kelkajn numerojn de la revuo El Popola Ĉinio. Ankoraŭ etulo, mi komencis esperi, ke iutage mi renkontos veran albanan esperantiston. Ĉi tio realiĝis, kiam fondiĝis Albana Esperanto-Asocio”

Bedaŭrinde Artur de longa tempo ne skribas al ni kaj konsekvence ne plu kontribuas al nia enlanda movado.

7.26 Sajmir Beqiraj



Kiam Sajmir estis studento pri biologio en la Fakultato pri Naturaj Sciencoj, li partoprenis la lernokurson ĉe la Fakultato pri Fremdlingvoj, malfermitan en la jaro 1993. Li sekvis ankaŭ la duan nivelon de la lernokurso. Sajmir kontribuis al la pliriĉigado de la vortaro albana-esperanto per terminologio el la kampo de zoologio, botaniko kaj aliaj biologiaj sciencoj.

En la jaro 2013 Sajmir estis unu el kvin esperantistoj, kiuj subskribis la novan Statuton de nia Asocio kaj la fundamentan deklaron ĉe la Juĝejo de Tirana, kiu agnoskis oficiale nia Asocion. Li estas delonge delegito de UEA.

Prof. Dr. Sajmir Beqiraj estas aktuale lektoro kaj personeco de la katedroj de hidrobiologio, akva ekologio, mara biologio, metodologio pri la studado de la faŭno. Li portas la titolon de profesoro ekde la jaro 2012, agnoskita de Tirana Universitato kaj Ministrejo pri Edukado kaj Scienco de Albanio. Lia esplorkampo estas la ekologio de la akvaj ekosistemoj, kun fokusiĝo en la makrozoobentoso (bentikaj invertebruloj) en la maraj, lagunaj kaj dolĉakvaj habitatoj. Li partoprenis en multaj internaciaj sciencaj projektoj en lia esplorkampo, en la rolo de kunordiganto, grupestro kaj fakulo. Sajmir estas membro de kelkaj konsilistaroj, sciencaj komitatoj kaj internaciaj profesiaj retoj sur lia esplorkampo.

7.28 *Sanie Gashi*



Esperanto- agrabla memoraĵo ekde mezlernejaj studoj



En Vikipedio oni skribas, ke **Sanije Gashi** estas publicisto, redaktoro kaj batalanto por la emancipiĝo de virinoj. Ekde 60 jaroj ŝi aktivas en la ĵurnalistiko de Kosovo. Du revuoj por virinoj “Kosovarja” kaj “Teuta” estas fonditaj de s-ino Sanie.

Ŝi naskiĝis en Prishtina, kie ŝi finstudis en la elementa okjara lernejo, en la pedagogia mezlernejo kaj en la Pedagogia Altlernejo. Same Sanie studis en la Filologia Fakultato de la Universitato de Prishtina. Sian profesion de ĵurnalista Sanie komencis en la jaro 1965 per artikoloj en la revuo “Zëri i Rinisë” (La Voĉo de Junularo). Novembre 1971 oni nomumis ŝin redaktoro en la revuo “Kosovarja” (La Kosovanino) kiu aperis tiun jaron, dum en 1975 Sanie fariĝis ties ĉefredaktoro dum 18 sekvaj jaroj. Maje 1994, jam sperta ĵurnalistino, ŝi fondis la unuan sendependan porvirinan kaj porfamilian revuon “Teuta”, la sola de ĉi tiu profilo en Kosovo.

S-ino Sanie dediĉis sian vivon al la emancipiĝo de virinoj, subtenis ilian edukiĝon, la liberan pensadon, la batalon por la homrajtoj, memkonsciiĝon por malfermi al si la vivajn padojn, ĉiam je la servo de kreado de pli bona estonto. Ŝi starigis kaj pritraktis interesajn temojn, intervjuis elstarajn personeculojn, skribis pri la pezaj travivaĵoj de la albanaj virinoj dum la lasta milito.

Printempe 1990 oni elektis s-inon Sanie en la estraro de la Asocio “La Fratinoj Qiriazî”, por neniigo de malalfabetismo en Kosovo

Engaĝita dum danĝera tempo, kadre de trimembra delegacio de Kosovo, ŝi renkontiĝis la unuan de oktobro 1990, en Parizo kun la prezidantino de la Komitato pri la Homrajtoj, Danielle Mitterand, rilate al malrespektado de la homrajtoj en Kosovo, aparte por infanoj. Ŝi same aktiviĝis ĉe la unua kontraŭkomunista politika partio “La Demokratia Ligo de Kosovo”, propagandante en ties branĉoj ekster Jugoslavio, okaze de la “Deklaracio pri Respubliko de Kosovo kaj ties Konstitucio” (la 2-an de julio 1990), partoprenis en la demonstracioj organizitaj de albanoj en Germanio kaj Belgio. Somere 1991 ŝi enmanigis al la tiama prezidento jugoslava Stipe Mešić peticion subskribitan de 220 mil kosovaj virinoj okaze de mortigo fare de la polico serba de 11-jara knabo Afrim Prebreza, same al la tiama prezidento de Albanio, Ramiz Alia. Samjare okazis la unua renkontiĝo kun la forumoj de la virinoj de Albanio, post duonjarcenta izoliĝo.

La serba polico arestis ŝin dufoje kaj enprizonigis Sanie januare 1992. Oni kondamnis baldaŭ ŝin laŭ akuzo “Insulto kontraŭ naciaj sentoj de civitanoj”. Fakte ŝi estas la sola ĵurnalistino arestita kaj kondamnita dum la okupacio serba!

Post la liberiĝo de Kosovo, Sanie daŭrigis la eldonadon de la revuo “Teuta” kaj realigis ekstraajn eldonaĵojn je temoj “Rekapabligo de familio postmilite (1999)”, “Revenigo de infanoj stresitaj al la normala vivo (1999)”, “La gravedeco kaj la patrineco (tri eldonoj, lasta en 2004)”, “La seksa egaleco kaj la konstruado de la paco (2006)”.

Ŝi estas aŭtoro de kelkaj publicistikaj libroj:

Gatojsa (1982), Gatojca (1989);

Histori të tmerrit 1998-1999 / dosje krimesh lufte, rrëfime të grave (2009);

Histori të tmerrit 1998-1999 në gjuhën rumune: Ororile războiului din Kosova 1998-1999, Dosarul crimelor de război, mărturiile femeilor (2010);

Ecje nëpër kujtesë, tregime jete të grave me karrierë (2010);

Ecje nëpër kujtesë, botimi i dyte i plotësuar (2012);

Prishtina e fëmijërisë sime (2013);

Gjurmë ndër vite (2015);

Serbian Crimes in Kosovo 1998-1999 / Appalling true stories of Albanian women's suffering, told first-hand (dhjetor 2015);

Monografi Unike për Prishtinën - Shqip/Anglisht (dhjetor 2016).

Sanie Gashi estis intervjuita en la diversaj landaj kaj internaciaj medioj kiel ” La Voço de Ameriko” (maje 2000); BBC (2004 kaj 2010); ka.

Ŝia nomo aperas en la Enciklopedia Vortaro “Ĵurnalistoj kaj publicistoj albanaj”, same en la “Enciklopedia Vortaro de la Albanaj Virinoj”.

Oni honoris Sanie per la “Medalo por Laboro”, per la premio “Elstara ĵurnalista de Kosovo”; per “Publika Dankemo” (1980, 1985); kaj dufoje ŝi estas momumita por la premio “La Rekompenco de Novembro” (La Tago de Prishtina).

La parlamentanaj virinoj honoris ŝin per la atestilo “Dankemo” por la kontribuo en la evoluigo de demokratio, en 2012. Plue oni honoris ŝin per la premio “La Reĝino Teuta” de La Klubo de Albanaj Virinoj en Kroatio, 2012.

En la 16-a Librofoiro- Prishtina 2014 la Asocio de Eldonistoj de Kosovo honoris s-inon Sanie per la “Premio por Kapitalaj Verkoj”, rilate al ŝia libro “Prishtina de mia junaĝo”.

Sanie akiris la premion “Ramiz Kelmendi” en 2015, kiun liveras la Beletra Festivalo Orllan FLO kiel dankemo por la eksterordinara kontribuo kvindekjara al ĵurnalistiko kaj publicistiko de Kosovo.

Jen kion skribas mem s-ino Sanie Gashi:

“Mi ekaŭdis pri tiu ĉi lingvo dum la mezlernejaj studoj en Prishtina en 1963. Tiam oni instruis la anglan en nia lernejo, sed ĉar alvenis kelkaj geknaboj el la aliaj urboj, kie la angla ne estis en la programo, nia elstara profesoro je longa pedagogia sperto, s-ro Beqir Kastrati, decidis

lernigi al ni esperanton, kiun li jam posedis. Tiel li fondis apartan lernoklason kun interesitaj geknaboj pri la lernado de Esperanto!

Fakte neniu el ni aŭdis antaŭe pri tiu lingvo. En la elementa lernejo oni lernis la francan dum en mezlernejo la anglan. Tiel ni bonŝancis konatiĝi kun la internacia helplingvo!



Esperanto estis tre alloga por mi, same por mia amikino Fëllënxa. Bedaŭrinde la instruado de Esperanto daŭris nur unu jaron. Sed la stranga lingvo neniam perdiĝis en nia memoro. En la jaro 2013 mi ĉeestis la promociiĝon de la poeziaĵoj de mia amiko Eqrem Basha, poeto, nun en Esperanto versio.

“La mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj” vekis intereson en la aŭlo de la Nacia Biblioteko en Prishtina, kie ĉeestis, krom la aŭtoro, ankaŭ la tradukistoj Tomasz Chmielik kaj Bardhyl Selimi, same s-ro Adem Demaçi, laŭreato de la porpaca premio “Saĥarov”, ankaŭ profesoro pri beletro, s-ro Sali Bashota.

Mi sekvis plezure la konversacion kaj diskutojn en Esperanto parolata! Tiel reeĥis ĉe mi la bela memoraĵo pri Esperanto. Kial oni ne plu subtenu tiun grandan lingvokomunikilon?



Same kiel mi, esperanton ankoraŭ rememoras la eksaj studentoj de la Pedagogia Mezlernejo de Prishtina, tiutempe tre grava por la eduksistemo en Kosovo.”


Sur la fotoj:

Mi kaj du miaj amikinoj dum la lernejoj jaroj (1963); mi nuntempe; mi kaj sinjoroj Bardhyl Selimi kaj Tomasz Chmielik en la Nacia Biblioteko de Prishtina

Aldonaĵo

Teruraj historioj 1998-1999

Fragmentoj



La kovrioloj de la libro

... Vilaĝo Celin el 300 domoj kaj 3500 loĝantoj.

Selman Zeqiri, gastlaboristo en Germanio nun havas nur filon, Valon-on. La edzino, Sebahat, kun du aliaj filoj, ne plu vivas; nek la frato, Bajram, kvinope, kun la edzino kaj tri gefiloj, nek la patrino kaj kvar filoj de la onklo, unu el ili kun la edzino kaj gefiloj..

Valon rakontas:



Valon hodiaŭ

La 25-an kaj 26-an de marto 1999 la serbaj fortoj okupis la vilaĝon. Oni ekpafadis ekde la 5-a de mateno en la malantaŭa parto de Celin. En la loko nomata Pisjak ariĝas krom la vilaĝanoj ankaŭ homamasoj el Hoqa e Vogel, Bellacerka, Nagavci, entute ĉirkaŭ 7-8 miloj.

Miftar Zeqiri, la familia kapo, petas virojn ke ankaŭ ili iru, mem restas hejme por zorgi la virinojn kaj la infanojn. Dume la serbaj fortoj eniras la hejmon, forprenas la dommastron, la virinojn kaj la infanojn, venigas ilin malantaŭen de la domo, en la apuda deklivaĵo kaj ekzekutas ĉiujn: Miftar-on (63 jara) , ties edzinon Sanije 60 jara) , la novedzinojn, Sebahat-on kun filoj Altin (10 jara) kaj Bledar (8 jara) , Myrvet-on (33 jara) kun gefiloj Alma (2 jara) , Alban (5 jara) kaj Albulena-n (10 jara) , Myrvete-n (42 jara) kun Besart (10 jara) , Burbuqe (13) , Elbasane (19 jara) , Suzana (21 jara) , Nazlije (26 jara) ..



La popolo salutas la soldatojn de NATO-o

La etulino Alma, kiun estis portanta Myrvete, dum ili iradis sur la morta vojo, pafita per kugloj, ekfalas apud la patrino, same sangumita. Ambaŭ, patrino kaj filino, porĉiame fermis la okulojn.

Bajram Zeqiri, kun Valon manenmane kaj kvin aliaj viroj, post kelkaj horoj revenas hejmen por vidi, ĉu okazis io al siaj gefamilianoj. Sed la serbaj fortoj plurestis en ilia hejmo atendante. Ĝus ili eniris, la serboj kaptis kaj ordonis ke ili kuŝu surtere ĉe deklivaĵo kun la manoj malantaŭe. Same agis ankaŭ la 12 jara Valon.



Foto Kevin Capan

La soldatoj de NATO estas bonvenaj en Kosovo

Tiumomente, iu serbo ordonas al Valon ekstari kaj rigardi la scenon de iu ŝtono apude.

Sekvis batado de familianoj. Oni tiradis ilin per hararo, kunfrapigis la kapojn al la deklivaĵo, sangumigis, returnis, frapis per fusilo en diversaj sentemaj korpopartoj, precipe en genitaloj, poste insultadis, kriegis, denove frapis al la sangumitaj kapoj... Estis ĉirkaŭ dek policistoj turmentantaj...

Post fizikaj turmentaĵoj kaj humiligoj ili venigis ilin kelkajn metrojn pli fore kaj ekzekutis ĉiujn: onklon Bajram, Naim-on, Brahim-on, Hamet-on, Gezim-on.. Tio okazis ĉirkaŭ la 3-a posttagmeze de la 25-a marto 1999.

Krushe e Vogel kaj Krushe e Madhe

En la vilaĝo Krushe e Vogel, kiam eniris la serbaj hordoj, la homoj ankoraŭ dormis. Ili bruligis la domojn, persekutante samtempe ĉiujn.

Ĉekape de la vilaĝo vivas la familio Berisha. En la jaro 2001 tie loĝis nur tri personoj, la bopatrino, novedzino kaj nepo: Hanemshane Batusha, 70-jara kun la juna novedzino, Shemsie, 29 jara, kaj ties filo, nun 4-jara. La 26-an de marto 1999 oni mortigis kaj bruligis 8 familianojn: tri filojn- Zaim-on (47 jara) , Ahmet-on (43 jara) kaj Milaim-on (32 jara) kun ties filoj- Fehmi, Mergim, Behar, Burim kaj Lirim 14-jara! La murdistoj alvenis kun tranĉiloj enmane.



La tomboj en Krushe e Vogel

La matenon de la 26-a de marto 1999 la vilaĝo estis sieĝita de tankoj.. Komenciĝis la bruligo de domoj unu post la alia.. La vilaĝanoj hastis ariĝi ĉerande apud la domo de Batusha. Eniris mian hejmon la lokaj serboj, maskite, la ceteraj senmaskite. La samaj serboj kun kiuj niaj filoj kunlaboris en la kantinoj de brando, restintaj, manĝintaj kaj drinkintaj kune. La maskitaj serboj ordonis albane, ke la viroj disiĝu disde la virinoj kaj infanoj. Mia filo portis surbruste ties filon dujaran, kiu ne volis disiĝi kriante. Oni forprenis ankaŭ knabojn 13-14 jarajn.

Entute 120 masklojn oni elirigis en la straton kun manoj surnuke. Dume du serboj lokaj, Culi kaj Rade diris al virinoj: Nun iru kaj dronu en la Drin, aŭ foriru al Albanio! Ĉar vi mem volis tion, volis NATO! La virojn oni enirigis en la ĉambron po duope kaj pafmortigis. Poste ties kadavrojn ili forportis kaj ĵetis en la riveron. La novedzino atestas ke ŝi trovis ĉe la riverbordo virajn vestoj, botojn. En la alia vilaĝo, Krushe e Madhe, oni mortigis ĉirkaŭ 250 homojn.

Jetmir Duraku rakontas:

La tri unuajn tagojn post la NATO bombardoj, la serboj mortigis lian patron, Xhemal kaj onklojn Ibish, Malush, Jakup kaj Xhevat. Ili estas la kvin filoj de Muharrem Duraku. En Krushe e Madhe serboj estas uzintaj krematorion. Entute estis ekzekutitaj 241 homoj. Oni trovis poste du amastombejojn, 2 krematoriojn kaj multajn individuajn tombojn. Okcent domoj kaj la moskeo estas bruligitaj. Pluraj homoj estas ekzekutitaj per kuglo enbuŝe!. Estas junaj novedzinoj kaj etaj knabinoj murditaj kaj bruligitaj! Restis 139 vidvinoj kaj 500 orfoj!

Esalto el la morta kamiono de la virinoj - "kadavroj"

Tagmezon de la 26-a de marto 1999 la specialaj unuoj de la polico serba entreprenis tiel nomatan "teritorian kombadon" en la triangulo Suhareke- Rahovec- Prizren.


Rakontas Vjollca Berisha:



Vjollca Berisha

Shyhrete Berisha perdis la edzon, Nexhat, 46 jara kaj siajn kvar gefilojn: Majlinda- 16 jara, Herolinda- 14 jara, Altin-on 11 jara kaj Redon-on 2 jara. Ekde la 5-a horo de la 25-a de marto en nian hejmon eniris perforte policistoj kaj metante sur niajn brustojn siajn aŭtomatajn pafilojn kaj kriegis: kie estas la usonanoj, kial ili ne venas savi vin!? Poste ili postulis de ni monon. Ni estis devigitaj doni ĉiujn niajn ŝparaĵojn, kelkmilojn da germanaj markoj.

Inter la policistoj estis ankaŭ Milorad Nišavić- Miško, ĉefo de urba UDBA. Ili revenis la morgaŭon. Ni estis ariĝinta en la hejmo de onklo Vesel, entute 25 homoj. Malantaŭ la domo estis du tankoj. Loka serba policisto, Zoran, gvidis taĉmenton de 30 policistoj. Zoran vokis albane Bujar-on, filon de onklo Vesel ke li eliru en la korton. Ĝis Bujar eliris, oni pafis al li, faligante lin morta. La frato de Bujar eliris por demandi pri la kialo de la mortigo. Sed ankaŭ lin ili faligis morta surteren.



Nëna në kolonë, në
rrugë për në Shqipëri,
30 Mars 1999

284

La albanoj marșas piede al la direkto de la landlimo por savi siajn vivojn


Poste ili forprenis la bofraton Nexhmedin-on (36 jara, inĝeniero), Faton-on (29-jara), kaj ilin pafmortigis antaŭ muro. Ili ankaŭ mortigis Lirije-n (virino 27-jara, instruistino, naŭ-monate graveda), kiu hastis savi la edzon. Restis nur virinoj aliaj. Oni ordonis ke ni ariĝu en la picejo "Kalabria" en la komerca centro, kien oni irigis ankaŭ alian homamason,



Knabino perfortita kaj poste murdita de la serbaj soldatoj kaj policistoj

Tie daŭris la pafado fare de policistoj al ĉiuj civiluloj, entute 60. Vjollca Berisha troviĝis tie kune kun siaj gefiloj Gramoz 10-jara, Drilon 14-jara kaj Dafina 16-jara. Oni ne kompatis eĉ la infanojn. La unua falis la filino de Shyhrete, Herolinda, poste mia filino Dafina. Oh Dio, mi vidis la sangon elverŝiĝantan el ŝi kaj ne povis helpi.


Oni daŭrigis per bomboĵetoj. Al Redono, 2-jara tio kaŭzis kranofendon! Ankaŭ mi, trafita de mangrenadoj, svenis. Rekonsciĝinte mi vidis la knabon Gramoz ,kiun oni estis pafinta per kuglo surkape.



Difektita vizaĝo pro torturoj kaj masakroj far serboj

Shyrete rakontas, ke la filo Altin vokis ŝin, post kiam li vidis la mortan Herolinda-n. Sed la saman sorton havis ankaŭ li mem tuj poste. Estis mortkuŝanta Sebahatja kun siaj gefiloj, Ismet 3-jara, Erion 1-jara, Shirinja 17-jara kaj Florian 16-jara. Oni estis lasinta nin mortaj longe, poste venis kaj ŝarĝis en kamionon. Dumvoje, preterpasante la vilaĝon Lutoglava, mi rekonsciiĝinte, same ankaŭ Shyrete, pensis pri la eskapo. Kaj tiel ni agis.

Ni tuj elsaltis kaj falis sur la asfaltan duonvivajn. Vilaĝanoj aliaj helpis nin akceptante nin en siaj hejmoj.



Patro ŝokita pro perdo de siaj gefiloj

Teruraĵoj en Gjakove

Tiun nokton, en la urbo de Gjakove, Naser Rudi kaj Agron Nagavci vidis multajn policistojn drinkantajn kaj sieĝantajn la domojn de la kvartalo. Ili rompis la pordon kaj eniris. Unue ili eniris en la hejmon de Fehmi Lleshi kaj tuj ekzekutis lin kaj lian edzinon.



Avino klopodas trankviligi sian nepon, kiu perdis la gepatrojn

Poste ili pasis ĉe la familio Deda, ekzekutis unue la filinon, Aferdita, kaj ties filon 7-jaran kaj la gepatrojn. Poste ili eniris en nian hejmon, kie rifuĝis multaj homoj. La edzino de la komandanto Pituliq, s-ino Lila, loĝanta apude, estis renkontinta Tringa-n, nian novedzinon. Tringa estis plendinta al ŝi pri la reprezalioj. - Ne zorgu, Tringa, estis respondinta Lila, - ni estas ja najbaroj, nenio okazos al vi. Kaj ŝi petis, kiom da homoj estas en ŝia domo. Tiel, post la noktomezo, la policistoj rompis la kortan pordon. Tri maskloj de la domo tuj eskapis malantaŭ la domo. 7-8 policistoj eniris en la subĉambron, kie ariĝis virinoj kaj infanoj.

-Nu, eliru, eliru, ĉar tion postulis NATO kaj UÇK- (Naciliberiga armeo) !

Dren Caka, tiam knabo 9-jara, rakontas:



Dren Caka post kelkaj jaroj en Kanado

Unue oni ekzekutis Flaka-n, la fratino de Tringa, ankoraŭ 16-jara. Kiam ŝi petis glason da akvo, oni pafis al ties kapo per kuglo. Poste ili mortigis ŝian patrinon, Shahinder, kaj la aliajn. Elirinte en la korton, ili pafis sur la onklo Hysen, kiu estis preterpasanta per ĉaro. Mi vundiĝis ĉebrake. Mi vidis la malgrandan fratino, Rita-n, kiu sin kaŝis en la ŝranko, kiun kovris jam la flamoj... Mi eskapis de la flamoj, transsaltis la muron dumetran de la korto kaj, de domo al domo, alvenis en la hejmon de miaj geavoj. La morgaŭon, ili kondukis min al la hospitalo, kie ankoraŭ deĵoris kelkaj albanaj kuracistoj. Ĉi tiuj kondukis min al la landlimo, kie min kunprenis italoj per helikoptero kaj venigis en Tirana-n.



Malesperigitaj virinoj

En la ruinaĵoj de la domo restis mortaj kaj bruligitaj 20 homoj: patrino Fetije Vejsa (60-jara) , Tringa Vejsa (30-jara) , infanoj: Dorina (11-jara) , Marigona (9-jara) , Sihana (7-jara) , Arlind (5-jara) , Rita (20-monata) ; Valbona Vejsa Haxhiavdia (38-jara) kun tri gefiloj: Doruntina (8-jara) , Egzon (5-jara) , Rina (3-jara) ; Valbona Caka (34-jara) kun tri gefiloj: Dalina (13-jara, Delvina (8-jara) , Diona (2-jara) ; Shahindere Hoxha (60-jara) kun la filino Flaka (16-jara); Shirine Nuçi (72-jara) kun sia filino Mandush (52-jara) kaj la onklo Hysen (52-jara) .



Masakrita infano

Shqipe, filino de la legendeca komandanto Adem Jashari, el la vilaĝo Prekaz, rakontas:



Masakro en Peja

Nia domo estas sieĝita kelkfoje. Ĝi rezistis al sieĝo de la 30-a de decembro 1991 kaj sieĝo de la 22-a de januaro 1998.

La tria sieĝo okazis la 5-an, 6-an kaj 7-an de marto 1998.

Post heroeca rezistado, falis 20 personoj el la familio Jashari, inter ili 12 inoj: 4 virinoj (Zahideja, Zarifja, Feridja, Adilja) , kaj 8 knabinoj (Blerina 7-jara, Fatimja 9-jara, Igballja 11-jara, Liria 14-jara, Valdetja 15-jara, Afetja 17-jara, Hidajetja 18-jara kaj Selvetja 20-jara) . Dum el la tuta larĝa familio Jashari falis 57 personoj konsistigintaj vilaĝan kvartalon. Saviĝis nur la knabino Besarta 11-jara kaj alia knabo Bashkim.


Masakro de Reĉak

La 15-an de januaro 1999 okazis masakro, kiu influis notinde en la ŝanĝo de la internacia opinio rilate la sorton de Kosovo.



La tomboj de la masakritoj en Rečak

Serbaj krimuloj, inter ili ankaŭ najbaroj el Shtime, alvenis en Rečak kaj mortigis 42 homojn, kelkajn el ili oni eĉ senkapigis, ĵetante ilin en grandan kanalon ĉerande de la vilaĝo. La morgaŭon alvenis ĵurnalistoj, ĉekape la reprezentanto de OSCE observa misio William Walker. Tuj la tuta monda gazetaro kaj medio raportis pri la makabra evento.



William Walker revenas Kosovon ofte

La ekzekuto de advokato Bajram Kelmendi kaj ties du filoj

Nekibe Kelmendi, eksa ministrino pri justeco kaj vicprezidantino de la Demokratia Ligo rakontas:



Nekibe Kelmendi

Estis la unuaj horoj de la 25-a de marto 1999. La policistoj forprenis perforte mian edzon kaj du filojn kaj venigis ilin de Prishtina al Fushe Kosove. Junulo preterpasanta tien post finiĝo de sia deĵorperiodo, rigardis la tutan krimscenon.



Ĉirkaŭ 1 miliono da albanoj estis devigitaj forlasi siajn hejmojn kaj terojn

Respondeculoj de la Ŝtata Sekureco, Miško Lakoviĉ, David Gajiĉ kaj tri aliaj ekzekutistoj eligis la kaptitojn el la veturilo kaj ordonas Kastriot-on, pliaĝan filon 25-jaran, ke li pafu al la patro Bajram. Li maljesis. La samon faris la alia filo, 17 jara, Kushtrim. Ankaŭ Bajram mem ne plenumis la ordonon por pafi kontraŭ siajn filojn.

Tiam la ekzekutistoj pafis al Kastriot, poste al Kushtrim kaj fine al Bajram. Sekvis pafado kontraŭ la tri korpoj, kiuj ricevis po 18 ĝis 32 kuglojn.



Oni portas avinon en fera ĉareto al direkto de la landlimo

Bedaŭrinde neniam oni invitis Nekibe-n en la Juĝejon de Hago. La eksa ĝenerala prokuratorino, Carla del Ponto, prokrastigis ĉiam la konfrontiĝon de Nekibe Kelmendi al Miloŝeviĉo.




La trajno Prishtine- Skopje plenplena de rifuĝintoj

- Kial vi ne akuzas ĉi lastan pri genocido kontraŭ la albana popolo?- kelkfoje demandis ŝin Nekibe.

-Ne ekzistas pruvajtoj- respondis del Ponte...

7.27 Eqrem Basha



Li naskiĝis en Granda Dibra (Norda Makedonio) en la jaro 1948. Ekde la jaro 1970 li vivas en Prishtina (ĉefirbo de Kosovo) kie elstaras kiel verkisto.

Eqrem Basha finstudis pri la albana lingvo kaj beletro ĉe la Universitato de Prishtina. Poste li deĵoris longajn jarojn ĉe Televizio de Prishtina en la departamento de Drama kiel redaktoro. La serbaj aŭtoritatoj maldungis lin en la jaro 1999 pro politikaj kialoj.

Eqrem aŭtoras por 8 volumoj kun poeziaĵoj verkitaj dum la jaroj 1971-1995, tri volumoj kun mallongaj rakontoj kaj multajn tradukaĵoj precipe el la franca.

Aktuale li laboras ĉe granda eldonejo Dukagjini en Prishtina.



Eqrem Basha antaŭ la statuo de Patrino Tereza en Prishtina kaj en la Nacia Biblioteko de Prishtina

Printempe 2013 estis promociita en la Nacia Biblioteko de Prishtina lia libro “La mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj” en esperanto. Dum tiu renkontiĝo sinjoro Eqrem sin esprimis ke kiam li estis juna aŭdis kaj okupiĝis pri esperanto. Jen kion li memoras mem:

“ Dum mia junaĝo provokis min la ideo de esperantismo. Tial mi sekvis tiam (tre mallonge) studadon de tiu lingvo laŭ metodo prezentita sur ĵurnalo, kies nomon mi ne precize povas rememori nun: ĉu Rilindja, ĉu Flaka e Vllaznimit aŭ kelkiu alia ĵurnalo de la eksa Jugoslavio en la serbokroata lingvo. Mi tamen bone rememoras la nomon de la hungara esperantisto Tibor Sekelj el Subotice, ĉar komence li legis ties skribaĵojn pri la historio de esperanto, pri la facileco de la lernasdo de tiu lingvo, pri la personeculoj ĝin studintaj.

Mi do sekvis kelkajn lecionojn pri tiu lingvo, certe dum la periodo de miaj universitataj studoj, tio estas ĉirkaŭ 50 jarojn antaŭe. Tial miaj memoraĵoj pri esperanto estas ne freŝaj..”

Jen poezio el la libro supre menciita

Homo kun la mondo en la manoj

(Njĉ njeri me botĉn nĉ duar)

La mondon li transportas per du fingroj

per unu movo nek spiras nek tusas

kiel ĉiuj ordinaraj formikoj.

La kontinentojn li envicigas

ke ili marŝu kiel soldatoj dum parado.

La mondon li transportas per unu mano

ĉiutage traserĉas arbarojn kaj herbejojn kriante

per montrofingro ni kulpuloj instruis al li ordinarajn malsanojn

ĉar la mondo febras, bezonas polvon de neŭtronoj

pilolojn da napalmo kaj fumon de bombaviadiloj

ne lin doloras la ventro hemeroidojn

li ne havas nek suferas je hemikranio

li ne scias kio estas kancero

sed li timas infekti milojn da insektoj

7-28 Anisa Proda



Jen kion skribas Anisa mem (ŝi estas blinda) pri siaj travivaĵoj per Esperanto:

“La lernado de fremdlingvo por la blinduloj estas ia fenestro tra kiu oni povas vidi pli klare la mondon. Dum la jaroj 1990, kiam Albanio komencis sperti la demokratian vivon, la eblecoj por la gelernantoj je vidkapablaj problemoj rilate la lernadon de la fremdlingvoj estis modestaj. La Instituto por la Blindaj Gelernantoj, gvidita de s-ro Ramazan Kabashi (jam forpasinta), ne plu produktis librojn en Brajlo aŭ aliajn didaktikajn materialojn, kiel antaŭe. Ankaŭ la instruistoj de la angla lingvo, la sola fremdlingvo instruata tiam, ofte ŝanĝiĝis tiel kreante barojn por progresi en tiu lingvolernado.

Mi estis lernantino en tiu institucio, tial miaj memoraĵoj estas ankoraŭ freŝaj. En la sepa grado aperis en nia lernejo gasto, kiu fariĝis tre kara por la generacioj, kiuj bonŝancis lin koni. Profesoro Bardhyl Selimi instruis al ni la esperantan lingvon. Komence li allogis nin per ties mildeco kaj humuro.



Li ĉiam rakontis al ni novajn intrigajn historiojn por ke vekis nian intereson dum la lernado. En la kondiĉoj niaj tre limigitaj por komuniki kun la medio ekster la lernejo aŭ renkontiĝi kun aliaj homoj krom la instruistoj kaj deĵorantoj, profesoro Bardhyl estis kvazaŭ radiofonia elsendo dum la posttagmezoj kiam vi venis ĉe nin.

Alia afero igis lin tre aparta por ni: Bardhyl instruis matematikon en mezlernejo en Tirana, sed li estis tre afabla kaj pacienca, tute alie, laŭ niaj spertoj, ol la kutimaj instruistoj pri matematiko.

Esperanto estis lingvo nekonata antaŭe de mi. Krome ni neniam antaŭe havis librojn en Brajlo por la lernado de Esperanto. Sed Bardhyl, helpe de la nederlandaj amikoj, certigis dulingvajn lernolibrojn en Brajlo, per kiuj ni povis plulerni la lingvon ankaŭ memstare.. Mi mem komencis korespondi kun sinjoro Jacques Tuinder (jam forpasinta), granda sponsoro por nia Instituto. Profesoro Bardhyl fojfoje helpis min dum tiu korespondo.

Kiam mi finstudis en la mezlernejo, mi bonŝancis kunvojaĝi kun profesoro Bardhyl kaj mia virinhelpanto al Florenco, Italio, por partopreni la tiaman UK-2006. Mi travivis neforgeseblajn spertojn dum tiu unua vojaĝo eksterlanden kun kulturaj celoj. Tre interese estis, ke blindaj homoj el la diversaj landoj tre aktivis en la kongreso, kio estis neimagebla por mi ĝistiam.

Profesoro Bardhyl havas meriton, ke li prezentis al ni la esperantistan komunumon laŭ tre natura maniero. En tiu komunumo ĉiu ĝuadas sian vivon originale, sed ĉiujn kunigas la ideo, komuniki en la sola helplingvo internacia, kio pruvas ke la mondo bonŝancas vivi enpace kiel io tuto.”


Anisa Proda, finstudinte la universitaton, laboris kiel specialisto pri la politikoj de la socia ampleksiĝo ĉe la Urbodomo de Tirana dum kelkaj jaroj.



Aktuale ŝi sekvas programon de Magistrecio pri Internaciaj Studoj en Usono.

7-28

Beqir Hasan Kastrati- esperantisto el Kosovo



Li naskiĝis en la urbo Pejë, je 2an de marto 1911. En la naskiĝloko li sekvis du jarojn de la elementa lernejo kie instruis la albanan ankaŭ sia frato , Halil Kastrati. Kiam la serba reĝimo fermis la albanlingvajn lernejojn en la jaro 1918, Halil translokiĝis al Shkodër, Albanio, ĉar lin la reĝimo serba persekvadis. Poste lin sekvis ankaŭ Beqir, kiu daŭrigis la elementajn studojn en Shkodër, same la gimnaziajn kaj pedagogiajn. En la jaro 1933 Beqir komencis la instruadon kaj laboris ĝis la jaro 1974. Li forpasis en la jaro 1989, la 7an de julio.

Beqir Kastrati unue instruis en Krumë de la distrikto de Has, poste kiel ĉefinstruisto kaj lernejestro de la studenta domo “Kosova”. En Krumë stariĝis ankaŭ la kulturaj societoj “Shkëndija” kaj “Dobia” kie partoprenis studentoj kaj instruistoj ankaŭ el Kosovo. Mem Beqir gvidis multajn teatrajn aktivecojn. Preter li, en la Montaro de Gjakova, deĵoris ankaŭ aliaj kosovaj instruistoj: Ibrahim Kolçi, Feri Imami, Osman Shaqiri, Ibrahim Fehmiu, Qazim Bakalli, Sali Morina, Iljaz Prishtina, Niman Ferizi ka. Krom en Krumë, ĉi tiuj intruistoj deĵoris ankaŭ en Tropojë, Shtiqen, Bicaj, Kolgecaj, Kalaja e Dodës.

Ili agadis ankaŭ kadre de la edukaj, politikaj kaj kulturaj societoj kiuj sekvis progresivajn kaj demokratiajn ideojn. Sendube ili postlasis neforvisĝeblajn spurojn en la edukado kaj ĉe la edukitaj generacioj, kiuj siaflanke poste sin distingis en ĉiuj kampoj de la albana vivo, sur la albanaj teritorioj.

Por Beqir Kstrati la popolo montris grandan respekton kiel pri “homo malmulte parolanta sed multe laboranta”.

En la jaro 1941, kiam aliĝis al Albanio multaj albanaj teritorioj ekster ĝi, Beqir Kastrati kun 400 instruistoj kaj aliaj intelektuloj el Albanio, komencis la laboron en Kosovo, unue kiel ĉefinstruisto en Deĉan de la regiono de Dukagjin. Inter ties studentoj estis ankaŭ du infanoj de hebreaj familioj (Solomon Ivet Komfort kaj rafael Suzika Martam), kiujn protektis la popolo, kun kiuj Beqir estis amika. Li instruis ilin en la franca.

Ekde 1942-1946 Beqir deĵoris en Pejë en la lernejoj “Haxhi Zeka” kaj “Lidhja e Prizerenit”. Ankaŭ tie li sin okupis per kultura agado. Samtempe li estis vicinspektoro pri edukado kaj eduka instruitoro por la urboj Pejë, Gjakovë kaj istog, poste ĉefo de edukado por la regiono de Dukagjin. Post la jaro 1946, oni nomumis lin direktoro de la Pedagogia Lernejo,

aŭ Normalo de Gjakovë. Malgraŭ malfacilaĵoj la pedagogia kolektivo estrata de li sukcesis eduki kelkajn generaciojn da instruistoj.

Beqir estis la inicianto de la Kvalifikaj Pedagogiaj Kursoj de la edukistoj. Li multe klopodis por altiri studentojn el la profundaj areoj kie la malalfabetismo estis pli sentebla. Same li kompiladis lernolibrojn kiel “Aritmetiko por la dua grado de la elementa lernejo” kaj “Mia amiko”, legolibro por la unua grado de la elementa lernejo, libroj kiuj konis multaj reeldonoj poste. Beqir ege helpis en la fondiĝo de la Amatora Teatro “Emin Duraku” de Gjakovë. Li eĉ verkis tatraĵojn je unu akto kaj reĝisoris ilin, formis kaj gvidis la Orkestron de la Mandolinoj.

Kiam la ŝtato translokigis la Normalon al Prishtinë, Beqir fariĝis direktoro de la urba gimnazio en Gjakovë, kie li fondis ankaŭ la Dommastrinan Lernejon en Gjakovë kaj instruis la francan en ambaŭ lernejoj, same en la Ekonomia Mezlernejo.

Kiam li iris instrui al la Normalo de Prishtinë kaj al Gimnazio de Prishtinë, oni bonvenigis lin. Tie Beqir ankaŭ pensiigis.

Beqir Kastrati sin okupis ankaŭ per beletra agado. Ekde studento en la Normalo de Shkodër, li verkis poeziaĵojn, teatraĵoj je unu akto, kiujn ne sukcesis publikigi. Li ricevis multajn dankleterojn kaj aprecaĵojn tra artikoloj en la preso, radio kaj televizio.

Pensiiginte, Beqir kolektis la arĥivitan materialon de la Normaloj en Gjakovë kaj Prishtinë. Liaj poeziaĵoj en manuskripto la familianoj publikigis postmorte en unu almanako je titolo “Tiktatu i Kohës”.

Beqir Kastrati adoris la muzikon, mem ludis per mandolino verkojn de la grandaj majstroj- Li estis la unua prezidanto de la Veteranoj de Edukado de Kosovo. Oni dekorigis lin en la jaro 1994 (postmorte) per la prezidenta ordono “Naim Frashëri- unua klaso” tra Sali Berisha de Albanio kaj per la Medalo de Respubliko de Kosova prezidento Hashim Thaqi.

Beqir Kastrati kaj esperanto

Beqir Kastrati bone konis la francan, la italan, la turkan, la serbokroatan kaj esperanton. Ĉi lastan, plej probable, li ellernis de la esperantistoj de Shkodër, ĉar estas sciite ke esperanto startis en Albanio ĝuste en la urbo de Shkodër. Li verkis artikolon en la revuo “Përparimi”, Prishtinë, nr.4, 1960, paĝo 286 je titolo “Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof-la aŭtoro de esperanto”.

Beqir fondis la Asocion de Esperantistoj de Prishtinë. Li strebis ke la albanoj tie posedu lingvon per kio ili komuniku kun la tuta mondo, aŭ kiel li mem sin esprimis “kun ĉiuj meridianoj”.. Li estis ligita kun la esperantista asocio de Kroatio, de kio li ricevadis literaturaĵojn, havigis al si la libron “ Esperanta Krestomatio”. Beqir klopodis enkonduki esperanton en la lernejoj. Li mem instruis gxin en la Normalo de Prishtina, inter la studentoj estis ankaŭ Fellaza Luzha. Li korespondis kun la Esperantista Ligo de Jugoslavio, centre en Ljubjana. Ankaŭ tiutempe oni opiniis ke esperanto fariĝos tutmonda lingvo unuigonta la popolojn kaj certigonta la pacon.

Pretigis la filino, la 23an de junio 2020

8, Impresoj de fremdaj esperantistoj

1. Ni kaptis la okazon

(El la vizito de polaj esperantistoj, aprile 2012)

Estas jam pruvite, ke neesperantistoj dediĉas atenton al Esperanto nur kiam ni demonstras ties utilecon praktikan. Tiel oni pravas, ke la lingvo funkcias kaj povas uzati por esprimi ĉion.

Antaŭ tri jaroj mia amiko el Pollando, Tomasz Chmielik, alskribis min retmesaĝe petante ke mi peradu ĉe la albana verkisto, jam monde konata, Fatos Kongoli, ke li permesu la tradukon kaj eldonon de unu el ties romanoj, ĝuste la “Hunda Haŭto-n”, kiu konis ĝis tiam 7 tradukojn fremdlingvajn.



Fatos Kongoli, Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi

Estis ia koincido, ke Fatos kunstudis kun mi matematikon en la universitato dum la jaroj 1963-1967 kaj daŭre tenis amikajn rilatojn kun mi. Do ne estis malfacile por mi konvinki lin pri la propono de Tomasz, kvankam li havis siajn naturajn dubojn pri Esperanto. Tiel mi akiris de li ne nur la permeson, sed ankaŭ la eblecon ne rekompenci lin por tio, ĉar la legantoj de la internacia lingvo konsistigas ankoraŭ relative malgrandan komunumon.

Sekvis pluraj retmesaĝoj inter mi kaj Tomasz. Ĉi-lastata kompilis koncernan kontrakton oficialan, kiu estis subskribita de ambaŭ ili.



Malantaŭe: Albanaj espeeantistoj Gjergji Gusho, Engjëll Gusho, Bardhyl Selimi

Fronte: Albana sinjorino kaj la edzino de Fatos Kongoli

Pasis jam sufiĉe da tempo ĝis Tomasz anoncis, ke la traduko finiĝis sukcese, same la provlegoj far eminentaj esperantistoj. Plue li raportis pri la klopodoj trovi sponsorojn por la eldono. Inter ĉi lastaj aliĝis ankaŭ mia amiko el Elzaso, Edmond Ludwig, cetere unu el la provlegantoj.

Sed Fatos ankoraŭ ne kredis, ke la libro aperos envere...ĝis januaro 2012, kiam mi enmanigis al li la unuan ekzempleron de la libro en Esperanto. Li ege feliĉis, eble pli ol kiam liaj romanoj estis tradukitaj kaj publikitaj en pluraj lingvoj “grandaj” de nia kontinento, en Francio, Britujo, Italio kaj en Usono. Kial do? Ĉar ĉiĉfoje temis pri “rara kaj ekzotika” lingvo, naskiĝinta relative malfrue, apartenanta al neniuj nacio, sed legata kaj parolata almenaŭ en 120 landoj.

Li informis pri tio per aparta konunikletero la gazetojn kaj televidojn, kio kaŭzis veran lavangon da intervjuoj miaj antaŭ ĵurnalistoj. Mi tute ne supozis, ke tiel mi povus sufiĉe efike kaj forte propagandi por Esperanto.

Tomasz estas skribinta pli frue al mi, ke li intencas venigi en Tirana-n grupon de esperantistoj polaj kaj aliajn por ĉeesti la eventualan promocion de la romano en Esperanto. Li aldonis, ke li deziras traduki ankaŭ alian verkon de unu el la plej mondkonataj albanaj verkistoj, nome Ismail Kadare, plurfoje kandidato por la Nobel-premio kaj laŭreato de aliaj prestiĝaj beletraj titoloj, la romano “La Palaco de la Songoj”.



Ismail Kadare

Denove mi peradis ĉe la elstara verkisto tra lia edzino Elena kaj akiris lian permeson por la traduko kaj eldono.

Plue Tomasz sciigis ankaŭ pri la traduko de la kompleta poemkolektoj de aliaj famaj poetoj albanaj- Luljeta Lleshanaku (el Albanio) kaj Ekrem Basha (el Kosovo).



Luljeta Lleshanaku kaj Tomasz Chmielik

Certe tio estis bonega okazo por propagandi nian Esperanton helpe de tiaj aŭtoritatoj sur la beletra kampo. Kaj fakte tiel okazis.

Ni faris plejeblon por aranĝi konvenan programon de la vizitoj kaj renkontiĝoj de la grupo de Tomasz, kiu alvenis la 13-an de aprilo 2012. Sekvis pluraj kontaktoj kun aŭtoritatuloj, televizioj kaj gazetoj por instigi ilin akcepti la esperantistan alvenontan grupon fremdan dum la unusemajna restado en Tirana.

La unua akcepto okazis en la Akademio de Sciencoj, kies membro estas mem la verkisto Fatos Kongoli. La prezidanto de la Akademio, prof. Gudar Beqiraj, plezurigis la fremdajn

esperantistojn per tre varmkora konversacio en sia oficejo, babilante kun ili tre nature pri la rilatoj ambaŭlandaj kaj aprecante Esperanton kiel lingvon de “paco, amikeco kaj internacia bonkompreno”.



Prof. Gudar Beqiraj akceptas la esperantistajn gastojn

Tiun posttagmezon grupeto de 5 esperantistoj estis invitita al 50-minuta intervjuo ĉe la televida kanalo “Albanian Screen”.



La prezentistino Ema Andrea kun esperantistoj dum la TV elsendo

La prezentistino, s-ino Ema Andrea, konata dram-aktorino, estis pretiginta tre saĝajn kaj trafajn demandojn pri la Esperanta Kulturo, al kiu respondis la poloj Tomasz, la polino Ela, la latvino Mara, la svedo Gunnar kaj mi, do vere internacieca grupo.



Prof. Osman Kraja, eksa ambasadoro albana en Varsovio kaj la esperantistino Ela el Bjalistoko.

La venontan tagon okazis la promocio de la libro en la granda salono de la Akademio, kie estis invititaj krom la membroj, ankaŭ politikistoj, verkistoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, diplomatoj, esperantistoj kaj pluraj ĵurnalistoj kaj televiziaj raportistoj kaj kameraoj.



La prezidantaro de la kunveno en la Akademio: Bardhyl, Tomasz, Fatos, Irena (ĝenerala direktorino de la eldonejo “Toena”), Myzafer (vicprezidanto de la Akademio). Surmure: la kovrilpaĝo de la romano “Hunda Haŭto”



La ĉeestantoj

La albana Centro de la Libro kaj eldonejo, kie aperis dekoj da romanoj de Fatos, salutmesaĝis la ĉeestantojn, poste prelegis mem Tomasz Chmielik pri la valoroj de Esperanto kaj la motivoj instigintaj lin por la traduko, same Fatos Kongoli rakontis pri siaj unuaj duboj kaj poste pozitivaj konvinkoj pri Esperanto.

Estis probable la unua fojo, ke aŭdiĝis en la kunveno neesperantista albana la parolata Esperanto, diskonigata tra la tuta lando dank'al televizioj.



Grupo de esperantistoj antaŭ la enirejo de la Akademio

Tuj post la fermo de la aranĝo la ĵurnalistoj ĉirkaŭis Tomasz kaj mi petante de ni pliajn klarigojn pri Esperanto, pri la lingvo mem kaj ties kulturo.



Tomasz Chmielik intervjuate

La ĵurnalistoj estis ege surprizitaj, kiam Tomasz anoncis, ke li akiris permeson kaj komencis traduki unu el la romanoj de Ismail Kadare kaj alian romanon de Fatos (“La perdinto”).

Mi rememorigis al ili, ke Esperanto havas tradicion relative longjaran ankaŭ en Albanio (almenaŭ 105-jara) kaj ke la unua originala verko en Esperanto aperis tie en la jaro 1929!



Mi respondas al la demandoj de ĵurnalistoj. Malantaŭe videblas Tomasz kaj Fatos Kongoli.

Multaj fotoj estis faritaj, pluraj ekzempleroj de la romano “Hunda Haŭto” estis dediĉitaj de la aŭtoro mem, kelkaj invititoj direktiĝis al la fremdaj gastoj. Vera, tute ne atendita sukceso!

La radioteleviziaj novaĵelsendoj tiun vesperon raportis kaj la sekvan tagon preskaŭ ĉiuj tagĵurnaloj dediĉis al tiu evento sufiĉe da spaco aŭ unu-du plenajn paĝojn.

La trian tagon la grupo de esperantistoj estis akceptitaj en la Ministerio pri Kulturo de la Direktoro pri Libroj kaj Bibliotekoj, s-ro Ermir Nika.



La komponisto Gazmend Mullahi, Ermir Nika, Tomasz, Fatos kaj mi.

Ĉeestis ankaŭ la verkisto Fatos Kongoli kaj kelkaj albanaj artistoj kaj verkistoj. Ankaŭ tie Esperanto estis la “laborlingvo”, io tute nova en tiu ministerio.



Antaŭ la ministerio pri kulturo

La saman tagon ni estis akceptitaj en la Fakultato pri Fremdlingvoj de la Dekano, s-ino Klodeta Dibra. En sia oficejo ŝi raportis pri la historio de tiu fakultato kaj pri la lingva politiko de la registaro. Bedaŭrinde, rimarkis ŝi, ĉio estas farata favore al la angla, inkluzive ankaŭ la

deviga ekzameno por ĉiuj magistriĝontoj, de TOEFL- (altkvalita angla nivelo), kio ege senluziigis kaj studentojn kaj instruistojn, ĉar tiel oni tute diskriminacias la ceterajn lingvojn, reduktante draste la nombron de studentoj de la franca, germana, itala, rusa, ktp.



La akcepto ĉe profesorino Klodeta Dibra

Kompreneble, aldonis s-ino Klodeta, en tia etoso, Esperanto apenaŭ havas ŝancon por inkluziviĝi en la ŝtataj instruprogramoj.



Prelegas s-ro Tomasz Chmielik, Bardhyl interpretas al la albana.

Poste ŝi ebligis al nia grupo renkontiĝi kun cento da studentoj en granda aŭditorio, kie Tomasz prelegis en la internacia lingvo pri la esperanta kulturo kaj ties perspektivo, same pri la ebleco de postuniversitataj studoj pri interlingvistiko en la Poznana universitato.



Studentoj aŭdas pri Esperanta lingvo kaj kulturo.

La pasiiĝinta pola instruistino, Jolanda, improvizis dekminutan provlecionon de Esperanto per la rekta metodo antaŭ almenaŭ 40 gestudentoj.

Sur la tabulo ni notis la adresojn retajn, kie la gestudentoj povu trovi facile la kompletan korespondan kurson de Esperanto por albanoj.



Jolanda instruas pasie

Samideano Stanislav Mandrak, la tutan tempon “registris” niajn renkontiĝojn per sia fotilo.

La ceteraj tagoj pasis en ekskursoj en la urbo (promenante tra la granda bulvardo, vizito en la Nacia Historia Muzeo, ekskurso al la monto Dajti grimpante per telfero kaj al la kasteleto de Petrela per buseto), al la antikva muzea urbo Berat (2400 jaraĝa, kun granda kastelo, ortodoksaj preĝejoj kaj muzeo de ikonoj, mirindaj karakterizaj loĝkvartaloj), al la historia urbo Kruja (kastelo de Skanderbeg, mezepoka bazaro, ka), al la marhaveno de Dures (kun la plej granda amfiteatro en Balkanio kaj ties longa plaĝo).



En la centro de la nia ĉefurbo-Tirana, placo “Skanderbeg”

La adiaŭa vespermanĝo okazis en popola karakteriza restoracio en gaja etoso esperantista.



Shaban Hasani, Bardhyl Selimi kaj Stanislav Mandrak. Bardhyl salutparolas.

Bedaŭrinde la vetero tutan semajnon estis ne kiel kutime tiuperiode en Abanio, pluvis, eĉ pluvegis, malvarmis, sed tio neniom paligis la entuziasmon de esperantistoj.



Pluvo en Tirana

Konklude: la semajno de vizito de la grupo de Tomasz atingis sian celon, t.e. disvastigi kaj propagandi Esperanton en Albanio utiligante eĉ tian eventon, kia ja estas la enesperantigo de la romano de la fama albana verkisto. Estas nun nia devo bone mastrumi tiun atingon.

Bardhyl Selimi

Albanio – lando de kontrastoj

Serĉante en mia arkivo iujn informojn mi hazarde trovis intervjuon, faritan en 2003 de loka ĵurnalistino. Ŝi demandis min, interalie, pri nerealitaj revoj. “Viziti Albanion”, — estis la respondo. Mi naskiĝis en malgranda urbo en la Malsupra Silezio. Ĝin ekloĝis diversaj familioj, kiuj pro la ŝanĝo de la limoj post la Dua Mondmilito serĉis novajn eblecojn por vivi en paco: eĉ grekoj kaj albanoj, kaj ŝajnas al mi, ke precipe infanoj vivis tiam en harmonio partoprenante la saman bazan lernejon.

En 2012 Tomasz Chmielik tradukis al Esperanto la libron *Hunda haŭto* de la nuntempa albana verkisto Fatos Kongoli, kaj per komunaj fortoj de sponsoroj, interalie, de la alzasano Edmond Ludvig kaj de la Podlaĥia Libraro, ĝi estis eldonita en Bjalistoko. Tiu ĉi evento naskis la ideon vojaĝi al Albanio kaj renkontiĝi kun la aŭtoro. Poloj, latvino kaj svedo interkonsentis rete pri renkontiĝo en Tirano la 14an de aprilo.

En la flughaveno noktomeze atendis nin profesoro Bardhyl Selimi — loka organizanto de nia restado. La dua grupeto venis de Krakovo per buseto. Nia celo estis ne nur konatiĝi kun la lando, sed ankaŭ promocii Esperanton. 50-minuta televida intervjuo pri Esperanto farita kun ni estis spektbla en la tuta Albanio. Okazis renkontiĝoj en la Akademio de Sciencoj kaj en la Ministerio pri Kulturo, Sporto kaj Junularo, kaj prelego en la Tirana Universitato por studentoj de fremdlingvoj. Jola Kieres el Nowy Sącz instruis amuze Esperanton al gestudentoj uzante la metodon de Cseh; Bardhyl tuj kaptis okazon por skribi sur la tabulo la kontaktdresojn por venontaj kursanoj.

La plej grava momento estis la renkontiĝo kun la aŭtoro de la libro. Supozante, ke ĝi temas iomete pri lia biografio, mi atendis renkontiĝon kun iu frustrita donjuano, tamen ne... Modesta, ĉarma en interhomaj rilatoj, parolanta mallaŭte kaj ege kortuŝe, li multe impresis nin.

Okaze de la libroprezento ĉe la Akademio de Sciencoj renkontiĝis politikistoj, akademianoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, diplomatoj, esperantistoj kaj pluraj ĵurnalistoj. Mi admiris la facilecon, kun kiu Bardhyl Selimi tradukis simultane la paroladojn. Aplaudon vekis la informo, ke danke al la universala lingvo *Hunda haŭto* atingis Pollandon, Luksemburgion, Usonon, kaj

eĉ Madagaskaron. Tomasz havis okazon rakonti pri aliaj libroj de albanaj aŭtoroj tradukataj al Esperanto.

Kion devus fari Esperantistoj en via urbo por allogi reprezentantojn de sep televidstacioj, dek ĵurnalistojn el lokaj kaj landaj gazetoj, reprezentantojn de radioj? Ĉi-foje sufiĉis antaŭinformi pri renkontiĝo kun la fama verkisto, kies verko estas eldonita en lingvo rara kaj ekzotika, tamen parolata en 120 landoj. La vorto “Esperanto” estis unusola, kiun ni komprenis provante legi gazetojn en la sekva tago. Ni alportis 50 ekzemplerojn da *Hunda haŭto* en Esperanto por ricevi aŭtografojn de la aŭtoro.

Al ĉiuj eminentuloj ni enmanigis salutmesaĝon de la direktoro de la Podlaĥia Libraro en Esperanto en la formo de privata letero kaj po du libroj eldonitaj esperantlingve en Bjalistoko. Ili ĉiuj tuj provis legi!

Albanio estas por mi mirinda lando de kontrastoj. Alia lingvo, alia mentalo. Mi supozis vidi rusan provincon, kaj ŝokis min supermodernaj domoj apud ruinigitaj dometoj. La malnova urbocentro de Tirano fakte ne ekzistas. Survoje al provinco tristigis nin skeletoj de iamaj fabrikoj, kiuj produktis uzante la rusan aŭ la ĉinan teknologiojn kaj nun estas fermitaj pro manko de mendoj. En modernaj vendejoj nur la lingvo de prezslipoj montras en kiu lando vi estas, ĉar produktoj estas vere internaciaj. Ĉu vi povas imagi mil parojn da uzitaj ŝuoj pendantaj sur la palisetaro uzata kiel ekspozicio? Eĉ tian vendejon mi vidis en Tirano. Sciante, ke en Albanio 25% de la landa produktado donas agrokulturo mi esperis viziti subĉielajn bazarojn plenajn

de nutraĵo kaj orientaj dolĉaĵoj. Bedaŭrinde, oni vendis tie nur uzitajn aŭ ĉinajn vestaĵojn.

Shaban Hasani — nia gvidanto dum turismaj ekskursoj — rakontis, ke multaj albanaj familioj havas eksterlande sian reprezentanton, kiu forveturis por mallege labori kaj sendi monon al la patrujo. Pri la terura tempo de la regado de Enver Hoxha rakontas ekspozicio en la Historia Muzeo de Tirano. Tio jam pasis, kaj albanoj denove vekigas sen timo. De la 7a horo matene kafejoj jam estas plenaj de viroj, kiuj trinkante ege fortan kafon pritraktas aferojn. Promenante laŭlonge de la plaĝo en Durrës oni admiras modernajn ripozdomojn kaj bluajn baseojn kun kristala akvo por malgrandaj infanoj. Apude estis videbla truo de iu konduktubaro, per kiu ripozdomo (?) elfluigas malpuraĵojn en la maron. Sur multaj tegmentoj de altaj kaj malaltaj domoj estas grandegaj ujoj por kolekti akvon, ĉar en diversaj kvartaloj de Tirano kaj en aliaj urboj ĝi estas porciumata.

En la universitato mi vidis ordeman, bone vestitan junularon, sed surstrate videblaj estis modestaj homoj: nek elegantuloj, nek mizeruloj. Plaĉis al mi, ke viroj ĉiam ŝajnas esti freŝrazitaj kaj havas kurte tonditajn harojn. Ĉiuj aspektis pacemaj kaj paciencaj: ili ridetis al ni, kiam ni provis interkompreniĝi. Mi esperas reveni Albanion post kelkaj jaroj por vidi tion, kion mi ne sukcesis vidi dum la kelktaga restado. Espereble nia alveno helpis al lokaj esperantistoj varbi por Esperanto junularon kion ni el la tuta koro deziris al niaj ĉarmaj gastigantoj adiaŭante ilin.

Elżbieta Karczewska



Temo

Tirano: La televida programo pri Esperanto.

3 Vojaĝo tra Okcidenta Albanio

(Vizito de 12 diverslandaj esperantistoj, somere 2001)

Ĉi somere prezentiĝis al ni nekutima ŝanco. La vojaĝagentejo de Lucille kaj William Harmon el Oakland, Kalifornio, proponis semajnan vojaĝon tra Albanio post la UK en Zagrebo, Kroatio. Ni hezitis. La lando, ĝis la granda politika ŝanĝiĝo de la jaro 1989 estis tute fermita., ĝi estas eĉ hodiaŭ nekonata en la okcidenta parto de la mondo. Oni opinias ĝin malkonforta, malcivila, malsekura kaj danĝera. Germanlingva vojaĝlibro tute ne ekzistas kaj la ununura trovebla stratmapo montras multon alian norden kaj orienten de Albanio, sed Albanion mem nur parte. Aldoniĝis ankaŭ la malfavora sezono, la plej varmegaj semajnoj de la jaro. Tia vojaĝo promesis do ĉiuspecajn surprizojn kaj absolute devis esti lacigea.



Aliflanke nin logis la perspektivo, ekvidi la landon, kiun kvazaŭ neniu vidintis, krome la ebleco kontakti enlandajn esperantistojn kaj babilante kun ili pri si mem kaj ties vivo kaj lando, akiri tutfreŝajn informojn, ne preparitajn kaj ne kribritajn de iu ĉiĉerono. La jam en Meksikio kaj Koreio spertita kaj sukcesa aranĝo de la vojaĝoj dank'al la Lucille-agentejo nin konvinkis kaj konfidigis. Ni do decidis partopreni ĝin.

Sabaton, la 28an de julio 2001, la vojaĝgrupo kunvenis en la halo de la hotelo Esplanade, situanta inter la stacidomo kaj la botanika ĝardeno de Zagrebo. Dekduana estis nia grupeto: Lucille kaj William Harmon el Usono, Kalifornio, la geedza paro Kim el Koreio, Sizuki Okada kaj Ryuzo Yamasaki el Japanio, Heta Kesala el Finnlando, Josef Shemer el Izraelio, Rochelle Grossmann el Nova Jorko, Usono, Henry Studer el Halifakso, Kanadio kaj ni, la geedza paro Fillmann el Germanio. Eta buso nin portis al Slovenio, ĉar de Zagreb oni ne povas aviadile atingi Albanion. Dufoje ni tranoktadis en Bled, en la suda rando de la Karavankaj montoj, tiel ni povis viziti la mezepokan kastelon ĉe la lago de Bled kaj la enlagan insulon kun ties monaĥejo. Dimanĉe posttagmeze ni laŭmigris ĉarman montan valetan.

Kaj lunde ni do flugis. En la aviadilo sidis apud mi junulo, kiu revenis de piedpilka ĉampionado. Li naskiĝis en Kosovo, vivintis dum dek jaroj en Dusseldorf, Germanio, parolis flue la germanan kaj multe preferis vivi en Germanio ol en Kosovo.

Dum la albania semajno nin prizorgis Bardhyl Selimi el Tirana. La enlandan organizadon prenintis la vojaĝagentejo "Tirana", kies estro Adem Ymeraj pretis persone nin akompani dum la tuta vojaĝo. Ofte ankaŭ partoprenis lia filino Luljeta, kiu foje angle, foje france, ĉiam ĉarme kaj gaje babilis kun ĉiu.

Nu, vere la vojaĝo estis laciga, temperaturoj grimpis ĝis 38 ° C en la ombro (certe neniu devigas vin resti en la ombro!) kaj Lucille Harmon petintis, ke oni montru al ni tiom, kiom ajn eblos. Kaj tiel oni agis: ni vidis la landon norde, sude kaj meze, ni estis supre en la montoj kaj malsupre ĉe la marbordo.



En restoracio en Tirana

Nia elstara ŝoforo stiris la buseton sekure laŭ la plej aventuraj vojetoj kaj pontetoj, ne nur trapasis, sed eĉ venkis ĉiujn policajn kontrolojn - ĉiutage almenaŭ unu - ĉarme, pacience kaj homsperte. Unuescepte: kiam iu protektanto de la albana leĝordo post profunda kontrolo de ĉiuj busaj vojaĝpaperoj - kiuj jam ofte estis bone elpruvitaj - la fermitajn kurtenojn li kritikis, tiam nia ŝoforo perdis sian paciencon kaj furioze eksplodis. Danĝeriga situacio kaj nur Bardhyl Selimi, la ĉiĉerono, matematika profesoro, ĵurnalisto kaj kosmopolito samtempe, scipovis ĝin savi. Ridetante li komplimentis la sinjoron trafikpoliciston, ke tia zorgema precizeco certe bonege impresos la vojaĝgrupon, internacian komision cetere, kiu travojaĝas la landon por kontroladi la ĝeneralan sekurecon en Albanio. Nur bedaŭrinde la gesinjoroj iomete lacas kaj bezonas en la tagmeza varmego ripozon malantaŭ la fermitaj kurtenoj. - Kaj tiel ni evitis pluajn malagrablojn kaj nenecesajn mondonacojn. Ĝenerale Bardhyl Selimi elstare ĉiĉeronis nin klarigante ĉiujn eblajn politikajn, kulturajn, historiajn trajtojn kaj faktojn de sia lando. nelaciĝante li respondis al niaj senfinaj demandoj, ĉu ili estis simplaj, ĉu komplikaj.



En urbo de Kruja

Same li amas Albanion kaj Esperantujon. Li sukcesis renkontigi kun ni enlandajn esperantistojn, tri el liaj lernantinoj, Matilda, Fjoralba kaj Denisa, same la ĵurnaliston Zamir kaj la direktoron de la Albana Esperanto- Instituto, Vasil Pistoli kaj la instruistino Enkela Xhamaj, kiuj eĉ akompanis nin dum partoj de la ekskurso kaj tagmanĝis kun ni.

Enkela Xhamaj ekde ŝia dekkvinjariĝo verkis poeziojn en esperanto.

En la ĉelaga Shkoder, norde de Albanio, vivis iam Zef Mjeda, fama esperantisto, honora membro de UEA, verkinta dikanon vortaron (Albana-Itala-Esperanta) kaj tradukinta la albanan eposon de bravuloj kaj popolfabelojn, legendojn kaj rakontojn. Ni havis la okazon viziti lian hejmon, renkonti lian familion kaj babili kun la nepino Klea, kiu lernis Esperanton de sia avo.

Volante nombri la vizititajn vidindaĵojn, la raportanto ĉiam devas pripensi ĉu troa detaleco jam enuigas la legonton. Plurfoje kaj zorge ni vizitis la ĉefurbon Tirana, la placon Skanderbeg kaj la Nacian Historian Muzeon ĉe ties rando, la monumenton de Skanderbeg surĉevale starigitan en la jaro 1968, la moskeon de Et-hem Bej kaj la Palacon de Kulturo. De la giganta monumento de Enver Hoxha restas nun nur la bazalta bazo. Lia maŭzeleo, grandioza piramido kun blua vitro, estas nun internacia centro de kulturo. La kvartalo, en kiu loĝis iam la prominenta registaro kaj ties kunuloj, ĝis la jaro 1990, bone izolita de la albana popolo, nun estas alirebla al ĉiu kaj ne havas pli ion rimarkindan. La muzeoj de la urbo ebligas bonege la diligentan vizitanton informiĝi pri la historio, kulturo kaj la arto de la lando.



Lucille kaj William Harmon

Nemalproksime de la placo Skanderbeg, ĉerande de la granda Bulvaro "Zog la Unua" troviĝis malpli bone videbla monumento dediĉita al Osman Kazazi, kiu de 1944 ĝis 1990

devis resti en malliberejo pro siaj politikaj konvinkoj. La triono, oni diras, de la loĝantaro de Albanio scipovas rakonti pri propraj spertoj en malliberejoj, internulejoj kaj aliaj policaj persekutadoj.

Aliaj urboj, kiujn ni vizitis, Shkoder kun ĝia teatro " Migjeni" kaj la fama kastelo de Rozafa, de kie oni ĝuas la pentrindan pejzaĝon de la rivero, lago de Shkoder kaj la fortikaĵo, Berat, la urbo de mil kaj unu fenestroj, unuj super la aliaj, ties impresa kastelo, ene de kiu ankoraŭ ekzistas kvartalo loĝata kun multaj malnovaj domoj kaj 44 preĝejoj. Ni rajtis eniri por vizito en unu el ili kaj plaĉis al ni la pureco kaj komforto ene. De ĉi tie ni iris tra la tradicia osmana kvartalo al la Muzeo de Etnografio, jam pentrinda, malnova kaj nobela domo indas vizitadon. La muzeo Onufri kun ĝiaj ikonoj estis fermita, bedaŭrinde.

El la klasikaj urboj ni vidis Durres, la Durrachium de la romianoj, kun ĝia romia amfiteatro. kaj la palacon de la reĝo Zog la Unua, alte sur la monteto, de kie la italoj kontrolas nun la Adriatikan Maron; Butrinton aŭ Butrotum de Virgilio, fondita de iliroj kaj grekoj, sed ne de la trojanoj, la dua klasika loko, kiun ni vizitis, kun ties bonege konservitaj ciklopoj muregoj kaj la porda skulptaĵo, leono taŭron kaptanta, estis kulmino, kiu ne nur ravas historiistojn, sed ankaŭ la homojn, kiuj ŝatas revii pri la pasintaj epokoj.

Saranda en la varmega sudo, la urbo de kvardek sanktuloj, Santi Quaranta, impresis nin ne nur per ties pentrinda situo ĉe la golfo, des pli per ties vivega, sopirata vespera feria etoso. Estis la unua de aŭgusto, por multaj albanoj la unua vespero de la dusemajna ĉe-akva libertempo. Tio estis la plej suda urbo de la vojaĝo, Gjirokastra, la grizŝtona urbo, kiu vere malbone videblas kontraŭ la griza ŝtono de ĝia montaro, la naskiĝurbo de Ismail Kadare, jam situas pli nordoriente. Tie ni vidis malnovan urbon, malliberejon dum la epoko de la nazioj, poste muzeon pri militaĵoj kaj moderna historio de Albanio.

Kaj ne forgesindas Kruja, ankaŭ ĝi kulmino. Malfacila vojo kondukas nin alten al la monto, singardeme nia buseto laŭas la mallarĝajn stratetojn. Elbusiĝinte ni staras antaŭ la malnova, malebene pavimita sed rektega strateto, dekstre kaj maldekstre pentrindaj malnovaj turkaj dometoj kun antikvaj vendejoj, la plej bela bazaro de la tuta Albanio. Ne estis facile logi la vojaĝgrupon tra tiom altira templo de la tentado ĝis la vera celo de tiu posttagmezo, la restaĵoj de la giganta kastelo. Ĉi tie estis la ĉefa bazo de la albana princo Gjergj Kastrioti, kiu de Murat la Dua ricevintis la nomon Iskander, Aleksander, kaj de ĉi tie li defendis sian landon kontraŭ Murat kaj la osmana armeo de 1443 ĝis 1468, je plej bona sukceso! La historio konas lin kiel Skanderbeg, la heroon de Skiptaroj. Meze, inter la restaĵoj staras la moderna domo, desegnita kaj konstruita en la jaro 1982 de Pranvera Hoxha, la filino de Enver Hoxha, laŭ la deziro de ŝia patro. Ĝi dokumentas la historion kaj la legendon de Skanderbeg, sed same ankaŭ la identecon de la lando mem. Kion oni povas montri dum unu semajno, tion oni fakte montris. Estis sufiĉe por entuziasmigi nin pri Albanio, la beleco de ties pejzaĝo kaj naturo. Sufiĉe por konvinki nin ke Albanio, kaj dum pasinteco, kaj en nuntempo, estas kultura lando, ĝi posedas cetere propran legindan literaturon tradician kaj modernan. Lando ankaŭ, kiu indas nian respekton kaj simpatian, defendinta sin kun amo de libereco kaj kun kuraĝo kontraŭ atakoj de potencoj pli fortaj proksime kaj fore. Ĉiuj albanoj estas Skanderbergegoj.

Multaj albanoj bone aŭ bonege parolas la italan. Pro tio mi havis la ŝancon kaj eblecon, iomete babili private kun multaj albanoj dum tiu semajno. Mi aŭdis multon pri la sufero kaj malriĉeco, konsekvencoj de la sorto de la lando, kiu vivis dum duona jarcento en fera izoleco sub plej forta socialista diktaturo. Sed dum tiaj mallongaj konversacioj mi ofte ekkonis la albanojn kiel malfermajn, elkorajn, gajajn kaj amindajn homojn.



Sinjoro Fillman maldekstre

Sed tiun impreson ekhavis ni ĉiuj: ni ĉiuj lernis estimi kaj ami albanojn kaj ilian landon. La 6an de aŭgusto ni reflugis al Ljubliana, la fina punkto de nia vojaĝo. Tie la grupo pasigis gajan vesperon kaj poste disiĝis. La sekvan matenon, la du germanaj partoprenantoj prenis la trajnon al Zagrebo kaj flugis de tie al Frankfurto. Tie ni alvenis je la 16a, sed al Ottweiler, nia urbeto, ni alvenis nur je la 21a horo.

Hartmut Fillmann

4 Letero de Henri Studer, Usono

Unue mi ŝuldas al vi miajn korajn dankojn pro via bonkoreco, afableco kaj laboro dum la vojaĝo kun nia Esperantista grupo tra via lando Albanio antaŭ monato. Mi ŝatis la tutan vojaĝon, eĉ kiam mi, en la plej malantaŭa seĝo de la aŭtobuso, saltiĝis de tempo al tempo ĝis la busa plafono kaŭze de iu malglataĵo sur la vojo. Mi antaŭe havis nebulan ideon pri via lando kaj la albana societo. Kaj 7 tagoj tute ne sufiĉas por akiri profundan veran scion. Sed la sperto estas neforgesebla.

En mia Esperanto-grupo ĉi tie en Davis, Kalifornio, partoprenas universitata studento. Li estas sveda. Kiam mi deklaris, ke mi ĵus revenis de Albanio, li aspektis nekredema kaj asertis, ke laŭ multaj en la nordaj eŭropaj landoj la albanoj havas malbonajn reputaciojn. Nu eble li pravas, sed mi dum 7 tagoj en Albanio ne renkontis eĉ unu malbonulon (krom tiu policano, al kiu malplaĉis la kurtenoj en nia aŭtobuso, kaj eble eĉ li nur penis fari sian laboron kiel eble plej bone!). Fakte, mi sentis min hejme en via lando.

Due, mi ŝuldas al vi dankojn pro tio, ke vi stimulis mian intereson en via lando kaj en la aliaj balkanaj landoj. Kaj post kiam mi tralegis vian ret-poŝt-mesaĝon pri la historio de Kosovo, mi aĉetis la libron de Schwartz kaj nun legas ĝin. Estas interese, ke mi malkovris ĉi tiun libron, kiu estis verkita en la angla, per resumo en Esperanto!



Sinjoro Studer dekstre

Mi kaj mia edzino ofte vojaĝas en aliaj landoj per Elderhostel. Tiaj programoj okazas en multaj landoj, eĉ en aliaj balkanaj landoj kiel Rumanio kaj Bulgario. Mi opinias ke la tempo jam venis por starigi Elderhostel-vojaĝprogramon en Albanio. Usonanoj multe profitus de tio. Kontrolu la jenan adreson por havi pli da informoj pri Elderhostel : <http://www.elderhostel.org/>

Mi supozas, ke la infanoj jam revenis al via klasĉambro kaj la nova studjaro komenciĝis. Gvidinte kaj prizorginte nian grupon dum semajno, eble vi nun sentas vin je ferio en via klasĉambro. Nu vi meritas iom da ripozo!

Sincere **Henry Studer** hestuder@ucdavis.edu ,16.09.2001

5 Mi estis feliĉa en Albanio

Letero de Young Myung Kim (Sudkoreio)

Mi kore salutas vin. Ĉu vi bonfartas? Pere de via sindonema servo por nia vojaĝo ni estis ege feliĉaj dum nia restado en Albanio. Mi tutkore dankas vin kaj bonvolu transdoni mian saluton al aliaj konatuloj.



Sinjoro Kim kaŭranta kun sia edzino maldekstre

Hodiaŭ mi sendas al vi 22 fotojn de tiam. Bv transdoniilin al aliaj.



Young Myung Kim (Koreo) esperanto@hananet.net 16.08.2001

6 Esperantistoj vizitis Albanion

(Artikolo de Josef Ŝemer, publicita en la paĝo 20 de Israela Esperantisto , oktobra numero 2001)

Ĉu vi renkontis foje Israelanon, kiu vizitis Albanion? Mi ne! Eble pro tio mi tre ĝojis kiam Lusi Harmon, la aktiva esperantista vojaĝagento el usono, proponis al mi en la komenco de la jaro aliĝi al sia grupo de esperantistoj, kiuj intencas viziti Albanion tuj post la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Zagrebo , Kroatio.



Mi aliĝis al la ekskurso kun timo: ĉu mi ne riskas mian vivon? Ja ekzistas milita stato en tiu parto de la mondo! (fakte ne en Albanio mem, sed en la najbaraj Makedonio kaj Jugoslavio..)

Kaj krome, Albanio estas neevoluinta lando. Oni diris al mi, ke ties vojoj estas danĝeraj, mankas tie bonaj kondiĉoj por turistoj, ne valoras tien iri, ktp.

Sed mi decidis tamen iri, nur pro tio ke temis pri esperantista grupo, do pri "rondo familia".

Ni estis 12 e-istoj el 6 nacioj: Usono, Japanio, Koreio, Germanio, Finnlando kaj Israelo. Ni flugis al Tirana, la ĉefurbo, kie akceptis nin la loka esperantista aktivulo kaj instruisto Bardhyl Selimi. Dum 8 tagoj li gvidis nin per buseto tra la tuta lando. Nia internacia "familio" (mi ne troigas!) spertis neforgeseblajn travivaĵojn en tiu tre interesa lando, vizitante historiajn lokojn kaj veturante tra belaj montaraj kaj marbordaj panoramoj.



Ni lernis multe pri la riĉa historio de Albanio ("Ŝkiperija" nacilingve) kaj ties popolo. Pere de s-ro Bardhyl, "nia zorganta patro", ni plej bone konatiĝis kun la vivo kaj problemoj de tiu popolo, kiu antaŭ 10 jaroj liberiĝis de prema diktatora reĝimo. Ni povis vidi en kiuj malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj vivas la plimulto de la civitanoj. Tre interese kaj ekscite estis

la renkontiĝoj kun diversaj lokaj esperantistoj, inkluzive de gejunuloj. La etoso reginta dum la tuta semajno estis tre bona kaj amikeca. Estis pruvite denove, ke dank' al Esperanto eblas profiti de unika interesa kaj lerniga turismo, enhavanta amikajn interrilantojn kun lokaj civitanoj.

Ĉiuj membroj de la grupo esprimis en la fino de la vojaĝo grandan dankon al nia albana amiko Bardhyl, sen kiu la vizito en Albanio tute ne ebligus kaj certe ne tiom sukcesus.

8 Intervjuo kun David Kelso

(Dum lia vizito al Albanio aprile 2004)

1 Kio vekis ĉe vi intereson pri Albanio?

Dum multetaj jaroj mi interesiĝis pri Albanio. Kial? Nu, antaŭ la jaroj 90-aj, ĝi estis sendube la lando malplej konata en Eŭropo, do por mi misterplena! Eĉ post 1990, ĝi estis/estas iom aparta: la popolo kaj la lingvo estas unikaj en Eŭropo, plej eble, kun la litova kaj la vaska, unu el la plej antikvaj en la kontinento. Ankaŭ, de mia legado pri Albanio, ŝajnis ke la vivstilo - precipe en la kamparo - estis ankoraŭ sufiĉe *aŭtentika*, per kio mi intencas diri, ke la homoj vivas ankoraŭ sufiĉe proksime al la naturo kaj al sia historio. Mi konstatis, ke Albanio estas malriĉa lando; tamen, mi jam de longe konvinkiĝis, ke riĉeco estas relativa eco: riĉulo en Peŝkopio estus malriĉulo en Parizo, kaj inverse.



Sinjoro Kelso maldekstre kun menuo enmane en restoracio tradicia en Kruja

Pri la esperanto-movado en Albanio mi ege miris: kiel ajn oni lernis, instruis, uzis kaj privarbis Esperanton sen oficiala aprobo, sen internacia vojaĝado, sen rimedoj? Albanaj esperantistoj, mi konkludis, devas esti aparte lertaj homoj !

Kion vi jam vizitis enlande?

2 Dum mia lastatempa 5-taga vizito al Albanio dum la paska festsezono, mi vidis nur malgrandan parton de la lando (je antaŭa unutaga vizito, de Korfujo, mi ankaŭ ekkonis Sarandon). Ni alvenis en Durrës (de Bari, en Italio), sed ne restis por rigardi, ĉar miaj kunvojaĝantoj volis atingi Tiranon kaj kiel eble plej rapide ekiri al la marbordo (ĉe Dhermi), dum mi restis en Tirano. La morgaŭon, dank' al la sindonemo de Shaban Hasani, mi vizitis

Krujon, kiu ege imponis: la arkitekturo, la kastelo, la bektaŝa *tekejo*, la bazaro kaj la muzeo (kiu tre sukcese, mi opinias, agordas kun la antikva ĉirkaŭejo). Mi precipe ĝuis la etnografan muzeon, kie oni povas vidi la tradician vivstilon de albana familio, kun bonega ĉiĉeronado far la klerega gardisto. Cetere, mi esploris Tiranon piede kun Bardhyl Selimi: bulvarojn, placojn, la *Blokon*, foirejojn, katedralojn, moskeon, la *piramidon*, k.c.

Kiaj estas viaj bonaj kaj malbonaj impresoj pri la lando?

3 Bonaj impresoj? - la laboremo kaj entreprenemo! Nekredeblaj. Eĉ dimanĉon duono el la butikoj funkcias kaj ĉie troviĝas apudstrate kamparanoj, kiuj vendas legomojn, fruktojn, fromaĝon kaj urbanoj vendantaj nu, ĉion ajn, ŝajne, de pordoj kaj fenestroj ĝis ŝupolurado kaj mempesado ! Kaj tiom da novaj, belaspektaj butikoj, kafejoj, oficejoj. Tirano ja moviĝadas ! La homoj ŝajnis senescepte ĝentilaj, afablaj, helpemaj (ĉu ankaŭ ĉeĥjme, kiu scias ?!).

Malbonaj? Nu, la ĉiea rubaĵo. Mi ĝojis vidi, kiel oni komencis beligi la riverbordon en la urbocentro kaj esperas ke, pograde, oni tiel plibonigos la tutan urbon, ĉar la vizitanto tuj rimarkas rubon, kvankam la tieulo ofte preterrigardas pro kutimiĝo. Kaj la ŝoseoj! Necesas mono por fari, ripari kaj plibonigi la stratojn, mi scias, sed mi esperas ke oni laŭeble ĝustigos la ŝoseojn tiel ke la plibonigoj daŭros. Tiuj estis miaj solaj impresacoj.

Ĉu vi povas rimarki iajn paralelojn inter ambaŭ landoj?

4 Ho, mi rimarkis tiom da paraleloj inter Albanio kaj Skotlando, Albanio kaj Kalabrio (kie mi aktuale loĝas kaj laboras). Kaj Albanio kaj Skotlando estas malgrandaj, belaj landoj kun potencaj najbaroj kaj historio de malriĉo, kio neprigis laboremon, entreprenemon kaj, foje, batalemon. (Antikva nomo de Skotlando, fakte, estas *Albanio*, el la gaellingva *Alba*). Ni skotoj ege fieras, kiel vi, pri nia nacia idento - eble eĉ tro! Nia kamparo estas plejparte montara: bela sed malriĉa kaj malfacile travojaĝebla. Nia nacia heroo William Wallace (*Ŭiljem Ŭoles*), ĉefrolulo en la filmo *Braveheart*, tre similis al via Gjergi Kastrioti Skanderbeg.



Ankaŭ kun Kalabrio vidiĝas multaj paraleloj: la montoj, la vilaĝoj, la abunda marbordo, la bonega manĝo (kiun Skotlando ne rivalas), historio de subpremado, tradicia agrikulturo eĉ la lingvo, ĉar unu el la lingvoj de Kalabrio estas la albana (*arbareŝa*), tien portita de albanaj rifuĝintoj post la morto de Skanderbeg kaj ankoraŭ parolata en deko da montaraj vilaĝoj. Kvankam la suditaloj, ĝenerale, estas iom bruemaj kaj histrionaj, en la montoj, mi rimarkis, la homoj estas pli kvietaj, ankaŭ laboremaj kaj ĝentilaj, kiaj la albanoj. Kia opinio ekzistas pri albanoj kaj Albanio eksterlande?

5 Bona demando, kvankam malfacila. Nu, unue, mi konsilus, ke oni legu iom pri la historio de Albanio, ĉar hodiaŭa Albanio rekte kaj klare spegulas sian historian travivon. Due, ne kreu ĉion kion oni legas en la ĵurnalaĉoj pri albanoj en Italio kaj aliloke. Malfeliĉe, malmultaj albanoj, pro ekstrema malhavo kaj troa avido, eniĝis en la pli maldecajn partojn de la okcidenta ekonomio - sukcesege, parenteze ! - sed ili estas malgrandega ekcepto. Trie, pripensu la sorton de popolo, kies lingvon preskaŭ neniu komprenas ekster en la propra lando: ili nepre devas lerni kaj uzi ne nur unu, sed plurajn fremdajn lingvojn, ĉu la turkan, la serban, la grekan, la italan, la rusan, la anglan, la germanan. Kiom maljuste, kompare kun ni anglalingvanoj. Kiom pli juste, se ni ĉiuj scipovus la gepatran lingvon, kaj duan, tutmondan, neŭtralan helplingvon!

Intervjuis Bardhyl Selimi, aprilon, 2004

Aldonaĵo

Prelego

Albanio, Skotlando, Kalabrio: komparoj kaj kontrastoj

(Lekcio prelegata de David Kelso antaŭ studentoj de Nacia Hotelumada kaj Turisma Mezlernejo en Tirana, aprile 2004)



Kiel vizitanto al Albanio, mi konscias tiom da paraleloj inter tiu lando kaj mia hejmlando, Skotlando. Ankaŭ, koincide, inter Albanio kaj la landparto, kie mi aktuale loĝas kaj laboras, Kalabrio en Italio.

Dum jarcentoj (eĉ miloj?) Albanio strebadis realigi sian nacian identon. Same Skotlando. Skotlando estas malgranda lando (5 m. da enloĝantoj) apud Anglio (50 m.) kun kiu (kaj Kimrio) ni dividas la insulon Brition. Jam dum tri cent jaroj ni estas unu ŝtato - la *Unuiĝinta Regno de Britio kaj Nordirlando* - sed Skotlando restas aparta lando, popolo kaj kulturo. Lastatempe ni denove havas nian propran parlamenton por enlandaj aferoj kiaj sanservoj, edukado, transporto k.s. Interese, kvankam la romianoj invadis Brition kaj okupis Anglion dum preskaŭ 500 jaroj, ili ne sukcesis konkeri Skotlandon (aŭ eble decidis ke ne valoris la peno!?) De tiu epoko ĝis la Unuiĝo kun Anglio (1707), t.e. dum pli ol mil jaroj, Skotlando estis sendependa lando, preskaŭ konstante batalanta kontraŭ sia pli granda, pli potenca, pli riĉa najbaro, Anglio. Ĉu vi albanoj rekonas tian historion?

Grandega heroo de tiuj militoj estis William Wallace (*Ŭeljam Ŭolas*), la ĉefrolulo en la mondfama filmo *Braveheart* (*Kuraĝkoro*). Denove mi vidas paralelojn kun Gjergj Kastrioti Skanderbeg, eĉ iom da fizika simileco. Ambaŭ estis elstare fortikaj kaj kuraĝaj; ambaŭ estis veraj patriotoj kaj dediĉis siajn vivojn al la patrujo, ne por gloro, nek riĉo, nek potenco, sed tutsimple por libero, por ke ni vivu laŭ niaj propraj kutimoj, uzu niajn proprajn lingvojn, sekvu ĉiu la propran religion, ktp. Ambaŭ, ŝajne, siavive fine malsukcesis; ambaŭ tamen lasis memoregon, kiu ebligis plipostan realigon de tiu revo.

Malgrandaj landoj devas klopodegi por pretervivi. Tial famaj albanoj kaj skotoj troviĝas multloke ekster sia propra lando, precipe en najbaraj, imperiaj landoj. Skotoj inventis la vapormotoron (Watt), la biciklon, la modernan ŝoseon (*tarmacadam* el *MacAdam*, la inventinto), la pluvmantelon (*Macintosh* aŭ simple *mac*), la pneumatikon (Dunlop) kaj la poŝtmarkon. Skoto fondis eĉ la nacian bankon de Anglio (nun de Britio), la *Bank of England*, kaj oni povus diri ke la moderna petrolindustrio komenciĝis en Skotlando per minado kaj uzo de parafino en la deknaŭa jarcento. Dum la daŭro de la Brita Imperio, skotoj troviĝis ĉie kiel inĝenieroj, kontistoj, bankistoj, soldatoj, kuracistoj, misiistoj (ekz. David Livingstone en Afriko) kaj administrantoj - tutsimple ĉar mankis ĉehejme ekonomiaj oportunoj. Same la

albanoj kaj antaŭ ili, la ilirianoj, ĉu ne, en la imperioj greka, romia, bizanca, otomana ktp ? Kaj en Skotlando kaj en Albanio la edukado estis ĉiam plej grava: la usona sistemo de supera edukado modeliĝas plejparte de la skotlanda.

Strange, la antikva nomo de Skotlando estas *Albanio* (anglalingve, *Albany*), el la gaelalingva *An Alba*. Historie, Skotlando havis kvar lingvojn: la piktan (neniam skribita, uzita ĉefe en orienta Skotlando ĝis la 11-a jarcento); la gaelan (de Irlando, ankoraŭ parolata, ĉefe en okcidenta Skotlando); la skotan (tre simila al la angla sed ĝis la 17-a jarcento, aparta lingvo uzata oficiale ĉie en meza Skotlando; nun nur dialekto de la angla); kaj la anglan. Tiu ĝermandevena lingvo estas parolata en sudorienta Skotlando samlonge kiel en Anglio. Hodiaŭ la unua lingvo de ĉiu estas la angla, kvankam la gaela kaj la skota ankoraŭ audiĝas.

Paraleloj kun Kalabrio estas pli fizikaj ol kulturaj. Kalabrio, kiel Albanio, estas bela, montara, mediteranea lando, kie troviĝas bilanco inter suno kaj pluvo (en Skotlando tute mankas tia bilanco!). Ankaŭ Kalabrio spertis invadojn: de antikvaj grekoj (Kalabrio tiutempe nomiĝis *Granda Grekio* - *Magna Graecia*), de romianoj, bizancanoj, kaj turkoj, sed ankaŭ de vizigotoj, saracenoj, normianoj, aragonanoj, germanoj kaj francoj. Eĉ la britoj mallonge invadis dum la napoleona milito. Malkiel Albanio, Kalabrio neniam estis sendependa: dum 3000 jaroj ĉiuj regis Kalabrio krom la kalabrianoj mem. Ankaŭ laŭ ekonomio Kalabrio tre similas al Albanio: abundas la naturaj rimedoj, ĉu mineralaj, ĉu vegetalaj, sed ĝis lastatempe mankis industrio. Dum Albanio strebas ĝustigi la mankon, en Kalabrio malmulto okazas: krom turismo, agrikulturo kaj forstado, preskaŭ tute mankas ekonomia aktivo. La registaro en Romo investis miliardojn da eŭroj en suda Italio (la *Kaso per la Sudo*), kio uziĝis plejparte por aŭtovojoj, havenoj, pontoj, akvoservoj kaj similaj, sed ankoraŭ mankas vera industrio. Kaj la kalabrianoj? - ĉu ili similas la albanojn? Nu, iuj estas albanoj! Antaŭ preskaŭ 500 jaroj, post la morto de Skanderbeg, iuj miloj da albanoj rifuĝis al Italio kaj ekloĝis en Puljio (*Puglia*), Sicilio kaj Kalabrio. Post tiom da jaroj la lingvo (*Arbareŝ*) ankoraŭ vivas kaj uzatas ĉiutage en iuj montaraj vilaĝoj. Tamen, pli similas la lingvon de Gjergj Kastrioti ol la albanan lingvon de hodiaŭ! [Parenteze - ankaŭ pluvivas en Kalabrio dialekto greka - *grekaniko* - kiu uzatas jam dum pli ol 2000 jaroj]. Surface la kalabrianoj malsimilas la albanojn - pli eferveskaj, pli ekagemaj - sed mi rimarkis, ke en la montaraj regionoj (kie la homaro estas vere *kalabria*, sen tiom da mikso kun aliaj italaj gentoj) la konduto pli similas al la albana: serioza, laborema, honesta, konstanta.

Ĉu ni povas lerni ion el tio? Nu, la homoj ĉie samas kaj malsamas !! Vere, sed per interkomparo de Albanio, Skotlando kaj Kalabrio, ŝajnas al mi, ke oni povas vidi, ke gravas ne nur la homtipo, la genoj, sed ankaŭ la historio. Albanio, samkiel Skotlando kaj Kalabrio hodiaŭaj, estas rezultato de pasintaj epokoj, de historia travivo. La pasinto restas ĉiam aktuala, ĉu ne?

David Kelso

(Ellaborita en majo 2004)

9 Intervjuo kun francaj esperantistoj Pol kaj Mirej



... elkore dankas du francaj "vagabondoj" !...

Mirej kaj Pol

Intervjuo kun la francaj amikoj Pol kaj Mirej



En la valo de Valbona, norda Albanio

(La duan parton de junio 2013 vizitis nian landon la paro de la francaj amikoj Pol kaj Mirej. Ĉikaze ni petis de ili la jenan intervjuon)

D: Saluton, vi ĵus revenis el la dusemajna ekskurso tra Albanio. Kiel naskiĝis ĉe vi la ideo viziti ĉi tiun malgrandan balkanan landon?

Antaŭ 3 jaroj, okaze de franc-germana renkontiĝo, enpartoprenis ĝin nia albana samideano Bardhyl Selimi. Lia prezento de la lando estis tiom interesa kaj konvinka, ke ni havis tuj la deziron malkovri la landon, kiu ĝis nun ŝajnis al ni ŝlosita je la turismo.

D: Kiajn preparojn vi faris antaŭ ol alveni ĉi tie? Ĉu sufiĉis la informacio donita de la gvidlibroj, artikoloj ktp.?

Ni acĉetis la unnikan franclingvan gvid-libreton, "le petit futé", kaj landkarton por malkovri kulturon kaj valoraĵojn de Albanio. Sed ĉar tiu gvid-libreto ne estis racie konceptita, mi esploris en fadokumentaro de pluraj vojaĝagentejoj itinerojn kaj vizitindajn lokojn, kun la celo ricevi bonan ideon de turism-allogaĵoj.

D: Kion vi vizitis en Tirana kaj ties ĉirkaŭaĵoj kaj kiaj estis viaj unuaj impresoj pri la lando kaj la homoj?

Bardhyl amplekse implikiĝis koncerne la organizadon de nia restado, ĉefe por ke ni aprezu la ĉefurbon laĵ ĉirkaŭaĵojn, piede aŭ veturile, kaj tio dank' al Artur nia elstara ŝoforo!

Intervjuo kun la francaj amikoj Pol kaj Mirej

E n la valo de Valbona, norda Albanio

(La duan parton de junio 2013 vizitis nian landon la paro de la francaj amikoj Pol kaj Mirej. Ĉikaze ni petis de ili la jenan intervjuon)

D: Saluton, vi ĵus revenis el la dusemajna ekskurso tra Albanio. Kiel naskikis ĉe vi la ideo viziti tiun malgrandan balkanan landon?

Antaŭ 3 jaroj, okaze de franc-germana renkontiĝo, enpartoprenis ĝin nia albana samideano Bardhyl Selimi, Lia prezento de la lando estis tiom interesa kaj konvinka, ke ni havis tuj la deziron malkovri la landon, kiu ĝis nun ŝajnis al ni ŝlosita je la turismo.

D: Kiajn preparojn vi faris antaŭ ol alveni ĉi tie? Ĉu sufiĉis la informoj donitaj de . gvidlibroj; artikoloj ktp.?

Ni aĉetis la unikan franclingvan gvid-libreton, "le petit futé." kaj mapon por malkovri la kulturon ka laj valoraĵojn de Albanio. Sed ĉar tiu gvid-libreto ne estis racie konceptita, ni esploris en fafdokumentaro de pluraj vojaĝagentejoj pri itineroj kaj vizitindaj lokoj, kun la celo ricevi bonan ideon de turism-allogaĵoj.

D: Kion vi vizitis en Tirana kaj ties ĉirkaŭaĵoj kaj kiaj estis viaj unuaj impresoj pri la lando kaj la homoj?

Bardhyl amplekse implikiĝis koncerne la organizadon de nia restado, ĉefe por ke ni aprezu la ĉefurbon kaj la ĉirkaŭaĵojn, piede aŭ veturile, kaj tio dank' al Artur, nia elstara ŝoforo.

Bardhyl amplekse implikiĝis koncerne la organizadon de nia restado, ĉefe por ke ni aprezu la ĉefurbon laĵ ĉirkaŭaĵojn, piede aŭ veturile, kaj tio dank' al Artur nia elstara ŝoforo!



Artur, la taksiisto

Tial ni malkovris nepre vizitindajn lokojn, inter alie la tre riĉan, nacian muzeon de historio kun ties superbaj mozaikoj, kaj la muzeon de la bel'artoj, temo, kiun ni aparte ŝatas. Pli ol plaĉis al ni malkovri pentraĵojn de la albanaj impresionistoj kaj la originalecon de la kolekto pri pentraĵoj kaj skulptaĵoj de la epoko ligata al la socialista realismo.

Okaze de nia ekskurso ĝis la *monto Dajti*, kiun ni ŝuldis al la magio de la telfero, ni ĝuis belegan panoramon super la tuta regiono, punktita de kvieta ripozo kun refreŝiga trinkaĵo!



En la kafejo La Akvofonto de Feino en la monto Dajt

Cetere, surprizis nin la religia fervoro, kiu incitas je la 21a jarcento al starigo de novaj kaj multekostaj konstruaĵoj, kiel ekzemple iu katedralo honore al "Mère Teresa", kiu naskiĝis en Albanio, kaj tio fronte al tiom da farenaĵoj, kiuj faciligus la tagan vivon de ĉiuj ... La fasadoj je mil koloroj, kiuj "gajigas" la urbon je originala kaj neatendita maniero ravis niajn okulojn. Memkompreneble ni pli ol ŝatis la vidon je 360° super la urbo, post suprenatingo lifte de moderna rotacia restoracio. Nu, pli ol ĝuinde ankaŭ, promenadoj vespere, en tuta kvieteco, tra la parkoj kaj longe de larĝaj avenuoj, kiel la albanoj, frandante la revenintan freŝecon!

Dum la urbo kaj la tuta lando spertis ian "agitadon" pro la balotado cele renovigon de la Parlamento, ni miris, konstatante kiom la urbanoj kondukis tre agrable al ni, kaj pretis informi nin kaj eĉ enpartopreni babiladon! Ŝajnas, ke la albanoj tre feliĉas renkonti turistojn kaj estas scivolemaj pri ilia nacieco.

D: Ĉu vi povas priskribi aliajn ekskursojn viajn tra la lando, menciante la plej interesajn lokojn vizititajn?

Dum 14 tagoj ni sukcesis esplori la ĉefaĵojn de Albanio koncerne turismon. Memevidente necesus pli da tempo por malkovri ĉiujn facetojn de la lando, kaj ĉefe de ties loĝantoj, sed ĉio kion ni vidis, plenplene interesis nin! Ĉar Albanio, kiel ĉiuj landoj de la mediteranea ĉirkaŭo,

spertis sinsekvajn invadojn far grekoj, romianoj, otomanoj, turkoj, popoloj el Italio, eĉ foje francoj kaj multaj aliaj, ne mirigas malkovri multnombrajn restaĵojn de tiuj pasintaj epokoj.

Por eviti eventualajn ripetaĵojn, mi tajpos "liter-grase" lokojn kaj faktojn preferitajn. Alveno la 18an de junio. Malkovro de Tirana kaj de la monto **Dajti** dum la du sekvantaj tagoj. Ĵaŭdon la 20an, interesoplena babilado kun Ylljet Aliĉka, iama ambasadoro en Parizo. Poste vizito en la monaĥejo de la monaĥoj **Dervish**. Unu el ili afable informis nin pri la tiea vivo. Fine ni aprezis inviton de **Shaban Hasani kaj edzino**, tostante per apartaj trinkaĵoj, dum babilado - en speranto! - pri diversaj temoj.



En la hejmo de la prezidanto de la Albana Esperanto Asocio

La 21an, unua vizito "ekstere" en *Krujë*, kie ni malkovris rimarkeblan **etno-muzeon** en riĉa domo de iama eminentulo (1794), konstruita sine de ĉirkaŭmuro de la kastelo, en kiu troviĝas ankaŭ la muzeo de Skanderberg, nacia heroo, kiu sukcesis forpeli la turkojn transe de la landlimoj. Sekvas itinero al *Durrës* kun halto ĉe la kastelo de *Preza*, ebligante ĉirkaŭvidon je 360°!



La amfiteatro de Durrës

Multnombraj restaĵoj el la romia epoko, ĉefe amfiteatro por 20 000 spektantoj. Cetere, **abunda kaj varia fiŝaĵo**, ege bongusta, en plaĝ-restoracio, kun kafo gustumita en la lasta etaĝo de dom-turo, kiu aldonis plezuron pli "nuntempan", kun alloga observo de aktivaĵoj de la var-haveno kaj de la mar-strando.

Sabaton la 22an, jen *Berat*, kie atendis nin pluraj vidindaĵoj, la "kalaja" ("kastelo" albanlingve...) memevidente, ankaŭ bela etno-muzeo, sed ĉefe **aro da domoj**, el kiu originas la nomo "*urbo de la mil fenestroj*".



Karakterizaj domoj de Berat

La ege malnovaj glitigaj pavimaroj elprovis la lertecon de nia ŝoforo, kiu sukcesis suprenveturi la ŝoseon ĝis la citadelo, kie kelkaj privilegiuloj, daŭre ĝuas kvietecon kaj freŝan aeron en loko "ekster la forpasanta tempo". Trans iu malnova ponto (1780), tagmanĝo en "castle park", kie ni pli ol aprezis **tipe albanan pladon de fiŝaĵo!** Reveno per la sama vojo, ĉirkaŭata de montoj, kiuj ofertas novajn bildojn kontrastantaj kun la marbordo kaj la kultivitaj ebenaĵoj. Lasta halto sude de Durrës elmontras "galopantan" disvolviĝon de domkonstruado iom senorde, de tiu marbordo jam certagrade trookupita!

Jen agrabla vojo tra la kamparo por reatingi Tirana-n, en kiun ni enveturas tra industria kvartalo, alia bildo de la urbo, kiu tiumomente troviĝas en ia "febra agitado" pro la morgaŭa balotado. Hupadoj, petardoj, veturiloj ĉirkaŭitaj je rubandoj, kun pasaĝeroj svingantaj flagojn je la nomo de proponitaj kandidatoj!

3

Dimanĉon, la 23an, "ripoztago". Ni vizitas la kastelon de *Petrela*, je kelkaj kilometroj for de la urbo, kiu ankaŭ proponas vidaĵon de la ebenaĵo ĉirkaŭita de spronoj. La vojo trairas verdajn kaj freŝajn pejzaĝojn. Fulma halto apud banejo en plezur-parko, sed sen kvieteco, ĉar la allogaĵoj estas enurbaj, tie daŭre invitas la voĉdonejoj.

London, la 24an, jen elektita dutaga ekskurso sud-okcidente, al *Saranda*, la "Albana Riviera", pri kiu fieras la lando.



En la restoracio de Orikum, Vlora

Sed ni unue travivos densan programon. Halto ĉe la laguno de *Karavasta* kun ĝiaj pelikanoj, lokon kiun ni malfacile malkovris pro manko de voj-indikoj. Dank'al muskolaj brakoj de plaĝantoj ni eliris el iom malica sablo kaj senprobleme atingis *Ardenica*, lasta monaĥejo ankoraŭ okupita. Sed jen *Apollonia* kun imponaj romiaj ruinoj, kiuj najbaras la horizonton kaj ĉieestantan maron ...



Antikva urbo de Apolonia

Post tagmanĝo en alloga strand-restoracio, ekas suprenveturado, ne al infero sed al paradizo, ĉe la *pasejo Llogara*, 1027m, kie oni sentas la deziron "birdiĝi" kaj lasi sin ŝvebi ĝis la maro, malsupren!!!



Survoje tra la Albana Riviero

Kiom rava, superba! La mont-vojo, je ĉiu kurvo, ofertas al ni novan surprizon, novan okul-frapan, mirindan naturlokon! Sed ni devas malsuprenveturi, ĉar atendas nia hotelo en Saranda. Tie ni retrovos la agitadon de la ban-urboj, tute simila al tiu de ĉiuj turismaj urboj rande de maro ... Nu, ni ekdormos, "lulitaj" je multfacetaj bildoj!

Mardon, la 25an, akceptas nin miriga panoramo en la **"kalaja" de Saranda!** Kia ajn estas la angulo, kien ni okulumas, ĉio malsamas, filmas senhalte ĉiuj fotiloj, oni vidas la golfeton de Saranda ... plenplene "bolanta"! Konstruiĝas senbride, en perfekta anarkio, ĉiustilaj dom-ensembloj, kun la celo igi "turism-uzina" tiun etan angulon de paradizo... Kiom bedaŭrinde! Ĉirkaŭe tendas siajn "branĉojn" la mont-ĉenoj, divers-specaj kultivitaj kampoj koloras la pejzaĝon, horizont-funde la maro, kaj, tie, tute proksime *Corfou-insulo*, kiun oni verŝajne volas imiti, kun feri-klubo por gastoj ne tro mon-dotita. Sed ĉiuj tiuj valutoj bedaŭrinde ne profitas al la aŭtoktonoj! Tiun ĉarman lokon ni devas forlasi por atingi tute sude, kelkajn kilometrojn de la landlimo kun Grekio, unu el la plej rimarkeblaj vizitindaj lokoj de Albanio, **Butrint** kun la sennombraj restaĵoj de sinsekvaj epokoj kaj civilizacio ek de la 8a jarcento antaŭ nia erao! Ekde 1920 arkeologiaj esploroj daŭre malkovras novajn elementojn, kiuj riĉigas la lokon, agnoskitan de Unesko ekde la jaro 1992.



En Butrint, Mirej kaj Artur

Ni poste laŭiros la vojon ĝis *Gjirokaŝtër*.



Strato en Gjirokaster

Serpenta itinero tra montaro ... Ni lastsekunde evitas nesingardeman testudon, kiu kviete trairas la ŝoseon! Je kelkaj kilometroj ni haltas en kurioza loko, "**la blua okulo**". Temas pri subtera 45 metrojn profunda akvofonto, kiu tute ne timigas junajn riskemulojn salti enen ek de rok-elstaraĵo. Alveno en la valon de la *Vjosa - riverego*, kies akvo-fluoj jam el Grekio, devas printempe torente aperi. Sed fine de junio ili ne tiom imponas, kiom la strat-laboroj efektivigitaj por atingi la urbon *Fier*. Akra polvo penetras ĉien kaj fak-maŝinoj aktivas plurloke por transformi difektitan ŝoseon en belegan aŭtovojejon, kiu faciligos venonte komercajn kaj turismajn ligojn kun la interna regiono. En la tuta lando svarmas tiaj laboroj sturmtraktitaj, por "liberigi" urbojn lokitajn for de la maro. Oportuna halto en *Gjirokastër* por memkompreneble atingi la citadelon, - memevidente uzante samajn, superbajn glitajn pavimarojn: militposteno por kontroli la valon. De tie okulfrapa malkovro super la urbo, malnova aŭ nova, kun grizaj tegmentoj laŭ otomana stilo.

Antaŭ ol reatingi la mar-bordon, la vojo boras al si itineron tra seka kaj montara kamparo. Iom lacigite ni finos tiun esploradon sub temperaturo pli alta ol 30°! Sed por satigi nian scivolon, ni ja deziras malkovri plej amplekse tiun simpatian landon, jen ni denove estas pretaj por du ekskurso-tagoj sud-orienten. Por atingi *Elbasan*, unua halto, ni uzos la

freŝboritan tunelon sur la ellaborata bela aŭtovojo, kiu ebligas baldaŭ ligi Tirana al *Korça*, ankaŭ kun superba panoramo. Industria urbo, Elbasan enhavas ankaŭ ruinojn de la malnova fortreso, ĉar la urbo lokiĝas sur la fama *via Egnatia*, unu el la ĉefaj romiaj vojegoj, ebligante sekuran halton.



En La citadelo de Elbasan

Suprenveturante la valon *Shkumbin* ni atingos la *pasejon de Thana*, kie ni ĝuos denove belegan rigardon, ĉifoje al la lago *Ohrid*. Rava malsupren-veturado sen iu ajn obstaklo por la fotilo, kaj ni povos aprezi vidaĵon de la alia rando, en Makedonio kaj la insuleton *Lin*, kiun ni vizitos dum la reveno. Ĉe la pinto de la lago jen *Pogradec*, kie ni tranoktos. Ĉu pro iama somer-ripozurbo de la diktatoro, la urbeto aspektas iom pli modernigita ol la aliaj pri urbanismo, eĉ se kelkaj konstruaĵoj aŭ la granda ombrumita aleo elvokas iom la eks-sovetan stilon.

... Plaĉas ege al ni la etoso, tiom pli ke ni havas bonŝancon renkonti esperantistan veteranon, *Gjergji Gusho*, kiu plezure gvidas nin tra la urbo, cele malkovron de tipaj kvartaloj.



En Pogradec kun esperantisto Gjergji Gusho

Pogradec profitas pluson, ĉar lokita piede de montaro kaj rande de la granda lago, kiu ebligas enteni agrablajn temperaturojn longe de la jaro. Ni frandos la faman **Koran**, endema fiŝo de lago, kiu dum pra-epoko estis maro ... Jen salmaĵo sed ankoraŭ pli bongusta! Rapida ekskurso ĝis la plilgrimejo multe vizitita *Sankta Naum*. Sed ne eniras Makedonion, kiu deziras! Halto ĉe la landlimo-giĉetoj postulos unu horon da atendo! Okulumo ĉe la alia rando divenigas, ke necesos surveturi montvojon verŝajne ankaŭ belegan por atingi Pogradec.



La mirinda lago de Pogradec-Ohrid

Frumatene, la 27an, post solida matenmanĝo en la internacia hotelo, ni prunteprenas vojon al *Korçë*, kiu facile trairas la vastan ebenaĵon, sed ni surprize malkovras domaron tute apartan de tiuj, kiujn ni vizitis ĝis nun. Regas etoso duon-komunista, duon-orienta kaj la ampleksa plenaera bazaro sur la vasta placo plifortigas tiun impreson.



La malnovaj gastejoj en Korça

Ni dediĉos tempon por trairi tiun enorman stokon da diversaj varoj, kiuj koncernas dommastrumadon kaj profesiajn taskojn! Artur tute senpene aĉetos baterion por sia poŝ-telefono... inter centoj da ili! Plua vizito de najbara antikva karavanejo ... Oni facile imagas la etoson, kiu regis tiuepoke, kiam komercistoj renkontiĝis kun vendendaĵoj el ĉiuj anguloj de Eŭropo aŭ Azio. Tiu spektaklo forte memorigis al ni Uzbekion! Oni ankaŭ fulme piedumas ĝis tombejo, kie ripozas francaj soldatoj, kiuj militis por akceli ian liberecon de la albanoj.



La tombejo de la francaj falintaj soldatoj

Tiu evento iĝas tiom neatendita, ke ĝi meritas esti konata! Vizito de la nova ortodoksa preĝejo, de la "orienta" muzeo riĉa je diversaj trezoroj, tapiŝoj, pentraĵoj, brodaĵoj, ktp ... sed kiu plej interesis nin estas malkovro de la muzeo de la latina alfabeto, skribliteroj instruataj ek de ... 1887! Diversaj dokumentoj de la sama epoko elvokas laboron de la iamaj lernantoj! Lasta eta halto piede de la malnova moskeo, kies videblaj fundaĵoj postulos monatojn da laboro antaŭ ol retrovi sian iaman aspekton certe okulfrapan ...

Nu, ek al *Voskopojë*, altitudo 1200 metrojn, kiu famiĝas pro siaj preĝejoj. La vojo enŝoviĝas tra la montaro, sed pluvo pli kaj pli densa vualas la pejzaĝojn certe vidindajn kaj ni malkovras neatendite, je la horo de tagmanĝo, vilaĝon en plenplena renoviĝo. Ni profitas gastigon de freŝmalfermita, tipa restoracio, kie mirinda ŝafaĵo satigas nian apetiton! Daŭre densiĝas la pluvo kaj Artur lerte manovras sian stirilon por veturi sur tute difektita ŝoseo... Spite vanan serĉadon de emfazita monasterio kaj de preĝejoj entenantaj unikajn freskojn, ni rezignis kaj retroveturis por retrovi Tirana-n! Eta halto ĉe rando de la lago *Ohrid*, kie finfine reaperas suno, kiu akompanos nin ĝis la hotelo!

Vendredon la 28an – Du urboj en la vizit-programo, *Lezhë* kaj *Shkodër*, ambaŭ nord-okcidente, ĉe la landlimo de Montenegro kaj sude de la plej alta montaro de Albanio, 2694 metrojn ...



El la kastelo de Shkoder

Suprenirado ĝis la kastelo de la unua ofertas, kiel supozite, revan rigardon super la ebenaĵo, la urbo, la maro kaj la montaro de la ĉirkaŭaĵo. Sed, kiel en Saranda, la impet-deziro konstrui domaron ne konas limon kaj stariĝas feri-apartamentoj en granda malordo ... kiel antaŭ 50 jaroj ĉe la hispana *Costa Brava*, apartamentoj, kiuj hodiaŭ ne plu trovas aĉetantojn! Ni bondeziru sukceson al tiuj konstruaĵoj! Sama fenomeno ekzistas en pluraj landoj eskapintaj el la komunismo, kiel ekzemple en Bulgario rando de la Nigra Maro. Shkodër ĉarmas nin pro la impona fortreso kaj la tute **nova alloga centro por piedirantoj.**

Je la 10a matene, sabaton la 29an, ni pli ol plezure enbusiĝas kun nia fidela amiko Bardhyl, deĵoranta ĉiĉerono, kiu akompanos nin por densa malkovro de vizitindaĵoj, direkte al *Bajram Curri*, nord-oriente, ĉe la limoj de Albanio. Pro nekomfortaj monto-vojoj pli oportunas laŭiri superban aŭtovojon ĝis *Prizren*, en la najbara Kosovo, kaj de tie traveturi la ebenaĵon antaŭ ol re-eniri Albanion pli norde, atingante *Bajram Curri* laŭ la plej bonaj kaj la plej rapidaj kondiĉoj.




Nova aŭtovojo en Kosovo

Sed denove pluvo akompanos nin en tiu impresa ĉirkaŭaĵo. Tiom pli, ke ni konscias pri la gigantaj laboroj postulataj por konstrui tiun superban aŭtovojon kaj tunelon meze de turmentita reliefo... Necesis ja energio kaj kompetenco. Ĉi-foje ni fulme transiris la landlimojn kaj la traveturado de Kosovo ne surprizis nin. Ĉar tiu lando, kiun kelkaj nacioj persistas ne "agnoski", tiom pli ke ankaŭ ili spertas samajn politikajn problemojn, travivas plenan disvolviĝon, kiel Albanio. Oni eĉ ekvidas vent-motorojn, male al ĝia najbarino!

Valizojn en la hotelo tuj post nia alveno, sendube malnova feri-centro de la "malnova epoko" kaj per loka taksio ni ekveturas al *Valbona*, plej lasta celo de tiu vojaĝo. Sed la albana montaro ja ne volas oferti la malavaran sunon, kiun ni ĝuis dum niaj aliaj ekskursoj. Griza ĉielo, surmeto de varma vestaĵo. Ni rapide enpenetras tamen abruptan montaron, en kiu mi tiom volintus piediri ... Sed malfruiĝas, ni dediĉos iom da tempo por vespermanĝi en restoracio por "migrantoj" kaj re-laŭveturos difektitan ŝoseon, ĝis nia "sovet-hotelo" – tute propra esprimo nia!- kiam ni deziras aludi konstruaĵojn el la komunista epoko ... NI ja devas konstati, ke ĉiuj posedas ja ian "famili-aspekton" !

La postan tagon, dimanĉon la 30an, ni vere bedaŭras forlasi tiun mont-pejzaĝon, kies kadron ni sopiris malkovri kaj admiri, kiel ni tiom ŝatas, sed buso ne atendas. Ni veturis la saman itineron inverse ĝis *Gadime*, kie per taksio ni trafis kuzojn de Bardhyl, kiuj gastis en la regiono, kaj kune kun ili ni vizitis grotojn kun granda intereso.



En la 80-miljonjara marmora groto de Gadime en Kosovo

Jen plue okazo elvoki la estontecon de tiu parto de Eŭropo kaj ĝian eventualan eniron en EU. Dank'al Esperanto - ĉar la albana lingvo restis por ni tute nekomprenebla - ni satigis nian scivolemon!

La lastan vesperon en Tirana ni dediĉis al amika kunĉeado, dum kiu ni kore dankis al Bardhyl por la atento kaj komplezemo, kiun li daŭre esprimis dum nia gastado. Ni plezure aprezis la partoprenon de lia edzino en bongusta vespermanĝo en la restoracio "Gloria" ... Tiu neforgesebla momento konkludis mirindan estadon, kiu sukcesis ĉiuvidpunkte!

Ni tutkore dankas denove nian gastiganton kaj memevidente nian serveman ŝoforon Artur! Ambaŭ ebligis al ni konkretigi vojaĝon en tiu "mistera Albanio", ĉar nekonata, sed tiom alloga!

D: Certe vi konstatis multajn mankojn en la lando rilate la infrastrukturon, trafikon, vivmanieron, ks. Ĉu vi povas mencii tion?

Anstataŭ ol elvoki la de vi aluditajn mankojn, mi taksas pli oportune raporti pri kio mensfrapis nin, ĉiuteme.

= Tiu lando, eĉ je eta amplekso, 340 x 150 km-ojn maksimume, ofertas grandan variecon de pejzaĝoj: ebenaĵoj, mar-randoj, montaroj, kamparoj, arbaroj, sekaj regionoj, ktp ...

= Rimarkiĝas enorma kontrasto inter "tradicio" kaj "moderneco", laŭ urbanismaj vidpunkto kaj vivmodoj, kiun ni ŝuldas al eniĝo de unu periodo al alia dum tre kurta tempo, apenaŭ 20 jaroj, male al okcidentaj landoj, kie la ŝanĝiĝo okazis malrapide dum 60 jaroj.

= "Sovaĝa" afiŝado iĝas tro libera kaj ĝin oni devos "reguligi", ĉar tio vere makulas konstruaĵojn kaj pejzaĝojn. Eĉ politikan propagandon oni malkovras sur historiaj konstruaĵoj, jen prioritato por leĝigi!



La granda bulvaro de Tirana

= Abundo da alilandaj lernejoj kaj kuracejoj ŝajnas elmontri ian mankon pri sanzorgado kaj edukado, tiom pli ke tio instalas servojn laŭ du "rapidecoj", lige al monposedo.

= La plej "videbla" farenda strebado koncernas starigon de traktado de la rubaĵoj: apartigo, forpreno, deponejo, ekologia traktado, reutiligado, ĉar la maniero alfronti tiun problemon montras la staton de disvolviĝo de iu lando! Ni ne malkaŝu tamen, ke Francio ne estas unu el la plej gratulindaj "lernantoj" tiuteme!

= Ega kontrasto inter "Mercedes" kaj ĉaretoj trenitaj far bicikloj aŭ ĉevaloj, kiujn oni foje trafas sur aŭtovojoj kvarŝoseaj! Stirado de veturiloj iĝas tre danĝera, ĉar la trafik-kodo ne estas obeita, ekzemple la temo de prioritato en la tiel nomataj "rond-kruciĝoj". Ĉar tion ne ignoras alilandaj turistoj, kiuj sekve hezitas uzi siajn proprajn veturilojn aŭ eĉ rezignas pri la

servo de lu-preno, pri kio ni mem unue ankaŭ pensis. Jen enuiga situacio, ĉar turismo riskas lokiĝi nur sur marbordo aŭ reduktiĝi je lu-preno de fiksjaj rezidejoj, en internaciaj "kluboj", kiuj enpoŝigas devizojn! Tio tute ne favoras albanan ekonomion! Sekve "turismo" malfacile eniras la landon, kiel ekzemple en Kreto, kie grupiĝas turistoj nur en la du ĉefaj urboj, *Heraklio* kaj *Rethymnon*! Nu, urĝas "eduki" la stirantojn!...



Aerporto de Tirana

Plej mirigis nin konstatante, ke la piedirantoj trairas stratojn je 4 ŝoseoj, sen iu ajn timo, kun totala senkonscienco! Mi malkovris lertan sistemon cele malrapidigi alvenantajn veturilojn, tio je tre modesta prezo; temas pri ŝnurego fiksita sur la ŝoseo, ŝajne iagrade pli efika ol la pli ellaboritaj sistemoj ege multekostaj, uzataj "ĉe ni"! Same sistemo de surgrundaj kroĉiloj, kiuj supren- kaj malsupreniras, kiam oni elektas la unikan permesatan ŝoseon! "Bravo"!

= La prezo de benzino estas kompanse alta, 1,30 € koncerne senplumban karburadon, kompare kun la enspezaro de la albanoj aŭ kun aliaj produktoj regule uzataj, kaj ĉefe al la prezo postulata en Francio nuntempe, 1,60€ ... La ŝtato devas konscii, ke se oni posedas sufiĉe da rimedoj por aĉeti veturilon, oni havas sufiĉe da mono por funkciigi ĝin ... Ĉe ni veturilo estas taksata necesa posedaĵo de ĉiu civitano, kiun li devas uzi por plenumi labortaskon...

= Kutimo kiel en Francio, en Elzaso, farbi fasadojn je diversaj tre vivaj koloroj estas tre agrabla por la okuloj, plue tio gajigas makulitajn aŭ certagrade difektitajn fasadojn.



Sur la trotuaroj de la albanaj stratoj

= Konstatigās disvolviĝo de "distro-domaroj" longe de la mar-bordo en la urboj Durrës, Lezhë, Sarandë, kaj tio laŭ anarkia kaj eksternorma maniero, tiom pli ke raras turistoj sur la aluditaj plaĝoj! Kiu venos okupi tiujn apartamentojn? Kion volas Albanio? Turismo por homsvarmo aŭ "elektita" turismo? Bedaŭrinda situacio por tre allogaj lokoj. Ekzemple, ĉu oni sukcesos antaŭgardi la lagunon de *Karavasta*? Intereso de iu lando ne mezuriĝas laŭ grava priatento de lokoj taksataj heredaĵoj de Unesko, sed ĉefe je kapableco respekti kaj valorigi posedatajn juvelojn!

= La okuloj aprezas konstati, ke "aeraj" tubaroj malaperas subgrunde!

= Feliĉe limiĝas ĝis nun la invado de tutmondaj komerc-centroj, kiuj iom post iom malaperigas la etajn, simpatiajn strat-butikojn, kie oni povas havigi al si regionajn legomojn kaj fruktojn tre bongustajn, kiuj ne originas el la antipodoj! Momente nur "Carrefour" mi vidis. Tion ni spertis proksime de nia hotelo, kie oni plezure aĉetis ĉiutage maturajn fruktojn: ĉerizojn, abrikotojn, bananojn, ktp. Sed la potencaj grupoj internaciaj ankaŭ ĉeestas kaj enkalkulas altrudi siajn vidpunktojn al la albana ekonomio, ne forgesante la "furiozan" normaligon: *Mac Do*, pizza-butikoj kaj aliaj ... Tutsame por estigoj de bankoj aŭ fabrikoj de veturiloj.

= Multnombraj kafejoj, kie kunĉeadas gastoj antaŭ trink-glaso ... Iom mirige: ĉetablas virinoj aŭ viroj, raras ambaŭ sammomente! Tiuteme malmultas restoracioj. Oni povas observi, ke

jaroj da komunismo ne forpelis ian patriarkan kulturon prapatran, kiu kun alveno de la liberalismo ŝajnas ree iĝi hodiaŭa modelo. Io mirfrapis min: oni ne vidas promenantajn parojn, manenmane, kiuj publike kisas sin, kiel tio kutimas en "latinaj landoj"! Manko de restoracioj, kiuj proponas albanajn specialaĵojn, kuraĝigas instaligon de "fast foods"... Ege bedaŭrinde, tiom pli ke malfacilas disponi pri menuoj en la angla aŭ la itala lingvo, kiun ni, francoj, sukcesus kompreni. Kuraĝigon kaj gratulon al kelkaj tiaj iniciatoj, kiuj evitas al "malsatantoj" gastigi je hazarde renkontitaj, aluditaj "fast foods", kie ili "vidas", kion oni proponas!

= Oni konstruas kiel oni volas: loko, arkitekturo, alto, surgrunda areo, ktp; urĝas ellabori regulojn por ne minaci lokan belecon, tiom pli ke multaj konstruaĵoj ne konas finpretiĝon.

Grava bedaŭrindaĵo! Restas ankoraŭ signoj de la komunista epoko, konstruaĵoj intreralie, kazematoj aŭ la "piramido" centre de Tirana ekzemple, kiuj ne eskapas je la modo de la "murdesegnaĵoj". Sed ĉar ili estas parto de historio de Albanio, domaĝus ilin detruiri, male oni savgardu kelkajn post renovigo, tiamaniere ke la junularo povu aprezi la ŝanĝiĝon ne forgesante, ke ĝi datumas el proksima periodo! Trafa ekzemplo de rehabilitado, la "Blok".



La centro de Tirana

Tamen stariĝas en la tuta lando multnombraj statuoj honore al la patrolando kaj tiu sinteno ŝajnas ankoraŭ grava ĉiuloke. Cetere "ŝvebas" ĉie la albana, nacia flago!

= Logiko volis, ke Tirana iĝu ĉefurbo, ĉar lokita en la centro de la lando, kio, racie, estas bona ideo, sed tio ne respondas al klasika disvolviĝo de antikva urbo, rando de riverego por plenumi la bezonojn de grava loĝantaro. Tio estas parto de ĝia originaleco, kaj ĝia situo 40 km-ojn for de la maro, piede de la monto Dajti, estas bonŝanco. Tiu-ĉi lasta devus nepre fariĝi la "verda pulmo" de la urbanoj, per multifacetaj aktivaĵoj, ligataj al la libera tempo, vintre kaj somere.

= Kiam en Francio oni elvokas Albanion, la konversaciantoj aludas problemojn de sekureco! Memevidente ni vidis policiston ĉe enirejo de bankoj, tre malofte por respektigi la trafikregulon, sed neniumomente ni sentis ian antaŭtimon dum promenadoj, kaj eĉ vespere en Tirana aŭ en vizititaj urboj. Koncerne la "poŝ-vizitantojn", evidentiĝas ke ne ĉi-tie ili agadas, sed en Parizo aŭ en Barcelono!

= Ni ankaŭ admiris florojn, kiuj elvokas la landojn borde de Mediteraneo: laŭroj, bugenviloj, bignonioj, hibiskoj, sed ankaŭ magnolioj kun larĝaj folioj dumjunie ...

= La albana lingvo ŝajnas al ni tute nekomprenebla tiom pli, ke la albanoj elparolas fluege je itala maniero, kaj tio tiom laŭte, ke ili ŝajnas sperti kolereton, kiam ili esprimiĝas! Koncerne muzikon, krom tiu por la junularo, ĝi similas al nia propra, kaj ni ne havis bonŝancon aŭskulti verkaĵon tipe albanan. Eta bedaŭrindaĵo.

= Religia kulto ŝajnas reakiri gravecon, se konsiderante konstruaĵon de novaj preĝejoj ortodoksaj, katolikaj aŭ dediĉataj al monaĥoj "dervish". Tio ankaŭ konstatigis en aliaj eks-komunistaj landoj.

= Oni sentas, ke ĉe la junularo estiĝas forta deziro "okcidentaniĝi", roboj por festa edziniĝo, jam menciitaj "fast-foods" ekzemple ... Domaĝus, se oni lasus malaperi ĉiujn specialaĵojn de tiu bela lando. Eĉ se la mondo suferas je financa krizo, oni konstatas tie-ĉi nepran apetiton je disvolviĝo.

= Dise oni vidas bovinojn, azenojn aŭ ĉevalojn ligatajn al fosto sen iu ajn eblo moviĝi, kio estus taksata aliloke kiel malbona traktado de bestoj. Eble tion oni eble ŝuldas al manko de disponeblaj grundoj kultiveblaj. Same agrokulturo restas ankoraŭ malmulte mekanizita, multaj personoj kultivas per ŝovelilo aŭ pioĉo. Probable ĉar poseditaj grund-areoj estas tro malgrandaj. Ekonomia disvolviĝo ŝajnas estiĝi prioritata je komerco kaj ne je agrokulturo.

Ĉar vivante antaŭe en ia aŭtarcio, estis necese prizorgi kultiveblan grundon, devigante ligi bestojn je fostoj. Fakte nenie vidiĝas instalaĵoj por bredado. Krom ŝafoj aŭ kaprinoj, oni ne manĝas ofte bovaĵon aŭ ĝi devas esti importata mi opinias, ĉar la bovinoj estas tro magraj por disponigi viandon por pretigo de bonaj pladoj ... Sed abundas fiŝoj direkte kaptitaj ĉe la bordo aŭ en la maro. Ni esperu, ke daŭros tiu valoraĵo. Cetere ni ĉeestis en Pogradec fiŝ-kaptadon per reto! Nur okaze de festo vidiĝas tia evento ĉe ni! Ankaŭ miriga konstato: la manko de oliv-arbaroj kiel en najbaraj landoj. Pri deserto, krom itala "tiramisu" aŭ glaciaĵoj el kuveto, la franca "frandemul(in)o" sentas ian mankon! Feliĉe abundas sukulentaj fruktoj ... eĉ "mirabelle", emblema pruno el nia lorena regiono! Vera surprizo malkovri tiun flavan frukton en Albanio, tre rare kultivita en Francio aŭ aliloke!

= Interese gas malkovri en muzeoj, speciale pri etnografio, objektojn tute similajn al tiuj de niaj preparencoj, sed en tre malsimila viv-ĉirkaŭaĵo.

= "Liberaj" hundoj vagadas iome ĉie, sed ili ne ŝajnas agresivaj ... Neniu "dom-hundo" ligata al ŝnuro, kio por ni estas tre agrabla konstato, ĉar en Francio la kulto de la familia hundo troas! Nu, tia sinteno daŭru en Albanio!

= Pri industrio, ne vidiĝas multaj termikaj centraloj... Kiamaniere produktiĝas energio? Cetere disvolviĝas foto-voltaikaj paneloj, aldonitaj al akvo-cisterno ankritaj sur la tegmentoj, kiuj tradicie ne poluas. Kune ili ofertas ian energi-aŭtonomion, kiun oni devas maksimume kuraĝigi. Aliflanke staras en Kosovo vent-motoroj ... Eble tion ankaŭ instalos fakaj inĝenieroj en Albanio.

= Inter la sinsekvaj civilizacioj la romiana postlasis la plej gravajn restaĵojn. Oni konstruis "solide" tiuepoke, niaj monumentoj ne akiros tiom longan vivon! Sed tre agrablas promeni tra Tirana por ĝui ĉiujn stilojn de arkitekturo, ĉefe italan, grekan, balkanan, ktp. Hodiaŭ la stilo de freŝbakitaj domoj elvokas tiun, kiun oni renkontas en Rusio, Ĉinio aŭ en ĉiu lando en periodo de disvolviĝo. Bedaŭrindas konstati, ke eĉ tio submetas sin al tutmondiĝo, despli domaĝe ke la balkana stilo de malnovaj domoj, kiel ekzemple en Bulgario, ofertas tre personan vizaĝon de la lando.

= La fervojo ŝajnas forlasita, almenaŭ por transporto de la homoj, profite al uzo de busoj, pli "flekseblaj" kaj malpli kostaj. Tamen linio Tirana-Pogradec meritis modernigi por iĝi inter junio kaj septembro turista vojo, ĉar ĝiaj art-konstruaĵoj kaj itinero aparte allogaj, tra montaro kaj panoramo super la Ohrid-lago, estigus turisman atuton por alilandaj gastoj, kiuj aprezus tian proponon!

= Ni ŝatis la eblecon tranokti en hotelo laŭ modesta prezo, kiu disponigas klasikajn necesojn, kaj plue, lokigita apud la centro. Denove dankon al Bardhyl! Oni devus tamen inciti vilaĝanojn disponigi "gasto-ĉambrojn", tre aprezataj de vojaĝantoj, tio favore al alveno de turismo internen de la lando. Notinde: uzi efikan inform-dokumentaron ekstere laŭ hodiaŭaj normoj, ebligante malkovri facile, kion oni serĉas, monumenton, restoracion, ktp... koncerne "reklamon", tro abundas ĉiuspecaj paneloj, kiuj agresas la rigardon, ĝis malkaŝi ian indikon pri kiu oni bezonas!

= Sed nia unika bedaŭrindaĵo estas la neebleco atingi la valon de *Theth* pro ne facilaj uzeblaj transport-rimedo troveblaj, cele malkovron de tiu alloga loko, certe tre "distanca", sed vere vizitinda! Jen io prizorgenda por la turismo, cele faciligi la uzotan itineron. Verŝajne ekzistas gasto-ĉambroj, sed kiamaniere profiti ilin, se la aktuala vojo restas nepraktikebla? La unua plezuro de turistoj estas aprezi la traveturatan pejzaĝon... kaj ne la truojn en la ŝoseo. Tiam li ĝisfunde poste ĝuos vagabondadon kaj gastiĝon memorindajn! Valo al *Valbonë* estas en fazo de taŭg-aranĝo, jen io eksterordinara kaj espero por *Theth*! *Shkodër* posedas siaflanke laŭ turisma avantaĝo bonegajn plusojn, ĉar proksimas akvo, lago aŭ maro kaj montaro. Jen bonŝanco valorizenda kiel en Francio *Nico* kun postregiono, aŭ *Genevo* en Svisio.

Jen kialo, pro kio necesas doti Theth je mankantaj rimedoj. Kaj tiu komplemento allogos alilandajn turistojn. Ne surprise, se vojaĝ-agentoj, kiujn ni konsultis por elekti intereso-centrojn en Albanio, proponis ĉefe itinerojn tra montaroj, ĉar tio iĝas pli fruktodona ol proponi ĉeestadon ĉe la maro, kaj konstatiĝas, ke pli oftas tiaj demandoj el la turistoj de okcidenta Eŭropo.

= Jen do la frukto de niaj observoj, konkretigitaj per pli ol 5000 fotoj, kiuj ebligas konservi, daŭre vivantaj, memoraĵojn pri lando ege alloga, riĉa je historio plur-kultura kaj je geografio multfaceta, ofertante superbajn pejzaĝojn, sed ankaŭ la kondensaĵon de la viv-sintenoj de la homaro, formita far jarcentoj, kaj hodiaŭ malfermita al tio, kion povas alporti al ĝi el la mondo plejbonaĵon.

D: Ĉu vi pensas ke indas reviziti Albanion post kelkaj jaroj? Ĉu vi rekomendus, ke tion faru ankaŭ la aliaj vialandanoj?

Kiel vi certe komprenis, montaron ni ŝatas, kaj cele profiti tiun superban ĉirkaŭaĵon ni kun plezuro retrovus Albanion por ĝui neĝ-rakedon aŭ trapiedumadon. Sed nia amikeco kun Bardhyl povus iĝi dua okazo de revizito, ĉar li sukcesis spite familiajn devojn, organiziĝi por dediĉi al ni plej eble maksimuman tempon! Kaj tion, ni ne pretas forgesi!

Tuj post nia rehejmiĝo ni elvokis Albanion "ĉirkaŭe" kun multe da entuziasmo. Baldaŭ, en la regiona dulingva bulteno "La Informilo", kiun redaktas Pol, aperos rakonto de nia epopeo. Jen la plej fruktodona reklamo farebla por promocii turismon en via lando. Dankon al ĉiuj albanoj, kiuj malkovrigis al ni sian landon kaj varme akceptis nin.

Multan dankon!

Aldonaĵo

Ekzistas artikolo verkita de Pol Denis kaj Mirej Turck La Informilo n°63 de Esperanto France-Est 2013, paĝoj 14 -17.

8.4 Fabbrizio Penacchietti

Vera historio el la dua mondmilito

Mia patrino, Francesca TRASCIATTI (1911-), memoras nur ke ŝi akompanis sian edzon, Mario PENNACCHIETTI (1906-1999), mian patron, al Albanio printempe de 1941 kaj ke ŝi restis tie kun li nur du monatojn. Mia patro (tiam 34-jaraĝa) deĵoris en Tirano kiel kuracista kapitano de "Carabinieri" (ĝendarmoj) kaj intertempe okupiĝis privatcele pri antropologiaj mezuradoj (ekzemple pri la proporcio inter la longoj kaj larĝoj de la diversaj partoj de la kranio ĉe plenkreskuloj viraj kaj inaj).

Por enketi kaj mezuri ankaŭ virinojn en islama kvartalo li bezonis la intervenon de helpantino. Tial li venigis de Italio sian edzinon (tiam 30-jaraĝan) kiu estis ruĝkruĉanino. Ili loĝis en unufamilia vilaeto en ĉarma parto de la albana ĉefurbo. Ili

kutimis tagmanĝi kaj vespermanĝi en la restoracio por italaj oficiroj en hotelo centre de Tirano. Ili kune laboris en ĝenerala hospitalo. Fojon ili partoprenis en tendumado en aparte agrabla monta regiono, kie la domoj estis ligne konstruitaj. Tie ili aĉetis buntan tapiŝon.



Prelego en Timiŝoara, 2006

Bedaŭrinde, kiam poste mia patrino ĝin lavis en Italio, ĝi perdis multajn el siaj koloroj. Fojon ili eĉ vizitis la grekan insulon Korfu. Dum tiuj monatoj mi (dec. 1938, do tiam 2-jaraĝa) kaj mia fratino Guia (nov. 1939) estis gardataj de eĉ du vartistinoj ĉe niaj patraj geavoj en la Liguria-ĉemara urbeto Chiavari (Ĝenovo).



En Timiŝoara, 2006, kunkafumado, maldekstre Fabrizioo

La rezultoj de la antropologiaj mezuresploroj de mia patro estis prezentitaj disertaciforme de mia fratino Guia okaze de ŝia magistriĝo pri biologiaj sciencoj. Sed pri tio kun mia fratino mi ankoraŭ ne parolis. Ek de pli ol 40 jaroj ŝi loĝas en Istanbul, nun kiel pensiulino (emerita direktorino de kemia laboratorio kaj avino de 6 genepoj).




Korajn salutojn kaj ĝis baldaŭ
Fabrizio Pennacchietti, Torino, Italio

Aldonaĵo

Monografio

La heredeca teorio kaj la genetika strukturo de la albana loĝantaro laŭ la sangaj grupoj



Tercie ereditarie
 e struttura genetica della popolazione albana
 nei riguardi del gruppo sanguigno
 per il
Dr. MARIO PENNACCHIETTI, Docente di Clinica Neurologica
 (Comunicazioni fatte alla Società del 11 Giugno 1943)

Finché la mia permanenza come medico militare in Albania dal novembre 1940 al gennaio 1942, mi pose sempre sotto l'indirizzo del prof. Sergio della distribuzione dei gruppi sanguigni nella popolazione Albanese, dato biologico non ancora noto, e che quindi esprimeva un certo interesse antropologico.

I risultati di questa mia ricerca sono stati comunicati alla Società di Antropologia e di Embiologia nella seduta tenutasi in Firenze il 2 dicembre ultimo scorso, sui miei appunti ho avuto trovato una distribuzione percentuale di 41,44% di O, 55,39% di A, 13,25% di B e 5,86% di AB.

Dai dati percentuale distribuzione dei gruppi sanguigni in Albania, che rappresenta caratteristiche proprie di questo gruppo etnico, ho trovato interessanti risultati alle leggi ereditarie che regolano la trasmissione nei gruppi sanguigni e che possono per così dire essere rianimate ad una determinata e notevole frequenza genetica. Il punto di contatto di ereditarietà dei gruppi sanguigni li avevo elaborati secondo mi riferirò brevemente ad essi.

Ogni carattere ereditario è dovuto ad una coppia di fattori Mendeliani che rappresentano modalità del carattere stesso, e la sua dominanza e recessività.

A proposito dei gruppi sanguigni Davenport e Hirsfeld nel 1910 hanno stabilito due diversi caratteri che hanno considerato separatamente il 2 gruppo A, non A e B, non B. Hanno così trovato che quando portati dal carattere A avevano fatti portatori dello stesso carattere nella proporzione di 3 ad 1, e che così avveniva anche per il carattere B. Questi questi due hanno considerato il fattore Mendeliano A come dominante su non A e B dominante su non B.

Nel loro calcolo questi autori non hanno mai considerato il gruppo sanguigno naturalmente, ma hanno tenuto conto solo di ereditarietà dei due caratteri A e B, e così per se consideravano come portatori del carattere A i gruppi A e AB, e come portatori di questo carattere i gruppi O e B. E dalla frequenza dei due gruppi non si determinava esattamente l'eterogeneità dei portatori della stessa linea ebbene la percentuale dei soggetti omozigoti e di quelli eterozigoti fu appunto ad ogni carattere, trovando in ogni popolazione valori dati ai caratteristici. Stabiliscono così in un

- 3 -

gruppo germanico che su 100 figli il 18,5% erano eterozigoti e 15 soltanto omozigoti, e su 100 B il 93% era eterozigote ed il 7% omozigote.

Nel 1924 Mino ha voluto molto più opportunamente studiare in modo unitario il gruppo sanguigno e le leggi della sua ereditarietà, e lo ha considerato come un carattere unico iniscindibile dovuto al concorso di 2 coppie di fattori Mendeliani A, non A e B, non B e cioè come un carattere digeno. Questa sua interpretazione si fonda su considerazioni biologiche riservate dalle reazioni anticorpo di gruppo negli animali. Egli ha così creato degli schemi, che come quelli di Bushkara, tengono conto delle due coppie allomorfe.

In via teorica per Mino come per Hirsfeld la combinazione dei vari fattori Mendeliani fa prevedere per i 4 fenotipi umani A B O AB 9 combinazioni genotipiche, la cui conoscenza ha importanza fondamentale per lo studio delle possibilità ereditarie, ed esse sono:

fenotipi	A	B	O	AB
genotipi	A, A non B, non B	B, B non A, non A	non A, non A non B, non B	A, A B, B
	A, non A non B, non B	B, non B non A, non A		A, A B, non B
				A, non A B, non B
				B, B A, non A

In contrapposito alla interpretazione di questi Aa. Bernstein nel 1924 ha proposto la teoria dei tre allomorfi, per la quale i fattori ereditari sarebbero solo 3, e cioè i geni P e Q dominanti, che determinerebbero rispettivamente gli agglutinogeni A e B, ed il gene R recessivo portatore della caratteristica O. Di questi fattori i due dominanti sarebbero anche equivalenti, e cioè se uniti nella stessa coppia Mendeliana determinerebbero la comparsa di entrambi gli agglutinogeni, cioè il gruppo AB.

Questa teoria ha l'inconveniente di non prevedere la agglutinina, che per Mino sarebbero determinate dalla presenza del recessivo omozigote a,a - b,b.

Con la teoria di Bernstein le combinazioni genotipiche si vengono a ridurre a 6 e cioè:

fenotipi	A	B	O	AB
genotipi	PP PR	QQ QR	RR	Q ¹



La grupon prizorgis la enlanda agentejo "Tirana", kies estro estas s-ro Adem Ymeraj. La gvidanto kaj ĉiĉerono estis Bardhyl Selimi. Ekde la 30 - a de julio ĝis la 6 - a de aŭgusto la grupo vizitis preskaŭ la tutan marbordan parton de Albanio, ekde Shkodër ĝis Butrint, inkluzive de la urbo-muzeoj de Gjirokaŝtër kaj Berat.



Estis relative longa vojaĝo - ĉirkaŭ 1500 km - sur niaj ŝoseoj ne tre bonaj kaj densa programo de vizitoj. Tamen, malgraŭ la relative alta averaĝa aĝo de la grupanoj, ni diru pli pl 45 jaroj, dank' al la scivolemo, bonkomprenemo, amikiĝemo karakteriza por esperantistoj ĝenerale, neniu el la grupo malsaniĝis, nek rezignis de la vizitoj kaj ĉiuj estis kontentaj.

Ĉiuj raportoj al ni por la situacio en Albanio estis malfavoraj. Laŭ ili, ĉi tie la danĝero renkontiĝas ĉiun paŝon, la infrastrukturo estas malbona, vojaĝo ne sekura. Ni eĉ aĉetis du botelegojn da akvo en Ljubljana pro timo de manko eĉ de akvo en Albanio. (Josef Shemer : Nikola Raŝić eldiris avertojn kaj eĉ sugestis al ni rezigni je la vojaĝo al Albanio!)

Male, ni vere povis ĝui la landon. La personoj ĉi tie estis tre amikaj kaj la vojaĝoj tre interesaj. Estis por mi eble la plej bela aventuro. Ni estis korespondintaj longe kun s-ro Bardhyl kaj certe la interreto helpis al ni.



Tre kortuŝa estis la vizito en Shkoder al la familio de la forpasinta Zef Mjeda, Honora membro de UEA, kie lia nepino Klea konversaciis tre bone en Esperanto kun la samideanoj kaj s-ino Anjeze Mjeda regalis ĉiujn per malvarma suko. Ankaŭ interesaj estis la renkontiĝoj kun esperantistoj, studentoj kaj aliaj (s-ro Vasil Pistoli, Zamir Gjurgji, Matilda Sokoli, Enkela Xhamaj, Fjoralba Ceno), kiuj akompanis la grupon dum la vizitoj en Tiranë kaj ties ĉirkaŭaĵoj. La gastoj havis okazon renkontiĝi ankaŭ kun la "Junulino Albanio 2001", f-ino 14-jara Enisa Ĉela, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis studinta Esperanton, kvankam fakte ŝi estis forgesinta iom ĝin pro manko de praktikado.

Dum la adiaŭa vespermanĝo ĉiuj esprimis bonajn impresojn pri la vizito ĉe ni en la restoracio " La Perla", la 5-an de aŭgusto 2001.

William R. Harmon tostis por Albanio kaj la Esperanto-komunumo.

Lucille Harmon donacis je la nomo de ELNA serion de dekunu videokasedoj de "Pasporto al la tuta mondo".

Yung Myung Kim: Mi demandis ĉe la albana ambasado en Pekino, ĉu mi bezonas enirvizon por Albanio helpe de mia amiko tie, kaj oni diris ke ne. En mia lando neniu parolas pri Albanio.

Yamasaki Ryoza: Ankaŭ ĉe ni, krom eventoj en la eksa Jugoslavio, nenio alia estas sciigita pri Albanio. Mi certe nun propagandas pri Albanio en mia lando. Li aldonis, ke "Albanio estas lando de suno, de monda heredaĵo, de historiaj vizitindaĵoj, lando de braveco, lando de heroeca batalo por sendependeco sub la gvido de Skanderbeg, lando de gastiganteco."

Hartmut Fillmann rakontis historiaĵon el lia lando Saarlando.

Certe similaj vizitoj kontribuos ankaŭ al la disvastigado de Esperanto en nia lando (fakte ĉirkaŭ dek personoj renkontitaj survoje estis pretaj eklerni esperanton), kio vidiĝis ankaŭ en la intervjuado de kelkaj grupanoj fare de ĵurnalisto de la Albana Ŝtata Televizio, s-ro Fiqiri Sejdiaj en Berat.

8.6 Albanio- lando de kontrastoj

(Vojaĝimpresoj de s-ino Ela Karzewska)

Traserĉante en mia arkivo, mi trovis hazarde artikolon kun intervjuo farita en la jaro 2003 de loka ĵurnalistino. Ŝi demandis min interalie pri miaj nerealigitaj revoj. “Viziti Albanion”- diris mi.

Mi naskiĝis en eta urbo de la Malsupra Silezio. Tie loĝis diversaj familioj, kiuj pro ŝanĝo de la landlimoj post la Dua Mondmilito, serĉis novajn eblecojn por vivi pace, eĉ estis ankaŭ grekoj kaj albanoj, kaj ŝajnis al mi ke ties infanoj kunvivis harmonie frekventante la saman lernejon.

En la jaro 2012 s-ro Tomasz Chmielik tradukis esperanten la romanon “Hunda Haŭto” de la nuntempa albana verkisto Fatos Kongoli kaj kun komunaj klopodoj de sponsoroj, interalie de elzasano Edmond Ludwig kaj de bibliotekoj de Podlahio, la libro eldoniĝis en Bjalistoko. Tiu evento vekis la ideon por vojaĝi al Albanio kaj renkonti la aŭtoron. Poloj, svedo kaj unu letonino konsentis per interreto por renkontiĝi en Tirana la 14-an de aprilo 2012.

En la Aeroporto, noktomeze, atendis nin la instruisto Bardhyl Selimi - la loka organizanto de nia restado. Dua grupo alvenis el Krakovo, tra Kroatio, per buseto. Nia celo estis ne nur konatiĝi kun la lando, sed ankaŭ propagandi esperanton, montrante ke en diversaj landoj, ĝi povas uziĝi por internaciaj renkontiĝoj. 50-minuta intervjuo pri Esperanto realigita kun ni estis travidita en la tuta Albanio.



La televida program Orkideo en ALSAT, pri la kulturo de Esperanto, direktita de Ema Andrea (foto: Stanislaw Mandrak)

Okazis ankaŭ renkontiĝo en la Akademio de Sciencoj, en la Ministrejo pri Kulturo, Sporto kaj Junularo, prelego en la Universitato de Tirana antaŭ la studentoj pri fremdaj lingvoj, Jola Kieres, el Nowy Saĉ, lekciiis amuze pri Esperanto uzante la metodon Cseh. Bardhyl profitis la okazon por noti sur la Nigra Tablo la elektronikan kontakt-adreson por la estontaj kursanoj.



La universitaj studentoj en Tirana atente aŭskultas pri Esperanto (foto: Stanislaw Mandrak)

La plej grava momento de nia restado estis la renkontiĝo kun la aŭtoro de la romano. Supozante ke oni parolos pri ties biografio, mi atendis ekvidi frustritan Donjuanon, sed ne..Modesta, ĉarma en interhomaj rilatoj, kun parolvoĉo malalta kaj tre agrabla, li lasis al ni bonan impreson.

Okaze de la promocio de la libro en la Akademio de Sciencoj ariĝis politikistoj, akademianoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, diplomatoj, esperantistoj kaj multaj ĵurnalistoj. Mi admiris la facilmanieron per kiu Bardhyl Selimi interpretis simultane la paroladojn de Tomasz, Fatos kaj aliaj parolantoj. Vekis aplaŭdojn la anonco ke, dank'al la universala lingvo, "Hunda Haŭto" alvenis en Pollandon, Luksemburgion, Usonon, Brazilon, eĉ en Madagaskaron. Tomasz havis la okazon rakonti pri aliaj libroj de la albanaj aŭtoroj tradukitaj jam en Esperanto.

Kion devas fari esperantistoj en via urbo por altiri la reprezentantojn de sep televido, minimume de 10 lokaj kaj tutnaciaj ĵurnaloj, la reprezentantojn de radiostacioj? Ĉifoje sufiĉis ke ili antaŭanoncu pri la renkontiĝo kun la elstara verkisto, kies verko estas eldonita jam en rara kaj ekzotika lingvo, parolata tamen en 120 landoj! La vorto "Esperanto" estis la sola, kiun mi komprenis provante legi la ĵurnalojn la sekvontan tagon.



Ni alportis 50 ekzemplerojn de "Hunda Haŭto" por ricevi aŭtografajn de la aŭtoro. La bonaŭgurojn por la bibliotekoj de Podlahio en Esperanto, en formo de privata letero, subskribis ankaŭ la eksa ambasadoro de Albanio en Pollando, s-ro Osman Kraja.

Al ĉiuj elstaraj homoj ni liveris skriban salutaĵon de la direktoro de la bibliotekoj de Podlahio en Esperanto, en formo de privata letero kaj po du libroj eldonitaj en Esperanto en Bjalistoko. Ĉiuj provis eklegi ilin!



La aŭtorino, centre, kun blankaj pantalonoj

Albanio estas por mi stranga lando kun kontrastoj. Alia lingvo, alia mentaleco. Mi supozis ekvidi rusan provincon, sed ŝokis min la supermodernaj domoj starantaj apud la kadukiĝantaj domoj. La malnova centro de Tirana fakte ne plu ekzistas. Survoje al la vilaĝoj tristigis min la skeletoj de la eksaj fabrikoj produktintaj, uzintaj rusan aŭ ĉinan teknologion, sed nun fermitaj pro manko de mendoj. En la modernaj vendejoj nur la lingvo de la etiketoj de la prezoj montras en kiu lando ni troviĝas, ĉar la produktaĵoj estas vere internaciaj. Ĉu vi povas imagi 1000 duopojn da uzitaj ŝuoj pendantaj sur ferstango uzata kiel ekspoziciejo? Tia vendejo mi ja vidis en Tirana. Sciante ke en Albanio 25 % de la loka produktado venas el agrokulturo, mi esperis viziti malfermitajn bazarojn plenajn de nutraĵoj kaj orientaj dolĉaĵoj. Bedaŭrinde tie oni vendis nur uzitajn vestaĵojn aŭ ĉinajn.



Kun la verkisto Fatos Kongoli

Shaban Hasani - nia gvidanto dum la turismaj ekskursoj - rakontis al mi, ke multaj albanaj familioj havas eksterlande siajn reprezentantojn, kiuj pli frue foriris aŭ lastan tempon vojaĝis libere por labori neleĝe kaj por sendi monon en la patruon. Pri la terura tempo de la reĝimo de Enver Hoxha rakontas ekspozicio en la Nacia Historia Muzeo en Tirana. Tiu tempo jam pasis kaj albanoj denove vekiĝas sen timo. Ekde la sepa horo matene la kafejoj estas plenplenaj je viroj konversaciantaj trinkante fortan kafon. Promenante tra plaĝo de Durrës ni admiris la modernajn ripozdomojn kaj la blujn naĝejojn kun kritalklara akvo por la etaj infanoj. Apude vidiĝas tubo per kiu ripozdomo eligas la malpuraĵojn en la maron. Sur multaj tegmentoj de la altaj kaj malaltaj domoj oni surmetis grandajn akvorezervejojn, ĉar en la diversaj kvartaloj de Tirana kaj de aliaj urboj la akvo estas porciumita.



Tirana, la ĉefurbo de Albanio (foto: Stanislaw Mandrak)

En la universitato mi vidis gejunulojn bone vestitajn, sed sur la stratoj aperis ordinaraj homoj, ne elegantaj, ne povraj. Plaĉis al mi, ke la viroj aspektis ĉiam razitaj kaj kun haroj frizitaj

mallonge. Ĉiuj ŝajnis pacamaj kaj paciencaj, ili ridetis al ni, kiam ni provis interkompreniĝi. Laŭ mi ili ne havis kompleksojn. La ĝeneralaj impresoj estas tre pozitivaj kaj mi esperas reveni en Albanion post kelkaj jaroj por vidi tion, kion mi ne povis vidi dum la kelktaga restado nia. Mi esperas, ke nia alveno helpis la lokajn esperantistojn propagandi esperanton ĉe la junularo, kion ni tutkore bonaŭguris al niaj gastigantoj adiaŭante ilin.